

Libro de Certeco

Bahá'u'lláh

La Kitáb-i-Íqán de Bahá'u'lláh laŭ la angla traduko de SHOGHI EFFENDI
tradukis Lidia Zamenhof

Transskribita el paperaj originaloj de Marcel Marien, Ireneusz Bobrzak,
Nicholas Bridgewater, kun kontrolo laboro de Marcel Marien

Prespretigita, kompletigita kaj korektita de Joop Kiefte por la Bahaa
Esperanto-ligo

Provlegita de Anneke Schouten-Buys

PROVLEGA VERSIO 9f57c8

Sendu viajn korektojn ĉiam kun la versio menciita ĉi-supre, indiko de parto
kaj indiko de verso, se aplikebla.

Tio ĉi estas Tago, en kiu la atesto de la Sinjoro estas plenumita, Tago, en kiu la Vorto de Dio estas aperigita, kaj Lia Pruvo firme starigita. Lia voĉo alvokas vin al tio, kio alportos al vi bonon, kaj ordonas al vi observi tion, kio proksimigos vin al Dio, la Sinjoro de Revelacio.

Bahá'u'lláh

ANTAŬPAROLO AL LA ANGLA VERSIO

Jen estas unu plia provo prezenti al la Okcidento, en traduko kiel ajn neperfekta, tiun ĉi libron de senegala signifo inter la verkoj de la Aŭtoro de la Bahaa Revelacio. Espereble ĝi helpos aliajn en ilia penado pri tio, kio devas esti iam konsiderata kiel neatingebla celo - pli taŭga prezento de la senkomparaj paroloj de Bahá'u'lláh.

Shoghi

PARTO UNUA

EN LA NOMO DE NIA SINJORO, LA SUPERECA, LA PLEJALTA.

1. Neniu atingos la bordojn de la oceano de l' vera kompreno, se li ne malligos sian koron de ĉio, kio estas en la ĉielo kaj sur la tero. Sanktigu viajn animojn, ho vi, loĝantoj de la mondo, por ke vi atingu tiun staton, kiun Dio por vi destinis kaj eniru tiel la tabernaklon, kiu, laŭ la decido de Providenco, estas starigita sub la firmamento de la Bayán.

2. La esenco de tiuj ĉi vortoj estas jena: tiuj, kiuj iras la vojon de kredo, tiuj, kiuj soifas la vinon de certeco, devas purigi sin de ĉio, kio estas tera: ili devas purigi siajn orelojn de senenhavaj elpensaĵoj, siajn mensojn de vantaj imagoj, siajn korojn de mondaj sentoj, siajn okulojn de tio, kio pereos. Ili devas konfidi sin al Dio, kaj, forte kroĉante sin al Li, iri Lian vojon. Tiam ili iĝos indaj je la brillumaj gloroj de la suno de l' dia kono kaj kompreno kaj ricevos favoron, kiu estas senfina kaj nevidebla, ĉar homo neniam povas esperi atingi la kornon de la Plejglora, neniam li povas trinki el la torento de l' dia sciado kaj saĝo, neniam povas eniri la restadejon de l' senmorteco nek ricevi parton el la pokalo de dia proksimeco kaj favoro, antaŭ ol li ĉesos rigardi la vortojn kaj farojn de mortemuloj kiel kriterion de la vera kompreno kaj ekkono de Dio kaj Liaj Profetoj.

3. Konsideru la pasintecon. Kiel multe da homoj, kaj altaj, kaj malaltaj, sopire atendadis en ĉiuj tempoj aperon de Manifestiĝoj

de Dio en la sanktaj personoj de Liaj elektitoj. Kiel ofte ili atendadis Lian venon, kiel fervore ili preĝadis, ke la vento de la dia favoro ekblovu kaj la promesita Belo elpaŝu el trans la vualoj de kaŝiteco kaj estu konigita al la tuta mondo. Sed kiomfoje la portalo de favoro malfermiĝis kaj la nuboj de la dia malavareco verŝis sian pluvon sur la homaron kaj la lumo de la Nevidebla ekbrilis super la horizonto de la ĉiela potenco, ili ĉiuj malakceptis Lin kaj turniĝis for de lia vizaĝo - lia vizaĝo de Dio mem. Por konvinkiĝi pri tiu ĉi vero turnu vin al tio, kio estas priskribita en ĉiu sankta Libro.

4. Pripensu dum momento kaj konsideru tion, kio estis la kaŭzo de tia malakcepto flanke de tiuj, kiuj serĉados kun tia fervoro kaj sopiro. Iliaj atakoj estis pli sovaĝaj, ol lango aŭ plumo povas priskribi. Aperite nek unu Malkaŝanto de Sankteco, kiu ne estis turmentata per malakcepto, malkonfeso kaj akra kontraŭtarado de tiuj, kiuj Lin ĉirkaŭis. Tiel estis dirite: »Ho mizereco de la homoj! Venas al ili nek unu Diosenditio, kiun ili ne priridas moke.«¹ Aliloke li diras: »Ĉiu nacio intrigis malglorre kontraŭ sia Diosendito, por meti perforte la manon sur Lin, kaj disputis per vanaj vortoj, penante senvalorigi la veron.«²

5. En simila maniero la vortojn, kiuj elŝprucis el la fonto de potenco kaj malsuprenvenis el la ĉielo de gloro, estas nekalkuleblaj kaj ekster la ordinara kompreno de homo. Al tiuj, kiuj posedas la veran komprenon kaj la internan vidon, la surao pri Húd sufiĉas sendube. Konsideru dum momento tiujn sanktajn vortojn

¹Korano 36:30

²Korano 40:5

en via koro kaj kun plenegoa korpureco penu ekkompreni ilian signifon. Konsideru la mirindan konduton de la Profetoj kaj rememoru la kalumniojn kaj malkonfesojn, venintajn el la buŝoj de la infanoj de neado kaj falso, por ke vi igu la birdon de la homa koro direkti sian flugon for de la restejoj de senatento kaj dubo al la nesto de kredo kaj certeco, trinki el la pura akvaro de pratempa saĝo kaj gustumi la frukton de la arbo de dia sciado. Tia estas la donaĵo de la pano, malsuprenveninta el la sferoj de eterneco kaj sankteco, kiun ricevas korpuro.

6. Se vi ekkonos la maljustaĵojn suferigitajn abunde al la Profetoj de Dio, kaj ekkomprenos la veraĵn kaŭzojn de la kontraŭparoloj, kiujn voĉis iliaj persekutantoj, vi certe rekontos la signifon de ilia pozicio. Plie, ju pli detale vi observos la neadon de tiuj, kiuj kontraŭstaris la Malkaŝantojn de la diaj atributoj, des pli firma estos via kredado en la afero de Dio. Mallonga mencio estos sekve farita en ĉi tiu tabuleto pri diversaj okazoj, koncernantaj la Profetojn de Dio, por ke ili elmontru la veron, ke en ĉiuj jarcentoj kaj epokoj la Malkaŝantoj de potenco kaj gloro estis subigitaj al tiel malindegaj kruelaĵoj, ke neniu plumo kuraĝas ilin priskribi. Helpu tio al iom da homoj, ke ili ĉesu lasi sin maltrankviligi per kriado kaj protestado de ekleziuloj kaj malsaĝuloj de ĉi tiu epoko, kaj igu ĝin ilin fortiĝi en la fido kaj certeco.

7. Inter la Profetoj estis Noa. Dum naŭcent kvindek jaroj Li admonadis preĝe sian popolon kaj alvokadis ĝin al la ĉielo de certeco kaj paco. Neniu tamen atentis Lian vokadon. Ĉiu-tage oni suferigadis al Li tiajn dolorojn kaj turmentojn, ke neniu kredis, ke Li tion postvivos. Kiel ofte ili Lin malkonfesis, kiel

malamike ili menciis siajn suspektojn kontraŭ Li! Tiel estis dirante: »Kaj kiomfoje aro de liaj samgentanoj pasis preter Li, ili mokis Lin. Li diris al ili: »Kvankam vi mokas nin nun, ni mokos vin poste, kiel vi nun nin mokas. En la fino vi scios.«³ Longan tempon Li plurfoje promesis venkon al siaj kunuloj kaj difinis ĝian horon. Sed kiam la horo ekbatis, la dia promeso ne estis plenumita. Tio ĉi kaŭzis, ke kelkaj el la malgranda nombro de Diaj sekvantoj turnis sin for de Li, kaj pri tio ĉi atestas la vortoj de la plej bone konataj libroj. Certe vi legis ĉi tion, kaj se ne, vi legos sendube. En la fino, kiel diras la libroj kaj tradicioj, restis kun Li apenaŭ kvardek aŭ sepdek du el Liaj disĉiploj. Fine Li laŭte ekkriis el la fundo de sia estaĵo: »Sinjoro! Lasu en la lando eĉ ne unu solan loĝanton el la nekreduntoj!«.⁴

8. Kaj nun pripensu kaj konsideru dum momento la obstinecon de tiuj homoj. Kio povis esti la kaŭzo de tiu ilia malkonfesado kaj flankiĝado? Kio povis instigi ilin rifuzi formeti la mantelon de malkonfeso kaj vesti sin per la rolo de akcepto? Plie, kio povis kaŭzi la neplenumiĝon de la dia promeso, kiu igis la serĉantojn forĵeti tion, kion ili estis akceptintaj? Meditu profunde, por ke la sekretaj aferoj nevideblaj estu malkaŝita al vi, por ke vi enflaru la dolĉecon de spirita kaj senperea aromo, kaj por ke vi ekkonu la veron, ke de tempo nememorebla ĝis eterneco la ĉiopova provadis kaj provados plue Siajn servantojn, por ke lumo estu distingita de mallumo, praveco de malpraveco, gvidado de erarado, feliĉo de mizero kaj rozoj de dornoj. Ĝuste kiel Li diris: »ĉu la homoj pensas, ke kiam ili diras: »Mi kredas«, ili estos lasitaj libere kaj

³Korano 11:38

⁴Korano 71:26

ne estos provataj?»⁵

9. Kaj post Noa la lumo de la vizaĝo de Hud ekbrilis super la horizonto de la kreitaro. Dum preskaŭ sepcent jaroj, laŭ la rakontoj de homoj, Li alvokadis la popolon, ke ĝi turnu sian vizaĝon kaj proksimiĝu al la Riĉván de la dia apudesto. Kiaj pluvoj de afliktoj falis sur Lin, ĝis fine Liaj konsiloj portis la frukton de kreskanta ribelema kaj Lia persista penado finiĝis per obstina blindeco de Lia popolo! »Kaj la nekredo kreskigos nur por la nekredantoj ilian propran pereon.«⁶

10. Kaj post Li aperis el la Riĉván de la Eterna, de la Nevidebla, la sankta persono de Salih, kiu alvokadis la homojn al la rivero de ĉiamdaŭra vivo. Dum pli ol cent jaroj Li admonadis ilin persisti fidele en la ordonoj de Dio kaj teni sin for de tio, kio estas malpermesita. Liaj ordonoj tamen donis nenian frukton kaj Lia pledado restis senefika. Plurfoje li retiriĝis kaj vivis en soleco. Tiel estis, kvankam tiu eterna Belo alvokadis la homojn al nenio alia, krom al la urbo de Dio. Kiel estas dirite: »Kaj al la tribo de Thamud Ni sendis ilian fraton, Salih. ›Ho mia popolo – diris Li – adoru Dion, vi ne havas alian Dion krom Li...‹ Ili respondis: ›Ho Salih, niaj esperoj estis ĝis nun en vi: ĉu vi malpermesas al ni adori tion, kion niaj patroj adoris? Vere, suspektinda ŝajnas al ni tio, al kio vi nin alvokas!‹«.⁷ ĉio tio montriĝis vana, ĝis finfine eksonis granda kriadado kaj ĉiujn kaptis kompleta pere.

⁵Korano 29:2

⁶Korano 35:39

⁷Korano 11:61, 62

11. Poste la beleco de la vizaĝo de la Amiko de Dio⁸ aperis el trans la vualo kaj nova standardo de la dia gvidado estis levita. Ju pli flame Li admonadis ilin, des pli sovaĝa iĝadis la envio kaj obstineco de la popolo, escepte de tiuj, kiuj komplete malligis siajn korojn de ĉio krom Dio, kaj supreniĝis per la flugiloj de certeco al la stato, kiun Dio levis ekster la homan komprenon. Estas bone sciate, ke armeo da malamikoj sieĝis Lin, ĝis fine la fajroj de envio kaj ribelo estis flamigitaj kontraŭ Li. Post kiam okazis la epizodo kun la fajro, Li, la lampo de Dio inter la homoj, estis elpelita el sia urbo, kiel rakontas ĉiuj libroj kaj kronikoj.

12. Kaj kiam Liaj tagoj finiĝis, venis la vico de Moseo. Armita per la vergo de ĉiela regado, ornamita per la blanka mano de dia sciado, venanta el la Parano de amo de Dio, kaj mastranta la serpentojn de potenco kaj eterna majesteco, Li ekbrilis de la Sinaj-monto de lumo sur la mondon. Li alvokis ĉiujn popolojn kaj gentojn de la tero al la regno de eterneco kaj proponis +al ili la frukton de la arbo de fideleco. Certe vi scias pri la furioza kontraŭstarado de Faraono kaj lia popolo kaj pri la ŝtonoj de vanaj imagaĵoj, kiujn la manoj de nekredantoj ĵetadis sur tiun benitan Arbon. Tiagrada estis la kontraŭstarado de Faraono kaj lia popolo, ke fine ili leviĝis kaj streĉis ĉiujn fortojn por estingi per la akvo de falso kaj neado la fajron de tiu sankta Arbo, forgesante pri la vero, ke neniu tera akvo povas estingi la flamon de la dia saĝeco, kaj neniu mortemaj blovoj povas estingi la lampon de la eterna regado. Kontraŭe, tia akvo povas nur intensigi la bruladon de la flamo kaj tiaj blovoj povas nur certigi la sekurecon de la lampo, se vi rigardos tion per la okulo de la

⁸Abrahamo

interna vido kaj paŝos la vojon de la sankta volo kaj plaĉo de Dio. Kiel prave rimarkis kredanto el la gento de Faraono, kies historio estas priskribita de la Plejgora en Lia Libro, revelaciita al Lia Amato: »Kaj unu homo el la familio de Faraono, kiu estis kredanto kaj kaŝadis sian kredon, diris: »ĉu vi mortigos homon tial, ke Li diras: mia Sinjoro estas Dio, se Li jam venis al vi kun la signoj de via Sinjoro? Se Li estas mensogulo, Lia mensogo restos sur Li, sed se Li estas homo de vero, parto de tio, kion Li minacas, falos sur vin. Vere, Dio ne gvidas tiun, kiu estas leĝrompanto, mensogulo.«⁹ Finfine, tiel granda estis ilia malnobleco, ke tiu sama kredanto estis kondamnita je malhonora morto. »La malbeno de Dio estu sur la popolo de tiranoj.«¹⁰

13. Kaj nun pripensu tiujn ĉi aferojn. Kio povis kaŭzi tian malkonsenton kaj konflikton? Kial okazas, ke la alvenon de ĉiu vera Malkaŝanto de Dio akompanas tia malpaco kaj tumulto, tia tiraneco kaj konfuzego? Ĉio ĉi okazas malgraŭ la fakto, ke ĉiuj Profetoj de Dio, kiam ajn senditaj al la popoloj de la mondo, egale antaŭdiris alvenon de alia Profeto post ili mem kaj difinis signojn, kiuj anoncos la alvenon de la nova epoko. Tion ĉi atestas la enhavo de ĉiuj sanktaj libroj. Kial do okazas, ke malgraŭ la atendado, kun kiu la homoj serĉas la Malkaŝanton de Sankteco, kaj malgraŭ la signoj, priskribitaj en la sanktaj libroj, tiaj agoj de perforto, persekutado kaj krueleco estis plenumataj en ĉiuj tempoj kaj cikloj kontraŭ ĉiuj Profetoj kaj Elektitoj de Dio? Tiel, kiel Li diris: : »Kiomfoje Apostolo venas al vi kun tio, kion viaj animoj ne deziras, vi fieriĝas, akuzante kelkajn pri

⁹Korano 40:28

¹⁰Korano 11:21

trompo kaj mortigante aliajn.«¹¹

14. Konsideru, kio povas esti la kialo de tiaj faroj? Kio povis instigi tian konduton kontraŭ la Malkaŝantoj de la beleco de la Plejglora? Kio en la pasintaj tagoj estis la kaŭzo de malakcepto kaj kontraŭstarado flanke de tiuj homoj, tio kondukis ankaŭ nun al obstineco la homojn de tiu ĉi epoko. Aserto, ke la atesto de Providenco estis nekompleta, ke tio estis sekve la kaŭzo de malakcepto flanke de la homoj, estas nur malkaŝa blasfemo. Kiel malproksime de la favoro de l' Malavarega Dio kaj de Lia ama zorgemo kaj bonvolema kompatemo estas elekti unu el inter ĉiuj homoj por la gvidado de Siaj kreitoj, kaj ne havigante al Li plenan mezuron de Siaj diaj pruvoj, aliflanke puni severe Sian popolon pro tio, ke ĝi turniĝis for de Lia Elektito! Ne, la multspecaj malavaraĵoj de la Sinjoro de ĉiuj estaĵoj ĉirkaŭbrakadis en ĉiuj tempoj, pere de l' Malkaŝantoj de Lia dia Esenco, la teron kaj ĉiujn, kiuj vivas sur ĝi. Eĉ por momento Lia favoro ne estis retenita, nek la pluvoj de Lia amemo ĉesis faladi sur la homaron. Tia konduto, sekve, povas esti atribuita al nenio alia ol malgrandanimeco de tiuj, kiuj paŝas en la valo de fiereco kaj malhumileco, estas vojperdintaj en la sovaĝejo de malproksimeco, iras la vojon de siaj vanaj imagaĵoj kaj sekuras la ordonoj de la gvidantoj de sia religio. Ilia ĉefa celo estas nura kontraŭstarado, ilia sola deziro estas ignori la veron. Al ĉiu rimarkema observanto estas evidente kaj klare, ke se tiuj homoj en la tago de ĉiu el la Malkaŝantoj de la Suno de l' Vero liberigus siajn okulojn, orelojn kaj korojn de ĉio, kion ili estis vidintaj, aŭdintaj kaj sentintaj, certe ili ne estus senigitaj de

¹¹Korano 2:87

ekvido de la belo de Dio, nek ili devojiĝus for de la loĝejo de gloro. Sed juĝinte la ateston de Dio laŭ la kriterio de sia propra scio, rikoltita en la instruoj de siaj religiaj gvidantoj, kaj trovinte ĝin diferenca de sia propra limigita kompreno, ili leviĝis por plenumi tiajn maldecajn farojn.

15. Religiaj gvidantoj en ĉiu epoko malhelpis sian anaron atingi la bordojn de la eterna savo, ĉar ili tenis en sia potenco la birdon de la aŭtoritato. Kelkaj pro avido je gvidanteco, aliaj pro manko de scio kaj kompreno estis kaŭzo de la mizero de la homoj. Pro ilia sankcio kaj aŭtoritato ĉiu Profeto de Dio trinkis el la pokalo de sinofero kaj direktis la flugon al la altaĵoj de gloro. Kiajn nepriskribebajn kruelaĵojn tiuj, kiuj okupis la postenojn de aŭtoritato kaj instruiteco, suferigis la veraĵn Monarĥojn de la mondo, tiujn Gemojn de dia virto! Kontentaj pro pasema regado ili senigis sin de eterna aŭtoritato. Tial iliaj okuloj ne vidis la lumon de la vizaĝo de Pleĵamato, nek iliaj oreloj aŭdis la dolĉajn melodiojn de la Birdo de Deziro. Pro tiu ĉi kaŭzo en ĉiuj sanktaj libroj mencioj estas faritaj pri la ekleziuloj de ĉiu epoko. Tiel Li diris: »Ho anaro de la Libro! Kial vi ne kredas la signojn de Dio, kies atestantoj vi mem estis?«¹² Li diris ankaŭ: »Ho anaro de la Libro! Kial vi vestas la veron per malvero? Kial vi konscie kaŝas la veron?«¹³ Kaj aliloke Li diris: »Diru, ho anaro de la Libro, kial vi forpelas kredantojn de la vojo de Dio?«¹⁴ Evidente estas, ke kiel la »anaro de la Libro«, kiu forpelas siajn proksimumojn de la rekta vojo de Dio, konsiderataj

¹²Korano 3:70

¹³Korano 3:71

¹⁴Korano 3:99

estas ĝuste la ekleziuloj de tiu epoko, kies nomoj kaj karakteroj estis konigitaj en la sanktaj libroj kaj aluditaj en la versoj kaj enskribitaj tie tradicioj, se vi observos tion per la okulo de Dio.

16. Kun fiksa kaj firma rigardo, naskita de la senerara okulo de Dio, ekzameni dum kelka tempo la horizonton de la dia konado kaj meditu pri tiuj vortoj de perfekteco, kiun la Eternulo revelaciis, por ke la misteroj de dia saĝeco, kaŝitaj ĝis nun post la vualo de gloro kaj gardataj en la tabernaklo de Lia favoro, malkaŝitaj estu al vi. La neado kaj protestado de tiuj religiaj gvidantoj estis ŝuldata ĉefe al ilia manko de scio kaj kompreno. Tiujn vortojn, eldiritajn de la Malkaŝantoj de la belo de la sola vera Dio, prezentantajn la signojn, kiuj devis anonci la aperon de la venanta Diosendito, ili neniam komprenis nek penetris. Tial ili levis la standardon de ribelo kaj kaŭzis konfuzon kaj tumulton. Evidente kaj klare estas, ke la vera signifo de la paroloj de la Birdoj de Eterneco estas revelaciita al neniu krom tiuj, kiuj elmontras en si la Eternan Estaĵon, kaj la melodioj de la Najtingalo de Sankteco povas atingi nenies orelojn krom tiuj de la loĝantoj de la eterna regno. La kopto de tiraneco neniam povas trinki el la pokalo, tuŝita de la lipoj de la septo de justeco, kaj la Faraono de nekredo neniam povas esperi rekoni la manon de la Moseo de vero. Tiel, kiel Li diris: »Neniu scias la signifojn de tio, krom Dio kaj tiuj, kiuj firme staras sur la fundamento de sciado.«¹⁵ Kaj tamen ili serĉiu la interpretadon de la Libro ĉe vualitoj kaj rifuzis serĉi la lumon ĉe la fonto de sciado.

17. Kaj kiam la tagoj de Moseo estis finitaj kaj la lumo de Je-

¹⁵Korano 3:7

suo, brilanta el la tagiĝo de l' Spirito, ĉirkaŭverŝis la mondon, la tuta popolo de Izrael leviĝis proteste kontraŭ Li. Ili kriis, ke Tiu, kies alvenon antaŭdiris la Biblio, devas nepre akceli kaj plenumi la leĝojn de Moseo, dum tiu juna Nazaretano, kiu pretendis la rangon de la dia Mesio, nuligis la leĝojn de eksedziĝo kaj de sabuto - la plej gravajn el ĉiuj leĝoj de Moseo. Kaj la signoj de la venonta Malkaŝanto, plie? La popolo de Izrael atendas ĝis la nuna tempo tiun Malkaŝanton, kiun la Biblio antaŭdiris! Kiel multaj Malkaŝantoj de Sankteco, kiel multaj Elmontrantoj de la eterna lumo aperis de la tempo de Moseo, kaj tamen Izrael ĉirkaŭvolvita per densegaj vualoj de satanaj fantazjaĵoj kaj falsaj imagoj, atendas ankoraŭ, ke ĝia propra idolkreaĵo aperu kun tiuj signoj, kiujn ĝi mem elkonceptis! Kaŭzis de tio Dio metis sur ilin punktan manon pro iliaj pekoj, estingis en ili la spiriton de kredo kaj suferigis ilin per la flamoj de abisma fajro. Kaj ĉio ĉi okazis sole pro tiu kaŭzo, ke Izrael rifuzis ekkompreni la signifojn de tiuj vortoj, kiuj estis revelaciitaj en la Biblio koncerne la signojn de la venonta Malkaŝanto. Ĉar neniam Izrael ekkomprenis ilian veran signifon, kaj, ekstervide, tiaj faktoj neniam okazis, tial ne estis al ĝi lasite rekoni la belecon de Jesuo kaj ekvidi la vizaĝon de Dio. Kaj ankoraŭ ili atendas Lian venon! De tempo nememorebla ĝis la hodiaŭa tago ĉiuj gentoj kaj popoloj de la tero kroĉadis sin al tiaj fantaziaj kaj malĝustaj pensoj kaj senigadis sin tiel de la klara akvo, ŝprucanta el la fonto de pureco kaj sankteco.

18. Priparolante tiujn ĉi misterojn, Ni citis en Niaj antaŭaj tabuletoj, direktitaj al unu amiko en la melodia lingvo de Heĝaso, kelkajn versojn, revelaciitajn al la malnovaj Profetoj.

Kaj nun, responde al via peto, Ni citos denove sur tiu ĉi paĝoj tiujn samajn versojn, dirotajn ĉi-foje en la mirindaj vortoj de Irako, por ke tiuj, kiuj soifegas en la sovaĝejoj de malproksimeco, atingu la oceanon de la dia apudesto, kaj tiuj, kiuj sopiras en la dezertoj de aparteco, estu kondukitaj al la hejmo de eterna kuneco. Tiel dispelita estu la nebulo de eraro, kaj helega lumo de dia gvidado ekbrilu super la horizonto de la homaj karoj. Al Dio Ni konfidas kaj Lin Ni alvokas helpopete, ke fluu de sub tiu ĉi plumo vortoj, kiuj vigligas la animojn de la homoj, ke ĉiuj ili leviĝu el siaj litoj de malzorgemo kaj aŭskultu la murmuretadon de la folioj de Paradizo, bruetantaj sur la arbo, kiun la mano de l' dia potencoplantis, laŭ la permeso de Dio, en la Riqvân de la Plejglora.

19. Al tiuj, al kiuj estas donita kompreno, klare kaj videble estas, ke kiam la fajro de la amo de Jesuo konsumis la vualojn de la limigiteco de la judoj kaj Lia aŭtoritato iĝis evidenta kaj parte efektiviĝis, Li, la Malkaŝanto de la nevidebla Belo, turnante sin foje al Siaj disĉiploj, menciis pri Sia morto, kaj, estigante en iliaj koroj la fajroj de funebro, diris al ili: »Mi foriros kaj revenos al vi«. ¹⁶ Kaj aliloke Li diris: »Mi foriros kaj venos iu alia, kiu diros al vi tion, kion Mi al vi ne diris, kaj plenumos ĉion, kion Mi diris.¹⁷ Ambaŭ tiuj ĉi diraĵoj havas nur unu sencon, se vi konsideros la Malkaŝantojn de Unueco de Dio kun spirita penetremo.

20. Ĉiu juĝokapabla observanto konfesos, ke en la epoko de la

¹⁶Johano 16:16 (!)

¹⁷Johano 16:5-13 (!)

Korano, tiel la Libro, kiel la Instruo de Kristo estis konfirmitaj. Koncerne la nomojn, Mahometo mem deklaris: »Mi estas Jesuo.« Li konfesis la verecon de la signoj, profetaĵoj, kaj vortoj de Jesuo kaj atestis, ke ili ĉiuj estas de Dio. En tiu ĉi senco nek la persono de Jesuo, nek Liaj skribaĵoj diferencis de tiuj de Mahometo kaj de Lia sankta Libro, ĉar ambaŭ batalis por la afero de Dio, proklamis Lian gloron kaj konigis revelacie Liajn ordonojn. Tiel do Jesuo mem deklaris: »Mi foriros kaj revenos al vi.«¹⁸ Rigardu la sunon. Se ĝi dirus nun: »Vi estas la hieraŭa suno«, ĝi dirus veron. Kaj se ĝi, konsiderante la sekvadon de la tempo, deklarus sin alia, ol tiu suno, ĝi ankaŭ dirus veron. Simile, se oni diras, ke ĉiuj tagoj estas samaj, tio ĉi estus prava kaj vera. Kaj se vi, konsiderante la nomon kaj difinon de ĉiu tago aparte, oni dirus, ke ili diferencas, ankaŭ tio ĉi estas vera. Ĉar kvankam ili estas samaj, tamen oni rekonas en ĉiu apartan difinon, propran econ, specialan karakteron. Pensu simile pri la diferenco, alieco kaj unueco de la diversaj Malkaŝantoj de sankteco, por ke vi komprenu la aludojn pri la misteroj de diferenco kaj unueco, faritajn de la Kreinto de ĉiuj nomoj kaj atributoj, kaj por ke vi trovu respondon al via demando, kial la eterna Belo nomadis sin, en diversaj tempoj, per diferencaj nomoj kaj titoloj.

21. Poste la kunuloj kaj disĉiploj de Jesuo demandis Lin pri la signoj, kiuj devas anonci la revenon de Lia revelacio. Kiam, ili parolis, tiuj aferoj okazos? Plurfoje ili demandis tiun senkomparan Belon, kaj ĉiufoje, kiam Li respondis, Li prezentis specialan signon, kiu devas heroldi la alvenon de la promesita epoko.

¹⁸Johaho 16:16 (!)

Tion ĉi atestas la tekstoj de la kvar Evangelioj.

22. Tiu ĉi Persekutato citos nur unu el tiuj ekzemploj, oferante tiel al la homaro, pro la amo al Dio, malavaraĵojn, kiuj estas ankoraŭ gardataj en la trezorejo de la kaŝita kaj sankta Arbo, por ke la mortemuloj ne estu lasitaj sen sia porcio de la senmorta frukto kaj ricevu rosguton de la akvo de la eterna vivo, kiu el Bagdado, la¹⁹ »Sidejo de Paco«, estas favorverŝata sur la tutan homaron. Ni deziras nenian repagon, nek rekompencan. »Ni nutras viajn animojn pro amo al Dio; ni atendas de vi nek rekompencan, nek dankon.«²⁰ Tio ĉi estas nutraĵo, kiu donas eternan vivon al tiu, kiu posedis puran koron kaj lumhavan spiriton. Tio ĉi estas pano, pri kiu estas dirite: »Sinjoro, sendu al ni teren Vian panon el la ĉielo.«²¹ Tiu ĉi pano neniam estos detenita de tiuj, kiuj ĝin meritas, kaj neniam ĝi povas elĉerpiĝi. Ĝi krestas eterne el la arbo de favoro, ĝi terenvenas en ĉiuj sezonoj el la ĉielo de justeco kaj kompatemo. Kiel Li diris: »Cu vi ne vidas, kun kio Dio komparas bonan vorton? Kun bona arbo; ĝis radiko estas fiksita en la tero, ĝiaj branĉoj atingas la ĉielon, ĝi kreskigas fruktojn en ĉiu sezono.«²²

23. Kiel domaĝe, ke homo senigas sin de tiu havinda donaĵo, de tiu senperea malavaraĵo, de tiu eterna vivo! Decas al li alŝati tiun nutraĵon, kiu venas el la ĉielo, por ke, per la mirindaj favoroj de la Suno de l' Vero, mortinto estu revivigita kaj velkintaj animoj estu refreŝigitaj de la senlima Spirito. Rapidu, ho

¹⁹Korano 10:25

²⁰Korano 76:9

²¹Korano 5:117

²²Korano 14:24

mia frato, por ke dum tempo estas ankoraŭ, niaj lipoj gustumu la senmortan trinkaĵon, ĉar la vento de vivo, blovanta nun el la urbo de la Plejamato, ne povas daŭri senĉese, la ondanta rivero de sanktaj paroloj devas nepre eksilenti, kaj la portaloj de Riḍván ne povas esti ĉiam malfermitaj. Venos certege tago, kiam la Najtingalo de Paradizo returnos sian flugon for de tiu ĉi tera restejo al la ĉiela nesto. Tiam ĝia melodio ne estos plu aŭdata, kaj la beleco de la rozo ĉesos brili. Profitu do la tempon, antaŭ ol la gloro de la dia printempo forpasos kaj la Birdo de Eterneco ĉesos sonigi sian melodion, ke via interna orelo ne restu sen ekaŭdo de ĝia voko. Tiun ĉi konsilon Mi donas al vi. Kiu ajn volas, turnu sin al ĝi, kiu ajn volas, forturniĝu. Vere, Dio estas sendepende de li kaj de tio, kion li povas vidi kaj atendi.

24. Jen estas la melodioj, kantitaj de Jesuo, la filo de Mario, kun la sonoj de majesta potenco en la Riḍván de la Evangelio, konigantaj la signojn, kiuj devas anonci la alvenon de la Malkaŝanto post Li. En la unua Evangelio laŭ Mateo estas dirite: Kaj kiam ili demandis Jesuon pri la signoj de Lia veno, Li diris al ili: »Tuj post la aflikto²³ de tiuj tagoj la suno mallumiĝos, kaj la luno ne donos sian lumon, kaj la potencoj de la ĉielo ŝanceliĝos; kaj tiam aperos sur la ĉielo la signo de la Filo de homo, kaj tiam ploros ĉiuj gentoj de la tero, kaj oni vidos la Filon de homo, venantan en la nuboj de la ĉielo kun potenco kaj granda gloro. Kaj li elsendos siajn anĝelojn kun granda sono de trumpeto.«²⁴ Tradukita en la persan lingvon,²⁵ la senco de tiuj ĉi

²³La Greka vorto uzata signifas (sub)premon

²⁴Mateo 24:29-31

²⁵La teksto estas citita de Bahá'u'lláh en la araba kaj interpretata en la

vortoj estas jena: Kiam la suferado kaj afliktoj, kiuj devas trafi la homaron, estos okazintaj, tiam la suno estos senigita de sia brilado, la luno de sia lumo, la steloj de la ĉielo falos sur teron, kaj la pilastroj de la tero ekstrems. En tiu tempo la signoj de la Filo de homo aperos sur la ĉielo, tio signifas, ke, kiam tiuj ĉi signoj aperos, la promesita Belo kaj Substanco de la vivo elpaŝos el la nevidebla sfero en la videblan mondon. Kaj Li diris: en tiu tempo ĉiuj popoloj kaj gentoj, kiuj loĝas sur la tero, veos kaj plendkrios, kaj ili vidos tiun dian Belon, venantan el la ĉielo, sidantan sur la nuboj kun potenco, gloro kaj majesteco, elsendantan Siajn anĝelojn kun granda sono de trumpeto. Simile en la tri aliaj Evangelioj, laŭ Luko, Marko kaj Johano, samaj deklaroj estas enskribitaj. Ĉar Ni priparolis ilin detale en niaj tabuletoj, verkitaĵoj en araba lingvo, Ni ne mencios ilin sur tiuj ĉi paĝoj kaj limiĝos al unu sola citaĵo.

25. Ĉar la kristanaj teologoj ne komprenis la signifon de tiuj ĉi vortoj, ne rekonis ilian enhavon kaj sencon kaj alkroĉiĝis al la laŭvorta interpretado de la paroloj de Jesuo, tial ne estis sur ilin verŝitaj la ondoj de favoro de la Mahometana Revelacio kaj la torento de ĝiaj malavaraĵoj. La ignoruloj el la kristanaro, sekvante la ekzemplon de siaj religiaj gvidantoj, same restis baritaj kontraŭ la ekkono de la belo de la Reĝo de gloro, ĉar la signoj, kiuj devis akompani la sunleviĝon de la mahometana epoko, ne realiĝis. Tiel da tempo pasadis, jarcentoj fluis for, kaj tiu plej pura Spirito reiĝis en la rifuĝejon de sia pratempa regno. Ankoraŭ foje la eterna Spirito ekblovis la mistikan trumpeton, pro kio mortuloj ekrapidis el siaj tomboj de senzorgeco kaj er-

persa

aro en la regnon de gvidado kaj favoro. Kaj tamen tiu atendata anaro ankoraŭ vokas: Kiam venos tiuj signoj? Kiam aperigita estos la Promesito, la objekto de nia atendado, ke ni leviĝu por la triumfo de Lia Afero, ke ni oferdonu por Li niajn havaĵojn, ke ni metu niajn vivojn ofere sur Lia vojo? En simila maniero tiaj falsaj imagaĵoj igis aliajn kredantarojn flankiĝi de la Kawihar de la senfina kompatemo de Providenco kaj okupi sin per siaj propraj vanaj pensoj.

26. Krom tiu ĉi fragmento estas en la Evangelio ankaŭ alia verso, en kiu Li diras: »La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos.«²⁶ Pro tio ĉi la sekvantoj de Jesuo asertis, ke la leĝo de la Evangelio neniam estos nuligita, kaj ke kiam ajn la promesita Belo aperos kaj ĉiuj signoj plenumiĝos, Li devas nepre konfirmi kaj firmigi la leĝon, proklamitan en la Evangelio, por ke restu en la tuta mondo neniŭ kredo, krom Lia kredo. Tio ĉi estas ilia fundamenta dogmo. Kaj laŭ ilia konvinko, se aperus persono kun ĉiuj promesitaj signoj kaj proklamus ion kontraŭan al la literoj de la leĝo de l' Evangelio, ili devas senhezite malakcepti lin, rifuzi subiĝi al lia leĝo, deklari lin malfidelulo kaj mokegi lin. Tion ĉi pravas tio, kio okazis, kiam elbrilis la suno de la Mahometa Revelacio. Se ili serĉus humile ĉe ĉiu Malkaŝanto de Dio la veran signifon de la vortoj, revelaciitaj en la sanktaj libroj - de la vortoj, kies miskompreno senigis la homojn de la rekono de l' Sadratu' L-Muntaha, la finfina celo - certe ili estus gviditaj al la lumo de la Suno de l' Vero kaj malkovrus la sekretojn de la dia sciado kaj saĝeco.

²⁶Luko 21:33

27. Tiu ĉi Servanto dividos nun kun vi rosguton el la senfunda oceano de la veroj, trezortenataj en tiuj sanktaj vortoj, por ke juĝokapablaj koroj ekkomprenu ĉiujn aludojn kaj fundesencojn de la paroloj de la Malkaŝantoj de Sankteco, ke la venka majesteco de la Vorto de Dio ne malhelpu ilin atingi la oceanon de Liaj nomoj kaj atributoj kaj ne detenu ilin de rekono de la lampo de Dio, kiu estas la revelaci-loko de Lia gloruta Esenco.

28. Rilate la vortojn: »Tuj post la aflikto de tiuj tagoj«²⁷, ili koncernas la tempon, kiam la homoj estos premitaj kaj afliktitaj, la tempon, kiam la lastaj post signoj de la Suno de l' Vero kaj la frukto de la Arbo de sciado kaj saĝeco estos malaperintaj el ilia mezo, kiam la kondukiloj de la homaro estos falintaj en la manojn de malsaĝuloj kaj ignoruloj, kiam la portaloj de dia unueco kaj kompreno - la esenca kaj plej alta celo de la kreado - estos fermitaj, kiam certaj scioj estos cedintaj la lokon al vanaj imagaĵoj kaj malhonesteco uzurpos la pozicion de honesteco. Tia stato vidata estas en tiu ĉi tago, kiam la kondukiloj de ĉiu kredanto estas falintaj en la manojn de malsaĝaj gvidantoj, kiuj kondukas ilin laŭ siaj propraj kapricoj kaj deziroj. Sur iliaj langoj la mencio pri Dio iĝis senenhava nomo, Lia sankta vorto en ilia mezo iĝiu senviva litero. Tia estas la forto de iliaj deziroj, ke la lampo de konscienco kaj prudento estingiĝis en iliaj koroj, kvankam la fingroj de la dia potenco malfermis la portalojn de la konado de Dio, kaj la lumo de dia konado kaj ĉiela favoro lumigis kaj flamigis la esencon de ĉiuj kreaĵoj, tiel, ke en ĉiu el la kreaĵoj malfermita estas pordo de sciado, kaj en ĉiu atomo vidigitaj estas signoj de la suno. Kaj tamen, mal-

²⁷Mateo 24:29

graŭ ĉiuj tiuj multaj revelacioj de dia konado, kiuj ĉirkaŭzonis la mondon, ili ankoraŭ vane imagas, ke la pordo de sciado estas fermita kaj la pluvoj de kompatemo ĉesintaj. Kroĉante sin al vana imagaĵo, ili flankiĝis for de la 'Urvatu'-Vuthqa de la dia konado. Iliaj koroj ŝajnas ne inklini al la konado kaj al la pordo de l' konado, nek ili pensas pri ĝiaj revelacioj, ĉar en sia vana imago ili trovis pordon, kiu kondukas al teraj riĉaĵoj, dum en la revelacioj de la Malkaŝantoj de l' konado ili trovas nenion, krom alvoko al sinofero. Tial ili kompreneble firme staras ĉe la unua, kaj forkuras de la lasta. Kvankam en la koroj ili konfesas, ke la Leĝo de Dio estas unu sama, tamen el ĉiu flanko ili eldonas novajn ordonojn kaj en ĉiu tempospaco proklamas novajn dekretojn. Ne troviĝas eĉ du, kiuj konsentas unu saman leĝon, ĉar ili serĉas neniun Dion krom sia propra deziro, kaj paŝas neniun vojon, krom la vojo de eraro. Ili konsideras ĉefecon kiel plej superan celon de sia penado, kaj opinias fierecon kaj arogantecon kiel plej altan atingon de sia kordeziro. Ili starigis sian malindan intrigadon super la dia ordono, forlasis la sinrezignon al la volo de Dio, okupiĝis per egoista kalkulado kaj iris la vojon de hipokriluloj. Per sia tuta potenco kaj povo ili penegas sekurigi sin en siaj etaj klopodoj, timante, ke plej malgranda kompromito povus subfosi ilian aŭtoritaton aŭ ombrigi la brilon de ilia majesteco. Se la okulo estus sanktoleita kaj lumigita pel la kolirio de la kono de Dio, ĝi certe ekvidus, ke aro da rabemaj bestoj amasiĝis por mordi la kadavron de la homaj animoj.

29. Kia »aflikto« estas pli granda, ol ĉi tiu dirita? Kia »aflikto« estas pli korŝira, ol tio, ke animo, serĉanta la veron kaj deziranta atingi la konon de Dio, ne scias, kien direktiĝi kaj ĉe kiu ĝin

serĉi? Ĉar la opinioj plorinde diferenciĝis kaj la vojoj al atingo de la kono de Dio multiĝis. Tiu ĉi »aflikto« estas esenca trajto de ĉiu Revelacio. La Suno de l' Vero ne aperas, antaŭ ol ĝi ekzistas. Ĉar la tagiĝo de dia gvidado devas sekvi la mallumon de la nokto de erarvado. Tial en Viuj kronikoj kaj tradicioj oni mencias tiujn aferojn, nome, ke malnobleco kovros la superaĵon de la tero kaj mallumo envolvos la homaron. Ĉar la aluditaj tradicioj estas bone konataj kaj tiu ĉi Servanto deziras esti konciza, Li detenos sin de citado de tiuj tradicioj.

30. Se tiun ĉi »aflikton« (kiu laŭvorte signifas premadon) oni interpretus en tiu senco, ke la tero devas kunpremiĝi, aŭ en la vana imago la homoj bildus al si similajn malfeliĉojn kiel trafontajn la homaron, klare kaj evidente estas ke neniu el tiaj aferoj povas iam efektiviĝi. Sendube ili protestus, dirante, ke tiu antaŭkondiĉo de dia revelacio ne plenumiĝis. Tia estis kaj estas ankoraŭ ilia argumentado. Dume la »aflikto« signifas mankon de kapableco por atingi spiritan sciadon kaj ekkompreni la Vorton de Dio. Ĝi signifas, ke kiam la Astro de l' Vero estos subirinta, kaj la speguloj, kiuj rebriligas Lian Lumon, estos malaperintaj, la homaro suferos »aflikton« kaj malfacilaĵojn ne sciante, kien turniĝi por serĉi gvidadon. Tiel Ni klarigas al vi la interpretadon de la tradicioj kaj malkaŝas al vi la misterojn de la dia saĝeco, por ke vi komprenu ilian signifon kaj estu el tiuj, kiuj trinkis el la kaliko de dia kono kaj kompreno.

31. Kaj nun, koncerne Liajn vortojn: »La suno mallumiĝos, kaj la luno ne donos sian lumon, kaj la steloj falos el la ĉielo«: - la esprimoj »la suno« kaj »la luno«, menciitaj en la skribaĵoj de la Profetoj de Dio, ne signifas sole la sunon kaj la lunon de la

videbla universo. Ne, diversaj estas la sencoj, kiujn ili donis al tiuj esprimoj. En ĉiu okazo ili destinis al tiuj vortoj specialan signifon. Tiel la »suno« en unu senco signifas tiujn Sunojn de l' Vero, kiuj leviĝas el la tagiĝ-loko de la pratempa gloro kaj plenigas la mondon per malavara inundo de favoro el la ĉielo. Tiuj Sunoj de l' Vero estas la universalaj Malkaŝantoj de Dio en la mondoj de Liaj atributoj kaj nomoj. Tiel la videbla suno laŭ la ordono de Dio, la Vera, la Adorata, helpas la disvolviĝadon de ĉiuj teraj estaĵoj, kiel arboj, fruktoj ka iliaj koloroj, la mineraloj de la tero kaj ĉio, kion oni renkontas en la mondo de l' kreaĵoj, tiel la diaj Lumprotantoj, per sia ama zorgemo kaj eduka influo, kreskigas kaj elaperigas la arbojn de dia unueco, la fruktojn de Lia unuobleco, la foliojn de korpureco, la florojn de sciado kaj certeco kaj la miriojn de saĝeco kaj paroloj. Tial okazas, ke pro la apero de tiuj Lumportantoj de Dio la mondo estas renovigita, la akvoj de l' eterna vivo ŝprucas torente, la ondoj de amemo blanciĝas, la nuboj de favoro amasiĝas kaj la venteto de malavareco blovas sur ĉiujn kreaĵojn. La varmo, kiun estigas tiuj Lumportantoj de Dio, kaj la senmorta fajro, kiun ili flamigos - jen kio bruligas forte en la homaj koroj la lumon de la amo de Dio. La favorriĉaĵoj de tiuj Simboloj de korpureco estas la kaŭzo, ke Spirito de l' eterna vivo blovita estas en la korpojn de mortuloj. Tutcerte la videbla suno estas nur signo de la brilego de tiu Astro de l' Vero, de tiu Suno, kiu estas ĉiam senkompara, senegala kaj senrivala. Dank' al Li ĉiuj estaĵoj vivas, movas sin kaj havas la ekziston. Dank' al Lia favoro ili estas aperigitaj, kaj al Li ili ĉiuj revenas. Li estas la fonto de ĉiuj estaĵoj, kaj en la trezorejojn de Lia revelacio ili ĉiuj reiris. De Li ĉiuj kreaĵoj devenis, kaj en la gurdenejo de Lia leĝo ĉiuj ili returniĝis.

32. Ke tiuj diaj Lumportantoj ŝajnas esti limigitaj diverstempe en la kadroj de specialaj nomoj kaj kvalitoj, kiel vi rimarkis antaŭe kaj nun vi rimarkas, tio estas ŝuldata sole al la malperfekta kaj limhava kompreno de certaj mensoj. Alie, ili estis en ĉiuj tempoj kaj en la tuta eterneco estos for super ĉia laŭdovorto kaj sendependaj de ĉia kvalit-priskribo. La fundesenco de ĉiu nomo povas esperi nenian aliron al ilia kortego de sankteco, kaj la plej alta kaj pura el ĉiuj kvalitoj neniam povas alpaŝi ilian regnon de gloro. Senmeasure alte estas la Profetoj de Dio super la kompreno de la homoj, kiuj neniel povas koni ilin, escepte se per ili mem. Malkonforme estus Lia gloro, se Liaj Elektitoj devus esti laŭdataj alie, ol per siaj propraj personoj. Gloraj ili estas super la homa laŭdo; altaj ili estas super la homa kompreno!

33. La esprimo »sunoj« estas multfoje aplikita en la skribaĵoj de la »senmakulaj Animoj« al la Profetoj de Dio, tiuj lumaj Simboloj de Korpureco. Inter tiuj ĉi skribaĵoj estas la sanktaj vortoj, enskribitaj en la »Preĝo de Nudbih«²⁸ »Kien foriris la helegaj Sunoj? Kien foriĝis tiuj Lunoj kaj brilaj Steloj?« Tiamaniere klare estas, ke la esprimoj »suno«, »luno« kaj »steloj« signifas origine la Profetojn de Dio, sanktulojn kaj iliajn kunulojn, tiujn Lumportantojn, kies sciado per sia brilo verŝis lumon sur la videblajn kaj nevideblajn mondojn.

34. En alia senco tiuj ĉi esprimoj indikas la pastrojn de la antaŭa Diepoko, kiuj vivas en la tempo de la sekvanta Revelacio, kaj kiuj tenas en sia potenco la kondukilojn de la religio. Se tiuj pastroj estas lumigitaj per la lumo de la lasta Revelacio, ili

²⁸«Plorkanto» atribuita al la Dekdua Imamo

estos akceptindaj antaŭ Dio kaj brilos per eterna lumo. Aliokaze ili estos deklaritaj kiel mallumiĝintaj, se eĉ eksternvide ili estus gvidantoj de la homoj, ĉar kredo kaj nekredo, gvidateco kaj erarado, feliĉo kaj mizero, lumo kaj mallumo dependas de la sankcio de Tiu, kiu estas la Astro de l' Vero. Tiu el la pastroj de ĉiu epoko, kiu ricevas, en la Tago de Kalkulo, ateston pri kredo el la Fonto de l' vera sciado, iĝas efektive ricevanto de instruado, de dia favoro kaj de la lumo de vera kompreno. Aliokaze li estas markita kiel kulpa je malsaĝeco, kontraŭstaro, blasfemo kaj premado.

35. Klare kaj evidente estas al ĉiu juĝokapabla observanto, ke kiel la lumo de stelo paliĝas antaŭ la grandioza brilego de la suno, tiel lumportantoj de vera sciado, de saĝeco kaj kompreno neniĝas vizaĝ-al-vizaĝe kontraŭ la brilega gloro de la Suno de l' Vero, la Astro de la dia lumigiteco.

36. Ke la esprimo »suno« estas uzita rilate al la religiaj gvidantoj, tio estas pro ilia alta pozicio, gloro kaj famo. Tiaj estas la universale konataj pastroj de ĉiu epoko, kiuj parolas aŭtoritate kaj kies famo estas sekure starigita. Se ili estas similaj al la Suno de l' ĉero, certe ili estos kalkulitaj kiel plej altaj el ĉiuj lumportantoj, alie ili estos rekonitaj kiel fokuso de infera fajro. Kiel Li diris: »Vere, la suno kaj la luno estas kondamnitaj al la turmento de infera fajro.«²⁹ Sendube estas al vi konata la interpreto de la esprimoj »suno« kaj »luno«, menciitaj en tiu ĉi verso; senbezone do estas ĝin ripeti. Kaj kiu estas samelementa kun tiu »suno« kaj »luno«, t.e. sekvas la ekzemplon de

²⁹Korano 55:5

tiuj gvidantoj, direktante la vizaĝon al malvero kaj turnante ĝin for de la vero, tiu sendube devenas el infera mallumo kaj tien li revenos.

37. Kaj nun, ho serĉanto, necesas al ni teni nin forte je la ‘Urvatu’ l-Vuthaqa, por ke ni lasu malantaŭ ni la malluman nokton de erarvagado kaj etendu la brakojn al la tagiĝa lumo de la dia gvidado. Ĉu ni ne forkuru de la vizaĝo de neado, kaj ne serĉu la ŝirmodonan ombron de certeco? Ĉu ni ne liberigu nin de la teruro de satana mallumo, kaj ne rapidu al la sunleviĝo de la ĉiela Belo? Tiamaniere ni donacas al vi la frukton de la Arbo de la dia sciado, por ke ĝoje kaj feliĉe vi restadu en la Ridván de la dia saĝeco.

38. En alia senco la esprimoj »suno« , »luno« kaj »steloj« signifas tiun leĝon kaj instruojn, kiuj estis fonditaj kaj proklamitaj en ĉiu Diepoko, kiel la leĝoj pri preĝo kaj fasto. Tiuj ordonoj, kiam la belo de la Profeto Mahometo pasis trans la vualon, estis konsiderataj, laŭ la leĝo de la Korano, kiel la plej fundamentaj kaj devigaj leĝoj de Lia epoko. Pri tio ĉi atestas la tekstoj de la tradicioj kaj kronikoj, kiujn, pro ilia vasta konateco, ne necesas citi ĉi tie. Ne, en ĉiu Diepoko la leĝo, koncernanta preĝon, estis eĉ speciale akcentita kaj universale proklamita. Pri tio ĉi atestas la enskribitaj tradicioj, atribuitaj al la lumoj, kiuj emanis de la Astro de l’ Vero, la esenco de la Profeto Mahometo.

39. La tradicioj konfirmis la fakton, ke en ĉiu ŝiepoko la leĝo pri preĝo formis la fundamentan elementon de la Revelacio de ĉiu el la Profetoj de Dio; la maniero kaj formo de tiu ĉi leĝo estis alkonformigita al diversaj bezonoj de ĉiu epoko. Ĉar ĉiu

sekvanta Revelacio eksigis la manierojn, kutimojn kaj instruojn, kiuj estis klare, speciale kaj firme fiksitaj de la antaŭa leĝaro, tial oni esprimis ilin simbole per la vortoj »suno« kaj »luno«. »Por ke Li elprovu vin, kiu el vi estas supera en faroj«. ³⁰

40. Plie, en la tradicioj la esprimoj »suno« kaj »luno« estis uzitaj rilate al preĝo kaj fasto, kiel estas dirite: »fasto estas heleco, preĝo estas lumo«. Foje unu tre konata pastro venis al ni vizite. Dum Ni estis parolantaj kun li, li menciis la suprecititan tradicion. Li diris: »Car fasto kreskigas la varmon de la korpo, tial ĝi estas komparita al la lumo de la suno; kaj ĉar la nokta preĝado refreŝigas la homon, ĝi estas komparita al la brilo de la luno.« Ni ekvidis laŭ tio, ke la kompatindulo ne estis favorita eĉ per unu guto el la oceano de la vera kompreno, kaj paŝis for de la brulanta Arbusto de la dia saĝeco. Tiam Ni ĝentile alparolis lin, dirante: »La interpreto, kiun via moŝto donis al tiu ĉi tradicio, estas tiu, kiu estas kutima inter homoj. Ĉu oni ne povus interpreti ĝin alie?« Li demandis Nin: »Kiel oni ĝin povus interpreti?« Ni respondis: »Mahometo, la Sigelo de la Profetoj kaj la plej distingita inter la elektitoj de Dio, komparis la Leĝaron de la Korano al la ĉielo, kaŭze de ĝia alteco, ĝia senkompara influo, majesteco kaj la fakto, ke ĝi entenas ĉiujn religiojn. Kaj kiel la suno kaj la luno prezentas la plej brilajn kaj plej rimarkindajn lumfontojn en la ĉielo, simile en la ĉielo de la religio de Dio fonditaj estas du lumataj globoj - fasto kaj preĝo. »Islamo estas ĉielo; fasto estas ĝia suno, preĝo estas ĝia luno.«

³⁰Korano 67:2

41. Tia estas la senco, kaŝita en la simbolaj vortoj de la Malkaŝantoj de Dio. La aplikado de la esprimoj »suno« kaj »luno« al la jam menciitaj aferoj estas do evidentiga kaj pravigita per la tekstoj de la sanktaj versoj kaj de la enskribitaj tradicioj. Sekve estas klare kaj evidente, ke la vortoj: <#Bible-Mat_24÷29> »la suno mallumiĝos kaj la luno ne donos sian lumon kaj la steloj falos el la ĉielo« signifas la obstinecon de la religiaj gvidantoj kaj eksigon de la leĝoj, fiksitaj firme de Diosendito, kio, en la lingvo de simboloj, estis antaŭdirita de la dia Malkaŝanto. Neniu trinkos el tiu ĉi kaliko, krom justulo, neniu ricevos el ĝi sian parton, krom piulo. »Justulo trinkos el kaliko, plenigita ĉe kamfora fonto.«³¹

42. Sendube estas, ke en ĉiu sekvanta Revelacio la »suno« kaj »luno« de la instruistoj, leĝoj, ordonoj kaj malpermesoj, kiuj estis proklamitaj en la antaŭa Diepoko kaj kiuj ĵetadis sian ombbron sur la popolon de tiu tempo, mallumiĝis. t.e. estas elĉerpitaj kaj perdas la influon. Konsideru nun; se la popolo de la Evangelio rekonas la signifon de la simbolaj esprimoj »suno« kaj »luno«, se ĝi, ne kiel obstinulo kaj spitemulo, serĉus lumon ĉe Tiu, kiu estas Malkaŝanto de la dia sciado, certe ĝi ekkomprenus la sencon de tiuj esprimoj kaj ne estus afliktita kaj suferigita per la mallumo de siaj egoistaj deziroj. Jes, ĉar ili ne sciis ĉerpi la veran sciadon el ĝia fonto mem, ili pereis en la danĝera valo de obstino kaj nekredo. Ankoraŭ ili ne vekigis, por ekvidi, ke ĉiuj antaŭdirantaj signoj estas aperigitaj, ke la promesita Suno levigis super la horizonton de la dia Revelacio, kaj ke la »suno« kaj »luno« de la instruoj, leĝoj kaj ordonoj de la antaŭa Diepoko

³¹Korano 76:5

mallumiĝis kaj subiris.

43. Kaj nun kun fiksa rigardo kaj persistaj flugiloj suriru la vojon de certeco kaj vero. »Diru: Tio esta Dio; poste lasu ilin okupi sin per siaj artifikoj.«³² Tiel vi estos kalkulita inter tiujn kunulojn, pri kiuj Li diras: »Kiuj diras ›Nia Sinjoro estas Dio‹ kaj persistas firme sur Lia vojo, al tiuj, vere, anĝeloj malsuprenvenos.«³³ Tiam vi rigardos ĉiujn tiujn misterojn per viaj propraj okuloj.

44. Ho mia frato! Iru la vojon de l' spirito, por ke, rapide kiel okulmovo, vi fulmopasu la sovaĝejojn de malproksimeco kaj foreco, atingu la Ridván de l' eterna unuiĝo, kaj en unu spiro interrilatiĝu kun ĉielaj spiritoj. Ĉar per la homaj piedoj neniam vi povas esperi trapasi tiujn senmezurajn distancojn, nek atingi vian celon. Paco estu kun tiu, kiun la lumo de l' vero gvidas al ĉia vero, kaj kiu, en la nomo de Dio, persistas en la vojo de Lia Afero, sur la bordo de vera kompreno.

45. Tio ĉi estas la signifo de la sankta verso: »Sed ne! Mi ĵuras je la Sinjoro de la orientoj kaj okcidentoj«³⁴, ĉar el la menciitaj »BSunoj« ĉiu havas specialan lokon de supreniro kaj supreniĝo. Ĉar la komentantoj de Korano ne sciis ekkompreni la simbolan signifon de tiuj »Sunoj«, tial ili foris al si grandegajn penojn, por interpreti la supre-cititan version. Kelkaj el ili asertis, ke la esprimoj »orientoj« kaj »okcidentoj« estis uzitaj en pluralo sekve de la fakto, ke la suno ĉiutage leviĝas en alia punkto.

³²Korano 6:91

³³Korano 41:30

³⁴Korano 70:40

Aliaj skribis, ke tiu ĉi verso aludas la kvar sezonoj de jaro, ĉar la leviĝaj kaj subiraj lokoj de la suno varias kun la sinŝanĝo de la sezonoj. Tia estas la profundo de ilia kompreno! Malgraŭ tio ili plue inputus eraron kaj malsaĝecon al tiuj Gemoj de sciado, al tiuj neriproĉindaj kaj puregaj Simboloj de saĝeco.

46. En simila maniero peni kompreni el tiuj klaraj, potencaj, konvinkitaj kaj nedusencaj argumentoj la signifon de la »disfendo de la ĉielo« - unu el la signoj, kiu nepre devas heroldi la alvenon de la lasta Horo, la Tagon de Renaskiĝo. Kiel Li diris: »Kiam la ĉielo estos disfendita«. ³⁵ La vorto »ĉielo« signifas la ĉielon de dia Revelacio, kiu estas arklevita de ĉiu Malkaŝanto kaj fendita de ĉiu sekvanta. La »disfendo« signifas, ke la antaŭa leĝaro estas anstataŭita kaj eksigita. Mi ĵuras je ŝio, ke tiu ĉi disfeno de la ĉielo estas por juĝokapablo ago pli potenca, ol disfeno de la ĉielarkaĵo! Pensu momenton. Jen dia Revelacio, kiu dum jaroj restadis en firma sekureco, en kies ombro ĉiu, kiu ĝin konfesis, estis varita kaj edukita, per la lumo de kies leĝo homaj generacioj estis disciplinitaj, kies glorajn vortojn la homoj aŭdadis ripetantajn per la buŝoj de siaj patroj, tiel, ke la homa okulo vidis ĉirkaŭe nenion, krom la ĉiopenetra influo de ĝia favoro, kaj la mortema orelo aŭdis nenion, krom la resonoj de l' majesto de ĝia komando. Kiu ago estus pli potenca ol tio, ke per la povo de Dio tiu Revelacio estas »disfendita« kaj eksigita ĉe la apero de unu persono? Konsideru, ĉu ĝi ne estas ago pli potenca, ol tio, kion tiuj malnoblaj kaj malsaĝaj homoj imagis kiel signifon de la »disfendo de la ĉielo«?

³⁵Korano 82:1

47. Konsideru, plie, la malfacilaĵojn kaj la maldolĉajn vivojn de tiuj Malkaŝantoj de la dia Belo. Pensu, kiel senhelpaj kaj solaj ili ekstaris kontraŭ la mondo kaj ĉiuj ĝiaj popoloj, kaj proklamis la Leĝon de Dio! Kiel ajn servaj estis la persekutoj, suferigitaj al tiuj sanktaj, al tiuj karaj kaj koramataj Personoj, tamen ili restis en la pleneco de sia potenco, paciencaj, kaj, malgraŭ sia supereco, ili suferis dolorojn kaj turmentojn.

48. En simila maniero penu kompreni la signifon de la »ŝanĝo de la tero«. Sciu, ke sur kiujn ajn korojn falis la malavaraĵoj pluvoj de favoro, verŝantaj sin el la »ĉielo« de dia Revelacio, la tero de tiuj koroj vere estas ŝanĝita en la teron de dia konado kaj saĝeco. Kiajn mirtojn de unueco kreskigis la grundo de iliaj koroj! Kiajn florojn de vera sciado kaj saĝeco naskis iliaj sinoj! Se la tero de iliaj koroj restus neŝanĝita, kiamaniere tiuj personoj, al kiuj ne estis instruita eĉ unu litero, kiuj neniam vidis instruiston nek iris lernejon, povus sonigi tiajn vortojn kaj elmontri tian sciadon, ke neniu povas tion kompreni? Ili ŝajnas esti modelitaj el la argilo de senlima sciado, kaj kneditaj kun la akvo de dia saĝeco. Tial estis dirite: »Sciado estas lumo, kiun Dio ĵetas en la koron de kiuj ajn Li volas«. Ĝi estas tiu speco de la sciado, kiu estas kaj ĉiam estis glorinda - ne la limhava sciado, kiu elŝprucis el vualitaj kaj mallumaj pensoj. Eĉ tiun ĉi limhavan sciadon ili kaŝe pruntas unu de alia kaj vante fieras pro tio!

49. Ho, se la koroj de l' homoj estus purigitaj de tiuj homdevenaj limigaĵoj kaj mallumaj pensoj, truditaj al ili, por ke ili estu lumigitaj per la brilo de la Suno de l' vera sciado kaj komprenu la misterojn de la dia saĝeco! Konsideru nun: se la seka kaj

senfrukta grundo de tiuj koroj restus neŝanĝita , kiel ili povus akcepti revelacion pri la misteroj de Dio kaj aperigi en si la dian Esencon? Tiel Li diris: »En la tago, kiam la tero estos ŝanĝita en alian teron.«³⁶

50. Pro la ekblovo de l' malavareco de la Reĝo de kreaĵoj ŝanĝigis eĉ la fizika tero, se vi primeditos en viajn korojn la misterojn de Dia Revelacio.

51. Kaj nun ekkomprenu la signifon de tiu ĉi verso: »La tuta tero en la Tago de Renaskiĝo estos nur Lia plenmano, kaj en Lia dekstra mano konvolvita estos la ĉielo. Gloro estu al Li kaj estu Li alte levita super la kunuloj, kiuj staras pro Li!«³⁷ Kaj nun estu justa en via juĝo. Se tiu ĉi verso havas la signifon, kiun ĝi havas laŭ homa supozo, kian utilon - oni povus demandi - tio prezentus al la homaro? Plie, klare kaj kompreneble estas, ke neniu mano, kiun la homaj okuloj povus vidi, kapablas plenumi tiajn farojn, aŭ povus esti atribuita el la plejglora Esenco de la sola vera Dio. Ne, akcepti tian supozon estas simple pura blasfemo, kompleta malligo de la vero. Kaj se oni supozus, ke tiu ĉi verso signifas la Malkaŝantojn de Dio, alvokantajn en la Tago de Juĝo por plenumi tiujn farojn, ankaŭ tio ĉi ŝajnas malsimila al la vero kaj certe senutila. Kontraŭe la esprimo »tero« signifas la teron de kompreno kaj sciado, kaj »ĉielo« - la ĉielon de dia Revelacio. Pripensu, kiel unuflanke Li ŝanĝis, per la potenco de Sia mano, la teron de kompreno kaj sciado, antaŭe disetenditan, en unu nuran plenmanon, kaj aliflanke etendis novan kaj alte

³⁶Korano 14:48

³⁷Korano 39:67

glorindan teron en la homaj koroj, kreskigante tiel el la lumigita sino de homo plej freŝajn kaj belajn florojn kaj plej potencajn kaj altajn arbojn.

52. En simila maniero konsideru, kiel la alta ĉielo de la pasintaj Diepokoĵ estis, en la dekstra mano de potenco, kunvolvita, kiel la ĉielo de dia Revelacio arklevita estis laŭ la komando de Dio kaj ornamita per la suno, luno kaj steloj de Liaj mirindaj ordonoj. Tiaj estas la misteroj de la Vorto de Dio, kiuj estas senvaligitaj kaj evidentigitaj, por ke vi perceptu la tagiĝan lumon de dia gvidado, estingu, per la polvo de konfido kaj sinrezigno, la lampon de vana imago, de senhavaj fantazjaĵoj, de hezitado kaj dubo, kaj bruligu en la plejfunda angulo de via koro la novnaskitan lumon de dia sciado kaj certeco.

53. Sciu kun certeco, ke la celo de ĉiuj tiuj simbolaj esprimoj kaj malklaraj aludoj, kiuj emas de la Malkaŝantoj de la - sankta Afero de Dio, estis sperti kaj provi la popolojn de la mondo, por ke tiamaniere la tero de puraj kaj lumaj koroj estu distingita de pereema kaj senfrukta grundo. De tempo nememorebla tia estis la metodo de Dio rilate al Siaj servantoj, kaj tion ĉi atestas la enhavo de la sanktaj libroj.

54. Kaj simile pripensu pri la revelacia verso, koncernanta la »Qiblih«.³⁸ Kiam Mahometo, la Suno de Profeteco, forkuris de la tagiĝ-loko de Batha³⁹ en la urbon Yathrib⁴⁰, Li plue turnadis Sian vizaĝon, preĝante, al Jerusalemo, la sankta urbo, ĝis la

³⁸La direkto al kiu la vizaĝo turniĝu dum preĝado

³⁹Mekko

⁴⁰Medino

tempo, kiam la judoj komencis proklami kontraŭ Li maldecajn vortojn, vortojn, kies mencio malkonvenus al tiuj ĉi paĝoj kaj ĝenus la leganton. Tiuj vortoj multe malplaĉis al Mahometo. Kiam, envolvita en meditado kaj admiro, Li rigardis ĉielen, Li ekaŭdis la dolĉan voĉon de Gabrielo, dirantan: »Ni vidas vin de supre, turnantan vian vizaĝon ĉielen. Sed Ni igos Vin turniĝi al Qiblih, kiu estos al Vi agrabla.«⁴¹ La sekvintan tagon, kiam la Profeto kun siaj kunuloj preĝis la tagmezan preĝon kaj estis jam plenuminta du el la ordonitaj rikatoj⁴², aŭdiĝis denove la voĉo de Gabrielo: »Turnu vian vizaĝon al la sankta moskeo.«^{43 44} En la mezo de la sama preĝo Mahometo subite turnis la vizaĝon for de Jerusalemo kaj direktis ĝin al Ka'bih. Sekve de tio profunda konsterno ekregis subite la kunulojn de la Profeto. Ilia kredo estis akre ekskuita. Tiel granda estis ilia konfuzo, ke multaj el ili, interrompinte la preĝon, forlasis sian kredon. Vere, Dio estigis tiun tumulton nur por sperti kaj provi Siajn servantojn. Alie Li, la ideala Reĝo, povus facile lasi la Qiblih neŝanĝitan, kaj povus lasi Jerusalemon kiel adordirekton dum Sia epoko, ne senigante tiel tiun urbon de la distingo de ŝatindeco, kiu estis al ĝi favordonita.

55. De la tempo, kiun Moseo estis aperigita kiel Portantyo de la Vorto de Dio, neniu el la multaj Profetoj, senditaj en la mondon, kiel Davido, Jesuo kaj aliaj el la plej glorindaj Malkaŝantoj, kiuj aperis en la periodo inter la Revelacioj de Moseo kaj

⁴¹Korano 2:144

⁴²Adorkliniĝoj

⁴³ĉe Mekko

⁴⁴Korano 2:149

de Mahometo, ŝanĝis iam la leĝon pri Qiblih. Ĉiuj tiuj senditoj de la Sinjoro de kreaĵoj turnadis siajn popolojn al la sama direkto. Antaŭ la okuloj de Dio, la ideala Reĝo, ĉiuj lokoj de la tero estas egalaj, krom tiu loko, kiun Li, en la tagoj de Siaj Malkaŝantoj, destinas por speciala celo. Kiel Li revelaciis: »La oriento kaj la okcidento estas de Dio: tial kien ajn vi turniĝas, tie estas la vizaĝo de Dio.«⁴⁵ Malgraŭ la vareco de tiuj faktoj, kial la Qiblih devus esti ŝanĝita, semante tian konsternon inter la homoj, igante la kunulojn de la Profeto ŝanceliĝi kaj kaŭzante tiel grandan konfuzon en ilia mezo? Jes, tiaj aferoj, kiuj kaŭzas konsternon en la koroj de ĉiuj homoj, okazas nur tial, ke ĉiu animo estu provita per la provŝtono, por ke sincerulo estu ekkonita kaj distingita de malsincerulo. Tiel Li revelaciis post la rompo en la popolo: »Ni destinis la lokon, kiu estos al Vi agrabla, kiel Qiblih nur tiucele, ke Ni destingu tiun, kiu sekvas la Apostolon, de tiu, kiu kuras flanken.«⁴⁶ »Timigitaj azenoj, forkurantaj de leono.«⁴⁷

56. Se vi primeditos dum momento tiujn ĉi vortojn en via koro, vi certe trovos la portalojn de kompreno malfermitaj antaŭ via vizaĝo, kaj vi vidos ilian tutan konadon kaj ĉiujn misterojn senvaligintaj antaŭ viaj okuloj. Tiaj aferoj okazas nur per tio, ke la homaj animoj evoluu kaj estu liberigitaj el la kaĝo de memo kaj deziro. Ekster tio, tiu ideala Reĝo de eterne estis en Sia Esenco sendependa de la kompreno de ĉiuj estaĵoj, kaj estos ĉiam, en Sia propra Esteco, glorlevita super la adoradon

⁴⁵Korano 2:115

⁴⁶Korano 2:143

⁴⁷Korano 74:50

de ĉiu kreaĵo. Unu sola ekblovo de Lia abundeco sufiĉas, por vesti la tutan homaron per la robo de riĉeco, kaj unu guto el la oceano de Lia malavara favoro sufiĉas, por verŝi sur ĉiujn kreaĵojn la gloron de eterna vivo. Sed ĉar laŭ la dia intenco dekretite estas, ke sincerulo estu distingita de malsincerulo, kiel la suno de ombro, tial Li en ĉiu tempo sendadis sur la homaron la pluvojn de provoj el Sia regno de gloro.

57. Se la homoj primeditus la vivojn de la pasintaj Profetoj, ili atingus tiel facile la konon kaj komprenon pri la agomanieroj de tiuj Profetoj, ke ili liberiĝus de la vualo, kiun ĵetas sur ilin vortoj kaj faroj, kontraŭ al iliaj propraj egoistaj deziroj, neniigus tiel ĉian vualon, kiu estas inter ili mem kaj la fajro, brulanta el la arbusto de dia konado, kaj okupus lokon sur la trono de paco kaj certeco. Konsideru, ekzemple, Moseon, la filon de Imran, unu el la glorindaj Profetoj kaj aŭtoron de la diodonita Libro. Unu tagon, en la fruaj jaroj de Sia vivo, antaŭ ol Lia mesio estis proklamita, Li ekvidis, pasante tra foirejo, du homojn, batalantajn unu kontraŭ la alia. Unu el ili petis de Moseo helpo kontraŭ sia kontraŭulo. Tiam Moseo intermiksiĝis kaj mortigis lin. Pri tio ĉi atestas la enhavo de la sankta Libro. Se Ni citus la detalojn, ĝi prenus tro da tempo kaj interrompus la linion de la argumentado. La famo pri tiu okazo disvastiĝis tra la urbo, kaj Moseo estis plena de timo, kiel atestas la teksto de la Libro. Kaj kiam la averto: »Ho Moseo, vere, la ĉefuloj interkonsilas por vin mortigi«⁴⁸ atingis Liajn orelojn, Li foriris el la urbo kaj haltis en la lando midjuna, en la servo de Shoeb. Revenante, Moseo eniris la sanktan valon, kuŝantan en la sovaĝejo de Sinaj,

⁴⁸Korano 28:20

kaj tie Li vidis la vizion de la Reĝo de gloro en la ⁴⁹ »Arbo, kiu apartenas nek al la oriento, nek al la okcidento.« Tie Li aŭdis la animtuŝantan Voĉon de la Spirito, parolantan el la brulanta Fajro, kiu ordonis al Li verŝi sur la animojn de la faraona popolo la lumon de dia gvidado - tiel, ke, liberiginte ilin de la ombroj de la valo de egoismo kaj deziro, Li ebligu al ili atingi la herbejon de la ĉiela feliĉeco, kaj, savinte ilin, per la Salsabi de sinrezigno, el la konfuzo de malproksimeco, Li igu ilin eniri la pacan urbon de la dia apudesto. Kiam Moseo venis antaŭ Faraonon kaj transdonis al li, laŭ la ordono de Dio, Lian parolon, Faraono ekparolis insulte, dirante: »Cu vi ne estas tiu, kiu plenumis murdon kaj iĝis malfidela?« Tion rakontis la Sinjoro de majesteco, kiel diritan de Faraono al Moseo: »Kia faro ĝi estas, kiun Vi plenumis! Vi estas sendankulo. Li diris: 'Vere, Mi plenumis ĝin, kaj Mi estis el tiuj, kiuj eraris, kaj Mi forkuris de vi, kiam Mi timis vin, sed Mia Sinjoro donis al Mi saĝecon kaj faris Min unu el Siaj Apostoloj.'«⁵⁰

58. Kaj nun konsideru en via koro la tumulton, kiun Dio ekscitis. Pripensu pri la strangaj kaj multaj provoj, per kiuj Li spertas Siajn servantojn. Konsideru, Kiel Li elektis subite Moseon el inter Siaj servantoj kaj konfidis la altan mision de dia gvidado al Li, kiu estis konata kiel mortiginto, kiu mem konfesis Sian kruelaĵon, kaj kiu dum preskaŭ tridek jaroj estis, antaŭ la okuloj de la mondo, prizorgata en la domo de Faraono kaj nutrata ĉe lia tablo. Ĉu ne estis eble al Dio, la ĉiopova Reĝo, deteni la manon de Moseo de la mortigo, por ke ne estu al Li imputata

⁴⁹Korano 24:35

⁵⁰Korano 26:19

murdo, kaŭzante konfuzon kaj malamon?

59. Pensu, simile, pri la stato kaj kondiĉo de Mario. Tiel profunda estis la aflikto de tiu belega figuro, tiel dolora estis ŝia afero, ke ŝi maldolĉe bedaŭris, ke ŝi estis iam naskita. Pri tio ĉi atestas la teksto de la sankta verso, en kiu estas dirite, ke post kiam Mario donis vivon al Jesuo, ŝi priploris sian situacion kaj vokis: »Ho, se mi estus mortinta antaŭe kaj estus forgesita, tute forgesita!«⁵¹ Mi ĵuras je Dio! Tia lamento mordas la koron kaj skuas la animon. Tian internan konsternon, tian premitecon povis kaŭzi nenio, krom kritikado de malamikoj kaj ĉikanado de nekredantoj kaj malbonuloj. Pensu, kiam respondon Mario povis doni al siaj ĉirkaŭantoj? Kiel ŝi povis aserti, ke la Infano, kies patro estis nekonata, estis naskigita de la Sankta Spirito? Tial Mario, tiu vualita kaj senmorta figuro, prenis la Infanon kaj revenis en sian hejmon. Tuj kiam la rigardoj de la homoj falis sur ŝin, ili levis la voĉojn, dirante: »Ho fratino de Aron! Via patro ne estis malhonesto, nek malĉasta estis via patrino!«⁵²

60. Kaj nun pripensu pri tiu grandega sperto, pri tiu dolora provo. Malgraŭ ĉio tio Dio donis al tiu esenco de la Spirito, al Tiu, kiu estis konata inter la homoj kiel senpatrulo, la gloron de profeteco, kaj faris Lin Sia atestanto antaŭ ĉiuj, kiuj estis en la ĉielo kaj sur la tero.

61. Vidu, kiel la manieroj de la Malkaŝantoj de Dio, ordonitaj de la Reĝo de kreaĵoj, estas kontraŭaj al la manieroj kaj deziroj de la homoj. Laŭgarde kiel vi komprenos pli la esencon de tiuj

⁵¹Korano 19:22

⁵²Korano 19:28

diaj misteroj, klara iĝados al vi la intenco de Dio, la sankta Carmanto, la Plejamato. Vi vidos la vortojn kaj la farojn de tiu ĉiopova Reganto egalaj kaj samaj, tiel, ke kion ajn vi rimarkos en Liaj faroj, la samon vi trovos en Liaj paroloj, kaj kion ajn vi legos en Liaj paroloj, tion vi rekonos en Liaj faroj. Tiel do okazas, ke ekstervide tiuj faroj kaj vortoj estas venĝa fajro kontraŭ malbonuloj, kaj esence - akvo de kompato por virtuloj. Se la okulo de la koro malfermiĝus, ĝi certe perceptus, ke la vortoj, revelaciitaj el la ĉielo de la volo de Dio, estas egalaj kaj samaj, kiel la faroj, kiuj emanis el la Regno de la dia potenco.

62. Kaj nun streĉu vian atenton, ho frato! Se tiaj aferoj estas revelaciitaj en tiu ĉi Epoko kaj tiaj okazoj plenumiĝus en la nuna tempo, kion farus la homoj? Mi ĵuras je Tiu, kiu estas la vera Edukanto de la homaro kaj Malkaŝanto de la Vorto de Dio, ke la homoj senprokraste kaj senhezite proklamus Lin malfidelulo kaj kondamnus Lin al morto. Kiel malproksimaj ili estas de la ekaŭdo de la voĉo, kiu deklaris: Rigardu! Jen Jesuo, aperinta per la spiro de la Sankta Spirito, kaj jen Moseo, alvokita al die-difinita tasko! Se eksonus miriado da voĉoj, neniu orelo aŭskultus, se Ni dirus, ke al senpatra Infano donita estas la misio de profeteco, aŭ ke mortiginto alportis de la flamo de la brulanta Arbusto la parolon: »Vere, vere, Mi estas Dio!«

63. Se la okulo de justeco estos malfermita, ĝi baldaŭ rekonos, en la lumo de tio, kio estis menciita, ke Tiu, kiu estas la Kaŭzo kaj la finfina Celo de ĉiuj tiuj aferoj, estas aperinta en tiu ĉi tago. Kvankam similaj faktoj ne okazis en tiu ĉi Epoko, tamen la homoj kroĉas sin ankoraŭ al tiaj vanaj fantazjaĵoj, kiuj flegas malbonuloj. Kiel korpremaj estas la akuzoj, faritaj kontraŭ Li!

Kiel severaj estas la persekutoj, suferigitaj al Li - akuzoj kaj persekutoj, al kiuj similajn la homoj neniam aŭdis aŭ vidis!

64. Granda Dio! Kiam la torento de paroloj atingis tiun ĉi gradon, Ni rigardis - kaj jen la dolĉaj aromoj de Dio estis blovportataj el la tagiĝ-loko de Revelacio, kaj matena venteto spiris el la Sebo de la Eternulo. Ĝia blovo reĝojigis la koron kaj inspiris senmezuran feliĉon al la animo. Ĝi donis novecon al ĉiuj aĵoj, kaj alportis sennombraj kaj netakseblajn donacojn de la nekonebla Amiko. La robo de homaj laŭdoj neniel povas esperi taŭgi per ĝia nobla figuro, kaj al Ĝia brila estaĵo la mantelo de paroloj neniel povas konveni. Sen vortoj Ĝi malkaŝas la internajn misterojn, kaj sen paroloj Ĝi malkovras la sekretojn de la diaj diraĵoj. Ĝi instruas lamentadon kaj ĝemadon al la najtingaloj, ĉirpantaj sur la branĉo de malproksimeco kaj forteco, lernigas al ili la arton de amo kaj montras la sekretojn de korsubiĝo. Ĝi malkaŝas la karesojn de pasia amanto al la floroj de la Riĉván de l' eterna unueco, kaj senvualigas la ĉarmon de beleco. Al la anemonoj de la ĝardeno de amo Ĝi prezentas la misterojn de l' vero, kaj al la brustoj de amantoj ĝi konfidas la simbolojn de plejfundaj subtilaĵoj. En tiu ĉi horo tiel malŝpara estas la elŝpruco de Ĝia favoro, ke la Sankta Spirito mem estas envia! Ĝi donis al guto la ondojn de la maro, kaj havigis al polvo la brilegon de la suno! Tiel granda estas la inundo de dia malavareco, ke plej malpura skarabo ekserĉis la parfumon de musko, kaj vesperto la lumon de la suno. Ĝi revivigis la mortulojn per la spiro de vivo kaj igis ilin ekrapidi for el la tomboj de siaj mortemaj korpoj. Ĝi sidigis sensciulon sur la sidejon de instruiteco, kaj levis tiranon sur la tronon de justeco.

65. La universo abundegas je tiuj diversaj malavaraĵoj atendante la horon, kiam la efikoj de Gĵaj nevideblaj donoj vidiĝus en tiu ĉi mondo, kiam svenantoj kaj soifegantoj atingos la vivan Kawtharon de sia Amato, kaj vojperdinta migranto, eraranta en la sovaĝejoj de malproksimeco kaj nenieco eniros la tabernaklon de vivo kaj atingos unuiĝon kun la deziro de sia koro. En la grundo de kies koro ekĝermos tiuj sanktaj semoj? En la ĝardeno de kies animo elkreskos la floroj de la nevideblaj realaĵoj? Vere, Mi diras, tiel forta estas la flamo de la Arbusto de amo, brulanta sur la Sinaj-monto de la koro, ke la ondantaj akvoj de sanktaj paroloj neniel povas ĝin estingi. Oceanoj ne povas kvietigi la brulan soifon de tiu Leviatano, kaj tiu Fenikso de senmorta fajro povas vidi nenie, krom en la arbo de la vizaĝo de l' Plejamata. Tial, ho frato, lumigu per la oleo de saĝeco la lampon de la spirito en la plejfunda angulo de via koro, kaj ŝirmu ĝin per la vitraĵo de kompreno, ke via koro trovu pacon, ke vi estu unu el tiuj, kiuj per la flugiloj de certeco ekflugis en la ĉielon de amo de via Sinjoro, la Plej Kompatema.

66. Kaj nun, koncerne la vortojn: »Kaj tiam aperos sur la ĉielo la signo de la Filo de homo«. ⁵³ La signifo de tiuj ĉi vortoj estas, ke kiam la ĉielaj instruoj estos mallumiĝintaj, la steloj de la die-fiksitaj leĝoj estos falintaj, kaj la luno de la vera sciado - la edukanto de la homaro - estos senbriliĝinta, kiam la standardoj de gvidado kaj feliĉeco estos renversitaj kaj la tagiĝlumo de vero kaj justeco ŝanĝita en nokton - tiam la signo de la Filo de homo aperos sur la ĉielo. La vorto »ĉielo« signifas la videblan ĉielon, ĉar kiam proksimiĝos la horo, en kiu la Suno de la ĉielo de

⁵³Mateo 24:30

justeco aperos kaj la Arkeo de la dia gvidado naĝos sur la maro de gloro, montriĝos sur la ĉielo stelo, anoncanta al sia popolo alvenon de tiu plej granda lumo. En simila maniero ankaŭ en la nevidebla ĉielo aperos stelo, kiu estos por la popoloj de la tero heroldo, anoncanta la eklumon de tiu vera kaj glora Tagiĝo. Tiuj dueblaj signoj, en la videbla kaj la nevidebla ĉielo, antaŭvenis la Revelacion de ĉiu el la Profetoj de Dio, kiel oni ĝenerale kredas.

67. Inter la Profetoj estis Abraham, la Amiko de Dio. Antaŭ ol Li aperis, Nimrod havis songon. Li alvokis sekve aŭguristojn, kiuj sciigis lin pri la leviĝo de stelo sur la ĉielo. Simile aperis ankaŭ heroldo, kiu anoncis tra la lando la alvenon de Abraham.

68. Post Li venis Moseo, kiu interparolis kun Dio. La aŭguristoj de Lia tempo avertis Faraonon per tiuj vortoj: »Stelo leviĝis sur la ĉielo, kaj jen ĝi antaŭsignas naskiĝon de Infano, kiu tenas en sia mano vian sorton kaj la sorton de via popolo.» Simile aperis ankaŭ saĝulo, kiu dum la mallumo de l' nokto alportis la ĝojan novaĵon al la idoj de Izrael, inspirante konsolon al iliaj animoj kaj certecon al iliaj koroj. Pri tio ĉi atestas la enhavo de la sanktaj libroj. Se Ni volus mencii la detalojn, tiu ĉi epistolo atingus la dikecon de libro. Krom tio ne estas Nia intenco rakonti la okazojn de la pasintaj tagoj. Dio estas Nia atestanto, ke eĉ tio, kion Ni nun mencias, estas sole pro Nia ama korinklino al vi, por ke la malriĉulo de la tero atingu la bordojn de la maro de riĉeco, la scienculo estu gvidata al la oceano de dia sciado, kaj tiu, kiu soifas komprenon, allasita estu al la Salsabil de dia saĝeco. Alie tiu ĉi Servanto konsiderus la preparoladon de tiuj aferoj kiel gravan eraron kaj bedaŭrindan kulpon.

69. En simila maniero, kiam proksimiĝis la horo de la Revelacio de Jesuo, kelkaj magoj, sciantaj, ke la stelo de Jesuo aperis sur la ĉielo, serĉis kaj sekvis ĝin, ĝis ili venis en la urbon, kiu estis tronloko de la regno de Herodo. La potenco de lia regado en tiuj tagoj etendis sin sur la tutan landon.

70. La magoj diris: »Kie estas Tiu, kiu estas naskita Reĝo de la judoj? ĉar ni vidis Lian stelon en la oriento kaj venis, por adorkliniĝi al Li!⁵⁴ Kiam ili serĉis, ili trovis, ke en Betlehemo, en la juda lando, naskiĝis la Infano. Tio estis la signo, kiu aperis sur la videbla ĉielo. Koncerne la signon en la nevidebla ĉielo - en la ĉielo de dia sciado kaj kompreno - aperis Yahya, la filo de Zahariaso, kiu konigis al la popolo la novaĵon pri la Revelacio de Jesuo. Tiel Li diris: »Dio sendas al vi Yahyan, kiu proklamos ateston pri la Vorto de Dio, homon grandan kaj korpuran.«⁵⁵ La esprimo »Vorto« signifas Jesuon, kies alvenon Yahya antaŭdiris. Plie, en la ĉiela Skribaĵo estas dirite: »En tiuj tagoj venis Johano la Baptisto, predikante en la dezerto de Judujo, kaj dirante: Pentu, ĉar alproksimiĝis la Regno de la ĉielo.«⁵⁶ Johano estas Yahya.

71. Simile, antaŭ ol la belo de Mahometo estis senvualigita, vidiĝis la signoj sur la videbla ĉielo. Koncerne la signojn en la nevidebla ĉielo, aperis kvar homoj, kiuj sinsekve anoncis al la popolo la ĝojan novaĵon pri la apero de tiu dia Lumportanto. Al Ruz-bih, nomita poste Salman, donita estis la honoro servi al ili.

⁵⁴Mateo 2:2

⁵⁵Korano 3:39

⁵⁶Mateo 3:1-2

Kiam la fino de unu el ili estis proksima, li sendadis Ruz-bihon al la alia, ĝis la kvara, kiu, sentante la alvenon de sia morto, turnis sin al Ruz-bih, dirante: »Ho Ruz-bih! Post kiam vi prenos kaj enterigos mian korpon, iru en Hijazon, ĉar tie leviĝos la Suno de Mahometo. Feliĉa estas vi, ĉar vi vidos Lian vizaĝon!«

72. Kaj nun rilate al tiu ĉi mirinda kaj plejglora Afero. Sciu, vere, ke multaj astronomoj antaŭdiris la aperon de ĝia stelo sur la videbla ĉielo. Simile, aperis sur la tero Ahmad kaj Kazim,⁵⁷ la du frataj brilegaj lumoj - Dio sanktigu la lokon de ilia ripozo!

73. El ĉio, kion ili prezentis, klare kaj evidente montriĝas, ke antaŭ la Revelacio de ĉiu el la Speguloj, reflektantaj la dian Es-encon, signoj, anoncantaj ilian alvenon, devas plenumiĝi en la videbla ĉielo, same kiel en la nevidebla, kie estas la trono de la suno de sciado, de la luno de saĝeco kaj de la steloj de kompreno kaj parolo. La signoj en la nevidebla ĉielo devas plenumiĝi en la persono de perfektulo, kiu antaŭ ĉiu Revelacio aperas, edukas kaj preparas la homajn animojn por la alveno de la dia Lumportanto, la Lumo de la unueco de Dio inter la homoj.

74. Kaj nun, rilate al Liaj vortoj: »Kaj tiam ploros ĉiuj gentoj de la tero, kaj oni vidos la Filon de homo, venantan el la nuboj de la ĉielo kun potenco kaj granda gloro.« Tiuj ĉi vortoj signifas, ke en tiuj tagoj la homoj ploros la perdon de la Suno de la dia beleco, de la Luno de kompreno kaj de la Steloj de la dia saĝeco. Tiam ili vidos vizaĝon de la Promesito, de la adoranta Belo, malsupreniranta en la ĉielo kaj venanta sur nuboj. Tio ĉi signifas, ke la dia Belo aperos el la ĉielo de la volo de Dio,

⁵⁷Shaykh Ahmad-i-Aḥsá'í kaj Siyyid Kázim-i-Rashtí

kaj ĝi venos en la formo de la noma templo. La esprimo »ĉielo« montras altecon kaj grandecon, ĉar ĝi estas la trono de la revelacio de tiuj Malkaŝantoj de sankteco, de tiuj Astroj de pratempa gloro. Tiuj pratempaj Estaĵoj, kvankam naskitaj el la sinoj de siaj patrinoj, efektive estas malsuprenvenintaj el la ĉielo de la volo de Dio. Kvankam ili loĝas sur la tero, tamen ilia vera restejo estas la sidejoj de gloro en la superteraj sferoj. Paŝante inter la mortemuloj, ili ŝvebas samtempe en la ĉielo de dia apudesto. Sen piedoj ili iras la vojon de la spirito, kaj sen flugiloj ili leviĝas en la superterajn altaĵojn de la dia unueco. Kun ĉiu spirblovo ili pasas tras la vastaĵoj de la spaco, kaj en ĉiu momento ili tramiĝas la regnojn videblajn kaj nevideblajn. Sur iliaj tronoj estas skribite: »Nenio en la mondo malhelpas Lin de sinokupado per io alia;« kaj sur iliaj seĝoj estas gvavurite: »Vere, Liaj manieroj diferencas ĉiutage.«⁵⁸ Ili estas senditaj per la supernatura povo de la Pratempulo, kaj starigitaj de la glora volo de Dio, la plej potenca Reĝo. Jen kion signifas la vortoj: »venanta en la nuboj de la ĉielo.«

75. En la paroloj de la diaj Lumportantoj la esprimo »ĉielo« estas uzita rilate al multaj kaj diversaj aferoj, ekzemple: la »ĉielo de Ordonoj«, la »ĉielo de Volo«, la »ĉielo de la dia Intenco«, la »ĉielo de la dia Sciado«, la »ĉielo de Certeco«, la »ĉielo de Paroloj«, la »ĉielo de Revelacio«, la »ĉielo de Kaŝiteco« kaj simile. En ĉiu ekzemplo Li donis al la esprimo »ĉielo« specialan sencon, kies signifo malkaŝita estas al neniu krom tiuj, kiuj estas enkondukitaj en la diajn misterojn kaj trinkitaj el la kaliko de senmorta vivo. Li diris, ekzemple: »La ĉielo havas nutraĵon por

⁵⁸Korano 55:29

vi, kaj ĝi entenas tion, kio estas al vi promesita,«⁵⁹ dum tiun nutraĵon liveras la tero. Simile estas dirite: »La nomoj venas malsupren el la ĉielo,« dum ili venas el la homaj buŝoj. Se vi purigos la spegulon de via koro de la polvo de malbonvolo, vi komprenos la signifon de la simbolaj esprimoj, revelaciitaj de la ĉiopova Vorto de Dio, aperinta en ĉiu Epoko, kaj vi malkovros la misterojn de la dia sciado. Neniel tamen vi povos ekvidi la brilegan matenlumon de la vera kompreno, antaŭ ol vi neniigos per la flamo de la plena korpureco la vualojn de vantaj lernaĵoj, kiuj estas kutimaj inter la homoj.

76. Sciu, vere, ke la sciado estas duspeca: dia kaj satana. La unua ŝprucas el la fonto de dia inspiro; la dua estas nur rebrilo de vantaj kaj mallumaj pensoj. La fonto de la unua estas Dio mem; la movoforto de la lasta estas la flustroj de egoistaj deziroj. La unua estas gvidata de la principo: »Timu Dion; Dio instruos vin«,⁶⁰ la alia estas nur konfirmo de la vero: »Sciado estas la plej plorinda vualo inter la homo kaj lia Kreinto.« La unua naskas la fruktojn de pacienco, de sopirado, de la vera kompreno kaj de amo, dum la lasta povas estigi nenion krom aroganteco, malhumileco kaj fiereco. En la diraĵoj de tiuj Majstroj de sanktaj paroloj, kiuj klarigis la signifon de la vera sciado, oni povas neniel trovi la odoron de tiuj mallumaj instruoj, kiuj ombrigis la mondon. La arbo de tiuj instruoj povas doni neniun rezulton ekster malboneco kaj ribeleco, kaj ĝi kreskigas neniujn fruktojn, krom malamo kaj envio. Ĝia fructo estas mortiga veneno; ĝia ombro estas detruanta fajro. Kiel prave estas dirite: »Tenu

⁵⁹Korano 51:22

⁶⁰Korano 2:282

vin je la robo de la Deziro de via koro, kaj metu flanken ĉian honton; ordonu al mondsaĝuloj iri for, kiel ajn granda estus ilia nomo.«

77. Via koro devas sekve esti nepre purigita de la vanaj diraĵoj de la homoj, kaj sanktigita super ĉian teran senton, por ke ĝi povu malkovri la kaŝitan signifon de la dia inspiro kaj iĝi trezorejo de la misteroj de la dia sciado. Tiel estis dirite: »Tiu, kiu iras la neĝoblankan Vojon, kaj sekvas la postsignojn de la Skarlata Kolono, neniel atingos sian restejon, se liaj manoj ne estos antaŭe liberaj de tiuj mondaĵoj, kiuj estas karaj al la homoj.« Tio ĉi estas la unua kondiĉo por tiu, kiu iras tiun vojon. Pensu pri tio, por ke vi ekvidu la verecon de tiuj ĉi vortoj kun senvualigitaj okuloj.

78. Ni flankiĝis de la temo de Nia argumentado, kvankam kio ajn estas menciita ĉi tie, servas nur por konfirmi Nian tezon. Je Dio! Kiel ajn granda estas Nia deziro esti konciza, Ni sentas tamen, ke Ni ne povas deteni Nian plumon. Malgraŭ ĉio, kion Ni menciis, kiel sennombraj estas la perloj, kiuj restis netuŝite en la konko de Nia koro! Kiel multaj hurisoj de internaj signifoj kaŝitaj estas ankoraŭ en la ĉambroj de la dia saĝeco! Neniu ĝis nun proksimiĝis al ili, al tiuj hurisoj, »kiujn neniu homo aŭ spirito tuŝis antaŭe.«⁶¹ Malgraŭ ĉio, kion Ni diris ĉi tie, ŝajnas, kvazaŭ nek unu litero de Nia tezo estus elparolita, kvazaŭ nek unu sola signo estus malkaŝita koncerne Nian temon. Kiam troviĝos fidela serĉanto, kiu surmetos la veston de pilgrimado, atingos ĝis la Ka'bih de sia kordeziro, kaj sen orelo kaj lango

⁶¹Korano 55:56

malkovros la sekretojn de la diaj paroloj?

79. Per tiuj ĉi lumaj, konvinkaj kaj kompreneblaj argumentoj la signifo de la »ĉielo« en la menciitaj antaŭe versoj estos elmontrita klare kaj evidente. Kaj nun koncerne Liajn vortojn, ke la Filo de homo venos »en la nuboj de la ĉielo«. ⁶² La esprimo »nuboj« signifas tiujn aferojn, kiuj estas kontraŭaj al la manieroj kaj deziroj de la homoj. Kiel Li diris en la citita jam verso: »Kiomfoje Apostolo venas al vi kun tio, kion viaj animoj ne deziras, vi fieriĝas, akuzante kelkajn pri trompo kaj mortigante aliajn.« ⁶³ Tiuj nuboj signifas en unu senco la nuligon de la leĝoj, la eksigon de la antaŭa religia sistemo, la forigon de ritoj kaj moroj, kutimaj inter la homoj, la altigon de neinstruita kredanto super instruitaj kontraŭulojn de la kredo. En alia senco ili signifas la aperon de tiu senmorta Belo en la figuro de mortema homo, kun tiaj homaj limigitaĵoj kiel manĝado kaj trinkado, dormo kaj maldormo, kaj aliaj aferoj, kiuj ĵetas dubon en la homaj mensojn kaj kaŭzas ilian forturniĝon. Pri ĉiuj tiaj vualoj oni parolas simbole kiel pri »nuboj«.

80. Tio estas la nuboj, pro kiuj fendita estas la ĉielo de sciado kaj kompreno de ĉiuj, kiuj loĝas sur la tero. Kiel Li revelaciis: »En tiu tago la ĉielo estos fendita de nuboj.« ⁶⁴ Kiel la nuboj malebligas al la homaj okuloj vidi la sunon, tiel tiuj aferoj detenas la homajn animojn de la rekono de la lumo de la dia Lumportanto. Tion ĉi atestas la vortoj, kiuj elvenis al la buŝoj

⁶²Mateo 24:30

⁶³Korano 2:87

⁶⁴Korano 25:25

de la nekredantoj, kiel estas dirite en la sankta Libro: »kaj ili diris: Kia Apostolo tio estas? Li manĝas manĝaĵon kaj paŝas sur la stratoj. Se anĝeloj ne estos senditaj malsupren kaj ne kunagos en Liaj avertoj, ni ne ekkredos.«⁶⁵ Simile aliaj Profetoj estis subigitaj al malriĉeco kaj afliktoj, al malsato, al malsanoj kaj okazoj de tiu ĉi mondo. Ĉar tiuj sanktaj personoj estis subigitaj al tiaj necesajoj kaj mankoj, tial la homoj vagis en la dezertoj de malfido kaj dubo kaj lasis sin aflikti de konsterno kaj konfuzo. Kiel - ili demandis - tia persono povas esti sendita de Dio, aserti sian superecon super ĉiuj gentoj kaj popoloj de la tero, pretendi esti la celo de la tuta kreado - kiel Li diris: »ĉion, kio estas en la ĉielo kaj sur la tero, Mi kreis nur por Vi« - kaj tamen esti subigita al tiaj malgravaĵoj? Sendube vi scias pri la suferoj, malriĉeco, malsanoj kaj homiligoj, kiuj trafadis ĉiun Profeton de Dio kaj Liajn kunulojn. Certe vi aŭdis, kiel la kapoj de iliaj sekvantoj estis sendataj donace en diversajn urbojn, kiel dolore oni malhelpis ilin en tio, kio estis al ili ordonita. Ĉiu el ili iĝis viktimo de la malamikoj de Lia Afero kaj devis suferi, kion ili decidis kontraŭ Li.

81. Evidente estas, ke la ŝanĝoj, efektivigitaj en ĉiu Epoko, formas la mallumajn nubojn, kiuj metas sin inter la okulojn de la homa kompreno kaj dian Lumportanton, kiu brilas el la tagiĝ-loko de la dia Esenco. Konsideru, kiel dum generacioj la homoj blinde imitadis siajn antaŭulojn kaj estis edukataj laŭ tiuj metodoj kaj manieroj, kiujn prezentis la postuloj de ilia kredo. Se tiuj homoj malkovrus do subite, ke Homo, kiu vidis en ilia mezo, kiu, rilate al ĉiaj homaj limigaĵoj, estis ilia egalulo,

⁶⁵Korano 25:7

leviĝis por eksigi ĉiujn firmajn principojn, fiksitaĵojn de ilia kredo - la principojn, laŭ kiuj ili estis edukataj de jarcentoj, kaj kies ĉiun kontraŭulon kaj neanton ili rigardadis kiel malfidelulon, malnoblulon kaj malvirtulon - tio sendube vualus ilkian vidon kaj detenus ilin de la rekono de Lia vero. Tiaj aferoj estas kiel nuboj, kiuj vualas la okulojn de tiuj, kies interna estaĵo ne gustumis la Salsabilon de korpureco, nek trinkis el la Kawthar de la konado de Dio. Tiaj homoj, eksciinte pri tiaj cirkonstancoj, iĝas tiel vualitaj, ke sen ia hezito ili proklamas la Malkaŝanton de Dio malfidelulo kaj kondamnas Lin al morto. Vi aŭdis certe, ke tiaj aferoj okazadis ĉiam, en ĉiu tempo, kaj nun vi vidas ilin en tiuj ĉi tagoj.

82. Decan al ni sekve streĉi ĉiujn povojn, por ke, kun nevidebla helpo de Dio tiuj mallumaj vualoj, tiuj duboj de elĉielaj provoj ne detenu nin de la ekvido de l' beleco de Lia radia Vizaĝo, kaj por ke ni rekonu Lin nur per Li mem. Kaj se ni postulus pruvojn, ni kontentiĝu per unu sola kaj nura, por ke ni atingu dank' al tio Tiun, kiu estas la ĉeffonto de senfina favoro, kaj en kies ĉeesto ĉiuj riĉaĵoj de la mondo ŝanĝiĝas en nenion, por ke ni ĉesu ĉikani Lin ĉiutage kaj kroĉi nin al niaj propraj vantaj fantazjaĵoj.

83. Dio favorema! Malgraŭ la averto, kiu en mirinde simbola lingvo kaj subtilaj aludoj estis dirita en la pasintaj tagoj, kaj kiu celis vekti la popolojn de la mondo kaj malhelpi ilin seniĝi de sia parto el la ondanta oceano de dia favoro, tiaj aferoj, kiuj jam estis viditaj, tamen okazis! Aludoj al tiuj aferoj troviĝas ankaŭ en Korano, kiel atestas tiu ĉi verso: »ĉu tiaj homoj povas atendi ion alian, ol ke Dio mem venos malsupren al ili, envolvita

en nuboj?«⁶⁶ Kelka nombro da religiaj gvidantoj, kiuj tenas sin forte je la litero de la Vorto de Dio, konsideras tiun version kiel unu el la signoj de tiu atendata renaskiĝo, kiun kreis ilia propra vana imago. Tiel estos malgraŭ la fakto, ke similaj aludoj estas faritaj en plejparto de la ĉielaj Libroj, kaj estas notitaj en ĉiuj fragmentoj, koncernantaj la signojn de la venonta Malkaŝanto.

84. Simile Li diris: »En la tago, kiam la ĉielo eligos palpeblan fumon, kiu envolos la homaron: ĝi estos turmenta sufero.«⁶⁷ La Plejglora decidis, ke ĝuste tiuj aferoj, kiuj estas kontraŭaj al la deziroj de malvirtuloj, estu la provŝtono kaj kriterio, per kiu Li provas Siajn servantojn, por ke justulo rekonita estu de malvirtulo, kaj kredanto distingita estu de malfidelulo. La simbola esprimo »fumo« signifas gravajn malkonsentojn, eksigon kaj faligon de la akceptitaj standardoj kaj kompletan pereigon de iliaj malgrandanimaj probatalantoj. Kia fumo estas pli densa kaj pli potenca, ol tiu, kiu envolvigis nun ĉiujn popolojn de la mondo, kiu iĝis por ili turmento, kaj el kiu eliĝi ili senespere malsukcesas, kiel ajn ili braktas? Tiel forta estas la fajro de egoismo, brulanta en ili, ke en ĉiu momento ili ŝajnas suferi novan turmenton. Ju pli oni diras al ili, ke tiu ĉi mirinda Afero de Dio, tiu ĉi Revelacio de la Plejalta estas aperigita al la tuta homaro, kaj kreskas ĉiutage en sia grandeco kaj forto, des pli furioza iĝas la flamo de fajro en iliaj koroj. Ju pli ili vidas la nerompeblan forton, la noblan sinrezignon, la neŝanceleblan konstantecon de la sanktaj kunuloj de Dio, kiuj per la helpo de Dio, iĝadas ĉiutage pli noblaj kaj pli gloraj, des pli profunda konsterno mordas

⁶⁶Korano 2:210

⁶⁷Korano 44:10

iliajn animojn. En tiuj ĉi tagoj - glorata estu Dio - la povo de Lia Vorto atingis tian potencon super la homoj, ke ili ne kuraĝas flustreti eĉ vorton. Se ili renkontus unu el la kunuloj de Dio, kiu, se li povus, proprovole kaj ĝoje fordonus dekmilfoje sian vivon kiel oferon al sia Amato, tiel granda estus ilia timo, ke ili tuj deklarus sian kredon je Li, dum kaŝe ili insultus kaj malbenus Lian nomon! Kiel Li diris: »kaj kiam ili renkontas vin, ili diras: ‘Ni kredas’, sed kiam ili estas for de vi, ili mordas siajn fingrojn pro furiozo kontraŭ vi. Diru: ‘Mortu en via furiozo! Dio vere konas la plej kaŝajn sentojn de viaj brustoj.«⁶⁸

85. Post mallonga tempo viaj okuloj vidos la standardojn de la dia potenco, levitajn en ĉiuj regionoj, kaj la signojn de Lia triumfanta povo, elmontritajn en ĉiuj landoj. Ĉar plej multaj al la religiaj gvidantoj ne komprenis la sencon de tiuj versoj kaj ne konceptis la signifon de la Tago de Renaskiĝo, tial ili sensece interpretis tiujn versojn konforme al sia vanta kaj erara imago. La sola vera Dio estas Mia atestanto! Negranda koncepteno estas bezona, por igi ilin kompreni el la simbola lingvo de tiuj versoj ĉion, kion Ni intencis prezenti, kaj atingi tiel, per la favoro de la Plejkompatema, la brilan matenlumon de certeco. Tiaj estas la sonoj de la paradiza melodio, kiun la senmorta Birdo de l' ĉielo, kantanta sur la Sudrih de Bahá, verŝas sur vin, por ke vi, kun la permeso de Dio, iru la vojon de la dia sciado kaj saĝeco.

86. Kaj nun, koncerne Liajn vortojn: »Kaj Li elsendos Siajn

⁶⁸Korano 3:119

anĝelojn...»⁶⁹ La esprimo »anĝeloj« signifas tiujn, kiuj, fortigitaj per la potenco de la spirito, neniigis per la fajro de amo de Dio ĉiajn homajn ecojn kaj limigitaĵojn, kaj vestis sin per la kvalitoj de la plej altaj Estaĵoj kaj de Keruboj. Sádiq⁷⁰, tiu sankta homo, en sia glorskribaĵo pri Keruboj diris: »Aro de niaj ŝian-fratoj staras post la Trono«. Multaj kaj diversaj estis la interpretoj de la vortoj »post la Trono«. En unu senco ili montris, ke neniu vera ŝiano ekzistas. Kiel li diris en alia fragmento: «Vera kredanto estas simila al filozofa ŝtono.» Turnante sin poste al sia aŭskultanto, li diras: »ĉu vi vidis iam filozofian ŝtonon?« Pensu, kiel tiu ĉi simbola lingvo, pli elokventa, ol ĉia parolo, kiel ajn simpla, atestus neekziston de veraj kredantoj. Tia estas la aserto de Sádiq. Kaj nun konsideru, kiel maljustuloj kaj multaj estasj tiuj, kiuj, kvankam ili mem malsukcesis flari la aromojn de kredo, rigardas kiel malfidelulojn tiujn, per kies vortoj la kredo mem estas rekonita kaj firmigita.

87. Kaj nun, ĉar tiuj sanktaj personoj purigis sin de ĉiaj homaj lumigitaĵoj, alprenis la kvaliton de spirito kaj ornamis sin per la noblaj evoj de benitoj, tial ili estas difinitaj kiel anĝeloj. Tia estas la signifo de tiuj versoj, kies ĉiu vorto klarigita estas kun la helpo de plej klaraj tekstoj, plej konvinkaj argumentoj kaj plej bone bazitaj pruvoj.

88. Ĉar la sekvantoj de Jesuo neniam ekkomprenis la kaŝitan signifon de tiuj vortoj, kaj ĉar la signoj, kiujn ili kaj la gvidantoj de ilia kredo atendis, ne aperis, tial ili rifuzis rekoni, ĝis la nuna

⁶⁹Mateo 24:31

⁷⁰La sesa Imamo de la ŝianoj

tempo, la verecon de tiuj Malkaŝantoj de Sankteco, kiuj estis senditaj de post la tagoj de Jesuo. Tiel ili senigis sin mem de la elŝprucoj de sankta favoro de Dio kaj de la mirakloj de Lia dia parolo. Tiel malalta estas ilia stato en ĉi tiu tago, la Tago de Renaskiĝo! Ili ne komprenis eĉ, ke se la signoj de la Malkaŝanto de Dio en ĉiu epoko aperus en la videbla mondo konforme al la teksto de la akceptitaj tradicioj, neniu povas ilin nei aŭ forturniĝi, nek benito estus distingita de mizerulo, nek loĝrompanto de tiu, kiu timas Dion. Juĝu juste: se la profetaĵoj, priskribitaj en la Evangelio, plenumiĝus laŭlitere, se Jesuo, la Filo de Mario, akompanata de anĝeloj, malsuprenvenus sur la nuboj el la videbla ĉielo, kiu kuraĝus malkredi, kiu kuraĝus malakcepti la veron kaj arogantiĝi? Ne, tia konsterno kaptus tiuj ĉiujn loĝantojn de la tero, ke neniu sentus sin kapabla eldiri eĉ vorton, tiom malpli malakcepti aŭ akcepti la veron. La miskompreno de tiuj ĉi veroj kaŭzis, ke multaj gvidantoj de la kristana religio kontraŭstaris Mahometon kaj protestis kontraŭ Li per la sekvantaj vortoj: »Se Vi estas vere la promesita Profeto, kial ne akompanas Vin tiuj anĝeloj, kiujn niaj sanktaj Libroj antaŭdiris, kaj iuj nepre devas malsupreniri kun la promesita Belo, por helpi Lin en Lia Revelacio kaj esti avertantoj por Lia popolo?« Kiel la Plejglora enskribis iliajn argumentojn: »Kial anĝelo ne estas sendita al Li malsupren, por ke li estu kun Li, kiel avertanto?«⁷¹

89. Tiaj kontraŭstaroj kaj malkonsentoj ripetiĝadis en ĉiu tempo kaj epoko. La homoj ĉiam okupiĝadis per tiaj elstere pravaj argumentoj, vane protestante: »Kial tiu aŭ alia signo ne aperis?« Tiuj malfacilaĵoj prezentis sin al ili nur tial, ke ili

⁷¹Korano 25:7

alkroĉiĝis al la pensmaniero de la religiaj gvidantoj de tiu epoko, en kiu ili vivis, kaj blinde sekvis ilin, akceptante aŭ malakceptante tiujn Esencojn de Korpureco, tiujn sanktajn kaj diajn Estaĵojn. Pro tio, ke la gvidantoj dronadis en egoistaj deziroj kaj prizorgadis pasemajn kaj malaltajn aferojn, ili rigardis tiujn diajn Lumportantojn kiel kontraŭajn al la standardoj de ilia sciado kaj kompreno, kaj kiel malamikojn de siaj pensmanieroj kaj juĝoj, Ĉar ili interpretis laŭlitere la Vorton de Dio, la diraĵojn kaj tradiciojn de la Literoj de Unueco, kaj klarigadis ĝin laŭ sia propra malperfekta kompreno, tial ili senigis sin mem kaj sian tutan popolon de la malavaraj pluvoj de la dia favoro kaj kompatemo. Kaj ankoraŭ ili konfirmas la konatan tradicion: »Vere, Nia Vorto estas malklara, konfuzo malklara.« En alia okazo estas dirite: »Nia Afero provas severe kaj konsternas profunde; neniu povas ĝin elporti krom favorato de la ĉielo, aŭ inspirata Profeto, aŭ tiu, kies kredon Dio elprovis.« Tiuj religiaj gvidantoj konfirmas, ke neniu el tiuj elmontritaj kondiĉoj estas aplikebla al ili. La unuaj du kondiĉoj estas evidente ekster ilia povo; koncerne la trian, klare estas, ke neniam ili estis pruvoj kontraŭ la provoj, senditaj de Dio, kaj ke kiam la dia Provŝtono aperis, ili montriĝis nenio, krom skorio.

90. Granda Dio! Kvankam ili akceptas la veron de tiu ĉi tradicio, tamen ili, tiuj gvidantoj, dubantaj kaj diskutantaj ankoraŭ pri la teologiaj malklaraĵoj de sia kredo, pretendas esti interpretantoj de la subtilaĵoj de la dia leĝo, kaj klarigantoj de la esencaj misteroj de Lia sankta Vorto. Memfide ili asertas, ke la tradicioj, kiuj signas la alvenon de la atendata Qá'im, ne

estas plenumitaj, dum ili mem maltrafis flari la aromon de la signifo de tiuj tradicioj, kaj ĉiam ankoraŭ ignoras la fakton, ke ĉiuj signoj, kiuj estis antaŭdiritaj, plenumiĝis, ke la vojo de la sankta Afero de Dio estas malkaŝita, kaj la anaro de la kredantoj, rapida, kiel fulmo, paŝas ĉi-tempe tiun ĉi vojon, dum tiuj senprudentaj gvidantoj atendas ankoraŭ, esperante vidi la antaŭdirantajn signojn. Diru: Ho malsaĝuloj! Vi atendas kiel tiuj, kiuj antaŭ vi atendis!

91. Se oni demandus ilin pri tiuj signoj, kiuj devas heroldi la revelacion kaj leviĝon de la suno de la Mahometa Epoko, kiujn Ni jam menciis, el kiuj neniu plenumiĝis laŭlitere, kaj se oni dirus al ili: »Kial vi malakceptis la pretendojn de la kristanoj kaj de la anoj de aliaj religioj, kaj konsideras ilin malfideluloj?« tiam, ne sciante, kiun respondon doni, ili redirus: »Tiuj Libroj estas falsitaj kaj ne estas, nek iam estis, de Dio.« Pripensu: la vortoj de tiuj versoj mem atestus elokvente, ke ili estas de Dio. Simila verso estis revelaciita ankaŭ en Korano, se vi estus el tiuj, kiuj komprenas. Vere, Mi diras, dum tiu ĉi tuta periodo ili plene malsukcesis kompreni, kion signifas falsigo de teksto.

92. Jes, en la verkoj kaj paroloj de Speguloj, reflektantaj la sunon de la Mahometa Revelacio, menciitaj estas »modifoj, faritaj de gloraltuloj« kaj »ŝanĝoj, faritaj de memfiduloj«. Tiuj fragmentoj rilatas tamen nur al specialaj okazoj. Inter ili estas la historio pri Ibn-i-Súríyá. Kiam la popolo de Klaybar demandis la fokuson de la Mahometa Revelacio pri puno por adulto, plenumita inter edziĝanta viro kaj edziĝanta virino, Mahometo respondis, dirante: »La leĝo de Dio estas ŝtonmortigo.« Tiam ili ekprotestis kaj diris: »Neniu simila leĝo estas revelaciita en

la kvinlibro«. Mahometo respondis, dirante: »Kiun inter viaj rabenoj vi konsideras kiel rekonitan aŭtoritatulon kaj posedantan scion pri la vero?« Ili interkonsentis pri Ibn-i-Súríyá. Tiam Mahometo alvokis lin kaj diris: »Mi ĵurvokas vin je Dio, kiu defendis por vi la maron, sendis al vi manaon kaj nubon, por doni al vi ombron, kiu savis vin de Faraono kaj lia popolo kaj altigis vin super ĉiujn homajn estaĵojn - diru al ni, kion Moseo dekretis pri adulto inter edziĝanta viro kaj edziĝanta virino.« Li respondis: »Ho Mahometo! ŝtonmortigo estas la leĝo.« Mahometo demandis: »Kial do okazas, ke tiu ĉi leĝo estas nuligita kaj ĉesis funkcii inter la judoj?« Li respondis, dirante: »Kiam Nebukadnecar fordonis Jerusalemon al flamoj kaj kondamnis la judojn al morto, nur kelkaj restis vivantaj. La pastroj de tiu tempo, konsiderante la trege limigitan nombron de la judoj kaj la multegon da amalekidoj, interkonsiliĝis kaj venis al la konkludo, ke se ili aplikus la leĝon de Kvinlibro, ĉiu postvivinto, kiu estis savita el la manoj de Nebukadnecar, devus esti kondamnita al morto konforme al la ordonoj de la Libro. Sekve de tiuj konsideroj ili tute nuligis la mortpunon.« Dume Gabrielo inspiris la luman koron de Mahometo per la jenaj vortoj: »Ili falsas la tekston de la Vorto de Dio.«⁷²

93. Tio ĉi estas unu el la ekzemploj, pri kiuj Ni menciis. Vere, la »falsigo« de la teksto ne signifas tion, kion tiuj malprudentaj kaj malnoblaj personoj imagis, kiel kelkaj asertis, ke la judoj kaj kristanaj pastroj forigis el la Libro versojn, kiuj laŭdas kaj gloras la vizaĝon de Mahometo, kaj anstataŭe enmetis kontraŭaĵojn. Kiel senfine vanaj kaj falsaj estas tiuj vortoj! Ĉu

⁷²Korano 4:45

homo, kiu kredas je libro kaj konsideras ĝin kiel inspiritan de Dio, povus ĝin aligi? Plie, la Kvinlibro estis disvastigita sur la superaĵo de la tuta tero, kaj ne estis limigita nur al Mecca kaj Medina, tiel, ke ili povus kaŝe falsi kaj trompoŝanĝi ĝian tekston. Ne, la falsigo de la teksto signifas tion, per kio okupas sin nune ĉiuj gvidantoj de Islamo, t.e. interpretadon de la sankta Libro de Dio laŭ siaj vanaj imagoj kaj vantaj deziroj. Kaj ĉar la judoj en la tempo de mahometo interpretis tiujn versojn de la Kvinlibro, kiuj koncernis Lian Revelacion, laŭ sia propra imago kaj rifuzis kontentiĝi per Liaj sanktaj paroloj, tial ili estis akuzitaj pri »falsigo« de la teksto. Simile, klare estas, kiel en la hodiaŭa tago la popolo de la Korano falsis la tekston de la Libro de Dio, koncernantan la signojn de la atendata Malkaŝanto, kaj interpretis ĝin laŭ sia inklinado kaj deziro.

94. En unu plia ekzemplo Li diras: »Parto da ili aŭdis la Vorton de Dio kaj tiam, ekkompreninte ĝin, ili uzis ĝin artifice, kaj sciis, ke ili tion faras.«⁷³ Tiu ĉi verso ankaŭ montras, ke la signifo de la Vorto de Dio estis falsita, ne ke la vortoj mem estis forigitaj. La verecon de ĉi tio atestas tiuj, kies menso estos sana.

95. En alia ankoraŭ ekzemplo Li diras: »Ve al tiuj, kiuj per la propraj manoj false transskribas la Libron kaj poste diras: 'Tio ĉi estas de Dio!'« por vendi ĝin por aĉa prezo.«⁷⁴ Tio ĉi estis revelaciita rilate al gvidantoj kaj pastroj de la hebrea kredo. Tiuj pastroj, celante plezurigi riĉulojn, akiri mondaĵn profitojn kaj kontentigi sian envion kaj malĝustan kredon, skribis kelkan nom-

⁷³Korano 2:75

⁷⁴Korano 2:79

bron da traktatoj, refutante la pretendojn de Mahometo, subtenante siajn argumentojn per tiaj pruvoj, ke estus malkonvene ilin menci, kaj ili pretendis, ke tiuj argumentoj estis ĉerpitaj el la teksto de la Kvinlibro.

96. La samon oni povas vidi hodiaŭ. Konsideru, kiel abundaj estas la akuzoj, skribitaj de la malprudentaj pastroj de tiu ĉi tempo kontraŭ tiu ĉi mirinda Afero! Kiel vanaj estas iliaj imagoj, ke tiuj kalumnioj konformas kun la versoj de la sankta Libro de Dio, kaj harmonias kun la paroloj de la juĝokapabluloj!

97. La celo, por kiu Ni rakontas tiujn ĉi aferojn, estas averti vin, ke se ili asertus, kvazaŭ tiuj versoj, kie estas menciitaj la signoj, preparolitaj en la Evangelio, estas falsitaj, se ili malakceptus ilin kaj kroĉus sin anstataŭe al aliaj versoj kaj tradicioj, vi sciu, ke iliaj vortoj estas komplete mensogaj kaj nure kalumniaj. Jes, »falsigon« de la teksto, en la senco, kiun Ni preparolis, estis vere afektivigita en certaj okazoj. Kelkajn el ili Ni menciis, por ke evidente estu al ĉiu juĝokapabla observanto, ke al kelkaj neinstruitaj sanktuloj donita estas la majesteco de homaj lernaĵoj, por ke malbonvola kontraŭulo ĉesu disputi, dirante, ke certaj versoj indikas »falsigon« de la teksto, kaj suspektigi, ke Ni, pro manko de scio, menciis tiujn aferojn. Plie, plej multaj el la versoj, kiuj indikas »falsigon« de la teksto, estas anoncigitaj rilate al la juda popolo, se vi esploros la insulojn de la Korana Revelacio.

98. Ni aŭdis ankaŭ, ke la certa nombro da malsaĝuloj de la tero asertas, kvazaŭ la vera teksto de la ĉiela Evangelio ne ekzistas inter la kristanoj, kvazaŭ ĝi supreniris en la ĉielon. Kiel

korprema estas ilia eraro! Kiel ili malatentis la fakton, ke tia aserto imputas plej grandan maljustecon kaj tiranecon al la favorema kaj amema Providenco! Kiel povus Dio, post kiam la Astro de la belo de Jesuo malaperis foje de la vido de Lia popolo kaj supreniris en la kvaran ĉielon, malaperigi ankaŭ Sian sanktan Libron, Sian plej grandan ateston inter la kreitoj? Kio estus lasita al tiu popolo, je kio ili povus teni sin de la subiĝo de la astro de Jesuo ĝis la leviĝo de la suno de l' Mahometa Revelacio? Kiu leĝo povus ilin subteni kaj gvidi? Kiel povus tiuj homoj iĝi viktimoj de la venĝanta kolero de Dio, la plejpotenca Venĝanto? Kiel ili povus esti turmentataj per la skurĝado kaj puno de la ĉiela Reĝo? Antaŭ ĉio, kiel povus la torento de l' favoro de la Malavarulo halti? Kiel povus la oceano de Lia amema kompato sekiĝi? Ni alvokas ateston de Dio kontraŭ tio, kion Liaj kreitoj imagas pri Li! Altglorata Li estas super ilia kompreno!

99. Kara amiko! Nun, kiam la lumo de la eterna tagiĝo ekbrilas, kiam la radiado de Liaj sanktaj vortoj: »Dio estas la lumo de la ĉieloj kaj de la tero«⁷⁵ verŝas helecon sur la tutan homaron, kiam la nerompebleco de Lia tabernaklo estas proklamita por Liaj sanktaj vortoj: »Dio volis perfektigi Sian lumon«⁷⁶, kaj la Mano de ĉionpovo, portanta Lian ateston: »En Sia potenco Li tenas la regnon de ĉiuj aĵoj«, etendita estas super la popoloj kaj gentoj de la tero, decas al ni suprenstreĉi la bridon de penado, por ke, per la favoro kaj bonvolo de Dio, ni eniru la ĉielan Urbon: »Vere, ni estas de Dio«, kaj ekloĝu en la glorsupera loĝejo: »Kaj

⁷⁵Korano 24:35

⁷⁶Korano 9:33

al Li ni revenas.«⁷⁷ Estas via devo, kun la permeso de Dio, purigi la okulon de via koro de la aferoj de l' mondo, por ke vi ekkomprenu la senfinecon de la dia sciado kaj ekvidu la veron tiel klare, ke vi ne bezonos pruvojn por konstati Lian realecon, nek argumentojn por konfirmi Lian ateston.

100. Ho kara serĉanto! Se vi flugos en la sanktan regnon de la spirito, vi rekonos Dion, elmontriĝantan kaj altgloran super ĉio, en tia maniero, ke via okulo vidos nenion, krom Li. »Dio estis sola; estis nenio krom Li.« Tiel alta estas tiu stato, ke nenio povas ĝin atesti, nek iu pruvo povas ĝin konfirmi. Se vi esploras la sanktan regionon de la vero, vi trovos, ke ĉiuj aferoj estas konataj nur per lumo de Lia rekono, ke Li ĉiam estis kaj estos eterne konata en Si mem. Kaj se vi loĝas en la lando de atestoj, kontentiĝu per tiu, kiun Li mem revelaciis: »ĉu ne estas al ili sufiĉe, ke Ni sendis al Vi malsupren la Libron?«⁷⁸ Tio ĉi estas la atesto, kiun Li mem fiksas; pruvo pli granda, ol tio, ne ekzistas, nek iam ekzistos: »Tiu ĉi pruvo estas Lia vorto, Lia propra Esenco, la atesto de Lia vero.«

101. Kaj nun, Ni petas la popolon de Bayán, ĉiujn instruitulojn, saĝulojn, religiajn gvidantojn kaj atestantojn inter ili, ke ili ne forgesu la dezirojn kaj admonojn, revelaciitajn en ilia Libro. En ĉiu tempo ili fiksadu la rigardon sur la esencaĵoj de sia Afero, por ke, kiam Li, kiu estas la ĉefesenco de la vero, aperos, ili ne kroĉu sin al certaj fragmentoj de la Libro, ke ne suferigu al Li tion, kion oni suferigis en la Epoko de la Korano. Ĉar vere,

⁷⁷Korano 2:151(!)

⁷⁸Korano 29:51

Li, la ĉiopotenca Reĝo, havas la povon estingi per unu litero de sia mirinda vorto la spiron de vivo en la tuta Bayán kaj ĝia popolo, kaj per unu litero verŝi sur ilin novan kaj eternan vivon kaj igi ilin leviĝi kaj eliri el la tomboj de siaj vantaj kaj egoistaj deziroj. Atentu kaj estu gardemaj; kaj memoru, ke la celo de ĉio estas kredi je Li kaj atingi Lian tagon kaj kompreni Lian dian apudeston. »Pie ne estas turni vian vizaĝon orienten aŭ okcidenten, sed pia estas tiu, kiu kredas je Dio kaj la Lasta Tago.«⁷⁹ Klinu viajn orelojn, ho popolo de Bayán, al la veto, al kiu Ni vin admonis, por ke vi serĉu rifuĝon en la ombro, etendita, en la Tago de Dio, super la tuta homaro.

Fino de la unua parto

⁷⁹Korano 2:176

PARTO DUA

102. Vere Tiu, kiu estas Astro de la Vero kaj Malkaŝanto de la Plejsupera Estaĵo, havas en ĉiuj tempoj sendisputan regadon super ĉiu, kiu estas en la ĉielo kaj sur la tero, se eĉ troviĝus sur la tero neniu homo, kiu Lin obeus. Vere Li estas sendependa de ĉia tera aŭtoritato, se Li eĉ estus en ekstrema mizero. Tiel Ni malkaŝas al vi la misterojn de la Afero de Dio, kaj donacas al vi la gemajn de la dia saĝeco, por ke vi ekflugu per la flugiloj de sinrezigno al tiuj altaĵoj, kiuj estas forvualitaj de la homaj okuloj.

103. La signifo kaj esenca celo de tiuj ĉi vortoj estas malkaŝi kaj almontri al tiuj, kies koroj estas puraj kaj spiritoj sanktaj, ke tiuj, kiuj estas Portantoj de la vero jak Speguloj, reflektantaj la lumon de la dia unueco, en kiu ajn tempo kaj ciklo ili estas senditaj en tiun ĉi modon el sia nevidebla restejo de pratempa gloro, por eduki la homajn animojn kaj feliĉigi per favoro ĉiujn kredaĵojn, estas ĉiam provizitaj per ĉiorega povo kaj dotitaj per nevenkebla aŭtoritato. Ĉar tiuj kaŝitaj Gemoj, tiuj sekretaj kaj nevideblaj Trezoroj elmontras en si mem kaj pravigas la realecon de tiuj ĉi sanktaj vortoj: »Vere, Dio faras, kion ajn Li volas, kaj decidus, kion ajn Li deziras.«

104. Al ĉiu juĝokapabla kaj luma koro evidente estas, ke Dio, la nekonebla Esenco, la plejsankta Estaĵo, estas senmezure supera al ĉia homa atributo, kiel korpa ekzisto, supreniro kaj mal-suprenveno, eliro kaj reveno. Malkonvena estus al Lia gloro, se la homa lango povus inde voĉi laŭdojn pri Li, aŭ se la homa

koro povus kompreni Liajn senfundajn misterojn. Li estas kaj ĉiam estis forvualita en la pratempa eterneco de Sia Esenco, kaj Li estas en Sia realeco eterne kaŝita de la homa vido. »Neniu rigardeo enprenas Lin, sed Li enprenas ĉiujn regardojn; Li estas Saĝa, Ĉiovidanta.«⁸⁰ Nenio ligo de senpera interrilato povas iel kunigi Lin kun Liaj kreaĵoj. Li staras alte super kaj ekster ĉia aparteco kaj kuneco, proksimeco kaj foreco. Neniu signo povas indiki Lian ĉeeston aŭ foreston, ĉar per unu vorto de Lia ordono ĉio, kio estas en la ĉielo kaj sur la tero, venis en la ekziston, kaj per Lia volo, kiu estas la Plejunua Volo mem, ĉio eliĝis el nenieco en la regnon de estado, en la videblan mondon.

105. Favorema Dio! Kiel oni povus imagi ian ekzistantan rilaton aŭ eblan kontakton inter Lia Vorto kaj tiuj, kiujn ĝi kreis? La verso: »Dio gardas vin for de Si mem«⁸¹ ekstererare atestas la realecon de Nia argumentado kaj la vortoj: »Dio estis sola; estis nenio krom Li« estas certa konfirmo de ĝia vereco. Ĉiuj Profetoj de Dio kaj Liaj Elektitoj, ĉiuj pastroj, instruituloj kaj saĝuloj de ĉiu generacio unuanime konfesas sin nekapablaj atingi komprenon pri tiu Ĉefesenco de ĉiuj veroj, kaj akiri koncepton pri Tiu, kiu estas la esenca realeco de ĉio.

106. Ĉar la pordo de la konado de la Pratempulo estas tiel fermita antaŭ ĉia estaĵo, la Fonto de la senfina favoro, konforme al Siaj vortoj: »Lia favoro leviĝis super ĉiujn kreaĵojn; Mia favoro ilin ĉiujn ĉirkaŭprenis« aperigis tiujn lumajn Gemojn de sankteco el la sferoj de la Spirito, en la nobla formo de la homa tem-

⁸⁰Korano 6:103

⁸¹Korano 3:28

plo, kaj starigis ilin antaŭ ĉiuj homoj, ke ili konigu al la mondo la misterojn de la senŝaĝa Estaĵo kaj parolu pri la subitaĵoj de Lia senpera Esenco. Tiuj sanktaj Speguloj, tiuj Tagiĝoj de la pratempa gloro, ĉiuj klarigas sur la tero Tiun, kiu estas la centra Suno de la universo, Lian Esencon kaj finan Celon. De Li devenas ilia sciado kaj povo; de Li ili ĉerpas sian aŭtoritaton. La beleco de Iliaj vizaĝoj estas nur rebrilo de Lia figuro, kaj ilia revelacio nur signo de Lia senmorta gloro. Ili estas Trezorejoj de la dia konado kaj Deponejoj de ĉiela saĝeco. Pere de ili transdonata estas senfina favoro, kaj pere de ili malkaŝata estas lumo, kiu neniam paliĝas. Kiel Li diris: »Nenia diferenco ekzistas inter Vi kaj ili, krom tio, ke ili estas Viaj servantoj kaj estas kreintaj de Vi.« Tio ĉi estas la signifo de la tradicio: »Mi estas Li mem kaj Li estas mi mem.«

107. La tradicioj kaj diraĵoj, kiuj koncernas rekte Dian tezon, estas multaj kaj diversaj. Ni lasas ilin sencite, por konservi koncizecon. Ne – kio ajn estas en la ĉielo kaj kio ajn estas sur la tero, estas rekta pruvo, ke en ĝi malkaŝiĝas la kvalitoj kaj nomoj de Dio, ĉar en ĉiu atomo nestas signoj, kiuj elokvente atestas la revelacion de tiu plej granda Lumo. Ŝajnas, ke sen la potenco de tiu revelacio neniu estaĵo povus iam ekzisti. Kiel grandiozaj estas la lumfontoj de sciado, kiuj brilas en unu atomo, kaj kiel vastaj estas la oceanoj de saĝeco, kiuj ondas en unu guto! Ĉie la ekstrema grado tio ĉi estas vera pri homo, kiu, sola inter ĉiuj kreaĵoj, estas dotita per la robo de tiuj donacoj, kaj elektita por la gloro de tia distingito. Ĉar en li estas aperigitaj ĉiuj kvalitoj kaj nomoj de Dio ĝis la grado, kiun neniu alia kreaĵo superis aŭ eksterpaŝis. Ĉiuj tiuj nomoj kaj valitoj estas aplikeblaj al

li. Kiel Li diris: »Homo estas Mia mistero, kaj Mi estas lia mistero.« Multaj estas la versoj, ripete revelaciitaj en ĉiuj ĉielaj Libroj kaj Skribaĵoj, esprimantaj tiun ĉi plej majestan kaj altan tezon. Kiel Li revelaciis: »Ni certe montros al ili Niajn signojn en la mondo kaj en ili mem.«⁸² Aliloke Li diris: »Kaj ankaŭ en vi mem: ĉu vi do ne vidas la signojn de Dio?«⁸³ Kaj alifoje ankoraŭ Li diris: »Kaj ne estu kiel tiuj, kiuj forgesas Dion, kaj kiujn Li igis pro tio forgesi sin mem.«⁸⁴ Tiurilate Li, la eterna Reĝo – la animoj de ĉiuj, loĝantaj en la mistika Tabernaklo, estu Liaj oferoj – diris: »Tiu ekkonis Dion, kiu ekkonis sin men.«

108. Ni ĵuras je Dio, ho respektinda kaj honorinda amiko! Se vi konsideros tiujn ĉi vortojn en via koro, tucerte vi trovos la pordojn de la dia saĝeco kaj senfina sciado larĝe malfermitaj antaŭ viaj okuloj.

109. El tio, kion Ni diris, evidente montriĝos, ke ĉiuj kreaĵoj, en sia plejfunda realeco, donas ateston pri la sinelmontro de la nomoj kaj kvalitoj de Dio en ili. Ĉio el ili, konfrme al sia kapableco, elmontras kaj esprimas la dian konadon. Tiel pontenca kaj universala estas ĉi tiu elmontrado, ke ĝi regas ĉiujn aĵojn, videblajn kaj nevideblajn. Li diris tiel: »Ĉu io ajn ekster Vi havas la povon elaperigi, kion Vi ne posedas, ke ĝi povus Vin elmontradi? Blinda estas la okulo, kiu Vin ne vidus.« Simile diris tiu eterna Reĝo: »Nenion Mi vidis, en kio Mi ne vidus Dion, Dion antaŭ ĝi aŭ Dion post ĝi.« Ankaŭ en la tradicio de

⁸²Korano 41:53

⁸³Korano 51:21

⁸⁴Korano 59:19

Kumayl estas skribite: »Rigardu, lumo ekbrilis el la Meteno de eterneco, kaj jen ĝiaj radioj trapenetris la plejfundan esencon de ĉiuj homoj.« Homo, la plej noble, la plej perfekta el ĉiuj kreaĵoj, superis ilin ĉiujn per la intenseco de tiu ĉi elmontrado, kaj estas pli kompleta esprimo de ĝia gloro. Kaj el ĉiuj homoj la plej prefektaj, plej distingitaj kaj eminentaj estas la Malkaŝantoj de la Suno de l' Vero. Ne, ĉiuj ekster tiuj Malkaŝantoj vivas per la efikado de ilia volo, kaj movas sin kaj ekzistas per la elŝprucoj de ilia favoro. »La ĉielon Mi kreis nur por Vi.« Ne, kontraŭ ili ĉiuj malaperas en kompletan neniecon, kaj estas forgesitaj. La homa lango neniel povas dece prikanti ilian misteron. Tiuj Tabernakloj de sankteco, tiuj plejunuaj Speguloj, reflketantaj la lumon de la senpereca gloro, estas nur esprimo de Tiu, kiu estas Nevidebla el Nevideblaj. Per la revelacio de tiuj gemoj de la dia virto malkaŝitaj estas ĉiuj nomoj kaj kvalitoj de Dio, kiel sciado kaj potenco, regado kaj estreco, kompatemo kaj saĝeco, gloro, malavareco kaj favoremo.

110. Tiuj ĉi kvalitoj de Dio ne estas kaj neniam estis verŝitaj speciale sur certajn Profetojn, kaj detenitaj de la aliaj. Ne, ĉiuj Profetoj de Dio, Liaj favorataj, Liaj sanktaj kaj elektitaj Senditoj, portas senescepte Liajn nomojn kaj enkorigas Liajn kvalitojn. Ili diferencas sole per la intenseco de siaj revelacioj kaj per la relativa potenco de sia lumo. Kiel Li diris: »Kelkajn el la Apostoloj Ni levis super la aliajn.«⁸⁵ Estas do klare kaj evidente, ke en la Tabernakloj de tiuj Profetoj kaj Elektitoj de Dio reflektiĝas la lumo de Liaj senfinaj nomoj kaj altgloraj kvalitoj, sendepende de tio, ĉu la lumo de kelkaj el tiuj kvalitoj

⁸⁵Korano 2:253

estis aŭ ne estas malkaŝita eksteren el tiuj radiantoj Temploj al la homaj okuloj. Se kelkaj el la kvalitoj de Dio kaj ne malkaŝiĝis eksteren en tiu Esenco de korpureco, tio neniel signifas, ke ili, kiuj estas la Tagiĝoj de la kvalitoj de Dio kaj Trezorejoj de Liaj sanktaj nomoj, efektive ne posedis ilin. Sekve ĉiu el tiuj lumaj Animoj, el tiuj belegaj Vizaĝoj estis dotita per ĉiuj kvalitoj de Dio, kiel estreco, regado k.t.p., se Li eĉ ekstervide estus senigita de ĉia tera majesteco. Al ĉiu juĝkapabla okulo tio estas klara kaj evidenta; ĝi postulas nek pruvojn, nek argumentojn.

111. Vere, ĉar la popoloj de la tero ne serĉis ĉe la klaraj kaj kristalaj Fontoj de la dia sciado la internan signifon de la sanktaj vortoj de Dio, tial ili velkis, premitaj kaj soifegantaj, en la valo de vanta fantazio kaj obstineco. Ili devojiĝis for de la freŝa kaj sensoifiga akvo, kaj ariĝis ĉirkaŭ salaĵo, kiu akre brulvundas. Koncerne ilin diris la Kolombo de Eterneco: »Kaj se ili vidas la vojon de justeco, ili ne akceptas ĝin kiel sian vojon; sed se ili vidas la vojon de eraro, ili akceptas ĝin kiel sian. Tiel estas, ĉar ili konsideris Niajn signojn kiel mensogaĵojn, kaj malatentis ilin.«⁸⁶

112. Pir tio ĉi atestas tio, kion Ni vidas en tiu ĉi mirinda kaj altglora Epoko. Miradoj de sanktaj versoj malsuprenvenis el la ĉielo de potenco kaj favoro, tamen neniu turnis sin al ili, nek ĉesis kroĉi sin al tiuj vortoj de homoj, el kiuj nek unu literon komprenas la dirintoj. Pro tio ĉi la homoj ekdubis nerefuteblaj verojn, kiel ĉi tiuj, kaj forigis sin tiel de la Riḍvân de la dia sciado, kaj de la eternaj herbejoj de la dia saĝeco.

⁸⁶Korano 7:145

113. Kaj nun Ni resumon Nian argumenton koncerne vian demandon: Kial la regado de Qá'im, proklamita en la tekstoj de la konataj tradicioj kaj promesita de la lumaj steloj de la Mahometana Epoko al la postaj generacioj, neniagrade elmontriĝis? Ne, kontraŭaj estis la okazoj. Ĉu Liaj disĉiploj kaj kunuloj ne estis persekutitaj de la homoj? Ĉu ili ne estas nun ankoraŭ viktimoj de sovaĝa kontraŭstarado de siaj malamikoj? Ĉu ili ne vivas hodiaŭ la vivon de humiligitaj kaj senpovaj mortemuloj? Vere, la regado, atribuita al Qá'im kaj preparolita en la sanktaj skribaĵoj, estas realaĵo, kies verecon neniu povas dubi. Tiu ĉi regado ne estas tamen regado, kian la homaj mensoj false imagis. Plie, ĉiu el la Profetoj de la pasintaj tempoj, anoncanta al la popolo de sia tago la alvenon de la sekvonta Revelacio, ĉiam kaj konstante parolis pri tiu regado, kiun la promesita Malkaŝanto devas posedi. Tion ĉi atestas le tekstoj de la malnovaj skribaĵoj. Tiu ĉi regado ne estis atribuita sole kaj escepte al Qá'im. Ne, la atributoj de la regado kaj ĉiuj aliaj nomoj kaj atributoj de Dio estis kaj ĉiam estos favordonataj al ĉiuj Malkaŝantoj de Dio, antaŭ kaj post Li, ĉar tiuj Malkaŝantoj, kiel jam estis klarigite, estas Enkorpigantoj de la atributoj de Dio, la Nevidebla, kaj Elmontrantoj de la diaj misteroj.

114. Ple, tiu regado signifas la ĉiokoncernan ĉiopenetran povon, kiun denature posedas Qá'im, sendepende de tio, ĉu Li aperas antaŭ la mondo, vestita per la majesteco de la tera potenco, aŭ ne. Tio ĉi dependas sole de la volo kaj plaĉo de Qá'im mem. Vi komprenas facile, ke la esprimoj: regado, riĉeco, vivo, morto, juĝo kaj renaskiĝo, uzitaj en la sanktaj Skribaĵoj, ne estas identaj kun tio, kion ĉi tiu generacio imagis kaj vante bildis en sia fan-

tazio. Ne, tiu regado signifas regadon, kiu en ĉiu epoko loĝadas en la persono de la Malkaŝanto kaj estas praktikata de la Astro de l' Vero. Tiu regado estas la spirita supereco, iun Li etendas ĝis plej alta grado super ĉiuj, kiuj estas en la ĉielo kaj sur la tero, kaj kiu en ĝusta tempo malkaŝos sin al la mondo, en rekta proporcio al ĝia komprenemo kaj spirita akceptemo; same kiel la regado de Mahometo, la Sendito de Dio, estas hodiaŭ klara kaj videbla itner la homoj. Konata estas al vio tio, kio okazis al Lia kredo en la fruaj tagoj de Lia Epoko. Kiajn plorindajn suferojn kaŭzis al tiu spirita Esenco, al tiu plej pura kaj sankta Estaĵo la manoj de malfideluloj kaj erarantoj, de la religiaj gvidantoj de tiu tempo kaj iliaj kunuloj! Kiel abundaj estis la dornoj kaj pikiloj, kiujn ili disŝutis sur Lia vojo! Evidente estas, ke la malvirta generacio, gvidata de sia malnobla kaj satana fantazio, konsideris ĉiun malbonon, kaŭzitan al tiu senmorta Estaĵo, kiel rimedon por atingi ĉiamdaŭran feliĉon; ĉar distingitaj pastroj de tiu epoko, kiel 'Abdu'lláh-i-Ubayy, Abú'Ámir la ermito, Ka'b-Ibn-i-Ashraf, kaj Naĉr-Ibn-i-Háarith, ĉiuj traktis Lin kiel trompulon kaj deklaris Lin lunatiko kaj kalumniulo. Tiel dolorajn akuzojn ili voĉis kontraŭ Li, ke se Ni volus ilin ripeti, Dio malpermesus al la inko flui, al Nia plumo movi sin, aŭ al la paĝo ilin suproti. Tiuj malbonvolaj imputaj loj igis la popolon leviĝi kaj turmenti Lin. Kaj kiel kruela estas la turmento, se la religiaj gvidantoj de la koncerna tempo estas ĝiaj ĉefinstigintoj, se ili kulpigas Lin malvirtulo! Ĉu ne la samo okazis al tiu ĉi Servanto, kiel estis vidite de ĉiuj?

115. Pro tio ĉi Mahometo vokis: »Neniu Profeto de Dio suferis tiom, kiom Mi suferis!« Kaj en la Korano enskribitaj estas ĉi-

kiujn Li suferis. Ekzameni ĝin, por ke vi ricevu scion pri tio, kio okazis al Lia Revelacio. En tiel kompatinda stato Li estis, ke dum certa tempo ĉiu evitis interparolon kun Li kaj Liaj kunuloj. Kiu ajn ekrilatis kun Li, iĝis viktimo de la senindulga krueleco de Liaj malamikoj.

116. Ni citos, koncerne tion, nur unu version el tiu Libro. Se vi rigardos ĝin per juĝokapabla okulo, vi priplorados kaj prilendados dum ĉiuj restontaj tagoj de via vivo la maljustaĵon, faritan al Mahometo, la persekutita kaj premita Sendito de Dio. Tiu verso estis revelaciita en la tempo, kiam Mahometo suferis akre kaj grave sub la premo de la kontraŭstaro de la homoj kaj de ilia senĉesa torturado. Meze de Lia turmento aŭdiĝis la voĉo de Gabrielo, vokanta de Sadratu'l-Muntahá: »Sed se ilia kontraŭstaro estas al vi dolora, serĉu se Vi povas, fendaĵon en la tero aŭ ŝtuparon al la ĉielo.«⁸⁷ La senco de tiuj ĉi vortoj estas, ke en Lia situacio ekzistas nenia helprimedo, ke ili ne detenos de Li siajn manojn, escepte se Li kaŝos sin en la profundon de la tero aŭ direktos sian flugon al la ĉielo.

117. Konsideru kiel granda estas hodiaŭ la ŝanĝo! Rigardu, kiel multaj estas la monarĥoj, kiuj fleksas la genuon antaŭ Lia nomo! Kiom da nacioj kaj regnoj serĉis rifuĝon en Lia ombro, klinas sin respekte antaŭ Lia kredo, kaj fieras pro tio! El predikejoj leviĝas hodiaŭ laŭdovortoj, kiuj kun grandega humileco gloras Lian benitan nomon, kaj de la suproj de minaretoj sonas voĉoj, kiuj vokas Lian anaron, ke ĝi Lin adoru. Eĉ tiuj reĝoj de la tero, kiuj rifuzis akcepti Lian religion kaj formeti la veston de

⁸⁷Korano 6:35

nekredo, konfesas kaj rekonas malgraŭ tio la grandecon kaj potencan majestecon de tiu Tag-Stelo de amoplena bonkoreco. Tia estas Lia tera regado, kies pruvojn vi vidas de ĉiufanke. Tiu ĉi regado nepre devas aperi kaj esti fondita ĉu dum la vivotempo de ĉiu Malkaŝanto de Dio, aŭ post Lia supreniro en sian veran restejon en la superaĵ sferoj. Tio, kion vi vidas hodiaŭ, estas nur konfirmo de ĉi tiu vero. Ĉiel tiu spirita supereco, kiu estas la origina celo, loĝas en ili kaj rendirondiras ĉirkaŭ ili de eterneco ĝis eterneco. Neniam ĝi povas, eĉ por momento, esti apartigita de ili. Ĝia potenco prenis en sian regadon ĉion, kio estas en la ĉifelo kaj sur la tero.

118. Ni prezentos nun pruvon de la regado de Mahometo, la Tag-Stelo de l' Vero. Ĉu vi ne aŭdis, kiel per unu sola verso Li apartigis lumon de mallumo, virtulon de malvirtulo kaj kredanton de nekredanto? Ĉiuj aŭditaj de vi signoj kaj aludoj, koncernantaj la Tagon de Juĝo, kiel la revivigo de l' mortintoj, la Tago de Kalkulo, la Lasta Juĝo, kaj aliaj iĝis konataj, per la revelacio de tiu ĉi verso. Tiuj ĉi revelaciitaj vortoj estis beno por virtuloj, kiuj, aŭdinte ilin, ekkriis: »Ho Dio, nia Sinjoro, ni ekaŭdis kaj ekobeis.« Ili estis malbeno por anaro de malvirto, kiu, aŭdinte ilin, deklaris: »Ni ekaŭdis kaj ekribelis.« Tiuj vortoj, akraj, kiel glavo de Dio, apartigis fidelulon de malfidelulo, kaj dividis patron de filo. Certe vi vidis, kiel tiuj, kiuj konfesis sian kredon je Li, kaj tiuj, kiuj Lin malakceptis, batalis unuj kontraŭ la aliaj, kiel unuj atakis la proprajn de la aliaj. Kiom da patroj, forturniĝis de siaj filoj, kiom da amantoj forlasis la objektojn de sia amo! Tiel senkompate akra estis tiu mirinda glavo de Dio, ke ĝi distranĉis ĉiun parencecon! Aliflanke, kon-

sideru la unuigan potencon de Lia Vorto: »Rigardu, kiel tiuj, en kies mezo la santo de egoismo semadis dum jaroj la semojn de malbonvolo kaj malamo, tiel kuniĝis kaj unuiĝis per la sekvo de tiu mirinda kaj supertera Revelacio, ke ŝajnis, kvazaŭ ili naskiĝis el la samaj lumboj. Tia estas la liga povo de la Vorto de Dio, kiu unuigas la korojn de tiuj, kiuj forlasis ĉion krom Li, kiuj ekkredis je Liaj signoj kaj trinkis el la Mano de gloro la Kawtharon de la sankta favoro de Dio. Plie, kiel multaj estas tiuj popoloj de diversaj religioj, de konfliktantaj kredoj kaj kontraŭaj temperamentoj, kiuj, dank' al la vivodonaj aromoj de la dia printempo, spirantaj el la Riĉván de Dio, estis vestitaj per la nova robo de la dia unueco kaj trinkis el la kaliko de Lia unobleco!

119. Jen estas la signifo de la bone konataj vortoj: »Lupo kaj ŝafido paŝtiĝos kune.«⁸⁸ Vidu, kiaj ignoruloj kaj malsaĝuloj estas tiuj, kiuj, simile al la antikvaj nacioj, atendas ankoraŭ, esperante alvenon de tempo, en kiu tiuj bestoj kune paŝtiĝos sur unu paŝtejo! Tiel malalta estas la stato de iliaj koroj. Ŝajnas, ke iliaj lipoj neniam tuŝis la kalikon de kompreno, nek iliaj piedoj paŝis iam sur la vojo de justeco. Krom tio, kian profiton ĝi donus al la mondo, se tiaj aferoj efektiviĝus? Kiel prave Li diris pri ili: »Ili havas korojn, per kiuj ili ne komprenas, kaj ili havas animoj, per kiuj ili ne vidas!«⁸⁹

120. Konsideru, kiel tiu ĉi solas verso, malsuprenveninta el la ĉielo de la Volo de Dio, igis la mondon kaj ĉiujn, kiuj vivas en ĝi,

⁸⁸ Jesaja 65:25

⁸⁹ Korano 7:178

fari kalkulon kun Li. Kiu akceptis Lian veron kaj turnis sin al Li, ties bonaj faroj superpezis la malbonajn, kaj ĉiuj liaj pekoj estis forgesitaj kaj pardonitaj. Tio ĉi evidentigas la verecon de la jenaj vortoj koncerne Lin: »Li estas rapida en kalkulado.« Tiel Dio ŝanĝas malnoblecon en noblecon, se vi esploras la sferojn de la dia konado kaj penetros la misterojn de Lia saĝeco. En simila maniero, kiu trinkis el la kaliko de amo, tiu ricevis sian porcion el la oceano de eterna favoro kaj el la pluvoj de la ĉiamdaŭra kompatemo, kaj akiris la vivon de kredo la ĉielan kaj ĉiamdaŭran vivon. Sed tiu, kiu forturniĝis de tiu kaliko, estis kondamnita al eterna morto. La esprimoj »vivo« kaj »morto«, uzitaj en la sanktaj Skribaĵoj, signifas la vivon de kredo kaj la morton de nekredo. La plejmulto de la homoj, sekve de tio, ke ili ne komprenis la signifon de tiuj ĉi vortoj, malakceptis kaj forpuŝis la personon de la Malkaŝanto, senigis sin mem de la lumo de Lia dia gvidado kaj rifuzis sekvi la ekzemplon de tiu senmorta Belo.

121. Kiam la lumo de la Korana Revelacio estis bruligita en la ĉambro de la sankta koro de Mahometo, Li anoncis al la popolo la verdikton pri la Lasta Tago, la verdikton pri renaskiĝo, pri vivo kaj pri morto. Sekve de tio leviĝis la standardoj de ribelo kaj malfermiĝis la pordoj de mokado. Jen la vortoj de la malfideluloj, kiujn ripetis Li, la Spirito de Dio: »Kaj se vi dirus: ‘Post la morto sendube vi estos revivigitaj’, la malfideluloj certe ekkrius: ‘Tio estas evidente nur sorĉoj!’«⁹⁰ Alifoje Li diras: »Se vi iam miras, mirinda estas vere ilia diro: »‘Kiel! Post kiam ni

⁹⁰Korano 11:7

iĝos polvo, ĉu ni estos denove rekreataj?’⁹¹ Tial en alia fragmento Li ekkriis indignite: »Ĉu Ni estas irolacaj de la unua kreo? Tamen, ili estas duboplenaj koncerne novan kreon!«⁹²

122. Ĉar la komentintoj de la Korano kaj tiuj, kiuj sekvis ĝian literon, miskomprenis la internan sencan de la vortoj de Dio kaj ne konceptis ilian esencan signifon, ili penis elmontri, ke, konforme al la reguloj de la gramatiko, kiomfoje la esprimo »idhá« (signifanta »se« aŭ »kiam«) antaŭdiras pasintan tempon, ĝi ĉiam rilatas al la estonteco. Poste ili estis en grandega embaraso, penante klarigi tiujn versojn de la Libro, kie la citita vorto ne estis uzita. Kiel Li revelaciis: »Kaj aŭdiĝis sonogo de trumpeto – jen estas la minacita Tago! Kaj ĉiu animo estas vokita al kalkulo, kaj kun ĝi instiginto kaj atestanto.«⁹³ Klariginte tiujn ĉi kaj similajn versojn, ili argumentis, ke la esprimo »idhá« estas subkomprenata. En aliaj ekzemploj ili vane kontraŭparolis, dirante, ke ĉar la Tago de Juĝo estas neevitebla, tial oni parolas pri ĝi kiel pri okazo ne de la estonteco, sed de la pasinteco. Kiel vana estas ilia sofistado! Kiel bedaŭrinda estas ilia blindeco! Ili rifuzas rekoni la vokon de trumpeto, kiu laŭ teksto tiel klare eksonegis pro la Revelacio de Mahometo. Ili senigas sin de la reviviga Spirito de Dio, kiu ĝin blovas, kaj malŝaĝe esperas ekaŭdi trumpesono de Servaĵo de Dio, kiu estas nur unu el Liaj servantoj! Ĉu al la Serafo mem, la anĝelo de la Tago de Juĝo, kaj al liaj similuloj Mahometo ne ordonadis per siaj sanktaj paroloj? Diru! Kiel! Ĉu tion, kio estas por vi

⁹¹Korano 13:5

⁹²Korano 50:15

⁹³Korano 50:20

bona, vi interŝanĝas por tio, kio estas malbona? Malinda estas tio, kion vi false interŝanĝis! Sendube vi estas popolo malnobla, en plorinda mizero.

123. Ne, la »trumpeto« signifas la trumpetvokon de la Mahometa Revelacio, kiu estis senigita en la mezo de la universo, kaj la »renaskiĝo« signifas Lian propran leviĝon, celantan proklami la Aferon de Dio. Li ordonis al erarantoj kaj obstinuloj leviĝi kaj forlosi la tombojn de siaj korpoj. Li vestis ilin per la belega robo de kredo kaj revivigis ilin per la spiro de nova kaj mirinda vivo. Tial en la horo, kiam Mahometo, tiu dia Belo, intencis senvualigi unu el la misteroj, kaŝitaj en la simbolaj esprimoj »renaskiĝo«, »juĝo«, »paradizo« kaj »infero«, aŭdiĝis Gabrielo, la Voĉo de Inspiro, diranta: »Baldaŭ ili skuos siajn kapojn al Vi kaj diros: 'Kiam tio okazos?' Diru: 'Eble ĝi estas proksima.'«⁹⁴ La subsignifo de tiu ĉi verso sola estas sufiĉa por la popoloj de la mondo, se ili konsideros ĝin en siaj koroj.

124. Favorema Dio! Kiel malproksimen tiu popolo flankiĝis de la vojo de Dio! Kvankam la Tago de Renaskiĝo estis veninta en la mondon per la Revelacio de Mahometo, kvankam Lia lumo kaj signoj ekĉirkaŭis la teron kaj ĉion, kio estas sur ĝi, tamen tiu popolo insultis Lin, fordonis sin al tiuj idoloj, kiujn elpensis, en sia vanta kaj sensenca imago, la religiaj gvidantoj de tiu tempo kaj senigis sin de la lumo de la ĉiela favoro kaj de la pluvoj de la dia kompatemo. Vere, mizera skarabo neniam povas flari la aromon de sankteco, kaj vesperto de mallumo neniam povas

⁹⁴Korano 17:51

rigardi la brilon de la suno.

125. Tiaj aferoj okazadis en la tagoj de ĉiu Malkaŝanto de Dio. Kiel Jesuo diris: »Vi devas esti denove naskitaj.«⁹⁵ Li diris ankaŭ: »Se homo ne estas naskita de akvo kaj de la Spirito, li ne povas eniri en la Regnon de Dio. Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno; kaj tio, kio naskiĝis de la Spirito, estas spirito.«⁹⁶ La signifo de tiuj ĉi vortoj estas, ke en ĉiu Epoko tiu, kiu estas naskita de la Spirito kaj vivigita per la spiro de la Malkaŝanto de Sankteco, vere apartenas al tiuj, kiuj atingis la »vivon« kaj »renaskiĝon« kaj eniris la »paradizon« de amo de Dio. Kaj kiu ne apartenas al ili, estas kondamnita al »morto« kaj »forĵeto,« al la »fajro« de nekredo kaj al la »kolero« de Dio. En ĉiu sanktaj Skribaĵoj, libroj kaj kronikoj la verdikto de morto, fajro, blindeco, manko de kompreno kaj aŭdokapablo proklamita estis kontraŭ tiuj, kies lipoj neniam tuŝis la mistikan kalikon de la vera kompreno, kaj kies koroj estis senigitaj de la favoro de la Sankta Spirito en siaj tagoj. Kiel estis antaŭe dirite: »Ili havas korojn, per kiuj ili ne komprenas.«⁹⁷

126. En alia fragmento de la Evangelio estas skribite: »Kaj okazis, ke en unu tago la patro de unu el la disĉiploj de Jesuo mortis. Tiu ĉi disĉiplo, rakontinte al Jesuo pri la morto de sia patro, petis forpermeson, por lin enterigi. Tiam Jesuo, tiu Esenco de Korpureco, respondis, dirante: »Lasu la mortintojn enterigi siajn mortintojn«⁹⁸

⁹⁵ Johano 3:7

⁹⁶ Johano 3:5-6

⁹⁷ Korano 7:178

⁹⁸ Luko 9:60

127. Simile, du homoj el la popolo de Kúfih venis al ‘Alí, la Estro de Fideluloj. Unu el ili posedis domon kaj deziris ĝin vendi; la alia intencis ĝin aĉeti. Ili interkonsentis, ke tiu ĉi negoco efektiviĝu kaj la kontrakto estu skribita kun la saĝeco de ‘Alí. Li, la klariganto de la Leĝo de Dio, turnante sin al sia skribisto, diris: »Skribu: Unu mortulo aĉetis de alia mortulo domon. Tiu ĉi domo estas limigita per kvar limoj. Unu turnas sin al la ĉerko, la dua al la tomba arkaĵo, la tria al la Sirát, la kvara aŭ al la paradizo, aŭ al la infero«. Pensu, se la animoj de tiuj du homoj estus vivigitaj per la trumpetvoko de ‘Alí, se ili leviĝus el la tombo de eraro per la potenco de lia amo, la verdikto de morto certe ne estus kontraŭ ili proklamita.

128. En ĉiu tempo kaj epoko la celo de la Profetoj de Dio kaj iliaj elektitoj estis nur konfirmi la spiritan signifon de la esprimoj »vivo«, »renaskiĝo« kaj »juĝo«. Se iu konsiderus eĉ dum momento en sia koro tiun parolon de ‘Alí, li certe malkovrus ĉiujn misterojn, kaŝitajn en la esprimoj »ĉerko«, »tombo«, »Sirát«, »paradizo« kaj »infero«! Sed, ho kiel strange kaj bedaŭrinde! Jen ĉiuj homoj estas malliberigitaj en la tomboj de egoismo, kaj enterigitaj en la plejfunda profundejo de mondaj deziroj! Se vi akirus almenaŭ rosguton el la kristala akvaro de la dia sciado, vi tuj ekkomprenus, ke vera vivo ne estas la vivo de la karno, sed la vivo de la spirito. Ĉar la vivon de la karno kune dividas la homoj kaj la bestoj, dum la vivon de la spirito posedas nur korpuruloj, kiuj trinkis el la oceano de kredo kaj manĝis de la frukto de certeco. Tiu ĉi vivo ne konas morton, kaj la krono de tiu ĉi ekzisto estas senmorteco. Kiel estis dirite: »Kiu estas vera kredanto, vivas same en tiu ĉi mondo kaj en la mondo venonta«.

Se la »vivo« devus signifi tiun ĉi teran vivon, estas klare, ke morto nepre devas ĝin sekvi.

129. Simile, la enhavo de ĉiuj sanktaj Skribaĵoj prezentos ateston pri tiu alia vero, pri tiu plej glorinda vorto. Plie, la jena verso el la Korano, revalciita pri Hamzih, la »Princo de Martiroj«⁹⁹, kaj Abú-Jahl, estas klara pruvo kaj certa atesto pri la vereco de Nia diro: »Ĉu mortulo, kiun Ni revivigis kaj por kiu Ni ordonis lumon, ke li paŝadu kun ĝi inter la homoj, estos egala kun tiu, kies similaĵo estas en mallumo, el kiu li ne eliros?«¹⁰⁰ Tiu ĉi verso malsuprenvenis el la ĉielo de la Plejunua Volo en la tempo, kiam Hamzih estis jam vestita per la sankta mantelo de kredo, kaj Abú-Jahl obstinis neflekseble en sia kontraŭstarado kaj nekredo. El la Fonto de ĉiopovo kaj el la Ŝprucejo de eterna sankteco venis juĝo, kiu donis eternan vivon al Hamzih kaj verdiktis eternan kondamnon por Abú-Jahl. Tio ĉi estis signalo, kiu ekscitis en plej varman flamon la fajrojn de nekredo, brulantajn en la koroj de malfideluloj, kaj instigis ilin malkaŝe malkonfesi Lian veron. Ili kriegis laŭte: »Kiam Hazih mortis? Kiam li estis revivigita? En kiu horo estis donita al li tia vivo?« Ĉar tiuj homoj ne komprenis la signifon de tiuj noblaj paroloj, nek petis klerigon de la aŭtoritataj kraligantoj de la kredo, ke ili verŝu sur ilin ŝprucaĵon el la Kawthar de la dia sciado, tial tiaj fajroj de malbono estis bruligitaj meze de ili.

130. Hodiaŭ vi vidas, kiel, malgraŭ la radia brilego de la Suno de la dia sciado, ĉiuj homoj, ĉu altaj aŭ malaltaj, sekvis la ekzem-

⁹⁹Titolo de onklo de Mahometo

¹⁰⁰Korano 6:122

plon de tiuj mizeraj malkaŝantoj de la Princo de Mallumo. Ili konstante alvokas ilian helpon por malnodi la komplikaĵojn de sia kredo, kaj, pro manko de sciado, ili prezentas tiajn respondojn, kiuj neniel povas endanĝerigi ilian famon kaj bonstaton. Evidente estas, ke tiuj animoj, malnoblaj kaj mizeraj kiel skarabo, ricevis nenion de la mosk-odoraĵoj de eterneco, kaj neniam eniris la Riĉvânĉon de ĉiela ĝojo. Kiel do ili povas transdoni al aliaj la senpereajn aromojn de sankteco? Tian vojon ili iros, kaj tian ili irados eterne. Nur tiuj atingos la konadon de la Vorto de Dio, kiuj direktis sin al Li kaj forturniĝis de la malkaŝantoj de Satano. Tiel Dio konfirmis la leĝon de la tago de Sia Revelacio, kaj enskribis ĝin per la plumo de povo sur mistika Tabuleto, kaŝita sub la vualo de la ĉiela gloro. se vi atentis tiujn ĉi vortojn, se vi konsideros ilian eksteran kaj internan sencon, vi komprenos la signifon de ĉiuj malklaraj problemoj, kiuj en tiu ĉi tago iĝis netranspaŝebla barilo inter la homoj kaj la sciado pri la Tago de Juĝo. Tiam vi havos plu neniam demandojn, kiuj vin turmentos. Ni ĝoje esperas, ke, laŭ la volo de Dio, vi ne reiros en mizero kaj ankoraŭ soifante de la bordoj de la oceano de l' dia kompatemo, nek revenos kiel malriĉulo de la senperea Sanktejo de via kordeziro. Vidiĝu nun, kion atingos via serĉado kaj penado.

131. En la rezumo, prezentante tiujn ĉi verojn, Ni celis elmontri la regadon de Tiu, kiu estas Reĝo de reĝoj. Estu justa: ĉu tiu ĉi regado, kiu per eldiro de unu sola vorto evidentigis tian ĉiopentran influon, potencon kaj tiel timigan majestecon, ĉu tiu ĉi regado estas upera, aŭ ĉu tia estas la monda povo de tiuj reĝoj de la tero, kiuj, malgraŭ zorgado pri siaj subuloj kaj helpado al mal-

riĉuloj, havas certigitan al si nur eksteran kaj paseman fidelecon, dum en la homajn korojn ili inspiras nek amon, nek respekton? Ĉu tiu regado ne venkis, renaskis kaj revivigis per la potenco de unu vorto la tutan mondon? Kiel do! Ĉu mizera polvo povas esti komparita kun Tiu, kiu estas Sinjoro de Sinjoroj? Kiu lango kuraĝos esprimi la senliman diferencon, kiu estas inter ili? Ne, ĉiuj komparoj estus vanaj por atingi la benitan sanktejon de Lia regado. Se homo pripensus, li certe ekkomprenus, ke tiuj eĉ, kiuj estas servantoj ĉe Lia sojlo, regas ĉiujn kreaĵojn! Tio ĉi jam estis vidita kaj estos evidentigita en la estonteco.

132. Ĝi estas nur unu el la signifoj de la spirita regado, kiun Ni klarigis conforme al la kapableco kaj komprenemo de la homoj. Ĉar Li, la Movanto de ĉiuj estaĵoj, tiu glorata Vizaĝo, estas fonto de tiaj potencoj, kiujn nek ĉi tiu Persekutato povas malkaŝi, nek tiuj neindaj homoj povas kompreni. Senlime alta Li estas super la homaj laŭdoj de Lia regado; glora Li estas super tio, kion ili al Li atribuas!

133. Kaj nun konsideru en via koro: Se regado egalvalorus la teran regadon kaj la mondan estrecon, se ĝi signifus subecon kaj esteran obeadon de ĉiuj poploj kaj gentoj de la tero – se ĝi kaŭzus al Liaj amatoj gloron kaj vivadon en paco kaj al Liaj malamikoj humiliĝon kaj turmentojn – tia formo de regado ne estus inda je Dio, la Fonto de ĉia supereco, kies majestecon kaj povon ĉio atestas. Ĉar ĉu vi ne vidas, kiel plejmulto de la homaro estas en la povo de Liaj malamikoj? Ĉu ili ĉiuj ne forturniĝis de la vojo de Lia plaĉo? Ĉu ili ne faris tion, kion Li malpermesis, kaj ne lasis neforite, ne malakceptis kaj kontraŭstaris eĉ tion, kion Li ordonis? Ĉu Liaj amikoj ne estis ĉiam

viktimoj de la tiraneco de Liaj kontraŭuloj? Ĉiuj ĉi aferoj estas pli evidentaj, ol eĉ la brilego de tagmeza suno.

134. Sciu do, ho demandanta serĉanto, ke la tera regado estas sen ia valoro kaj ĉiam estos senvalora antaŭ la okuloj de Dio kaj de Liaj Elektitoj. Plie, se ni interpretus la potencon kaj regadon en tia senco, ke ĝi signifas la teran superecon paseman povon, kiel neeble estus al vi klarigi la jenajn versojn: »Kaj veroe Nia armeo venkos.«¹⁰¹ »Ĝoje ili estingus la lumon de Dio per la propraj buŝoj; sed Dio volis perfektigi Sian lumon, kvankam la malfideluloj ĝin abomenas.«¹⁰² »Li estas Reganto, super ĉiuj kreaĵoj.« Simile plejparto de la Korano atestas tiun ĉi veron.

135. Se la vanaj kontraŭparoloj de tiuj malsaĝaj kaj malnoblaj personoj estus veraj, ili ne havus alian alternativon, krom malkonfesi ĉiujn tiujn sanktajn parolojn kaj ĉielajn aludojn. Ĉar sur la tuta tero troviĝus neniu militisto pli eminenta kaj pli proksima al Dio, ol ĥusayn, la filo de ‘Alí, tiel senkompara kaj senegala li estis. »Estis en la mondo neniu, kiu lin egalus aŭ povus esti kun li komparita.« Tamen vi aŭdis certe, kio al li okazis. »Malbeno de Dio sur la kapojn de la tiranaro!«¹⁰³

136. Se oni interpretus laŭlitere la version: »Kaj vere Dia armeo venkos«, evidente estas, ke oni neniel povas ĝin rilatigi al la Elektitoj de Dio kaj Lia armeo, konsiderante, ke ĥusayn, kies heroeco estis klara, kiel la suno, premite kaj subjuĝigite trinkis fine el la kaliko de martireco en Karbilá, en la lando ŝaff. Simile

¹⁰¹Korano 37:173

¹⁰²Korano 9:33

¹⁰³Korano 11:18

estas kun la sankta verso: ¹⁰⁴ »Ĝoje ili estingus la lumon de Dio per la propraj buŝoj; sed Dio volis perfektigi Sian lumon, kvankam la malfideluloj ĝin abomenas«. Se oni interpretus ĝin laŭlitere, ĝi neniam konformus al la vero. Ĉar en ĉiu epoko la lumo de Dio estis eksternvide sufokita de la popoloj de la tero, kaj la Lampoj de Dio estis de ili estingitaj. Kiel do oni povus klarigi la superan regadon de tiuj Lampoj? Kion povus signifi la volo de Dio »perfektigi Sian Lumon?« Kiel jam estis vidite, tiel granda estis la malamikeco de la malfideluloj, ke neniu el tiuj diaj Lumportantoj trovis iam lokon por rifuĝi, aŭ gustumis la kalikon de trankvileco. Tiel paze ili estis premataj, ke lasta el la homoj suferigis al tiuj Esencoj de ekzisto kion ajn li volis. Tiujn persekutojn vidis kaj kunagis la popolo. Kiel do tiaj homoj kapablus kompreni kaj klarigi la vortojn de Dio, tiujn versojn de eterna gloro?

137. Sed la senco de tiuj versoj estas alia, oli ili imagis. Ne, la esprimoj “supereco», “povo», “aŭtoritato» havas tute alian signifon kaj rangon. Konsideru ekzemple la ĉiopenetran povon de tiuj sangogutoj de ĥusayn, kiuj surŝprucis la teron. Kian superecon kaj povon ricevis la polvo mem pro la sankteco kaj potenco de tiu sango, la potenco reganta la homajn korpojn kaj animojn! Tiel, ke kiu serĉis helpon kontraŭ siaj malsanoj, estis kuracita, tuŝinte la polvon de tiu sankta loko, kaj kiu, volonte gardi sian proprajon, tenis en sia domo kun absoluta kredo kaj kompreno iom da sankta tero el tiu loko, sekurigis ĉiujn siajn posedaĵojn. Tio estas la eksteraj elaperaĵoj de ĝia potenco. Kaj se Ni renkontus pri ĝiaj kaŝitaj ecoj, ili certe dirus: »Li kon-

¹⁰⁴Korano 9:33

sideras vere la polvon kiel la Sinojoron de Sinjoroj, kaj tutue forlasis la religion de Dio.«

138. Plie, voku al via memoro la malhonorajn cirkonstancojn, kiuj akompanis la martirigon de ĥusayn. Rememoru lian solecon – kiel ekstervide troviĝis neniŭ, por lin helpi, neniŭ, por preni lian korpon kaj enterigi ĝin. Kaj tamen vidu, kiel multaj estas hodiaŭ tiuj, kiuj en plej malproksimaj anguloj de la tero surmetas la vestojn de pligrimantoj, celante la regionon de lia martirigo, por meti siajn kapojn sur la sojlon de lia tomborestejo! Tia estas la potenco kaj povo de Dio! Tia estas la gloro de Lia regado kaj majesteco!

139. Ne pensu, ke ĉar tiuj aferoj plenumiĝis post la martirigo de ĥusayn, tiu tuta gloro restis por li senprofita. Ĉar tiu sankta animo estas senmorta, vivas la vivon de Dio kaj leĝas en la kaŝejo de ĉiela gloro sur la Sadrih de paradiza unuiĝo. Tiuj Esencoj de ekzisto estas brilaj Ekzemploj de sinofero. Ili fordonadis kaj ĉiam fordonados siajn vivojn, siajn posedaĵojn, siajn animojn kaj spiritojn, ĉion sian sur la vojo de la Plejamato. Neniŭ stato, kiel ajn glora, povus esti por ili pli dezirinda. Ĉar amantoj deziras nenion, krom kontenteco de sia Amato, kaj havas nenian celon, krom unuiĝo kun Li.

140. Se Ni volus transdoni al vi lumbrileton el la misteroj de la martireco de ĥusayn kaj malkaŝi al vi ĝiajn fruktojn, tiuj ĉi paĝoj neniam sufiĉus, nek elĉerpis ilian signifon. Ni esperas, ke, kun la volo de Dio, la ventoj de favoro ekblovos kaj la dia Printempo vestos la arbon de ekzisto per la robo de nova vivo – tiel, ke ni povos malkaŝi la misterojn de la dia saĝeco, kaj, per Lia prov-

idenco, sendependiĝi de la sciado de ĉio alia.Ĝis nun Ni tamen malkovris nur malgrandan areton da animoj, posedantaj nenian famon, kiuj atingis tiun ĉi staton. La estonteco elmontru, kion ordonos la Juĝo de Dio kaj proklamos la Tabernaklo de Liaj verdiktoj. Tiamaniere Ni rakontas al vi la mirindaĵojn de la Afero de Dio, kaj verŝas en vivajn orelojn la sonojn de la ĉiela melodio, por ke vi atingu la staton de vera kompreno kaj manĝu de ĝiaj fruktoj. Tial sciu kun certeco, ke tiuj Portantoj de la ĉiela majesteco se eĉ ilia loĝejo estas en polvo, havas sian veran restejon sur la trono de gloro en la supera regno. Kvankam senigitaj de ĉiaj teraj posedaĵoj, ili ŝvebas en la regno de senmorta riĉeco. Kaj dolore provataj en la manoj de malamiko, ili sidas dume ĉe la dekstra flanko de povo kaj ĉiela regado. Meze de la mallumo de ilia humiligo brilas sur ilin la lumo de senperea gloro kaj sur ilian senhelpecon verŝataj estas signoj de nevenkebla estreco.

141. Tiel Jesuo, la Filo de Mario, sidante foje kaj parolante laŭ la melodio de la Sankta Spirito eldiris la jenajn vortojn: »Ho popolo! Mia nutraĵo estas kampa herbo, per kiu mi kontentigas la malsaton. Mia lito estas la terpolvo, mia lampo nokte estas la lumo de la luno, kaj mia ĉevalo estas miaj propraj piedoj. Vidu, kiu sur la tero estas pli riĉa ol mi?« Je la justeco de Dio! Miloĵ da trezoroj rondturniĝas ĉirkaŭ tiu malriĉeco, kaj miriadoj da regnoj de gloro sopiras tian humiligon! Se vi akirus akveron el la oceano de la internaj signifoj de tiuj ĉi vortoj, certe vi forlasus la mondon kaj ĉion, kio en ĝi estas, kaj kiel fenikso vi konsumiĝus en la flamoj de la senmorta fajro.

142. Simile estas dirite, ke ian tagon unu el la kunuloj de ŝádiq

plendis antaŭ li pro sia malriĉeco. Tiam ŝádiq, tiu senmorta belo, faris la respondon: »Vere vi estas riĉa, vi trinkis la glutaĵon de riĉeco.« La mizerpremita homo konsterniĝis pro la vortoj, diritaj de tiu lumplena persono, kaj diris: »Kie estas miaj riĉaĵoj, se mi suferas pro manko de eĉ unu monero?« ŝádiq rediris al tio: »Ĉu vi ne posedas nian amon?« Li rediris: »Vere, mi posedas ĝin, ho vi markoto de la Profeto de Dio!« Kaj ŝádiq demandis lin fine: »Ĉu vi fordonus tiun ĉi amon por mil dinaroj?« Li respondis: »Ne, neniam mi ĝin fordonus, se eĉ estus donata al mi la mondo kaj ĉio, kio estas en ĝi!« Tiam ŝádiq diris: »Kiel tiu, kiu posedas tian trezoron, povus nomi sin malriĉulo?«

143. Tiu malriĉeco kaj tiu riĉeco, tiu humiligo kaj gloro, tiu regado, potenco kaj aliaj aferoj, al kiuj fiksitaj estas la okuloj kaj koroj de tiuj vantaj kaj malsaĝaj homoj – ĉio tio solviĝas en neniecon kontraŭ tiu Forumo! Kiel Li diris: »Ho homoj! vi estas nur mizeruloj, bezonantaj Dion; sed Dio estas la Riĉa, la Mem-sufiĉa.«¹⁰⁵ La »riĉeco« sekve signifas sendependecon deĉio krom Dio, kaj »malriĉeco« mankon de tiuj aferoj, kiuj estas de Dio.

144. Simile revoku al via memoro la tagon, kiam la judoj, ĉirkaŭpremitaj Jesuon, la Filon de Mario, insistis je Li, ke Li konfesu sian pretendon al la rango de Mesio kaj Profeto de Dio, por ke ili povu deklari Lin malfidelulo kaj kondamni Lin al morto. Tiam ili kondukis Lin, la Tag-Astron sur la ĉielo de la dia Revelacio, al Pilato kaj Kajafaso, kiu estis la ĉefa inter la religiaj gvidantoj de tiu tempo. Ĉiuj ĉefpastroj kunvenis en

¹⁰⁵Korano 35:15

la palaco, same ankaŭ amaso da popolo, kiu ariĝis por rigardi Liajn suferojn, por moki kaj insulti Lin. Kvankam ili insiste demandadis Lin, esperante, ke Li konfesos sian pretendon, tamen Jesuo restis en silento kaj ne parolis. Fine iu malbenita de Dio, leviĝis, kaj, proksimiĝinte al Jesuo, ĵuralvokis Lin, dirante: »Ĉu vi ne pretendis, ke vi estas la dia Mesio? Ĉu vi ne diris: 'Mi estas Reĝo de Reĝoj, Mia vorto estas la Vorto de Dio, kaj Mi estas rompanto de la Sabata tago?'« Tiam Jesuo levis sian kapon kaj diris: »Ĉu vi ne vidas la Filon de homo, sidantan dekstramane de la potenco kaj povo?« Tio ĉi estis Liaj vortoj, tamen konsideru, kiel eksternvide Li estis dotita per nenia potenco krom tiu interna potenco, kiu estis de Dio kaj kiu prenis en posedon ĉion, kio estis en la ĉielo kaj sur la tero. Kiel Ni povas rakonti ĉion, kio okazis al Li, post kiam Li diris tiujn vortojn? Kiel Ni povas priskribi, kiel abomene ili kondutis al Li? Fine ili surŝutis Lian benitan Personon per tiaj suferoj, ke Li direktis sian flugon al la kvara ĉielo?

145. Rakontite estas ankaŭ en la Evangelio de Sankta Luko, ke certan certan tagon Jesuo paŝis preter judo, kiu estis malsana, je paralizo kaj kuŝis en lito. Kiam la judo ekvidis Jesuon, li rekonis Lin kaj alvokis Lian helpon. Jesuo diris al li: »Leviĝu el via lito; viaj pekoj estas al vi pardonitaj«. Kelkaj judoj, starantaj apude, ekprotestis, dirante: »Kiu povas pardoni pekojn krom Dio sola?« Kaj tuj, kiam Jesuo eksciis iliajn pensojn, Li respondis al ili: »Kio estas pli facila: diri al paralizulo: viaj pekoj estas pardonitaj, aŭ diri: leviĝu, prenu vian liton kaj piediru? Sed por ke vi sciu, ke la Filo de homo havas aŭtoritaton

sur la tero pardoni pekojn...¹⁰⁶ Tio ĉi estas la vera aŭtoritato kaj tia estas la potenco de la Elektitoj de Dio! Ĉiuj ĉi aferoj, kiujn Ni multfoje menciis, kaj la detaloj, kiujn Ni citis el diversaj fontoj, havas unu solan celon: ebligi al vi ekkompreni la signifon de la aludoj en la paroloj de la Elektitoj de Dio, por ke certaj el tiuj paroloj ne ŝanceligu viajn piedojn kaj ne konfuzu vian koron.

146. Tiel per firmaj paŝoj ni iru sur la Vojo de certeco, por ke la vento, blovanta de la herbejoj de la plaĉo de Dio, portu al ni la dolĉajn aromojn de la dia akceptemo kaj igu nin, la pereemajn mortemulojn, atingi la Regnon de eterna gloro. Tiam vi komprenos la internan signifon de la regado kaj de aliaj aferoj, pri kiuj parolas la tradicioj kaj skribaĵoj. Plie, estas jam evidente kaj klare al vi, ke tiuj samaj aferoj, je kiuj tenis sin la judoj kaj la kristanoj, kaj la ĉikanoj, kiujn ili ŝutadis amase sur la Belon de Mahometo, estas hodiaŭ ripetataj de la anaro de l' Korano, kaj estas videblaj en iliaj akuzoj kontraŭ la »Punkto de Bayán« – la animoj de ĉiuj, loĝantaj en la regno de la diaj Revelacioj, estu al Li oferdonitaj! Vidu, kiel granda estas ilia malsaĝeco: ili parolas la samajn vortojn, diritajn en la pasinta temo de la judoj, kaj ne scias tion! Kiel veraj kaj pravaj etas Liaj vortoj koncerne ilin: »Lasu ilin okupiĝi per sia ĉikanado!«¹⁰⁷ »Je Via vivo, Mahometo! kaptis ilin la frenezo de iliaj vanaj imagaĵoj!«¹⁰⁸

147. Kiam la Nevidebla, la Eterna, la dia Esenco igis la Tag-

¹⁰⁶Luko 5:18–26

¹⁰⁷Korano 6:91

¹⁰⁸Korano 15:72

Astron de Mahometo leviĝi super la horizonton de sciado, inter la ĉikanoj, kiujn la judaj pastroj voĉis kontraŭ Li, estis, ke post Moseo neniu Profeto estas sendota de Dio. Vere, menciite estas en la Skribaĵoj pri Persono, kiu devas aperi kaj kiu progresigos la religion kaj akcelos la aferojn de la popolo, de Moseo, tiel, ke la leĝo de la Mosea Revelacio ekregos sur la tuta tero. Koncerne la vortojn de tiuj, kiuj vagas en la valo de malproksimeco kaj eraro, tiel diris en Sia Libro la Reĝo de eterna gloro: »‘La mano de Dio’, diras la judoj, ‘estas katenita.’ Katenitaj estu iliaj propraj manoj! Kaj pro tio, kion ili diris, ili estis malbenitaj. Ne, etenditaj estas Liaj ambaŭ manoj!«¹⁰⁹ »La mano de Dio estas super iliaj manoj.«¹¹⁰

148. Kvankam la komentantoj de la Korano diverse prezentis la cirkonstancojn, en kiuj tiu ĉi verso estis revelaciita, vi devas tamen streĉi la menson por ek kompreniĝian sencon. Li diris: Kiel malvera estas tio, kion la judoj imagis! Kiel povas la mano de Tiu, Kiu vere estas Reĝo, kiu aperigis al la mondo la vizaĝon de Moseo kaj donis al Li la robon de profeteco – kiel povas Ties mano esti katenita kaj ligita? Kiel oni povas imagi Lin, kiel ne povantan sendi alian Senditon post Moseo? Vidu, kiel absurda estas ilia diro; kiel malproksimen ĝi flankiĝis de la vojo de sciado kaj kompreno! Observu, kiel ankaŭ en ĉi tiu tago ĉiuj tiuj homoj okupiĝis per tiaj sensencaj absurdaĵoj. Dum pli ol mil jaroj ili recitadis tiun ĉi verson kaj senpense voĉis riproĉojn kontraŭ la judoj, komplete senkonsciaj pri tio, ke ili mem, kaŝe kaj malkaŝe, esprimas la sentojn kaj konvinkojn de

¹⁰⁹Korano 5:64

¹¹⁰Korano 48:10

la juda popolo! Certe estas al vi konata ilia vana argumentado, ke la tuta Revelacio estas finita, ke la portaloj de la dia favoro estas fermitaj, ke el la tagiĝ-loko de la eterna sankteco neniu suno leviĝos plu, ke la Oceano de la eterna malavareco sekiĝis por ĉiam, kaj el la Tabernaklo de la pratempa gloroĉsis aperadi Senditoj de Dio. Tia estas la amplekso de la kompreno de tiuj malgrandanimaj, malestimindaj homoj. Ili supozis, ke la fluo de la ĉiotuŝa favoro kaj abundaj malavaraĵoj de Dio, kies ĉeson neniu menso povas imagi, estas haltigita. De ĉiuj flankoj ili leviĝis, etendis la bridojn de tiraneco kaj streĉis ĉiujn fortoj, por per la maldolĉa akvo de sia vana fantazio estingi la flamon de la brulanta Arbusto de Dio, forgesante, ke la ŝirmilo de povo gardos en la propra potenco fortikaĵo la Lampon de Dio. La kompleta mizero, en kiun falis tiuj homoj, estas sufiĉa al ili, ĉar ili estas detenitaj de la ekkono de la esenca Celo, de la konado de l' Mistero kaj Esenco de la Afero de Dio. Ĉar la plej alta kaj plej eminenta favoro, elmontrita al la homoj, estas la favoro »atingi la apudeston de Dio« kaj ekkoni Lin, kio estas promesita al ĉiuj. Tio estas la plej alta grado de favoro, verŝita sur la homon de la Plej Malavara, la Pratempa, kaj ĝi estas la kompleta mezuro de Lia absoluta malŝpareco rilate al Siaj kreitoj. Tiun ĉi favoron kaj malavaraĵon neniu el tiuj homoj gustumis, nek ili estis honoritaj per tiu plej alta distingo. Kiel multaj estas la revelaciitaj versoj, klare atestantaj tiun ĉefgravan veron kaj glorindan tezon! Kaj tamen ili malakceptis ĝin, kaj, laŭ sia propra deziro, misinterpretis ĝian signifon. Kiel Li revelaciis: »Kaj koncerne tiuj, kiuj ne kredas je la signoj de Dio, aŭ ke ili iam Lin renkontos, tiuj Mian favoron ne esperu, tiujn dolora puno

atendas.«¹¹¹ Li diris ankaŭ: »Tiu, kiuj memoras, ke ili atingos la apudeston de sia Sinjoro, kaj ke al Li ili renovos.«¹¹²En alia okazo Li diras ankaŭ: »Tiu, kiuj konsideras kiel certajon, ke ili devas renkonti Dion, diras: ‘Kiel ofte, pro la volo de Dio, malgranda armeo venkis grandan armeon!’«¹¹³ En alia okazo ankoraŭ Li revelaciis: »Faru do justan laboron tiuj, kiuj esperas la apudeston de sia Sinjoro.«¹¹⁴ Kaj Li diris ankaŭ: »Li dekretas ĉiujn aferojn. Li faras Siajn signojn klaraj, por ke vi havu firman kredon je atingo de la apudesto de via Sinjoro.«¹¹⁵

149. Tiaj homoj forĵetis ĉiujn tiujn versojn, kiuj senerare atestas la realecon de la ¹¹⁶ »atingo de la Dio apudesto.« Neniu tezo estis asertita pli emfaze en la sanktaj skribaĵoj. Malgraŭ tio ili senigis sin de tiu alta kaj plej nobla rango, de tiu superega kaj glorinda stato. Kelkaj argumentis, ke la »atingo de la Dia apudesto« signifas la »Revelacion« de Dio en la Tago de Renaskiĝo. Se ili asertas, ke la »Revelacio« de Dio signifas »Universalan Revelacion«, klare kaj evidente estas, ke tia revelacio jam universale ekzistas. La verecon de tio Ni jam elmontris, ĉar Ni evidentigis, ke ĉiuj kreaĵoj ricevas kaj malkaŝas en si la brilojn de tiu ideala Reĝo, kaj ke la signoj de la revelacio de tiu Suno, la fonto de ĉia brileco, ekzistas kaj estas reflektitaj en la speguloj de la estaĵoj. Ne, se homo rigardus per la okulo de la dia kaj spirita juĝo, li rapide komprenus, ke nenio povas ekzisti sen la

¹¹¹Korano 29:23

¹¹²Korano 2:46

¹¹³Korano 2:249

¹¹⁴Korano 18:111

¹¹⁵Korano 13:2

¹¹⁶Korano 2:46

revelacio de la brileco de Dio, la ideala Reĝo. Konsideru, kiel ĉiuj kreaĵoj elokvente atestas la revelacion de tiu interna Lumo en si mem. Vidu, kiel en ĉiu kreaĵoj malfermitaj estas la portaloj de la Riĉván de Dio, por ke serĉantoj atingu la urbojn de kompreno kaj saĝeco, kaj eniru la ĝardenojn de sciado kaj povo. En ĉiu ĝardeno ili vidos mistikan fianĉinon de la internaj signifoj, sanktotenatan en la ĉambroj de parolo, en grandegaĉarmo kaj plen ornamateco. Plej multaj el la versoj de la Korano indikas kaj atestas tiun ĉi spiritan tezon. La verso: »Ekzistas nenio, kio ne kantas Lian gloron«¹¹⁷ elokvente tion atestas, kaj »Ni kalkulis ĉion kaj enskribis«¹¹⁸ fidine tion pruvas. Se do »atingi la apudeston de Dio« signifus akiri scion pri tia revelacio, evidente estas, ke ĉiuj homoj atingis jam la apudeston de la senŝanĝa Vizaĝo de tiu senkompara Reĝo. Kial do limigi tiun revelacion al la Tago de Renaskiĝo?

150. Kaj se oni asertus, ke la »dia apudesto« signifas »Specialan Revelacion de Dio«, esprimitan de certaj sufioj kiel la »Plej Sankta Spiritverŝiĝo«, se ĝi estas en la Esenco mem, evidente estas, ke ĝi estis eterne en la dia sciado. Se ni supozus la verecon de tiu ĉi hipotezo, la ¹¹⁹ »atingo de la dia apudesto« en tiu ĉi senco estus evidente ebla por neniu, ĉar tiu revelacio estus limigita al la plejfunda Esenco, kiun neniu homo povas aliri. »La vojo estas barita, kaj ĉia serĉado estas forpuŝita.« La mensoj de la favoratoj de la ĉielo, keil ajn alte ili ŝvebas, neniam povas atingi tiun staton, kiom do malpli kapablas la kompreno

¹¹⁷Korano 17:44

¹¹⁸Korano 78:29

¹¹⁹Korano 2:46

de malkleraj kaj lumigitaj mensoj.

151. Kaj se oni dirus, ke la “dia apudesto» signifas la “Dua-
vican Revelacion de Dio», interpretatan kiel la “Sankta Spiri-
tiversiĝo», tio ĉi estas akceptebla rilate al la mondo de kreaĵoj,
t.e. en la regno de la unua kaj origina malkaŝiĝo de Dio. Tia
revelacio estas limigta al Liaj Profetoj kaj Elektitoj, ĉar neniu
pli povohava ol ili ekzistis iam en la mondo de kreaĵoj. Tiun
ĉi veron ĉiuj konfesas kaj atestas. Tiuj Profetoj kaj Elektitoj
estas akceptantoj kaj malkaŝantoj de ĉiuj senŝanĝaj kvalitoj kaj
nomoj de Dio. Ili estas speguloj, kiuj fidele kaj vere reflektas la
lumon de Dio. Kion ajn oni povas atribui al ili, tion oni povas
atribui al Dio mem, kiu estas kune Videbla kaj Nevidebla. La
konado de Li, kiu estas Origino de ĉio, kaj atingo al Li estas ne
eblaj alie, ol per la kono kaj atingo de tiuj lumaj Estaĵoj, kiuj
devenas de la Suno de l’ Vero. Sekve per la atingo de la apudesto
de tiuj sanktaj Lumportantoj atingita estas la apudesto de Dio
mem. En la konado de ili malkaŝas sin la konado de Dio, kaj en
la heleco de iliaj vizaĝoj brilaperas la lumo de la Vizaĝo de Dio.
Pro la diversaj kvalitoj de tiuj Esencoj de Korpureco, kiuje stas
kune la unuaj kaj la lastaj, la videblaj kaj nevideblaj, evidente
estas, ke Tiu, kiu estas la Suno de l’ Vero, estas »la Unua kaj la
Lasta«, la Videbla kaj la Nevidebla.«¹²⁰ Simile estas kun aliaj
altaj nomoj kaj glorindaj kvalitoj de Dio. Tial kiu ajn persono
en kiu ajn Epoko rekonis kaj atingis la apudeston de tiuj alt-
gloraj, brilaj kaj plej eminentaj Lumportantoj, tiu vere atingis
la »apudeston de Dio« mem kaj eniris la urbon de eterna kaj
senmorta vivo. Atingi tiun apudeston estas eble bur en la Tago

¹²⁰Korano 57:3

de Renaskiĝo, kiu esta la tago de Dio mem, leviĝanta pere de Sia ĉiopenetra Revelacio.

152. Tia estas la signifo de la »Tago de Renaskiĝo«, pri kiu parolas ĉiuj sanktaj Skribaĵoj, kaj kiu estas anoncita al ĉiuj homoj. Konsideru, ĉu oni povas imagi tagon pli ŝatindan, pli potenca kaj pli gloran, ke homo voleme deturnu sin de ĝia favoro kaj senigu sin de ĝiaj malavaraĵoj, kiuj kvazaŭ printempaj pluvoj verŝiĝis el la ĉielo de kompatemo sur la homaron? Kiam do Ni elmontris konvinke, ke neniu tago estas pli granda, ol tiu ĉi Tago, kaj neniu revelacio pli glora, ol tiu ĉi Revelacio, kaj prezentis ĉiujn tiujn gravajn kaj nerefuteblajn pruvojn, kiuj neniu komprenema menso povas kontraŭparoli kaj neniu instruitulo ignori, kiel homo povas pro la vana argumentado de dubantoj kaj fantaziuloj senigi sin de tiel malavara favoro? Ĉu ili ne aŭdis la konatan tradicion: »Kiam Qá'im aperos, tiu tago estos la Tago de Renaskiĝo?« Simile la Imámoj, tiuj neestingebaj lumoj de la dia gvidado, interpretis la verson: »Kion alian povas tiuj homoj atendi, ol ke Dio venos al ili malsupren, ĉirkaŭvolvita per nuboj?«¹²¹ – kio estas signo, konsiderata de ili nepre kiel unu el la trajtoj de la Tago de Renaskiĝo – kiel rilatantan al Qá'im kaj Lia revelacio.

153. Penu do, ho mia frato, ekkompreni la signifon de »Renaskiĝo« kaj purigu vian koron de vajan diraĵoj de tiuj forpuŝitoj. Se vi enpaŝos la regnon de kompleta korpureco, vi atestos baldaŭ, ke neniu tago pli potenca, ol ĉi tiu Tago, kaj neniu renaskiĝo pli grandioza, ol ĉi tiu Renaskiĝo, estas imageblaj. Unu virta

¹²¹Korano 2:210

ago, plenumita en ĉi tiu Tago, egalas ĉiujn virtajn agojn, kiun la homoj plenumis dum miriadoj de jarcentoj – ne, Ni petas pardonon de Dio por tia komparo! Ĉar vere la rekompenco, kiun tia ago meritas, estas senmezure ekster la homa kalkulo. Tiuj senkomprenaj kaj malnoblaj animoj ne konceptis la veran signifon de »Renaskiĝo« kaj de la »atingo de la dia apudesto«, kaj sekve de tio ili restis komplete senigitaj de ilia favoro. Kvankam la sola kaj fundamenta celo de ĉia lernado, de ĝia tuta penado kaj laboro estas atingi kaj rekoni tiun staton, tamen ili ĉiuj dronas en siaj materialaj studadoj. Ili rifuzas al si unu liberan momenton kaj plene ignoras Tiun, kiu estas la Esenco de ĉia sciado kaj la sola Objekto de ilia serĉado! Ŝajnas, kvazaŭ iliaj lipoj neniam tuŝis la kalikon de la dia sciado, kaj kvazaŭ neniam ili ricevis eĉ rosguton el la pluvoj de la ĉiela favoro.

154. Konsideru, kiel tiu, kiu en la tago de la Revelacio de Dio malkapablas atingi la favoron de la »dia apudesto« kaj rekoni Liajn Malkaŝantojn, povas esti nomita instruitulo, se li eĉ estus pasiginta jarcentojn en studado kaj estus akirita ĉiujn limhavajn kaj materialajn sciojn de la homoj? Certe evidente estas, ke neniel oni povas lin konsideri kiel posedantan la veran sciadon. Dume plej neinstruita el ĉiuj homoj, se li estas honorita per tiu ĉi plej alta distingo, vere estas konsiderata kielunu el la disĉipuloj, kies sciado estas de Dio! Ĉar tiu homo atingis la plejsupron de sciado kaj alpaŝis la plej ekstremajn limojn de instruiteco.

155. Tiu stato ankaŭ estas unu el la signoj de la Tago de Revelacio. Kiel estas dirite: »Tiujn, kiuj estas malaltaj inter vi, Li altigos, kaj tiuj, kiuj estas altaj, Li malaltigos.« Kaj simile Li revelaciis en la Korano: »Kaj Ni deziras elmontri favoron al tiuj,

kiuj estas humiligitaj en la lando, kaj fari ilin spiritaj givadantoj itner la homoj, kaj fari ilin Niaj heredantoj.«¹²² Oni vidis enĉi tiu tago, kiel multaj religiaj gvidantoj, kaŭze de malakcepto de la Vero, falis en plaj fundajn abismojn de ignoreco, por resti tie, kaj iliaj nomoj estas forstrekitaj el la listo de gloruloj kaj instru-ituloj. Kaj kiel multaj estas la ignoruloj, kiuj pro akcepto de la kredo flugleviĝis alten, atingis la plejsupron de la sciado kaj kies nomoj estas enskribitaj per la Plumo de Povo sur la Tabuleto de la dia sciado. Tiamaniere »Dio neniigos aŭ konfirmos tion, kion Li deziras, ĉar Li estas la Fonto de la Revelacio.«¹²³ Tial estas dirite: »Serĉi pruvon, kiam la Pruvo estas elmontrita, estas nur maldecaĵo, kaj okupiĝi per sutado, kiam la Objekto deĉia lernado estas atingita, estas vere mallaŭdinde.« Diru: ho loĝantoj de la tero! Jen flamsimila Junulo, kiu rapidas tra la senlima profundo de la Spirito, heroldante al vi la novaĵon: »Rigardu: jen la Lampo de Dio estas lumanta,« kaj alvokas vin, ke vi turniĝu atente al Lia Afero, kiu, kvankam kaŝita sub la vualo de eterna gloro, brilas en la lando iraka super la tagiĝ-loko de eterna sankteco.

156. Ho mia amiko! se la birdo de via menso esploras la ĉielojn de la Korana Revelacio, seĝ ekzamenus la regnon de la dia sciado, kiu tie malkovriĝas, certe vi trovus sennombrajn pordojn de sciado, malfermitajn antaŭ vi. Vi renkonus sendube, ke ĉiuj ĉi aferoj, kiun en ĉi tiu tago malhelpis al la homoj atingi la bor- dojn de la oceano de l' eterna favoro, ankaŭ en la tempo de la Mahometa Revelacio malhelpis al la homoj de tiu epoko rekon-

¹²²Korano 28:5

¹²³Korano 13:41

tiun dian Lumportanton kaj konfesti Lian veron. Vi ekkomprenos ankaŭ la misterojn de la »reveno« kaj »revelacio«, kaj sekure vi restados en la plej altaj ĉambroj de certeco kaj fido.

157. Kaj okazi, ke iun tagon kelkaj el la kontraŭuloj de tiu senkompara belo, tiuj, kiuj flankiĝis for de la senperea Sanktejo de Dio, diris moke al Mahometo la jenajn vortojn: »Vere, Dio faris interligon kun ni, ke ni ne devas kredi apostolon, ĝis kiam li prezentos sin antaŭ ni kun ofero, kiun fajro el la ĉielo konsumos.«¹²⁴ La senco de tiu ĉi verso estas, ke Dio faris kun ili interligon, ke ili ne kredu iun ajn senditon, antaŭ ol li plenumos la miraklon de Habel kaj Kain, t.e. faros oferdonon, kaj fajro el la ĉielo bruligos ĝin, kiel ili aŭdis en la historio pri Habel, rakontita en la sanktaj Skribaĵoj. Al tio respondis Mahometo, dirante: »Apostoloj jam venis al vi antaŭ mi kun certaj pruvoj kaj kun tio, pri kio vi parolas. Kial vi ilin mortigis? Diru al mi, se vi estas homoj veramaj.«¹²⁵ Kaj nun estu justa: Kiel tiuj homoj, vivintaj en la tagoj de Mahometo, povis ekzisti milojn da jaroj antaŭa, en la epoko de Adamo aŭ de aliaj Profetoj? Kial Mahometo, tiu Esenco de vereco, povis akuzi la homojn de sia tago pri mortigo de Habel aŭ de aliaj Profetoj? Vi ne havas alian alternativon, krom konsideri Mahometon kiel trompiston aŭ malsaĝulon – Dio gardu de tio! – aŭ aserti, ke tiuj malnobloj estis la samaj homoj, kiuj en ĉiu epoko kontraŭstaris kaj ĉikanis la Profetojn kaj Diosenditojn, ĝis ili igis ilin ĉiujn suferi martirmorton.

¹²⁴Korano 3:183

¹²⁵Korano 3:182

158. Konsideru tion en via koro, por ke la dolĉaj ventoj de la dia sciado, blovantaj de la herbejoj de favoro, alportu al vi la aromon de la paroloj de l' Amato, kaj helpu al via animo atingi la Riĉvánon de kompreno. Ĉar la obstinuloj de ĉiu epoko malsukcesis elsondi la pli profundan sencon de tiuj gravaj kaj signifiĉaj paroloj, kaj imagis, ke la respondo de la Profetoj de Dio estis senrilate al la demandoj, kiujn ili prezentis al ili, tial ili atribuis ignorecon kaj malsaĝecon al tiuj Esencoj de sciado kaj kompreno.

159. Simile en alia verso Mahometo voĉis proteston kontraŭ la homoj de tiu tempo. Li diris: »Kvankam ili preĝis antaŭe pri venko super tiuj, kiuj ne kreadas, tamen kiam venis al ili Tiu, pri kiu ili sciis, ili malkonfesis Lin. Malbeno de Dio falu sur la malfidelulojn!«¹²⁶ Konsideru, ke tiu ĉi verso signifas ankaŭ, ke la homoj, vivantaj en la tagoj de Mahometo, estis la samaj, kiuj en la tempo de la antaŭaj Profetoj disputis kaj batalis por disvastigi la religion kaj instrui pri la Afero de Dio. Kaj tamen kiel la generacioj, vivintaj en la tempo de Jesuo kaj Moseo, kaj tiuj, kiuj vivis en la tagoj de Mahometo, povus esti konsiderataj kiel efektive tiuj samaj homoj? Plie, tiuj, kiujn ili konis antaŭe, estis Moseo, per kiu revelaciita estis la Kvinlibro, kaj Jesuo, la Aŭtoro de la Evangelio. Malgraŭ tio kial Mahometo diris: »Kiam venis al ili Tiu, pri kiu ili sciis – t.e. Jesuo aŭ Moseo – ili malkonfesis Lin?« Ĉu Mahometo ne estis ekstervide nomita per alia nomo? Ĉu Li ne venis el alia urbo? Ĉu Li ne parolis alian lingvon kaj ne proklamis revelacion de alia Leĝo? Kiel do estas eble aserti verecon de tiu ĉi verso kaj klarigi ĝian signifon?

¹²⁶Korano 2:89

160. penu do ekkompreni la signifon de la »reveno«, kiu estis tiel klare konigita en la Korano mem, kaj kiun neniu ĝis nun ekkomprenis. Kion vi diras? Se vi diras, ke Mahometo estis la »reveno« de la antaŭaj Profetoj, kiel atestas tiu verso, Liaj kunuloj sekve devas esti »reveno« de la antaŭaj kunuloj, ĉar la »revenon« de la antaŭaj homoj klare atestas la supre menciita verso. Kaj se vi neas tion, vi nepre malakceptas la veron de la Korano, la plej certan pruvon, elmontritan de Dio al la homoj. Simile penu ekkompreni la signifon de la »reveno«, »revelacio« kaj »renaskiĝo«, kiel de okazantaj en la tagoj de la Malkaŝantoj de la Dia Esenco, por ke vi ekvidu per viaj propraj okuloj la »revenon« de la benitaj animoj en la sanktigitaĵoj kaj lumajn korpojn, ke vi forlavu la polvon de nesciado kaj purigu la ombriĝintan esencon de via estaĵo per la akvo de favoro, fluanta el la Fonto de la dia sciado; por ke, per la povo de Dio kaj la lumo de la dia gvidado, vi distingu la tagiĝlumon de l' eterna brilego de la malhela nokto de erarado.

161. Plie, estas evidente al vi, ke la Portantoj de la konfiditaĵo de Dio estas aperigitaj al ĉiuj popoloj de la tero, kiel Proklamantoj de nova Afero kaj Portantoj de nova Revelacio. Ĉar tiuj Birdoj de la Plejalta Trono ĉiuj estas senditaj el la ĉielo de la Volo de Dio, kaj ĉar ĉiuj ili leviĝas por proklami Lian nekontraŭeblan kredon, ili estas tial konsiderataj kiel unu animo kaj la sama persono. Ĉar ĉiuj ili trinkas el la sama kaliko de amo de Dio kaj nutras sin per la frukto de la sama Arbo de Unueco. Ĉiu el tiuj Malkaŝantoj de Dio havas du statojn. Unu estas la stato de pura abstrakteco kaj esenca unueco. Tiurilate, se vi nomos ĉiujn ilin per unu nomo kaj atribuos al ili la samajn kvalitojn,

vi ne ĉeflankiĝos de la vero. Kiel Li revelaciis: »Nenian distingon Ni faras inter iuj el Liaj Senditoj!«¹²⁷ Ĉar ĉiu el ili alvokas la loĝantojn de la tero, ke ili konfesu la Unuecon de Dio, kaj heroldas al ili la Kawtharon de senfina favoro kaj kompatemo. Ĉiuj ili estas vestitaj per la robo de profeteco kaj kovritaj per la mantelo de gloro. Tiel Mahometo, la Punkto de la Korano, diris: »Mi estas ĉiu el la Profetoj.« Simile Li diris: »Mi estas la unua Adamo, Noa, Moseo kaj Jesuo«. Similaj estis la deklaroj de 'Alí. Tiaspecaj diraĵoj, kiuj indikas la esencan samecon de tiuj Proklamantoj de la Unueco, emanis ankaŭ de la Fluaĵoj de la senmortaj paroloj de Dio kaj Trezorejoj de la gemoj de la dia sciado, kaj estis enskribitaj en la sanktaj skribaĵoj. Tiuj Vizaĝoj estas ricevantoj de la Dia Ordonado, kaj tagiĝ-lokoj de Lia Revelacio. Tiu Revelacio estas supera al la vualoj de obleco kaj al la hazardaĵoj de nomrboj. Tiel Li diris: »Nia Afero estas nur unu.«¹²⁸ Ĉar la Afero estas unu kaj sama, ankaŭ ĝiaj Proklamantoj devas esti unuj kaj samaj. Simile la Imámoj de la mahometana kredo, tiuj lampoj de certeco, diris: »Mahometo estas nia unua, Mahometo estas nia lasta, Mahometo estas nia ĉio.«

162. Klare kaj evidente estas al vi, ke ĉiuj Profetoj estas Temploj de la Afero de Dio, kiuj aperis, vestitaj per diversaj vestoj. Se vi rigardos per juĝokapablaj okuloj, vi vidos ilin ĉiujn loĝantojn en la sama tabernaklo, ŝvebantajn en la saman parolon kaj proklamantajn la saman kredon. Tia estas la unueco de tiuj Esencoj de l' ekzisto, de tiuj Lumportantoj de senfina kaj

¹²⁷Korano 2:285

¹²⁸Korano 54:50

senmezura brilego. Tial, se unu el tiuj Malkaŝantoj de Sankteco proklamus: »Mi estas reveno de ĉiuj Profetoj«, Li dirus veron, efektive. En ĉiu sekvanta Revelacio, simile, la reveno de la antaŭa Revelacio estas fakto, kies vereco estas firme pruvita. Ĉar la reveno de la Profetoj de Dio, kiel estas atestite en versoj kaj tradicioj, estis konvike elmontrita, la reveno de iliaj elektitoj sekve ankaŭ estas definitive pruvita. Tiu reveno estos tro memevidenta, por postuli ian argumenton aŭ pruvon. Konsideru, ekzemple, ke inter la Profetoj estis Noa. Kiam Li estis vestita per la robo de profeteco kaj instigita de la Spirito de Dio or leviĝi kaj proklami Lian Aferon, kiu ajn ekkradis je Li kaj konfesis Lian kredon, al tiu favordonita estis nova vivo. Pri tiu homo oni povis sendube diri, ke li estis renaskita kaj revivigita, ĉar antaŭ la ekkredo je Dio kaj akcepto de Lia Malkaŝanto li estis liginta siajn sentojn al la aferoj de la mondo, kiel korligiteco al teraj posedaĵoj, al la edzino, infajon, manĝo, trinko k.t.p., tiagrade, ke tage kaj nokte lia sola zorgo estis amasigi riĉaĵojn kaj akiri rimedojn por plezuroj kaj vivoĝuoj. Ekster tio, antaŭ ol li sensoiĝis per la vivodona akvo de kredo, li estis tiel kunkresinta kun la tradicioj de siaj prapatroj kaj tiel pasie korligite al la sekvado de iliaj moroj kaj leĝoj, ke li preferus eĉ esti trafita de morto, ol malrespekti unu literon de tiuj superstiĉaj formoj kaj manieroj, kutimaj inter lia popolo. Kiel la popolo kriis; »Vere ni trovis niajn patrojn kun kredo, kaj vere ni sekvos iliajn paŝojn.«¹²⁹

163. Tiuj samaj homoj, kvankam envolvitaj en ĉiu tiuj vualoj de limigiteco, malgraŭ la detena forto de tia ritario, tuj post kiam

¹²⁹Korano 43:22

ili trinkis senmortan gluton da kredo el la kaliko de certeco, el la manoj de la Malkaŝanto de la Plejglora, tiel altiĝis, ke ili estis pretaj forlasi por Li siajn familiojn, havaĵojn, fordoni siajn vivojn, kredaĵojn kaj vere ĉion, krom Dio! Tiel potenca estis ilia sopiro al Dio, tiel edifa la abundo de ilia ekstazo, ke la mondo kaj ĉio, kion ĝi entenas, paliĝis antaŭ iliaj okuloj, kiel neniaĵo. Ĉu tiuj personoj ne prezentas ekzemplojn de la misteroj de la »renaskiĝo« kaj »reveno«? Ĉu ne estis vidite, ke tiuj samaj homoj, antaŭ ol ili estis dotitaj per la nova kaj mirinda favoro de Dio, streĉadis siajn mensojn en sennombraj manieroj, pro certigi al si sekurecon de siaj vivoj kontraŭ perejo? Ĉu dorno ne plenigadis ilin per timo, kaj la vido de vulpo ne instigadis ilin al forkuro? Sed, foje honoritaj per la plejsupra distingo de Dio kaj allasitaj al la bundo de Lia favoro, ili oferus volonte, se ili povus, dek mil vivojn sur Lia vojo! Ne, iliaj benitaj animoj, malŝatante la kaĝon de la korpo, sopiris liberiĝon. Unu sola militisto de tiu armeo ekstarus kaj ekbatalus kontraŭ amaso! Kaj tamen, se ne okazus tiu ŝanĝo en iliaj vivoj, kiel ili scipovus plenumi tiajn farojn, kontraŭajn al la manieroj de la homoj kaj nekunigeblaj kun iliaj deziroj?

164. Evidante estas, ke nenio alia krom tiu mistika ŝanĝo povus aperigi en la mondo de ekzisto tian spiritan kaj konduton, tiel komplete malsimilan al aliaj antaŭaj kutimoj kaj manieroj. Ĉar ilia maltrankvilo estis ŝanĝita en trankvilon, ilia dubo en certeco, ilia timemo en kuraĝon. Tia estas la potenco de la Dia Eliksiro, kiu rapide, kiel okulmovo, altigas la homajn animojn!

165. Konsideru, ekzemple, la substancon de kupro. Se ĝi estus gardata en sia propra mino kontraŭ solidiĝo, ĝi atingus, en la

daŭro de sepdek jaroj, la staton de oro. Estas tamen kelkaj, kiuj asertas, ke kupro mem estas oro, kiu pro solidiĝo estas en malsana kondiĉo kaj ne atingis pro tio sian propran staton.

166. Kiel ajn tio estas, la vera eliksiro en unu momento igos la substancon de kupro atingi la staton de oro, kaj trapasos la gradaron de sepdek jaroj en unu sola momento. Ĉu oni povos nomi tiun oron kupro? Ĉu oni povos aserti, ke ĝi ne atingis la staton de oro, dum la provŝtono estas apude, por provi ĝin kaj distingi de kupro?

167. Simile tiuj animoj, per la potenco de la Dia Eliksiro, trapasas rapide, kiel okulmovo, la mondon de polvo, kaj levas sin en la aferon de sankteco; per unu paŝo ili tramigras la teron de limigitaĵoj kaj atingas la regnon de la Senlokulo. Decas al vi prenstreĉi ĉiujn viajn fortojn, por akiri tiun Eliksiron, per kiu en unu ekspiro la okcidento de nesciado atingas la orienton de sciado, kiu lumigas la noktan mallumon per la briloj de tagiĝo, gvidas migranton, vagantan en la dezerto de dubo, al la fonto de la Dia Apudesto kaj ŝprucejo de certeco kaj honroas mortemajn animojn, enlasante ilin en la Riĉvánon de senmorteco. Se oni povus do pensi, ke tiu oro estas kupro, oni povus egale pensi, ke tiuj homoj estas samaj, kiuj ili estis, antaŭ ol ili estis favordotitaj per kredo.

168. Vidu, ho frato, kiel la internaj misteroj de »renaskiĝo«, de »reveno« kaj de »reviviĝo« estas senvualigitaj kaj solvitaj antaŭ viaj okuloj per tiuj pensufiĉaj, nerefuteblaj kaj konvinkaj paroloj. Dio permesu, ke per Lia favoro kaj nevidebla helpo vi formetu de via korpo kaj animo la malnovan veston kaj ornamu

vin per nova kaj senperea robo.

169. Tiuj do, kiuj enĉiu sekvanta diepoko antaŭiris la reston de la homaro en akcepto de la religio de Dio, kiuj trinkis la klaran akvon de sciado el la mano de la dia Belo kaj atingis la plej altajn suprojn de kredo kaj certeco – tiuj povas esti konsiderataj, en la nomo, en realeco, en faroj, en vortoj kaj en rango, kiel la »reveno« de tiuj, kiuj en la antaŭa epoko atingis la samajn distingojn. Ĉar kion elmontris la homoj de la antaŭa epoko, tion vidigis la membroj de tiuj ĉi lasta generacio. Konsideru la rozon: ĉu ĝi floras en la oriento, aŭ en la okcidento, ĝi estas malgraŭ ĉio rozo. Ĉar gravas tiurilate ne la ekstera aspekto kaj formo de la rozo, sed pli ĝuste la odoro kaj aromo, kiun ĝi eligas.

170. Purigu do viajn okulojn de ĉia tera limigiteco, por ke vi ekvidu ilin ĉiujn kiel portantajn unu Nomon, proklamantajn unu Aferon, elmontrantajn unu Esencon kaj malkaŝantajn unu Veron, kaj por ke vi ekkomprenu la mistikan »revenon« de la Vortoj de Dio, prezentitan en ĉi tiuj paroloj. Pensu momente pri la konduto de la kunuloj de la mahometana epoko. Konsideru, kiel per la vivodona spiro de Mahometo ili estis purigitaj de la makuloj de la teraj vantecoj, liberigitaj de egoistaj deziroj, kaj kiel iliaj koroj estis malligitaj de ĉio, kriom Li. Rigardu, kiel ili antaŭiris ĉiujn popolojn de la tero en la atingo de Lia sankta apudesto – la Apudesto de Dio mem – kiel ili forlasis la mondon kaj ĉion, kion ĝi entenas, kaj oferis libervole kaj ĝoje siajn vivojn ĉe la piedoj de tiu Malkaŝanto de la Plejglora. Kaj nun rigardu la »revenon« de tiu sama firmeco, de tiu sama konstanteco kaj sinrezigno, kiujn elmontris la kunuloj de la Punkto

de l' Bayán.¹³⁰ Vi vidis, kiel tiuj kumuloj levis, per la miraklo de l' favoro de la Sinjoro de Sinjoroj, la standardojn de nobla sinrezigno sur la neatingeblajn altaĵojn de gloro. Tiuj Lumoj devenas de unu sama Fonto, kaj tiuj fruktoj estas la fruktoj de unu Arbo. Vi povas distingi inter ili neniam diferencon, ne aliecon. Ĉio tio estas pro la favoro de Dio! Kiun Li volas, tiun Li dotas per Sia favoro. Dio permesu, ke ni evitu la landon de neado kaj rapidu al la oceano de akcepto, por ke ni ekvidu, per okulo purigita de ĉiuj konfliktantaj elementoj, la mondojn de unueco kaj diverseco, de varieco kaj sameco, de limigiteco kaj aparteco, kaj direktu nian flugon al la plejalta kaj plejfunda sanktejo de la interna signifo de la Vorto de Dio.

171. Per tiuj argumentoj sekve estas pruvite kaj elmontrite, ke se en la »fino, kiu ne konas finon« aperas Persono, kiu levigis pro proklami kaj akceli Aferon, kiun en la »komenco, kiu ne konas komencon« proklamis kaj akcelis alia Persono, vere oni povus deklari pri tiu, kiu estas la Lasta, kaj pri tiu, kiu estas la Unua, ke ili estas unu sama persono, ĉar ambaŭ estas proklamantoj de unu sama Afero. Pro tiu ĉi kaŭzo la Punkto de Bayán – la vivoj de ĉiuj ekster Li estu al Li oferdonitaj! – komparis la Mankaŝantojn de Dio al la suno, kiu, kvankam ĝi levigadas de la »komenco, kiu ne havas komencon« ĝis la »fino, kiu ne konas finon«, estas tamen ĉiam la sama suno. Se vi nur diros, ke tiu ĉi suno estas la antaŭa suno, vi diros veron, kaj se vi diros, ke tiu ĉi suno estas la »reveno« de tiu suno, vi ankaŭ diros veron. Simile, per tiu ĉi argumento estas elmontrite, ke la esprimo »lasta« estas rilatigebla al la »unua«, kaj la esprimo

¹³⁰Báb

»unua« estas rilatigebla al la »lasta«; ĉar tiel la »unua«, kiel la »lasta« leviĝis por proklami unu saman kredon.

172. Malgraŭ la evidenteco de tiu ĉi temo antaŭ la okuloj de tiuj, kiuj trinkis el la vino de la sciado, kiel multaj estas tamen tiuj, kiuj, kaŭze de miskompreno de ĝia signifo, lasis konfuzi sian komprenon per la esprimo »la Sigelo de la Profetoj« kaj senigi sin pro ĝi de la favoro de ĉiuj Liaj multegaj malavaraĵoj! Ĉu Mahometo mem ne deklaris: »Mi estas ĉiu el la Profetoj?« Ĉu Li ne diris, kiel Ni jam menciis: »Mi estas Adamo, Noa, Mosea kaj Jesuo?« Ĉar egale kiel Li konsideris sin mem la »unua el la Profetoj« – tio estas Adamo – simile ankaŭ la »Sigelo de la Profetoj« estas same rilatigebla al tiu Dia Belo. Estas evidente kompreneble, ke estante la »unua el la Profetoj«, Li estas egale ilia »Sigelo«.

173. La mistero de tiu ĉi temo estis en ĉi tiu epoko malfacilega provo por la tuta homaro. Vidu, kiel multaj estas tiuj, kiuj, kroĉante sin al tiuj vortoj, malkredis Lin, kiu estas ilia vera Proklamanto. Kian signifon, Ni demandas, tiuj homoj povus atribui al la esprimoj »unua« kaj »lasta«, rilatantaj al Dio – glorata estu Lia Nomo! Se ili asertas, ke tiuj ĉi esprimoj rilatas al ĉi tiu materiala universo, kiel tio estas ebla, se la videbla ordo de la aferoj estas ankoraŭ klare en sia ekzisto? Ne, en tiu ĉi ekzemplo la signifo de la »unua« estas sama, kiel tiu de la »lasta«, kaj la signifo de la »lasta« estas sama, kiel tiu de la »unua«.

174. Sama kiel en la »komenco, kiu ne konas komencon« la esprimo »lasta« estas vere rilatigebla al Tiu, kiu estas la Edukanto

de la videbla kaj nevidebla mondo, simile la esprimoj »unua« kaj »lasta« estas rilatigeblaj al Liaj Malkaŝantoj. Ili estas samtempe proklamantoj de tiel la »unua«, kiel la »lasta«. Sidante sur la honorseĝo de la »unua«, ili kune okupas la tronon de la »lasta«. Se troviĝus juĝokapabla okulo, facile ĝi malkovrus, ke la proklamantoj de la »unua« kaj »lasta«, de la »malkaŝita« kaj »kaŝita«, de la »komenco« kaj »sigelo« estas ĝuste tiuj sanktaj Estaĵoj, tiuj Esencoj de Korpureco, tiuj diaj Animoj. Kaj se vi ŝvebos en la sanktan sferon de »Dio estis sola, estis nenio krom Li«, vi trovos, ke en tiu Kortego ĉiuj tiuj nomoj estas plene senekzistaj kaj komplete forgesitaj. Tiam viajn okulojn ne nebuligados plu tiuj vualoj, tiuj esprimoj kaj aludoj. Kiel alta kaj glora estas tiu stato, kiun eĉ Gabrielo sengvide neniam povas alveni kaj la Birdo de Ĉielo senhelpe neniam povas atingi!

175. Kaj nun penu ekkompreni la signifon de la diraĵo de 'Alí, la Komandanto de l' Fideluloj: »Disŝirado de la vualoj de la gloro senhelpe«. Inter tiuj »vualoj de la gloro« estas pastroj kaj doktoroj, vivantaj en la tagoj de la Malkaŝanto de Dio, kiuj pro manko de kompreno, pro amo kaj avido je gvidado ne subiĝis al la Afero de Dio, plie, rifuzis eĉ klini la orelojn al la dia Melodio. »Ili ŝtopis siajn orelojn per la fingroj«. ¹³¹ Kaj ankaŭ homoj, plene ignorante Dion kaj akceptante ilin kiel siajn majstrojn, subiĝis tutanime al la aŭtoritato de tiuj pompaj kaj hipokritaj gvidantoj, ĉar ili ne posedas propran vidon, nek aŭdon, nek koron, por distingi veron de malvero.

176. Malgraŭ la die-inspiritaj alvokoj de ĉiuj Profetoj, Sank-

¹³¹Korano 2:19

tuloj kaj Elektitoj de Dio, admonantaj la homojn vidi per la propraj okuloj kaj aŭdi per la propraj oreloj, ili forĵetis males-time iliajn konsilojn kaj sekvis kaj sekvados blinde siajn religiajn gvidantojn. Se mizera kaj malklera persono, ne posedanta la vestaĵon de la instruituloj, turniĝus al ili, dirante: »Sekvu, ho popolo, la Senditojn de Dio«,¹³² ili respondus al tia alvoko, ege surprizitaj: »Kiel do! Ĉu vi pensas, ke ĉiuj tiuj pastroj, ĉiuj tiuj eminentuloj de sciado kun sia tuta aŭtoritato, kun sia pompo kaj parado eraris kaj ne scias distingi veron de malvero? Ĉu vi kaj homoj similaj al vi pretendas havi komprenon pri tio, kion ili ne komprenis?« Se la nombro kaj brileco de la vesto estus rigardata kiel kriterio, la homoj el la pasinta tempo, kiujn la nuntempuloj neniel superis en la nombro, lukso kaj potenco, devus esti rigardataj kiel pli altaj kaj indaj.

177. Klare kaj evidente estus, ke ĉiam, kiam aperis la Malkaŝantoj de Sankteco, la religiaj gvidantoj de ilia tago detenis la popolon kontraŭ atingo de la vojo de l' vero. Pri tio ĉi atestas la enhavo de ĉiuj sanktaj skribaĵoj kaj ĉielaj libroj. Aperis nek unu Profeto, kiu ne estis viktimo de senindulga malamo, de denuncoj, malakcepto kaj anatemo flanke de la ekleziuloj de sia tago! Ve al ili pro la malnoblaĵoj, kiujn iliaj manoj antaŭ plenumis! Ve al ili pro tio, kion ili nun faras! Kiuj vualoj de l' gloro estas pli plorindaj, ol tiuj enkorpiguloj de eraro! Je la justeco! disŝiri tiujn vualojn estas la plej potenca ago, kaj distranĉi ilin estas la plaj merita el ĉiuj faroj! Dio helpu nin kaj helpu vin, ho anaro de la Spirito, ke estu al vi lasite en la tempo de Lia Malkaŝanto plenumi, favorhelpate, tiajn farojn kaj atingi en Liaj Tagoj la

¹³²Korano 36:20

Apudeston de Dio.

178. Plie, inter la »vualoj de la gloro« estas tiaj esprimoj, kiel la »Sigelo de la Profetoj« kaj similaj, kies forigo estas plejsupera plenumaĵo antaŭ la okuloj de tiuj malgrandanimaĵoj kaj erarantaj personoj. Ĉiuj, kaŭze de tiuj misteraj diraĵoj, tiuj plorindaj »vualoj de la gloro«, estis baritaj kontraŭ la ekvido de la lumo de l' vero. Ĉu ili ne aŭdis la melodion de la Birdo de Ĉielo¹³³, kantanta tiun ĉi misteron: »Mil Fátimih Mi edzinigis, kaj ĉiuj ili estis filinoj de Mahometo, la filo de 'Abdu'lláh, la Sigelo de la Profetoj?« Jen, kiel multaj estas la misteroj, kuŝantaj ĝis nun nesolvite en la tabernaklo de la sciado de Dio, kaj kiel nombraj estas la gemoj de Lia saĝeco, kaŝitaj ĝis nun en Liaj nepenetreblaj trezorejoj! Se vi pripensos tion ĉi en la koro, vi komprenos, ke Lia verko konas nek komencon, nek finon. La aferaro de Lia ordono estas tro vasta, ke la lango de mortemulo ĝin priskribu, aŭ ke la birdo de la homa menso ĝin trapasu, kaj la decidoj de Lia providenco estas tro misteraj, ke la homa menso ilin komprenu. Lian kreaĵon neniu fino ekposedis, kaj ĝi ekzistis de la »komenco, kiu ne havas komencon«; kaj la Malkaŝantoj de Lia Belo vidis nenian komencon kaj ili daŭros ĝis la »fino, kiu ne konas finon«. Pripensu tiun ĉi parolon en via koro, kaj konsideru, kiel ĝi estas rilatigebla al ĉiuj tiuj sanktaj Personoj.

179. Penu simile, kompreni la signifon de la melodio de tiu eterna belo, ĥusayn, la filo de 'Alí, kiu, turninte sin al Salmán, diris la jenajn vortojn: »Mi estis kun mil Adamoj – la tempopaco inter ĉiu Adamo kaj la sekvinta estis kvindek mil jaroj

¹³³Imám 'Alí

– kaj al ĉiu el ili mi deklaris la sekvantecon, donitan al mia patro.« Li rakontas poste certajn detalojn, ĝis fine li diras: »Mi batalis mil batalojn en la vojo de Dio; la plej malgranda kaj malgrava el ili estis kiel la batalo apud Khaybar, en kiu mia patro batalis kaj kontraŭstaris al la malfideluloj.« Penu nun kompreni el tiuj du tradicioj la misterojn de »fino«, »reveno« kaj »kreaĵo sen komenco aŭ fino.«

180. Ho mia amato! Senmezure alta estas la ĉiela melodio super la fortostreĉoj de la homa orelo, penanta ekaŭdi, aŭ de la homa menso, penanta ekkompreni ĝian misteron! Kiel povas senhelpa formiko eniri la kortegon de la Plejglora? Kaj tamen malfortanimuloj forpuŝas, pro manko de kompreno, tiujn malklarajn parolojn kaj dubas la veron de tiuj tradicioj. Ne, neniu povas kompreni ilin krom tiuj, kiuj posedas penetreman koron. Diru, Li estas tiu Fino, por kiu en la tuta universo nenia fino estas imagebla, kaj por kiu nenia komenco en la mondo de kreaĵoj estas konceptebla. Rigardu, ho anaro de la tero, la brilegojn de la fino, aperigitajn en la Malkaŝantoj de la Komenco!

181. Kiel strange! Tiuj homoj per unu mano kroĉas sin al tiuj versoj de la Korano kaj tradicioj de la personoj de certeco, kiujn ili trovas konformaj al la propraj inklinoj kaj plaĉoj, kaj alimane forpuŝas tiujn, kiuj estas kontraŭaj al iliaj egoistaj deziroj. »Ĉu vi do kredas unu parton de la Libro, kaj neas alian?«¹³⁴ Kiel vi povas juĝi tion, kion vi ne komprenas? Tiel la Sinjoro de la estaĵoj en Sia senerara Libro, parolinte pri la »Sigelo« en la altaj vortoj. »Mahometo estas Apostolo de Dio kaj Sigelo de

¹³⁴Korano 2:85

la Profetoj, «¹³⁵ proklamis al ĉiuj homoj la promeson de »atingo de la Dia Apudesto«. Pri tiu ĉi ¹³⁶»atingo de la Dia Apudesto« parolas la versoj de la Libro, el kiuj kelkajn Ni jam menciis. La sola vera Dio estas Mia atestanto! Neniu pli majesta aŭ pli klara estis revelaciita en la Korano, ol la »atingo de la Dia Apudesto.« Benita estas tiu, kiu ĝin atingis, en la tago, kiam plejmulto da homoj, kiel vi mem vidas, forturniĝis de tio.

182. Kaj tamen, per la mistero de la antaŭa verso, ili forturniĝis de la favoro, promesita de la lasta, malgraŭ la fakto, ke la ¹³⁷ »atingo de la Dia Apudesto« en la »Tago de Renaskiĝo« estas klare esprimita en la Libro. Estis elmontrite kaj definitive pruvite per tiuj klaraj argumentoj, ke la »Renaskiĝo« signifas aperon de Malkaŝanto de Dio, proklamanta Lian Aferon, kaj »atingi la Dian Apudeston« signifas atingi la apudeston de Lia Belo en la persono de Lia Malkaŝanto. Ĉar vere, »Neniu rigardo vidas Lin, sed Li vidas ĉiujn rigardojn.«¹³⁸ Malgraŭ ĉiuj tiuj sendubaj faktoj kaj klaraj argumentoj ili kroĉiĝis malsaĝe al la esprimo »sigelo«, kaj restis komplete baritaj kontraŭ la rekono de Tiu, kiu estas, en la tago de Sia ĉeesto, Malkaŝanto kune de la Sigelo kaj de la Komenco. »Se Dio volus puni la homojn por iliaj malnoblaj agoj, Li ne lasus sur la tero unu moviĝantan estaĵon! Sed ĝis difinita tempo Li prokrastas!«¹³⁹ Sed sendepende deĉio tio, se tiu ĉi popolo atingus guton el la kristalaj torentoj,

¹³⁵Korano 33:40

¹³⁶Korano 2:46

¹³⁷Korano 2:46

¹³⁸Korano 6:103

¹³⁹Korano 16:61

fluantaj el la vortoj: »Dio faras, kion Li volas, kaj decidas, kiel al Li plaĉas,« ili ne ĉikanus tiel maldece, kiel ili faras, la fokusan Centron de Lia Revelacio. La Afero de Dio, ĉiuj faroj kaj vortoj, estas en la potenco de Lia povo. »Ĉio kuŝas sklavigite en la teno de Lia potenca Mano; ĉio estas facila kaj ebla por Li.« Li plenumas, kion Li volas, kaj faras ĉion, kion Li deziras. »Kiu diras ‘Kial?’ aŭ ‘por kio?’ blasfemis!« Se tiuj homoj forskuus de si la dormon de malzorgemo kaj konsciigus al si, kion faris iliaj manoj, certe ili pereus kaj propravole ĵetus sin en fajron, kiu estas ilia fino kaj restejo. Ĉu ili ne aŭdis kion Li revelaciis: »Li ne estos demandata pri Siaj faroj?«¹⁴⁰ En la lumo de tiuj ĉi vortoj kiel homo povas esti tiel maltima, por fari al Li demandojn kaj okupi sin per vanaj diraĵoj?

183. Dio favorema! Tiel granda estas la malsaĝeco kaj malvirteco de la homoj, ke ili turnis siajn vizaĝojn al siaj propraj pensoj kaj deziroj, kaj turnis la dorson al la sciado kaj volo de Dio – benata kaj glorata estu Lia Nomo!

184. Estu justa! se tiuj homoj konfesus la verecon de tiuj lumaj vortoj kaj sanktaj aludoj, kaj rekonus Dion, kiel »Tium, kiu faras, kio al Li plaĉas«, kiel ili povus plue persisti de tiuj frapantaj absurdaĵoj? Ne, tutanime ili akceptus kaj subiĝus al tio, kion Li diras. Mi ĵuras je Dio! Se ne kontraŭus tion la dia Ordonado kaj la neesplorableblaj decidoj de Providenco, la tero mem perigus komplete ĉiujn tiujn homojn! »Li tamen indulgos ilin ĝis la definitiva horo de konata tago.«

185. Mil ducent kaj okdek jaroj pasis de la tagiĝo de la Ma-

¹⁴⁰Korano 21:23

hometana epoko, kaj kun ĉiu matenlumo tiuj blindaj kaj malnoblaj homoj recitadis la Koranon, kaj tamen ne komprenis eĉ unu literon de tiu Libro! Ĉiam denove ili legas la versojn, kiuj klare atestas pri la realeco de tiuj ĉi sanktaj temoj kaj pri la vero de la Malkaŝantoj de l' eterna Gloro, kaj tamen ili ne komprenas ankoraŭ ilian sencon. Ili eĉ ne scipovis ekkompreni dum tiu tuta tempo, ke la legado de la sanktaj skribaĵoj kaj libroj havas en ĉiu epoko neniun alian celon, ol ebligi al la leganto ekkompreni ilian signifon kaj solvi iliajn plejfundajn misterojn. Alie, legado sen kompreno postlasas al homo nenian profiton.

186. Kaj okazis, ke certan tagon unu homo vizitis tiun ĉi Mizerulon, sopirante la oceanon de Lia sciado. Dum Ni parolis kun li, aluditaj estis la signoj de la Tago de Juĝo, Renaskiĝo, Reviviĝo kaj Kalkulo. Li petegis Nin klarigi, kiamaniere en tiu ĉi mirinda Epoko la popoloj de la mondo estos alvokitaj al kalkulo, se neniu el ili estas pri ĉi tio konscia. Tiam Ni konigis al li, konforme al la mezuro de lia kapableco kaj kompreno, certajn verojn de la Scienco kaj pratempa Saĝeco. Ni demandis lin tiam, dirante: »Ĉu vi ne legis la Koranon, kaj ĉu vi ne konas tiun ĉi benitan verson: »En tiu tago nek homo, nek spirito estos demandata pri sia peko?«¹⁴¹ Ĉu vi ne komprenas, ke demandi ne signifas demandi per lango aŭ parolo, kiel la verso mem indikas kaj pruvas? Ĉar poste estas dirite: »Laŭ la vizaĝoj estos ekkonitaj la pekuloj: kaj ili estos ekkaptitaj je la fruntharoj kaj piedoj.«¹⁴²

¹⁴¹Korano 55:39

¹⁴²Korano 55:41

187. Tiel la popooj de la mondo estas juĝataj laŭ siaj vizaĝoj. En la vizaĝoj evidentiĝas iliaj miskredaĵoj, ilia kredo kaj ilia malboneco. Same videble estas en tiu ĉi tago, kiel la sekvantoj de eraro estas rekoneblaj kaj distingeblaj laŭ siaj vizaĝoj de la sekvantoj de la dia gvidado. Se tiuj homoj primeditus, tutanime en la nomo de Dio kaj celante nenion, krom Lin plezurigi, la versojn de la Libro en siaj koroj, sendube ili trovus ĉion, kion ili serĉas. En ĝiaj versoj ili trovus malkaŝitajn kaj aperigitajn ĉiujn aferojn, ĉu grandajn, aŭ malgrandajn, kiuj okazis en ĉi tiu Epoko. Ili rekonus eĉ tie aludojn al la foriro de la Malkaŝantoj de la nomoj kaj kvalitoj de Dio el sia patrujo, al la kontraŭstarado kaj malrespekta aroganteco de registaroj kaj popoloj, al la ekloĝo kaj enhejmiĝo de la Universala Malkaŝanto en difinita kaj speciale destinita lando. Neniu tamen povas tion kompreni krom tiu, kiu posedas penetreman koron.

188. Ni sigelas Nian temon per tio, kio estis antaŭe revelaciita al Mahometo, por ke ĝia sigelo disverŝadu la odoron de tiu sankta mosko, kiu kondukas la homojn al la Riĉváno de senperea brilo. Li diris, kaj Lia Vorto estas vero: »Kaj Dio vokas al la Restejo de Paco;¹⁴³ kaj Li gvidas, kiun Li volas, sur la ĝustan vojon.«¹⁴⁴ »Por ili estas Restejo de Paco kun ilia Sinjoro! kaj Li estos ilia defendanto pro iliaj faroj.«¹⁴⁵ Tion ĉi Li revelaciis, por ke Lia favoroĉirkaŭregu la mondon. Glorata estu Dio, la Sinjoro de ĉiuj estaĵoj!

¹⁴³Baghdád

¹⁴⁴Korano 10:25

¹⁴⁵Korano 6:127

189. Diversmaniere kaj plurfoje Ni klarigis la signifon de ĉiu temo, por ke ĉiu, ĉu alta aŭ malalta, ricevu, konforme al sia komprenemo kaj kapablo, sian patron kaj dividaĵon el tio. Se li ne kapablos kompreni certajn argumentojn, li povos tiam, por la helpo de la aliaj atingi sian celon. »Por ke homoj deĉiu speco sciu, kie trankviligi sian soifon.«

190. Je Dio! Ĉi tiu Ĉiela Birdo, nun loĝanta en polvo, povas, krom tiuj melodioj, sonigi miriaden da kantoj, kaj scias, ekster tiuj ĉi paroloj, malkovri sennombrajn misterojn. Ĉiu unuopa sono de ĝiaj neeldiritaj paroloj estas senmezure alta super ĉio, kio elfluis de sub tiu ĉi plumo. La estonteco konigu la horon, kiam la Fianĉinoj de l' interna signifo, laŭ la dekreto de la Dia Volo, elrapide, senvualigite, el sia mistike palaco, kaj aperigos sin en la pratempa sfero de ekzisto. Nenio en la mondo estas ebla sen Lia permeso; neniu potenco povas daŭri alie, ol per Lia potenco, kaj neniu Dio ekzistas krom Li. Lia estas la mondo de la kreaĵaro, kaj Lia estas la Afero de Dio. Ĉio proklamas Lian Revelacion kaj ĉio rakontas la misterojn de Lia Spirito.

191. En la antaŭaj fragmentoj Ni jam difinis du statojn de ĉiu el la Lumportantoj, leviĝantaj el la Tagiĝlokoj de eterna sankteco. Unu el tiuj statoj, la staton de la esenca unueco, Ni jam klarigis. »Nenian diferecon Ni faras inter ili.«¹⁴⁶ La alia estas la stato de diferenceco, kaj ĝi rilatas al la mondo de kreiteco kaj al ĝiaj limigoj. Tiurilate ĉiu Malkaŝanto de Dio havas apartan individuecon, difinitan mision, antaŭdestinitan Revelacion kaj speciale determinitajn limigojn. Ĉiu el ili estas

¹⁴⁶Korano 2:136

konata per alia nomo, karakterizita per speciala atributo, ĉiu el ili plenumas difinitan mision kaj havas konfiditan al si specialan Revelacion. Kiel Li diris: »Kelkajn el la Apostoloj Ni levis super la aliajn. Al kelkaj Dio parolis, kelkajn Li altigis kaj glorigis. Kaj al Jesuo, la Filo de Mario, Ni donis klarajn signojn kaj Ni fortigis Lin per la Sankta Spirito.«¹⁴⁷

192. Tiu ĉi diferenco de iliaj statoj kaj misioj estas la kaŭzo, ke la vortoj kaj paroloj, fluantaj el tiuj Fontoj de la dia sciado, ŝajnas malsamaj kaj diversaj. Alie, antaŭ la okuloj de tiuj, kiuj estas allasitaj al la misteroj de la dia saĝeco, ĉiuj iliaj paroloj estas nur esprimo de unu Vero. Ĉar plejparto de homoj ne komprenas tiujn ĉi statojn, pri kiuj Ni parolis, ili sentas sin konfuzitaj kaj konsternitaj pro la diferencaj paroloj, eldiritaj de la Malkaŝantoj, kiuj estas esence unuj kaj samaj.

193. Ĉiam estis evidente, ke tiu tuta malsameco de la paroloj estas ŝuldata al la diferencoj de la statoj. Tiel, konsideranta de la vidpunkto de ilia unueco kaj noblanima korupureco, la atributoj de Dieco, Dipotenco, Plejsupera unuobleco kaj Plejfunda Esenco estis kaj estas atribueblaj al tiuj Esencoj de ekzisto, ĉar ĉiuj ili sidas sur la trono de la dia Revelacio kaj restadas sur la honorseĝo de la dia kaŝiteco. Per ilia apera konigita estas la Revelacio de Dio, kaj en iliaj vizaĝoj malkaŝita estas la Beleco de Dio. Jen kial la voĉo de Dio mem aŭdiĝas en la paroloj de tiuj Malkaŝantoj de la Dia Estaĵo.

194. Konsiderataj en la lumo de sia dua stato – la stato de diferenceco, malsameco, ĉi-tempaj limigoj, karakterizaĵoj kaj signoj

¹⁴⁷Korano 2:253

– ili elmontras absolutan servemon, plenan modestecon kaj kompletan sinforĝeson. Kiel Li diris: ¹⁴⁸ »Mi estas servanto de Dio. ¹⁴⁹Mi estas nur homo, kiel vi.«

195. Laŭ tiuj ĉi nerefuteblaj kaj plene prezentitaj argumentoj penu ekkompreni la signifon de la faritaj de vi demandoj, por ke vi iĝu firma en la Kredo de Dio kaj ne estu konsternita pro la diferencoj de la paroloj de Liaj Profetoj kaj Elektitoj.

196. Se iu el la perfektaj Malkaŝantoj de Dio deklaras: »Mi estas Dio!« efektive Li dirus veron, kaj neniam dubo estas pri tio. Ĉar estis plurfoje elmontrite, ke pere de ilia Revelacio, de Iliaj atributoj kaj nomoj, la Revelacio de Dio, Lia nomo kaj Liaj atributoj aperigitaj estas en la mondo. Tial Li diris: »Tiuj ĉi sagoj estas sagoj de Dio, ne viaj!«¹⁵⁰ Kaj Li diris ankaŭ: »Vere, tiuj, kiuj ĵuris fidelecon al vi, ĵuris ĝin efektive al Dio.«¹⁵¹ Kaj se iu el ili proklamas la vortojn: »Mi estas Sendito de Dio,« Li ankaŭ dirus veron, senduban veron. Kiel Li diris: »Mahometo ne estas patro de iu el vi, sed Li estas Sendito de Dio.« Konsiderataj en ĉi tiu lumo, ili ĉiuj estas nur Senditoj de tiu ideala Reĝo, de tiu senŝanĝa Esenco. Kaj se ili ĉiuj proklamas: »Mi estas Sigelo de la Profetoj«, efektive ili dirus nuran veron, ekster plej facila ombro de dubo. Ĉar ili ĉiuj estas nur unu persono, unu animo, unu spirito, unu estaĵo, unu revelacio. Ĉiuj ili estas malkaŝantoj de la »Komenco« kaj la »Fino«, la »Unua« kaj la »Lasta«, la »Videbla« kaj la »Kaŝita« – el kio ĉio apartenas

¹⁴⁸Korano 19:31

¹⁴⁹Korano 18:110

¹⁵⁰Korano 8:17

¹⁵¹Korano 48:10

al Tiu, kiu estas la plejinterna Spirito de Spiritoj kaj eterna Esenco de Esencoj. Kaj se ili dirus: »Ni estas servantoj de Dio,«¹⁵² ankaŭ tio ĉi estas evidenta kaj nediskutebla fakto. Ĉar ili estas aperintaj en la ekstrema stato de servemo, al kiu similan neniu homo kapablus atingi. Tial en la momentoj, kiam tiuj Esencoj de l' ekzisto estis profunde subigitaj en la oceanoj de pratempa kaj eterna sankteco, aŭ kiam ili ŝvebis al la plej altaj suproj de la diaj misteroj, ili proklamis, ke ilia parolo estas la Voĉo de la Plejalta Estaĵo, la Voko de Dio mem. Se la okulo de juĝokapablo estus malfermita, ĝi rekonus, ke eĉ en tiu ĉi stato ili konsideris sin plene nerimarkindaj kaj senekzistaj antaŭ Tiu, kiu estas Ĉiopenetra, Plejvirta. Ili ŝajnis opinii sin mem neniaĵo, kaj konsider en tiu ĉi Kortego mencion pri si mem kiel blasfemon. Ĉar plej eta flustro pri si mem en tiu Kortego estas pruvo de memfideco kaj sendependa ekzisto. En la okuloj de tiuj, kiuj atingis tiun Kortegon, tia ekpenso mem estas grava peko. Kiom pli peke estus, se io ajn alia estu menciita en Lia Apudesto, se la koro de homo, lia lango, lia menso aŭ lia animo okupiĝus per iu ajn alia, ol la Amegato, se lia okulo rigardus iun alian vizaĝon, ol Lia belo, se lia orelo klinus sin al iu alia melodio, ol Lia voĉo, kaj se liaj piedoj paŝus alian vojon, ol Lia vojo.

197. En tiu ĉi tago disportata estas la spiro de Dio, kaj ĉion penetras Lia Spirito. Tia estas la elŝpruco de Lia favoro, ke la plumo estas haltigita kaj la lango iĝas senvorta.

198. Pro tiu ĉi stato ili atribuis al si la Voĉon de Dio k.t.p. dum pro la stato de senditeco ili deklaris sin Senditoj de Dio. En ĉiu

¹⁵²Korano 33:40

okazo ili sonigadis parolojn, kiuj konformis al la bezonoj de la okazo, kaj alskribis ĉiujn tiujn deklarojn al si mem – deklarojn, etendantajn sin el la sfero de la dia Revelacio en la sferon de kreiteco, kaj el la regno de Dio en la regnojn de la tera ekzisto. Jen kial ilia parolo, kia ajn ĝi estas, ĉu ĝi koncernas la sferon de Dieco, Sinjoreco, Profeteco, Senditeco, Gardisteco, Apostoleco aŭ Servemo, ĉiam estas vera, sen ombro de dubo. Tial tiuj diraĵoj, kiujn Ni citis, por konfirmi Nian argumenton, devas esti atente konsideritaj, por ke la malsamaj paroloj de la Malkaŝantoj de la Nevidebla kaj Tagiĝlokoj de Sankteco ne maltrankviligu plu la animon kaj ne konfuzu la menson.

199. Tiuj vortoj, eldiritaj de la Lumportantoj de l' Vero, postulas nepran pripenson, kaj se iu ne komprenus ilian signifon, li devas serĉi lumigon ĉe la Gardantoj de la Trezorejoj de l' Sciado, ke tiuj klarigu ilian signifon kaj solvu iliajn misterojn. Ĉar decas al neniuj interpreti la sanktajn vortojn laŭ nia propra malperfekta kompreno, nek, trovinte ilin kontraŭaj al sia inklinoj kaj deziroj, malakcepti kaj malkonfesi ilian veron. Ĉar tia estas hodiaŭ la konduto de la ekleziuloj kaj doktoroj de ĉi tiu tempo, kiuj okupas la seĝojn de sciado kaj instruiteco, kaj kiuj nomis ignoradon sciado kaj titolis tiranecon justeco. Se ili turnus sin al la Lumo de l' Vero kun demando koncerne tiujn idolojn de fantazio, kiujn skulptis ilia vana imago, kaj se ili trovas Lian respondon malegaloa al la propraj konceptoj kaj al la propra kompreno de la Libro, sendube ili deklarus Liin, la Minejon kaj Fonton de ĉia sciado, la rekta malo de kompreno. Tiaj aferoj okazadis en ĉiu epoko.

200. Kiam, ekzemple, oni demanis Mahometon, la Sinjoron de

l' ekzisto, pri novlunoj, Li, laŭ la ordono de Dio, donis la jenan respondon: »Tio estas periodoj, difinitaj por la homoj.«¹⁵³ Sekve de tio tiuj, kiuj Lin aŭdis, deklaris Lin ignorulo.

201. Simile, en la verso, koncernanta la »Spiriton«, Li diris: »Kaj ili demandos Lin pri la Spirito. Diru: 'la Spirito venas laŭ la ordono de Mia Sinjoro.'«¹⁵⁴ Tuj, kiam Mahometo donis tiun ĉi respondon, ili ĉiuj brue ekprotestis, dirante: »Jen ignorulo, kiu ne scias, kio estas la Spirito, titolas sin Malkaŝanto de la dia sciado!« Kaj nun rigardu la ekleziulojn de ĉi tiu tempo, kiuj, estante honoritaj per Lia nomo kaj trovante, ke iliaj antaŭuloj konfesis Lian Revelacion, subiĝis blinde al Lia vero. Konsideru, ke se tiaj homoj hodiaŭ ricevas tiajn respondojn al tiaj demandoj, ili senhezite malaprobis kaj malakceptus ilin, plie, ili aŭdigus denove tiujn samajn ĉikanojn, same kiel ili aŭdigis ilin en ĉi tiu tago. Ĉio tio okazas malgraŭ la fakto, ke tiuj Esencoj de l' ekzisto estas sanlime altaj super tiaj fantaziaj imagoj kaj senmezure gloraĵoj super ĉiuj tiaj vanaj diraĵoj kaj super la kompreno de ĉiu komprenemma koro. Ilia tiel-nomata instru-iteco, kompare al tiu Sciado, estas kompleta malveraĵo, kaj ilia tuta kompreno estas nenio, krom frapanta erara. Ne, kion ajn proklamus tiuj Minejoj de la dia Saĝeco kaj Trezorejoj de la eterna sciado, tio estas vero, kaj nenio alia ol vero. La diro: »La sciado estas unu punkto, kiun malsaĝuloj multobligis« estas pruvo por Nia argumento, kaj la tradicio: »La sciado estas lumo, kiun Dio verŝas en la koron en kiu Li volas« konfirmas Nian parolon.

¹⁵³Korano 2:189

¹⁵⁴Korano 17:85

202. Ĉar ili ne komprenis la signifon de la sciado kaj nomis per tiu ĉi nomo imagojn, kiujn kreis ilia propra fantazio kaj kiuj devenas de enkorpigita ignoreco, tial ili suferigis al la Fonto de la Sciado tion, kion vi aŭdis kaj vidis.

203. Ekzemple unu homo,¹⁵⁵ konata pro sia instruiteco kaj klereco, kaj konsideranta sin mem unu el la ĉefementaj gvidantoj de sia popolo, ĉikanis kaj malaltigis en sia libro ĉiujn proklamantojn de la vera instruiteco. Tion ĉi tre klare evidentigis liaj malkaŝaj frazoj, same kiel aludoj, trovantaj sin en lia libro. Ĉar Ni ofte aŭdis pri li, Ni decidis tralegi kelkajn el liaj verkoj. Kvankam Ni neniam inklinis legi skribaĵojn de aliaj, tam, ĉar kelkaj personoj faris al Ni demandojn koncerne Lin, Ni sentis, ke estas nepre konatiĝi kun lia libro, por ke Ni povu respondi al Niaj demandantoj kun scio kaj kompreno. Liaj verkoj en la araba lingvo ne estis tamen riceveblaj, ĝis unu tagon iu homo informis Nin, ke unu el liaj ellaboraĵoj, titolita Irshádu'l-'Avám¹⁵⁶, estas trovebla en tiu ĉi urbo. Tiu ĉi titolo sentigis al Ni la odoron de malmolesteco kaj vanteco, ĉar li konsideris sin instruitulo kaj rigardis la reston de la homoj kiel ignorulojn. Lian valoron fakte konigis la titolo mem, kiun li elektis por sia libro. Evidente estis, ke ĝia aŭtoro iris la vojon de egoismo kaj deziroj, kaj erarvadis en la dezerto de ignoreco kaj malsaĝeco. Li ŝajnis esti forgesinta la bona konatan tradicion, kiu diras: »Sciado estas ĉio, kio estas sciebla, kaj potenco kaj povo, la tuta kreaĵaro.« Malgraŭ tio Ni havigis al Ni tiun libron kaj lasis ĝin ĉe Ni dum kelkaj tagoj. Kredeble Ni trarigardis ĝin dufoje. La duan fojon Ni

¹⁵⁵Hájí Mírzá Karím Khán

¹⁵⁶«Gvidilo por ignoruloj»

trafis hazarde la historion pri la »Mi'ráj«¹⁵⁷ de Mahometo, pri kiu estis dirite: »Se ne por Vi, Mi ne estus kreinta la sferojn.« Ni konstatis, ke li citis ĉirkaŭ dudek aŭ pli da sciencoj, kiujn li konsideris kiel esencajn por la kompreno de la mistero de la »Mi'ráj«. Ni konjektis, ke, laŭ liaj asertoj, homo neniam povas atingi la ĝustan komprenon de tiu supertera kaj alta afero, se li ne estas profunda konanto de ĉiuj tiuj sciencoj. Inter la nomitaj sciencoj estis la scienco pri metafizikaj abstraktaĵoj, pri alĥemio, kaj natura magio. Tiajn vanajn kaj forgesindajn sciencojn tiu homo konsideris kiel ĉefpostulojn de la kompreno de la sanktaj kaj eternaj misteroj de la dia sciado.

204. Dio favorema! Tia estas la mezuro de lia kompreno. Kaj tamen vidu, kiajn amasojn da ĉikanoj kaj kalumnioj li ĵetis kontraŭ tiujn Enkorpigojn de la senlima dia sciado! Kiel prava kaj vera estas la diro: »Ĉu vi priĵetas per kalumnioj la vizaĝojn de Tiuj, kiujn la sola vera Dio faris Gardantoj de la trezoroj de Sia sepa sfero?« Nek unu komprenema koro aŭ menso inter la saĝuloj kaj instruituloj atentis tiujn ĉi absurdajn asertojn. Tamen kiel klare kaj evidente estas al ĉiu juĝokapabla koro, ke ĉi tiu tiel-nomata instruiteco estas kaj ĉiam estis malaprobata de Tiu, kiu estas la sola vera Dio. Kiel oni povas rigardi la konadon de tiuj sciencoj, tiel malŝatindaj antaŭ la okuloj de la veraj saĝuloj, kiel nepran kondiĉon de la kompreno de la misteroj de la »Mi'ráj«, dum la Sinjoro de la »Mi'ráj« mem neniam okupis sian menson per unu sola litero de tiuj limhavaj kaj malkleraj instruoj, kaj neniam makulis sian radiantan koron per iu el tiuj fantaziaj iluzioj? Kiel vere Li diris: »La tuta homa instruiteco

¹⁵⁷Supreniro

migras sur lama aseno, dum la Vero, rajdante sur vento, kuras sagrapide tra la spaco.« Je la justa Dio! Kiu deziras esplori la misteron de tiu »Mi'ráj,« kaj soifas guton el tiu oceano, se lia koro jam estas makulita per la polvo de tiuj instruoj, devas nepre senpolvigi kaj purigi ĝin, antaŭ ol povos en ĝi respuguliĝi la lumo de tiu mistero.

205. En tiu ĉi tago tiuj, kiu banas sin profunde en la oceano de la pratempa sciado kaj loĝas en la arkeo de la dia saĝeco, malpermesas la la homoj la studadon de tiuj vanaj sciencoj. Iliaj brilantaj brustoj estas, glor' al Dio, puraj de ĉiaj postsignoj de tiuj instruoj kaj altaj super tiaj plorindaj vualoj. Ili konsumigis per la fajro de amo de la Amato tiun plej densan el ĉiuj vualoj, ĝin, pri kiu parolas la diraĵo: »La plej plorinda el ĉiuj vualoj estas la vualo de la scienco«. Sur ĝiaj cindroj Ili starigis tabernaklon de la dia sciado. Ili bruligis – glor' al Dio – la »vualojn de la gloro« per la fajro de la beleco de la Plejamato. Ili forpelis el la homa koro ĉion krom Tiu, kiu estas la Desirato de la mondo, kaj Ili fieras pro tio. Ili kroĉiĝas al neniuj sciado krom Lia sciado, kaj deziras en niaj koroj nenion, ekster la fulmradijaj brilegoj de Lia lumo.

206. Ni estis treege surprizitaj rimarkinte, ke lia sola celo estis komprenigi al la homoj, ke li konas ĉiujn tiujn sciencojn. Kaj tamen, Mi ĵuras je Dio, ke neniuj spiro, blovanta de la herbejoj de la dia sciado, portiĝis iam al lia animo, kaj ke neniam li solvis unu nuran misteron de la pratempa saĝo. Plie, se la signifo de la Sciado estus iam konigita al li, granda konfuzo ekkaptus lian koron, kaj lia tuta animo estus ekskuita. Malgraŭ tiuj malgrandanimaj kaj sensencaj asertoj vidu tamen, kiel eksterordinaran

altecon atingis liaj pretendoj!

207. Favorema Dio! Kiel granda estas Nia miro pro la homoj, kiuj ariĝis ĉirkaŭ lia persono kaj deklaris sin liaj sekvantoj! Kontentaj pro pasema polvo, tiuj homoj turnis al ĝi siajn vizaĝojn kaj lasis post sia dorso Tiun, kiu estas la Sinjoro de Sinjoroj. Kontentiĝinte per la grakado de korniko kaj enamiĝinte je la vizaĝo de korve, ili forlasis la melodion de najtingalo kaj la ĉarmon de rozo. Kiajn neesprimeblajn malveraĵojn malkovris la Ni la legado de tiu pretendema libro! Ili estas tro malindaj, ke iu plumi ilin priskribu, kaj tro malaltaj por ies momenta atento. Se tamen troviĝus provŝtono, tuj ĝi distingus veron de malvero, lumon de mallumo kaj sunon de ombro.

208. Inter la sciencoj, kiujn proklamis tiu pretendulo, estas la alĥemio. Ni dezirus, ke iu reĝo aŭ eminenta potenculo alvoku lin transkonduki tiun ĉi sciencon el la sfero de fantazio sur la kampon de fakto, kaj el la regiono de nura pretendado en tiun de realigo. Ni dezirus, ke ĉi tiu neinstruita kaj humila Servanto, kiu neniam voĉis pretendon al tiaj aferoj, nek konsideris ilin kriterio de la vera scienco, entreprenu la saman ???on, por ke tiamaniere la vero estu ekkonita kaj distingita de malvero. Sed kia estus la profito de tio! Ĉio, kion povis oferi al Ni ĉi tiu generacio, estis vundoj de ĝiaj sagoj, kaj la sola kaliko, kiun ĝi almetis al Niaj lipoj, estis kaliko de venemo. Sur Nia kelo Ni havas ankoraŭ la postsignojn de ĉenoj, kaj sur Nia korpo gravuritaj estas pruvoj de senkompata krueleco.

209. Koncerne la instruitecon de tiu homo, lian ignorecon, komprenadon kaj kredon, rigardu, kio estis dirita en la Libro,

kiu ĉion entenas: »Vere, la arbo Zaqqúm¹⁵⁸ estos nutraĵo de Athím^[Pekulo].« [Korano 44:43-44] Plue sekvas kelkaj versoj, kaj poste Li diras: »Gustumu ĝin, ĉar vera vi estas potenca Karim!«¹⁵⁹ Konsideru, kiel klare li estis priskribita en la senerara Libro de Dio! Plie, tiu home, ŝajnigante humilecon, nomis sin mem en sia libro »athím servanto«: »Athím« en la Libro de Dio, potenca inter la simpla ŝajaro, »Karim« laŭ la nomo!

210. Pensu pri tiu ĉi benita verso, por ke la signifo de la vortoj; »Ne ekzistas verdaĵo aŭ sekaĵo, nepriskribita en la senerara Libro,«¹⁶⁰ estu gravurita sur la tabuleto de via koro. Malgraŭ tio amaso da homoj konsideras lin sia gvidanto. Ili forlasis la Moseon de sciado, kaj aliĝis al la Samiri¹⁶¹ de nesciado. Ili forturnis la okulojn de la Tag-Stelo de l' Vero, kiu brilas en la dia kaj eterna ĉielo, kaj elmontris kompletan ignoremon al ĝia brilego.

211. Ho mia frato! Dia minejo sole povas aperigi la gemojn de la dia sciado, kaj la aromo de la mistika Floro estas flarebla nur en la ideala Ĝardeno, kaj la lilioj de la pratempa naĝo povas flori nenie, krom en la urbo de senmakula koro. »Sur riĉa grundo ĝiaj semaĵoj kreskas abunde, laŭ pa permeso de ĝia Sinjoro kaj en la grundo, kiu estas malhona, apenaŭ avare ili kreskas.«¹⁶²

¹⁵⁸Inferna arbo

¹⁵⁹Korano 44:49

¹⁶⁰Korano 6:59

¹⁶¹Magiisto, kiu vivis samtempe kun Moseo

¹⁶²Korano 7:57

212. Ĉar estis jam klare elmontrite, ke nur tiuj, kiuj havas la konon de la diaj misteroj, povas kompreni la melodiojn, kantatajn de la Ĉiela Birdo, tial estas ĉies devo serĉi klarigon pri la malfacilaĵoj de la Kredo kaj pri la malklaraj aludoj en la paroloj de la Tagiĝoj de Sankteco ĉe tiuj, kies koroj estas lumigitaj, kaj ĉe la Terzorejoj de la diaj misteroj. Tiamaniere tiuj misteroj estos solvitaj ne per la helpo de akirita scienco, sed sole dank al la subteno de Dio kaj verŝoj de Lia favoro. »Demandu do tiujn, al kiuj konfidita estas la gardado de la Sanktaj Skribaĵoj, se vi ĝin ne scias.«¹⁶³

213. Sed, ho mia frato, kiam vera serĉanto decidis komenci la paŝojn de serĉado sur la vojo, kondukanta al la konado de la Praeternulo, li devas antaŭ ĉio, senmakuligi kaj purigi sian koron, kiu estas la loko de la malkaŝiĝo de la internaj misteroj de Dio, de la malheliga polvo de ĉia akirita sciado kaj de la sugestoj de la enkorpiĝoj de satana fantazio. Li devas purigi de ĉia makulo sian bruston, kiu estas sanktejo de la eterna amo de la Amato, kaj sanktolevi sian animon super ĉion, kio rilatas al akvo kaj argilo, super ĉiajn ombrajn kaj efemerajn inklinojn de la koro. Li devas tiel purigi sian koron, ke restu tie neniam postsigno ĉu de amo aŭ de malamo, ke tiu amo ne instigu lin blinda al eraro, aŭ tiu malamo ne forpelu lin de la vero. Vi vidas en tiu ĉi tago, kiel plejmulte da homoj, kaŭze de tia amo kaj malamo, restis sen la ekvido de la senmorta Vizaĝo, flankigis for de la Enkorpiĝoj de la diaj misteroj, kaj senvide vagas tra la sovaĝejo de forgeso kaj eraro. La serĉanto devas konfidi sin ĉiam al Dio, li devas forlasi la popolojn de la tero, malligi sian

¹⁶³Korano 16:43

koron de la mondo de polvo kaj alligi ĝin al Tiu, kiu estas la Sinjoro de Sinjoroj. Li devas neniam klopido altigi sin super iun ajn, li devas forlavi de la tabuleto de sia koro ĉian postsignon de malhumileco kaj vanteco, li devas iri la vojon de pacienco kaj sinrezigno, observi silenton kaj deteni sin de senbezona parolado. Ĉar la lango estas brula fajro, kaj superflua parolo estas mortiga veneno. La materiala fajro konsumas la korpon, dum la fajro de la lango detruas la koron kaj la animon. La forto de la unua daŭras nur dum kelka tempo, dum la efiko de la lasta postrestas dum jarcento.

214. La serĉanto devas ankaŭ konsideri klaĉadon kiel gravan pekon, kaj teni sin for de ĝia kampo, ĉar klaĉado estingas la lumon de la koro, kaj ĝi estingas la vivon de la animo. Li devas kontentiĝadi per malmulto kaj esti libera de ĉiu supermesura deziro. Li devas alte taksi la rilatojn kun tiuj, kiuj rezignis la mondon, kaj rigardi evitadon de fanfaronemaj kaj mondamaĵ personoj kiel ŝatindan bonon. Je ĉiu tagiĝo li devas preĝoturnadi sin al Dio kaj per la tuta animo persisti en la serĉado de la Amato. Li devas konsumigi ĉiun spiteman penson per la flamo de la rememoro pri Li kaj kun la rapiceco de fulmo pasi preter ĉiu ekster Li. Li devas helpadi senhavulojn kaj neniam rifuzi sian bonvolon al malriĉuloj. Li devas elmontradi afablecon al bestoj, kiom do pli al siaj proksimuloj, al tiuj, kiuj estas dotitaj por la parolpovo. Li ne devas heziti oferi sian vivon por la Amato, nek lasi deturni sin de la Vero per homa kritikado. Li ne devas deziri por aliaj tion, kion li ne deziras por si mem, nek promesi tion, kion li ne plenumos. Per sia tuta koro la serĉanto devas eviti rilatojn kun malbonfarantoj, kaj preĝi indulgon por

iliaj pekoj. Li devas pardoni pekulon kaj neniam malestimi lian malaltan staton, ĉar neniu scias, kia estos lia propra fino. Kiel ofte okazis, ke pekulo en sia mortohoro estis favorita per la esenco de kredo kaj, trinkinte la vinon de senmorteco, direktis sian flugon al la ĉiela Anaro. Kaj kiel ofte okazis, ke pia kredanto tiel ŝanĝiĝis en la horo de sia animliberiĝo, ke li falis en la plejfundan fajron. Eldirante tiujn ĉi konvinkajn kaj signifajn vortojn Ni celas memorigi al la serĉanto, ke li devas rigardi ĉion krom Dio kiel paseman kaj konsideri ĉion ekster Li, la Objekto de ĉia adorado, kiel neniaĵon.

215. Tiuj ĉi kvalitoj apartenas al la ecaro de altanimuloj kaj prezentas la karakterizaĵojn de spirituloj. Ili estis jam menciitaj ĉe la kondiĉoj de la migrantoj, kiuj iras la Vojon de la Positiva Sciado. Kiam korpura migranto kaj sincera serĉanto estas plenuminta tiujn ĉi esencajn kondiĉojn, tiam, kaj nur tiam, li povas esti nomata vera serĉanto. Kiam li estas plenuminta la kondiĉojn, kiuj prezentas la sencon de la verso: »Kiu serĉas Nin animstreĉe«¹⁶⁴ li ĝuos la benon, entenatan en la vortoj: »Tiun Ni certe gvidos sur Nian vojon.«¹⁶⁵

216. Nur kiam la lampo de serĉado, de fervora penado, de sopirplena deziro, de pasia sindono, de arda amo, de ravo, de ekstazo estas ekbruligita en la koro de la serĉanto, kaj la ventoj de Lia amfavo estas blovitaj sur lian animon, nur tiam dispelita estos la mallumo de eraro, disigitaj estos la nebuloj de dubo jak senfido kaj la lumoj de sciado jak certeco ĉirkaŭvolvos

¹⁶⁴Korano 29:69

¹⁶⁵Korano 29:69

lian animon. En tiu horo la mistika Heroldo, portanta la ĝojan novaĵon de la Spirito, elbrilos el la Urbo de Dio, lumradie kiel tagiĝo, kaj per la trumpetvoko de la sciado vekos la koron, la animon kaj la spiriton el la dormo de malzorgemo. Tiam la multriĉaj malavaraĵoj kaj verŝopluvanta favoro de la sankta kaj eterna Spirito donos tian novan vivon al la serĉanto, ke li trovos sin dotita per nova okulo. nova orelo, nova koro kaj nova menso. Tiam li meditados pri la diversaj signoj de la universo kaj penetros la kaŝitajn misterojn de la animo. Rigardante per la okulo de Dio, li ekvidos en ĉiu atomo pardonon, kiu kondukos lin al la stato de absoluta certeco. Li malkovrados en ĉio la misterojn de dia Sinelmonro kaj la pruvojn de eterna Revelacio.

217. Mi ĵuras je Dio! Se tiu, kiu paŝas la vojon de gvidado kaj deziras supreniri la altaĵojn de justeco atingos tiun ĉi gloran kaj superegan staton, li flarsentos trans la distanco de mil majloj la aromojn de Dio kaj vidos la brilegan matenlumon de la dia gvidado, leviĝantan super la tagiĝlokon de ĉiuj aĵoj. Ĉiu aĵo, kiel ajn malgranda, estos por li revelacio, kondukanta lin al lia Amato, la Celo de lia serĉado. Tiel granda estos la penetremo de tiu serĉanto, ke li distingados veron de malvero, kiel li distingas la sunon de ambro. Se en la plej malproksimaj anguloj de la Oriento portiĝos la dolĉaj aromoj de Dio, li certe rekonos kaj flarspiros ilian odoron, se li eĉ estus loĝanta ĉe la plej malproksimaj limoj de la Okcidento. Simile li ankau klara distingados ĉiujn signojn de Dio - Liajn mirindajn parolojn, Liajn grandajn verkojn kaj potencajn farojn - de la faraĵoj, vortoj kaj manicroj de homoj, kiel juvelisto, rekonanta la diferencon inter gemo kaj ŝtono, aŭ homo, kiu distingas printempon de aŭtuno kaj varmon

de malvarmo. Kiam la fluejo de la homa animo estos purigita de ĉiu mondaj kaj barantaj korinklinoj, ĝi nepre eksentos la spiron de la Amato trans senmezuraj distancoj, jak, gvidante de ĝia aromo, atingos kaj eniros la Urbon de Certeco. Tie li malkovros la mirindaĵojn de Lia pratempa saĝo, kaj komprenos ĉiujn kaŝitajn instruojn el la folibruado de la Arbo, kiu floras en tiu Urbo. Tiel per la interna, kiel per la fizika orelo li aŭdos el ĝia polvo himnojn de gloro kaj laŭdkantojn, leviĝantajn al la Sinjoro de Sinjoroj, kaj per la interna vido li malkovros la misterojn de la »reveno« kaj »renaskiĝo«. Kiel neesprimeble gloraj estas la signoj, revelacioj kaj briloj, kiujn Li, la Reĝo de nomoj kaj atributoj, destinis por tiu Urbo. La atingo de tiu Urbo kvietigas soifon sen akvo akj ekbruligas amon al Dio sen fajro. En ĉiu herbeto kaŝitaj estas misteroj de neesplorebla saĝeco, kaj sur ĉiu rozarbusto miriado da najtingaloj sonigas en ravoplana ekstazo sian melodion. Ĉiaj mirindaj tulipoj malkaŝas la misteron de la Brulanta Arbueto, kaj ĝiaj dolĉaj aromoj de sankteco spiras la adoron de la Mesia Spirito. Ĝi oferas riĉaĵojn sen oro kaj donas senmortecon sen morto. En ĉiu folieto trezortenataj estas nepriskribeblaj ĝojoj kaj en ĉiu ĉambro kuŝas kaŝite sennobraj misteroj.

218. Tiu, kiuj brave malavaras penojn, serĉante la volon de Dio, foje forlasinte ĉion krom Li, estos tiel korligintaj kaj unuigintaj kun tiu Urbo, ke momenta foresto estos por ili nepensebla. Ili aŭdas senerarajn argumentojn de la Hiacinto de tiu anaro kaj plej certajn atestojn ricevos de la beleco de ĝia Rozo kaj de la melodio de ĝia Najtingalo. Unu fojon en ĉiu miljaro proksimume tiu Urbo estas renovigita kaj rebeligita.

219. Tial, ho mia amiko, decas al Ni streĉi ekstreme la penojn, por atingi tiun Urbon, kaj per la favoro de Dio kaj Lia afa-bleco, disŝiri la »vualojn de la gloro«, por ke tiel, kun nefleksebla firmeco, ni oferu niajn velkantajn animojn sur la vojo de la Nova Amato. Ni devas kun larmoplenaj okuloj fervore kaj insiste, petigi Lin, ke Li donu al ni la benon de tiu favoro. Tiu Urbo estas la vorto de Dio, revelaciita en ĉiu Epoko. En la tago de Moseo ĝi estis la Kvinlibro, en la Tagoj de Jesuo la Evangelio, en la tagoj de Mahometa la Diosendito la Korano, en ĉi tiu tago la Bayán, kaj en la Epoko de Tiu, kiun Dio aperigos - Lia propra Libro, Libro, al kiu ĉiuj Libroj de la antaŭaj Epokoj devas esti turnitaj, kiu staras inter ili ĉiuj kiel la plej altsignifa kaj superega. Tiuj Urboj estas abunda provizitaj per la spirita nutraĵo, kaj sanktaj ĝojoj estas tie pretigitaj. La nutraĵo, kiun ili donas, estas la ĉiela pano, kaj la Spirito, kiun ili inspiras, estas la senperea beno de Dio. Al korpuraj animoj ili oferas la donon de Unueco, riĉigas malriĉulojn kaj prezentas kalikon da sciado al tiuj, kiuj vegas en la savaĝejo de nesciado. La tuta gvidado, benoj, instruiteco, kompreno, kredo kaj certeco, kiujn ricevas ĉiuj en la ĉielo kaj sur la tero, estas kaŝitaj kaj trezortenataj en tiuj Urboj.

220. Tiel la Korano estis neskuebla fortikaĵo por la popolo de Mahometo. En Liaj tagoj kiu ajn ĝin eniris, estis ŝirmita kontraŭ satanaj atakoj, minaco de sagoj, animmordantaj duboj kaj blasfemaj flustroj de malamiko. Estis al li ankaŭ donita regalaĵo el la eternaj kaj ŝatindaj fruktoj la fruktoj de saĝeco, de la dia Arbo. Donita estis al li la klar-klara akvo el la rivero de la sciado por trinki kaj la vino de la misteroj de la dia Unueco

por gustumi.

221. Ĉion, kio estis bezona al la homoj rilate la Revelacion de Mahometo kaj Liajn leĝojn, oni trovas revelaciitan kaj malkaŝitan en tiu Riĉván de l' brilladia gloro. Tiu Libro estas ĉiamdaŭra atesto por sia popolo post Mahometo, ĉar ĝiaj decidoj estas nedisputeblaj kaj ĝiaj promesoj nepre plenumotaj. Al ĉiuj estis ordonite obei la instruojn de tiu Libro ĝis la »ses-deka jaro«¹⁶⁶ – la alvenjaro de la mirinda Malkaŝanto de Dio. Tiu Libro estas la Libro, kiu senerare gvidas la serĉanton en la Riĉvánon de la Dia Apudesto, kaj tiun, kiu forlasis sian landon kaj paŝas la vojon de serĉantoj, ĝi enkondukas en la Tabernaklon de la eterna unio. Ĝia gvidado neniam povas erari, ĝian ateston neniu atesto povas superi. Neniuj aliaj tradicioj, neniuj aliaj libroj aŭ skribaĵoj posedas tian distingitecon, ĉar tiel la tradicioj, kiel tiuj, kiuj ilin rakontis, ĉerpas konfirmon kaj pruvon sole el la teksto de tiu Libro. Krome, la tradiciaj mem diferencas inter si en bedaŭrinda maniero kaj iliaj malklaraĵoj estas multaj kaj diversaj.

222. Mahometo mem, kiam proksimeĝis la fino de Lia misio, diris la jenaĵn vortoj: »Vere, Mi lasas inter vi Miajn du gravajn atestojn: la Libron de Dio kaj Mian familion.« Kvankam multaj tradicioj estis eldiritaj de tiu Fonto de Profeteco kaj Minejo de la dia Gvidado, tamen Li menciis nur tiun Libron, tiamaniere deklarante ĝin la plej povorĉa gvidilo kaj la plej certa atesto por la serĉanto, vojmontrilo por la homoj ĝis la Tago de Renaskiĝo.

223. Kun nekonfuza vido, kun pura koro kaj sanktolevita spir-

¹⁶⁶La jaro 1260 A.H., la faro de la Deklaracio de Báb

ito konsideru atente, kion Dio difinis kiel ateston de gvidado por Sia popolo en Sia Libro, kies aŭtentikecon konfesas same personoj altaj, kiel malaltaj. Je tiu atesto ni ambaŭ devas teni nin, same kiel ĉiuj popoloj de la mondo, por ke dank' al ĝia lumo ni povu distingi kaj rekoni veron de malvero kaj gvidadon de eraro. Ĉar Mahometo limigis Siajn atestojn al Sia Libro kaj al Sia familio, kaj la lasta formortis, restas nur Lia Libro kiel Lia sola atesto inter la homoj.

224. En la komenco de Sia Libro Li diris: »Alif, Lám. Mím. Nenia dubo estas koncerne tiun ĉi Libron. Ĝi estas gvidilo por tiuj, kiuj timas Dion.«¹⁶⁷ En la disigitaj literoj de la Korano kaŝitaj estas la misteroj de la dia Esenco, kaj en ĝiaj konkoj trezortenataj estas la perloj de Lia Unueco. Pro manko de loko ĉi-momente Ni ne povas prikonsideri ilin pli longe. Ekstere ili signifas Mahometon mem, kiun Dio alparolis, dirante: »Ho Mahometo, nenia dubo nek malcerteco estas koncerne tiun ĉi Libron, kiu estas sendite teren el la ĉielo de la dia Unueco. En ĝi estas gvidado por tiuj, kiuj timas Dion« Konsideru kiel Li destinis kaj difinis tiun ĝuste Libron, la Koranon, kiel gvidilon por ĉiuj en la ĉielo kaj sur la tero. Li, la dia Estaĵo kaj nekonata Esenco, Li mem atestis, ke tiu Libro estas, ekster ĉia dubo kaj malcerteco, gvidilo por la tuta homaro ĝis la Tago de Renaskiĝo. Kaj nun Ni demandas, ĉu estas juste, ke la homoj rigardu dubeme kaj senfide tiun plej signifan Ateston, kies dian originon Dio mem proklamis kaj deklaris ĝin enkorpiĝo de la vero? Ĉu estas juste, ke ili forturnu sin de tio, kion Li difinis kiel la plej superan gvidilon por atingi la plej altajn pintojn de la sciado, kaj

¹⁶⁷Korano 2:1

serĉu ion alian, ol tiu Libro? Kiel ili povas permesi, ke absurdaj kaj malsaĝaj diraĵoj de homoj ĵetu la semojn de malfido en iliajn mensojn? Kiel ili povas ankoraŭ vane disputi, ke iu persono parolis tiel aŭ alie, aŭ ke iu afero ne realiĝis? Se estus imagebla io kron la Libro de Dio, kio povus montriĝi pli potenca gvidilo kaj pli certa vojontrilo por la homaro, ĉu Li ne revelacius tion en tiu verso?

225. Estas nia devo ne flankeniĝi de la nerizistebla konmando de Dio kaj firma decido, revela*ita en la supre citita verso. Ni devas rekonii la sanktan kaj mirindan Skribaĵon, ĉar ne rekonante ĝin, ni ne rekonas la veron de tiu benita verso. Ĉar estas evidente, ke iu ne rekonis la veron de la Korano, tiu ne rekonis fakte la veron de la antaŭaj Skribaĵoj. Tiu ĉi simple sekvas klare el tiu verso. Se Ni volus klarigi ĝian internan sencon kaj disvolvi ĝiajn kaŝitajn misterojn, la eterneco neniel sufiĉus por elĉerpi ilian signifon, nek la universo kapablus ilin aŭskulti! Dio atestas la verecon de nia diro!

226. En alia fragmento Li ankaŭ diris: »Kaj se vi dubas pri tio, kion Ni sendis malsupren al Nia Servanto, tiam verku sumilan suraon kaj alvoku viajn atestantojn, krom Dio, se vi estas homoj veramaj.«¹⁶⁸ Kiel alta estas la rango kaj kiel glora estas la perfekteco de tiuj versoj, kiujn Li deklaris Sia plej certa atesto, Sia nerefutebla pruvo, elmontraĵo de Sia ĉiorega povo kaj revelacio de la potenco de Sia Volo! Li, la dia Reĝo, proklamis la sendisputan aŭtoritaton de la versoj de Sia Libro super ĉio, kio atestas pri Lia vero. Ĉar kompare kun ĉiuj aliaj pruvoj kaj signoj tiuj

¹⁶⁸Korano 2:23

revelaciitaj de Dio versoj brilas kiel la suni, dum ĉiuj aliaj estas kiel steloj. Por la popoloj de la mondo ili estas eterna atesto, nerefutebla pruvo, brilanta lumo de la ideala Reĝo. Ilia brilo estas senkompara, ilian perfektecon nenio povas superi. Ili estas trezorejoj de la diaj perloj kaj gardejoj de la diaj misteroj. Ili estas nerompebla ligilo, fortika ŝnuro, ‘Urvatu’l-Vuthqá, neestingebla lumo. Per ili fluas la rivero de la dia sciado kaj brulas la fajro de Lia pratempa kaj perfekta saĝeco. Tio estas fajro, kiu samtempe ekbruligas la flamon de amo en la brusto de fidelulo, kaj estigas la malvarmon de malaltento en la koro de malamiko.

227. Ho frato! Ne decas al ni forĵeti la ordonon de Dio, sed kontraŭe, ni devas akcepti ĝin kaj subiĝi al tio, kion Li fiksas kiel Sian dian Ateston. Tiu ĉi verso estas parolo tro grava kaj signifa, ke tiu ĉi affliktito ĝin klarigu. Dio parolas veron kaj montras la vojon. Vere, Li estas superega super Sia tuta popolo; Li estas Potenculo, Bonfaranto.

228. Simile, Li diris ankaŭ: »Jen estas la versoj de Dio: verifidele Ni recitas ilin al Vi. Sed je kia revelacio ili kredos, ne ili malakceptas Dion kaj Liajn versojn?«¹⁶⁹ Se vi komprenos la signifon, kaŝitan en ĉi tiu verso, vi vidos la veron, ke neniu revelacio pli granda, ol pere de la Profetoj de Dio, estis iam farita, kaj neniu atesto pli potenca, ol iliaj revelaci-donitaj versoj, aperis iam sur la tero. Ne, tiun ĉi ateston neniu alia atesto povus iam superi, escepte de tio, kion la Sinjoro de via Dio volas.

229. En alia fragmento Li diras: “Ve al ĉiu mensoganta pekulo, kiu aŭdas la versojn de Dio, recitatajn antaŭ li, kaj poste, kvazaŭ

¹⁶⁹Korano 45:5

li ilin ne aŭdus, persistas en fiera aroganteco! Avertu lin pri dolora puno.«¹⁷⁰ La signifo, kaŝita en tiu ĉi verso, sufiĉas sola al ĉiuj en la ĉielo kaj sur la tero, se la homoj prikonsiderus la versojn de sia Sinjoro. Ĉar vi aŭdas, kiel en tiu ĉi tago la homoj ignoras arogante la dia-revelaciitajn versojn, kvazaŭ tio estus la lasta afero en la mondo. Kaj tamen nenio pli granda, ol tiuj ĉi versoj, iam aperis, nek estos aperigita en la mondo! Diru al ili: »Ho senatenta popolo! Vi ripetas la samon, kion diris viaj patroj en la pasintaj tagoj. Kiajn fruktojn ili kolektis de la arbo de sia nekredemo, tiajn samajn kolektos vi ankaŭ. Baldaŭ vi estos forprenitaj al viaj patroj, kaj kune kun ili vi loĝados en infera fajro. Malbona restejo ĝi estas, la restejo de la tiranaro!«

230. En ankoraŭ alia fragmento Li diras: »Kaj kiam li estas ekkoninta iun el Niaj versoj, li ridindigas ilin. Malhonora puno atendas ilin!«¹⁷¹ Mokante, la homoj diris: »Plenumu alian miraklon kaj donu al ni alian signon!« Unu diris: »Faligu sur nin parton de la ĉielo,«¹⁷² kaj alia: »Se ĝi devas esti efektiva verpruvo flanke de vi, pluvigu sur nin ŝtonojn el la ĉielo.«¹⁷³ Same kiel la popolo de Izrael en la tempo de Moseo forvendis la panon el ĉielo por la malvaloraĵoj de la tero, ankaŭ tiuj ĉi homoj penis interŝanĝi la die-revelaciitajn versojn kontraŭ siaj malpuraj, malnoblaj kaj vantaj deziroj. Simile vi vidas en tiu ĉi tago, ke kvankam la spirita nutraĵo venis malsupren el la ĉielo de la dia favoremo kaj estis pluvigita el la nuboj de Lia amemo, kaj

¹⁷⁰Korano 45:6

¹⁷¹Korano 45:8

¹⁷²Korano 26:187

¹⁷³Korano 8:32

kvankam la maroj de vivo ondas, laŭ la ordono de la Sinjoro de ĉiuj estaĵoj, en la Riĉváno de la koro, tamen la homoj, mordavidaj kiel hundoj, ariĝas ĉirkaŭ mortintaĵo kaj kontentiĝas per la senmova akvo de sala lago. Dio favorema! Kiel stranga estas la konduto de tiuj ĉi homoj! Ili petegas lamente pri gvidado, kvankam la standardoj de Tiu, kiu gvidas ĉiujn estaĵojn estas jam levitaj. Ili kroĉas sin al la malklaraj malsimplaĵoj de sciado, dum Tiu, kiu estas la Esenco de ĉia sciado, brilas, kiel la suno. Ili vidas la sunon per la propraj okuloj, kaj tamen ili demandas tiun brilradian astron pri la pruvo de ĝia lumo. Ili vidas printempajn pluvojn, falantajn sur ilin, kaj tamen ili serĉas pruvojn de tiu malavaro. La pruvo de la suno estas ĝia lumo, kiu brilas kaj ĉirkaŭlumigas ĉiujn estaĵojn. La pruvo de la pluvo estas ĝia malavaro, kiu renovigas la mondon kaj vestas ĝin per la mantelo de vivo. Vere blindulo povas rimarki el la suno nenion, krom ĝia vargego, kaj seka grundo ricevas nenion el la pluvoj de favoro. »Ne miru, se en la Korano nekredanto vidas nenion, krom la litersignoj, ĉar en la suno blindulo trovas nenion, krom varmego.«

231. En alia fragmento Li diras: ¹⁷⁴«Kaj kiam Diaj klaraj versoj estas recititaj al ili, ilia sola argumento estas la respondo: «Redonu al ni niajn patrojn se vi diras veron.» Vidu, kiel malsaĝajn pruvoj ili postulis de tiuj Enkorpigoj de l' ĉiotuŝa favoro! Ili mokis tiujn versojn, kies unu sola litero estas pli granda, ol la kreo de la ĉielo kaj tero, kaj kiuj per la spirito de kredo levis la mortintojn, entombigitajn en la valo de egoismo kaj deziro, kaj ili laŭtkriis, dirante: »Elirigu niajn patrojn el iliaj tomboj.« Tia

¹⁷⁴Korano 45:24

estis la obstineco kaj fiereco de tiuj homoj. Ĉiu el tiuj versoj estas por ĉiuj popoloj de mondo senerara atesto kaj glora pruvo de Lia vero. Ĉiu el ili estas vere sufiĉa por la tuta homaro, se vi meditos pri la versoj de Dio. En la supre-menciita verso mem kaŝitaj estas perloj de misteroj. Kia ajn estus la malsano, la kuraco, kiun ili prezentas, neniam povas resti senefika.

232. Ne atentu la vanan argumentadon de tiuj, kiuj asertas, ke la Libro kaj ĝiaj versoj neniel povas esti atesto por la popolamaso, ĉar ĝi nek komprenas ilian signifon, nek scias taksi ilian valoron. Kaj tamen la senerara atesto de Dio al la popoloj tiel de la Oriento, kiel de la Okcidento, estas ĝuste la Korano. Se ĝi estus ekster la homa kompreno, kiel ĝi povus esti deklarita kiel universala atesto al ĉiuj? Se ilia argumentado estus prava, tiam de neniu estu postulata koni Dion, nek tio estus necesa, ĉar la kono de la dia Estaĵo ekster-iras la konon de Lia Libro, kaj la popolamazo ne kapablas kompreni ĝin.

233. Tia argumentado estas komplete erara kaj neakceptebla. Ĝi estas inspirita sole de aroganteco kaj fiereco. Ĝia celo estas konduki la homojn for de la Riĉváno de la dia bonplaĉo kaj streĉi la bridon de ilia aŭtoritato super la homoj. Kaj tamen antaŭ la okuloj de Dio tiu popolamaso estas senfine supera kaj pli altspirita ol ĝiaj religiaj gvidantoj, kiuj forturniĝis de la sola vera Dio. La kompreno de Liaj vortoj kaj la kompreno de la paroloj de la Ĉielaj Birdoj neniel dependas de la homa instruiteco. Tio dependas sole de pureco de la koro, senmakuleco de la animo kaj libereco de la spirito. Tio ĉi estas pruvita de tiuj, kiuj en tiu ĉi tago, kankam kontantaj nek unu solan literon de la akceptitaj kriterioj de instruiteco, okupas la plej altajn lokojn de la sciado;

kaj la ĝardeno de iliaj koroj ornamita estas, dank' al la pluvoj de la dia favoro, per la rozoj de saĝeco kaj tulipoj de kompreno. Benitaj estas tiuj, kies koroj estas sinceraĵ, ĉar lumdonacon ili ricevas el la briloj de la granda Tago!

234. Kaj simile Li diris: “Koncerne tiujn, kiuj ne kredas je la versoj de Dio, aŭ ke iam ili Lin renkontos, tiuj pri Mia kompato malesperos kaj tiuj severa puno atendas.»¹⁷⁵ Ankaŭ: »Kaj ili diras, ‘Ĉu ni do forlasu niajn diojn pro freneza poetaĉo?’«¹⁷⁶ La signifo, kaŝita en tiu ĉi verso, estas klara. Jen kiajn rimarkojn ili faris, kiam la versoj estis revelaciitaj. Ili nomis Lin poetaĉo, mokis la versojn de Dio, kaj vokis: »Tiuj ĉi vortoj estas nur paroloj de la antikvuloj!« Ĝi signifas, ke Mahometo kompilis la vortojn, diritajn de tiuj, kiuj vivis en la antaŭaj tempoj, kaj nomis tion Vorto de Dio.

235. Tiel ankaŭ en tiu ĉi tago vi aŭdis kiel la homoj voĉis similajn akuzojn kontraŭ ĉi tiu Malkaŝanto, dirante: »Li kompilis tiujn ĉi vortojn el la vortoj de la prauloj«, aŭ: »Tiuj ĉi vortoj estas falsaj.« Vanaj kaj arogantaj estas iliaj diroj, malalta estas ilia stato kaj kondiĉo!

236. Post la kontraŭparoloj kaj akuzoj, kiujn ili voĉis, kaj kiujn Ni menciis, ili protestis, dirante: »Neniu sendependa Profeto estas aperonta, laŭ nia Sankta Skribaĵo, post Moseo kaj Jesuo, por eksigi la Leĝon de la dia Revelacio. Ne, tiu, kiu aperos, devas nepre plenumi la Leĝon«. Sekve de tio revelaciita estis la jena verso, indikanta ĉiujn diajn temojn kaj atestanta pri la

¹⁷⁵Korano 29:23

¹⁷⁶Korano 37:36

vero, ke la torento de la favoro de la Plejkompatata povas neniam halti: »Kaj Jozefo venis al vi antaŭe kun klaraj signoj, sed vi ne ĉesis dubi la parolojn, kun kiuj Li venis al vi, ĝis kiam, post Lia morto, vi diris: 'Dio neniel aperigos alian Senditon post Li.' Tiel Dio erarigas pekulon kaj dubanton.«¹⁷⁷ Komprenu sekve el tiu ĉi verso kaj sciu kun certeco, ke en ĉiu epoko homoj, kroĉantaj sin al verso de sia Libro, voĉis tiajn sensencajn kaj absurdajn dirojn, argumentante, ke neniu Profeto estas sendota denove al la mondo. Sama estas la sinteno de la kristanaj ekleziuloj, kiuj, starante fikse ĉe la verso de la Evangelio, kiun Ni antaŭe menciis, penis klarigi, ke la Leĝo de la Evangelio neniam estos eksigita, kaj ke neniu sendependa Profeto estos iam sendita al la mondo, escepte Li konfirmos la Leĝon de la Evangelio. Plej multe da homoj suferas la aflikton de tiu sama spirita malsano.

237. Tiel same vi vidas, kiel la popolo de la Korano, simile al la popoloj de la antaŭaj tempoj, lasis la vortojn »Sigelo de la Profetoj« vuali iliajn okulojn. Kaj tamen ili mem atestas la veron de la verso: »Neniu scias la signifon de tio krom Dio kaj tiuj, kiuj firme staras sur la fundamento de la sciado.«¹⁷⁸ Kaj kiam Tiu, kiu staras firme sur la fundamento de ĉia sciado, kiu estas ĝia Patrino, Animo, Sekreto kaj Esenco, anoncis tion, kio estas plej ete kontraŭa al ilia deziro, ili leviĝis furioze kontraŭ lin kaj malakceptis Lin senhonte. Tion ĉi vi jam aŭdis kaj vidis. Tiaj faroj kaj vortoj estis instigantaj sole de la religiaj gvidantoj, kiuj adoras neniun Dion krom sia deziro, kiuj konfesas nenion krom oro, kiuj estas ĉirkaŭvolvitaj per la plej densaj vualoj de

¹⁷⁷Korano 40:34

¹⁷⁸Korano 3:7

instruiteco, kaj kiuj, implikite en ĝia malklareco, vagas en la sovaĝejo de eraro. Kiel klare deklaris la Sinjoro de la ekzisto: »Kion vi pensas? Tiu, kiu faris al si Dion el siaj pasioj, kaj kiun Dio igas erari pro lia sciado, kaj kies orelojn kaj kies koron Li sigelis, kaj sur kies okulojn Li ĵetis vualon – de kiu estos gvidata tia homo, post kiam li malakceptis Dion? Ĉu ĝi ne estas averto por vi?«¹⁷⁹

238. Kvankam la ekstera signifo de la esprimo “Tiu, kiun Dio igas erari pro lia sciado» estis jam elmontrita, tamen al Ni ĝi signifas tiujn ekleziulojn de la epoko, kiuj forturnis sin de Dio, kaj kiuj, kroĉante sin al la propra instruiteco, formita laŭ iliaj propraj imagoj kaj deziroj, malakceptis la sanktan Parolon kaj Revelacion de Dio. »Diru: grandsignifa estas la Parolo, de kiu vi forturniĝas!«¹⁸⁰ Simile ankaŭ Li diris: »Kaj kiam Niaj klaraj versoj estas recitataj al ili, ili diras: ‘Tio ĉi estas nur homo, kiu celas deflankigi vin de la kredo de viaj patroj.’ Kaj ili diras: ‘Ĝi estas nenio krom artifika falsaĵo!’«¹⁸¹

239. Malfermu la orelojn al la sankta Voĉo de Dio kaj atentu Lian dolĉan kaj senmortan melodion. Rigardu, kiel Li avertis solene tiujn, kiuj malakceptis la versojn de Dio, kaj senheredigis tiujn, kiuj neis Liajn sanktajn vortojn. Konsideru, kiel foren la homoj flankiĝis de la Kawthar de la dia Apudesto, kaj kiel bedaŭrinda estis la malfideleco kaj aroganteco de la spiritaj mizeruloj antaŭ la vizaĝo de tiu sankta Belo. Kvankam tiu Esenco de

¹⁷⁹Korano 45:22

¹⁸⁰Korano 38:67

¹⁸¹Korano 34:43

amemo kaj favoremo igis tiujn pereemajn estaĵojn eniri la regionon de senmorteco kaj gvidis tiujn mizerajn animojn al la sankta rivero de riĉeco, tamen kelkaj proklamis Lin »kalumnianto de Dio, la Sinjoro de ĉiuj kreaĵoj«, aliaj akuzis Lin kiel tiun, kiu »detenas la homojn de la vojo de kredo kaj vera religio«, kaj ankoraŭ aliaj deklaris Lin »lunatiko«, k.t.p.

240. Simile ankaŭ vi vidas en tiu ĉi tago, kun kiaj malnoblaj imputoj ili atakis tiun Gemon de Senmorteco, kaj pri kiaj nedireblaj krimoj ili akuzis Tiun, kiu estas la fonto de Pureco. Kvankam en Sia Libro kaj en Siaj sanktaj kaj senmortaj Tabuletoj Dio avertis tiujn, kiuj malakceptas kaj forĵetas la revelaciitajn versojn, kaj kvankam Li anoncis Sian favoron al tiuj, kiuj ilin akceptas, tamen vidu, kiel sennombrajn kalumniojn ili aŭdigis kontraŭ tiuj versoj, kiuj estis senditaj teren el la nova ĉielo de la eterna sankteco de Dio! Tio okazis malgraŭ la fakto, ke neniu okulo vidis egale grandan pluvoverŝon de favoro, nek iu orelo aŭdis pri tia revelacio de amemo. Tia favoro kaj revelacio estis elmontrita, ke la revelaciitaj versoj ŝajnis kvazaŭ printempaj pluvoj, verŝantaj sin el la nuboj de la malavareco de la Plejfavorema. Ĉiu el la Profetoj »dotitaj per konstanteco«, kies alteco kaj gloro brilas, kiel la suno, estis honorita per Libro, kiun ĉiuj vidis, kaj pri kies versoj ili precize certiĝis. Dume la versoj, kiuj pluvis el tiu ĉi ĉielo de la dia malavareco, estis tiel abundaj, ke neniu povis ankoraŭ taksi ilian nombron. Dudeko da volumoj estas nun disponebla. Kiel multaj ne estas ankoraŭ haveblaj! Kiel multaj estas disrabitaj kaj falis en la manojn de l' malamiko, kaj neniu konas ilian senton!

241. Ho frato, ni devas malfermi niajn okulojn, mediti pri Lia

Vorto, kaj serĉi la rifuĝodonan ombbron de la Malkaŝantoj de Dio, por ke ni ĉerpu averton el la seneraraj konsiloj de la Libro kaj atentu la admonoj, entenatajn en la sanktaj Tabuletoj; por ke ni ne moku la Malkaŝanton de la versoj, por ke ni sindonu memrezigne al Lia Afero kaj akceptu tutkore Lian leĝon, por ke ni eniru la kortegon de Lia kompatemo kaj loĝadu ĉe la bordo de Lia favoro. Vere, Li estas kompatema kaj pardonema por Siaj servantoj.

242. Kaj simile Li diris ankaŭ: »Diru: Ho anaro de la Libro! Ĉu vi ne malkonfesas nin nur tial, ĉar ni kredas je Dio kaj je tio, kion Li terensendis al ni, kaj je tio, kion Li sendis al ni antaŭe, kaj ĉar plej multaj el vi estas malbonfarantoj?«¹⁸² Kiel ĝuste tiu ĉi verso malkaŝas Nian intencon, kaj kiel klare ĝi elmontras la veron de la atestoj de la versoj de Dio! Tiu ĉi verso estis revelaciita en la tempo, kiam Islamo estis atakata de la nekredantoj kaj ĝiaj sekvantoj estis akuzataj pri malbonkredo, kiam la kunuloj de Mahometo estis deklarataj kiel malakceptantaj Dion kaj sekvantaj mensogeman sorĉiston. En siaj fruaj tagoj, kiam Islamo ekstervide ne havis ankoraŭ aŭtoritaton kaj povon, la amikoj de la Profeto, turnintaj siajn vizaĝojn al Dio, kien ajn ili iris, estis turmentataj, persekutataj, priĵetataj per ŝtonoj kaj kalumniataj. En tia tempo tiu ĉi benita verso estis sendita teren el la ĉielo de la dia Revelacio. Ĝi revelaciis nerefuteblan ateston kaj alportis la lumon de senerara gvidado. Ĝi instruis la kunulojn de Mahometo deklari al la nekredantoj kaj idoloj la jenon: »Vi persekutas kaj premas nin, kaj tamen kion ni faris krom tio, ke ni ekkredis je Dio kaj je la versoj, terensenditaj al ni per

¹⁸²Korano 5:62

la lango de Mahometo, kaj je tiuj, kiuj estis revelaciitaj al la antaŭaj Profetoj?» La senco de ĉi tio estas, ke ilia sola kulpo konsistis en la rekono de la fakto, ke la novaj kaj mirindaj versoj de Dio, terensenditaj al Mahometo, same kiel tiuj, kiuj estis revelaciitaj al la antaŭaj Profetoj, estis ĉiuj de Dio, kaj en la konfeso kaj akcepto de ilia vero. Tio ĉi estas atesto, kiun la dia Reĝo instruis al Siaj servantoj.

243. Konsiderante ĉi tion, ĉu estas juste, ke tiuj homoj malakceptu la nove-revelaciitajn versojn, kiuj ĉirkaŭprenis la Orienton kaj la Okcidenton, kaj rigardu sin mem kiel kolonojn de la vera kredo? Ĉu ili ne devas, pli ĝuste, ekkredi je Tiu, kiu revelaciis tiujn ĉi versojn? Konsiderante la ateston, kiun Li mem fiskis, kiel Li povus ne kalkuli kiel la verajn kredantojn tiujn, kiuj konfesis ĝian veron? Malproksima tio estas de Li, ke Li forturnu de la pordo de Sia favoro tiujn, kiuj turniĝis al Li kaj akceptis la veron de la diaj versoj, aŭ ke Li minacu tiujn, kiuj tenas sin je Lia certa atesto. Efektive Li deklaras la veron per Siaj versoj kaj konfirmas Sian Revelacion per Siaj vortoj. Vere Li estas potenca, helpanta en danĝero, ĉiopova.

244. Kaj simile Li diris ankaŭ: »Kaj se Ni sendus teren al vi Libron, skribitan sur pergameno, kaj la nekredantoj tuŝus ĝin per siaj manoj, ili certe dirus: ‘Tio ĉi estas nur palpebla sorĉaĵo.’¹⁸³ Plej multaj el la versoj de la Korano temas pri ĉi tio. Ni menciis, por gardi la koncizecon, nur du versojn. Konsideru, ĉu en la tuta Libro io ajn ekster tiuj versoj estis difinita kiel kiterio por la rekono de la Malkaŝantoj de Lia Belo, ke la homoj kroĉu sin

¹⁸³Korano 6:7

al tio kaj malkonfesu la Malkaŝantojn de Dio? Kontraŭe, en ĉiu momento Li minacis per fajro tiujn, kiuj malakceptis kaj mokis la versojn, kiel jam estis elmontrite.

245. Tial, se aperus persono, kiu anoncus miradon da versoj, traktatoj, epistoloj kaj preĝoj, el kiuj neniu estus akirita dank' al instruiteco, kia imagebla pravigo povus senkulpigi tiujn, kiuj malakceptus ilin kaj senigus sin de la potenco de ilia favoro? Kian respondon ili povus doni, kiam iliaj animoj liberiĝos el sia ombra templo kaj forlasos ĝin? Ĉu ili povus peni pravigi sin, dirante: »Ni kroĉiĝis al certaj tradicioj kaj, ne vidante ilian laŭvortan plenumiĝon, ni atakis per tiuj kalumnioj la Enkorpigojn de la dia Revelacio, kaj tenis nin for de la leĝo de Dio?« Ĉu vi ne aŭdis, ke inter la kaŭzoj, pro kiuj certaj Profetoj estis nomitaj »dotitaj per kosntanteco«, estis la fakto, ke Libro estis al ili revelaciita? Kaj tamen kiel povis pravigi sin tiuj homoj, ke ili malakceptis la Anoncinton kaj Aŭtoron de tiom da volumoj kaj versoj, kaj sekvis la parolojn de tiu, kiu malsaĝe ĵetis la semojn de dubo en la homajn korojn, kaj kiu, kvazaŭ Satano, leviĝis por konduki la homojn sur la vojojn de pereco kaj eraro? Kiel ili povus toleri, ke tiaj aferoj senigu ilin de la lumo de la Suno de l' dia malavareco? Krom tio, se tiuj homoj evitas kaj malakceptas tiun dian Animon, tiun sanktan Spiron, al kiu, Ni demandas, ili povas aliĝi, al kies vizaĝo, krom Lia Vizaĝo, ili povas turniĝi? Vere – »Ĉiu havas parton de la ĉielo, al kiu li turniĝas.«¹⁸⁴ Ni montris al vi tiujn du vojojn; iru la vojon, kiun vi mem elektos. Tio ĉi estas vero, kaj ekster la vero estas nenio krom eraro.

¹⁸⁴Korano 2:148

246. Inter la pruvoj, elmontritaj la veron de ĉi tiu Revelacio, estas tiu ĉi, ke en ĉiu tempo kaj epoko, kiam ajn la nevidebla Esenco aperigis sin en la persono de Sia Malkaŝanto, certaj animoj, sensignifaj kaj korliberaj de ĉiuj mondaj logaĵoj, serĉis lumon ĉe la Suno de la dia gvidado kaj atingis la dian Apudeston. Pro tiuj ĉi kaŭzoj la ekleziuloj de la koncerna tempo kaj posedantoj de riĉaĵoj mokis kaj insultis tiujn homojn. Kiel Li diris pri tiuj, kiu eraris: »Tiam diris la ĉefof de Lia popolo, kiuj ne kredis: ‘Ni vidas en Vi nur homon, saman kiel ni; kaj ni vidas nenium, kiu vin sekvis, krom tiuj el inter ni, kiuj estas plej sensignifaj kaj rapidjuĝemaj, kaj ni vidas en vi nenion, kio igus vin superaj al ni: ne, ni opinias vin mensoguloj.’«¹⁸⁵ Ili ĉikanis tiujn sanktajn Malkaŝantojn kaj protestis, dirante: »Neniu sekvis vin krom tiuj, kiuj estas malaltaj inter ni, kiuj indas nenian atenton.« Ili celis montri, ke neniu el inter la instruituloj, riĉuloj kaj famuloj kredis je ili. Per tiuj kaj similaj argumentoj ili penis pravi malverecon de Tiu, kiu diras nenion krom vero.

247. Tamen en ĉi tiu plej lumradia Epoko kaj plej potenca Regno certa nombro de klerspiritaj ekleziuloj, da plej instruitaj homoj, da doktoroj kun matura saĝo atingis Lian Kortegon, trinkis el la Kaliko de Lia dia Apudesto kaj estis dotita per la honoro de Lia plej alta favoro. Ili forlasis por la Amato la mondon kaj ĉion, kion ĝi entenas. Ni mencias la nomojn de kelkaj el ili, por ke tio fortigu la malgrandkorulojn kaj kuraĝigu la timulojn.

248. Inter ili estis Mullá ĥusayn, al kiu estis lasite ricevi la

¹⁸⁵Korano 11:27

lumbrilan gloron de la Suno de la dia Revelacio. Sen li Dio ne estus loĝigita en la honorloko de Sia favoremo, nek levita sur la tronon de la eterna gloro. Inter ili estis ankaŭ Siyyid Yahyá, tiu unika kaj senegala persono de sia tempo,

Mullá Muḥammad ‘Alíy-i-Zanjání

Mullá ‘Alíy-i-Bastámí

Mullá Sa‘íd-i-Bárfírúshí

Mullá Ni‘matu’lláh-i-Mazindarání

Mullá Yúsuf-i-Ardibilí

Mullá Mihdíy-i-Khu’í

Siyyid ḥusayn-i-Turshízí

Mullá Mihdíy-i-Kandí

Mullá Báqir

Mullá ‘Abdu’l-Kháliq-i-Yazdí

Mullá ‘Alíy-i-Baraqání

kaj aliaj, en la nombro de preskaŭ kvarcent personoj, kies nomoj estas ĉiuj enskribitaj en la »Gardata Tabuleto« de Dio.

249. Ĉiuj ili estis gvidataj de la lumo de tiu Suno de la dia Revelacio, ĉiuj ili konfesis kaj akceptis Lian veron. Tia estis ilia kredo, ke plej multaj el ili forlasis siajn havaĵojn kaj familiojn kaj subiĝis al la plezuro de la Plejglora. Ili fordonis la vivojn por sia Amegato kaj oferis ĉion en Lia vojo. Iliaj bruetoj iĝis celo por la

sagoj de la malamikoj, kaj iliaj kapoj iĝis ornamo de la lancoj de la nekredantoj. Ne resits peco da tero, kiu ne trinkis la sangon de tiuj korpigoj de korpureco, nek glavo, kiu ne hakis iliajn kolojn. Iliaj agoj solaj atestas la veron de iliaj vortoj. Ĉu la atesto de tiuj sanktanimuloj, kiuj tiel glorie leviĝis por oferi siajn vivojn por la Amato, ke la tuta mondo miris la fervoron de ilia sinofero, ne sufiĉas al la homoj de tiu ĉi tago? Ĉu ĝi ne estas sufiĉa atesto kontraŭ la malfideleco de tiuj, kiuj por bagatelaĵoj perdis sian kredon, kiuj forvendis la senmortecon por tio, kio peras, kiuj fordonis la Kawtharon de la dia Apudesto por salaj ŝprucaĵoj, kaj kies sola celo en la vivo estas uzurpi la posedaĵojn de aliaj? Vi vidas, kiel ĉiu el ili okupiĝis per la vantaĵoj de la mondo kaj flankiĝis for de Tiu, kiu estas la Sinjoro, la Plejpotenca.

250. Estu justa: ĉu akceptinda kaj konsiderinda estas la atento de tiuj, kies faroj harmonias kun iliaj vortoj, kies ekstera konduto konformas al ilia interna vivo? La menso mirkonfuziĝas pro iliaj agoj kaj la animo admiras ilian forton kaj fizikan eltenemon. Aŭ ĉu estas akceptinda la atesto de tiuj malfideluloj, kiuj spiras nenion krom la spiro de egoistaj deziroj, kaj kiuj kuŝas sklavigite en la kaĝo de siaj vanaj imagaĵoj? Kiel vespertoj de mallumo ili levas la kapojn de siaj kuŝlokoj nur por ĉasi la pasemajn aferojn de la mondo, kaj nokte trovas ripozon nur tiam, kiam ili klopodas akceli la objekton de sia malnobla vivo. Dronante en siaj egoistaj planoj, ili forgesas pri la ordono de Dio. Tage ili klopodas tutanime pri mondaj profitoj, kaj nokte ilia sola okupo konsistas en la kontentigado de la korpaj deziroj. Kia leĝo aŭ kriterio povas pravigi la homojn, aliĝantajn al la neado de tiaj malgrandanimuloj kaj ignorantajn la kredon de tiuj, kiuj forla-

sis, por la plezuro de Dio, siajn vivojn kaj havaĵojn, sian gloron kaj famon, sian reputacion kaj honoron?

251. Ĉu la faktoj el la vivo de la “Princo de Martiroj»¹⁸⁶ ne estis konsiderataj kiel la plej grandaj el ĉiuj okazoj, kiel la plej superaj pruvoj de lia vero? Ĉu la homoj el la antaŭa tempo ne deklaris, ke tiuj okazoj estis senkezkemple? Ĉu ili ne asertis, ke neniu malkaŝanto de la vero elmontris iam tian konstantecon, tian eminentan gloron? Kaj tamen tiu epizodo el lia vivo, komenciĝinte matene ven al sia fino la saman tagmezon, dum tiuj ĉi sanktaj lumoj eltenadis heroe dum dekdek jaroj pluvojn da afliktoj, kiuj versiĝadis sur ilin de ĉiuj flankoj. Kun kia amo, kun kia sindonemo, kun kia ĝojego kaj sankta ekstazo ili oferis siajn vivojn sur la vojo de la Plejglora! Pri la vero de tio ĉiuj atestas. Kaj tamen kiel ili povas malgrandigi tiun ĉi Revelacion? Ĉu en iu ajn alia tempo oni vidis tiel grandsignifajn okazojn? Se tiuj kamaradoj ne estas veraj serĉantoj de Dio, kiu alia povas esti nomita per tiu ĉi nomo? Ĉu tiuj kamaradoj klopodis pri potenco kaj gloro? Ĉu ili iam sopiris riĉaĵojn? Ĉu en iliaj koroj estis alia deziro, krom plezurigi Dion? Se tiuj kamaradoj kun ĉiuj siaj senkomparaj atestoj kaj mirindaj faroj estas malveraj, kiu indas tiam nomi sin vera? Mi ĵuras je Dio! Iliaj agoj mem estas sufiĉa atesto kaj nerefutebla pruvo antaŭ ĉiuj popoloj de la tero, se la homoj konsideros en siaj koroj la misterojn de la dia Revelacio. »Kaj tiuj, kiuj agas maljuste, baldaŭ scios, kia sorto ilin atendas!«¹⁸⁷

¹⁸⁶Imám Ĥusayn

¹⁸⁷Korano 26:227

252. Plie, la signo de vero kaj malvero estas difinita kaj priskribita en la Libro. Per tiu ĉi die-difinita provŝtono devas esti provataj la pretendoj de ĉiuj homoj, por ke verulo estu distingita de trompisto. Tiu ĉi provŝtono estas la jena verso: ¹⁸⁸ <*> »Deziru morton, se vi estas verdirantoj.«¹⁸⁹ Konsideru tiujn martirojn kun ilia senduba sincereco, kies verecon atestas la klara teksto de la Libro, kaj el kiuj ĉiu, kiel vi vidis, forlasis ofere sian vivon, posedaĵon, edzinon, infanon, sian ĉion, kaj supreniris le plej altajn ĉambrojn de la paradizo. Ĉu estas juste malakcepti la ateston de tiuj korpuraj kaj gloranimaj estaĵoj pri la vero de tiu ĉi ĉef-eminenta kaj glora Revelacio, kaj konsideri kiel akceptindajn la akuzojn, kiujn kontraŭ tiu ĉi brilladia Lumo voĉis tiuj malfideluloj, kiuj por oro forlasis sian kredon kaj kiuj por sia aŭtoritato malkonfesis Tiun, kiu estas la Unua Gvidanto de la tuta homaro? Kaj ĉio tio malgraŭ la fakto, ke ilia karaktero estas nun malkaŝita al ĉiuj, kiuj ekkonis ilin kiel tiujn, kiuj neniel fordonus unu eron aŭ plej etan parteton de sia ĉi-tempa aŭtoritato por la sankta Kredo de Dio, tiom malpli sian vivon, havaĵojn kaj simile.

253. Rigardu, kiel la dia Provŝtono apartigis kaj distingis, laŭ la klara teksto de la Libro, la verulon de la malverulo. Malgraŭ tio ili ankoraŭ forgesas tiun ĉi veron kaj, en la dormo de malatento, postkuras la vantaĵojn de la mondo kaj okupiĝas per la pensoj pri vana kaj tera aŭtoritato.

254. “Ho filo de homo! Multaj tagoj pasis super vi, dum kiuj vi

¹⁸⁸Korano 62:6

¹⁸⁹Korano 2:94

okupiĝadis per viaj fantaziaĵoj kaj vanaj imagaĵoj. Kiel longe vi dormos ankoraŭ sur via lito? Levu vian kapon de la dormo, ĉar la Suno leviĝis ĝis la zenito: lasu ĝin brili sur vin per la lumo de beleco.»

255. Oni sciu tamen, ke neniu el tiuj doktoroj kaj ekleziuloj, pri kiuj ni parolis, estis ornamita per la rango kaj digno de aŭtoritato. Ĉar la famaj kaj influhavaj religiaj gvidantoj, kiuj okupas la lokojn de aŭtoritato kaj plenumas la funkciojn de gvidado, neniel povas sekvi la Malkaŝanton de la Vero, escepte de tiuj, kiujn Dio volas. Ekster kelkaj el ili, neniam okazis tia afero. »Kaj malmultaj el Miaj servantoj estas dankemaj.«¹⁹⁰ Same ankaŭ en tiu ĉi Epoko neniu el inter la konataj ekleziuloj, en kies manoj kuŝas la kondukiloj de la homaro, akceptis la Kredon. Kontraŭe, ili klopodis kontraŭ ĝi kun tia malamikeco kaj obstineco, ke neniu orelo aŭdis kaj neniu okulo vidis ion similan.

256. Báb, la Sinjoro, la plej glora – estu al Li oferita ĉies vivo – verkis speciale epistolon al la ekleziuloj de ĉiu urbo; Li plene klarigis en la epistolo la karakteron de la malakcepto kaj malkonfeso flanke de ĉiu el ili. »Tial estu singardaj, vi, posedantoj de la interna vido!«¹⁹¹ Per la aludoj al ilia kontraŭstarado Li celis senvalorigi la kontraŭparolojn, kiujn la popolo de Bayán povus voĉi en la tago de la revelacio de »Mustagháth«¹⁹² la Tago de la Lasta Leviĝo el Mortintoj, pretendante, ke dum en la Epoko

¹⁹⁰ Korano 34:13

¹⁹¹ Korano 59:2

¹⁹² «La Alvokito»

de Bayán certa nombro da ekleziuloj akceptis la Kredon, en tiu ĉi Lasta Revelacio neniu el ili konfesis Lian aserton. Lia celo estis averti la popolon de Dio, por ke – Dio gardu de tio – ĝi ne alkroĉu sian menson al tiaj stultaj pensoj kaj ne senigu sin de la dia Belo. Vere, tiuj ekleziuloj, pri kiuj Ni parolis, estis plejparte nekonataj, kaj per la favoro de Dio ili iĝis puraj de ĉiaj teraj vantaĵoj kaj liberaj de la logaĵoj de aŭtoritateco. »Tia estas la favoro de Dio; al kiu Li volas, al tiu Li ĝin donas.«

257. Alia argumento kaj pruvo de tiu ĉi Revelacio, kiu meze de ĉiuj aliaj pruvoj brilas, kiel la suno, estas la konstanteco de la eterna Belo en la proklamado de la Kredo de Dio. Malgraŭ Sia juneco kaj frua aĝo kaj kvankam la Afero, kiun Li proklamis, estis kontraŭa al la deziro de ĉiuj loĝantoj de la tero, ĉu altaj aŭ malaltaj, riĉaj aŭ malriĉaj, grandaj aŭ malgrandaj, reĝoj aŭ regatoj, tamen Li leviĝis kaj proklamis ĝin kun firmeco. Ĉiuj sciis kaj aŭdis tion. Li ektimis nenium; Li ne konsideris la sekvojn. Ĉu io simila povus okazi en la mondo krom per la potenco de la dia Revelacio kaj la potenco de la nevenkebla Volo de Dio? Je la justeco de Dio! Se iu ajn havus en sia koro tiel grandan Revelacion, la penso pri tia deklaro mem konfuzigus lin! Se la koroj de ĉiuj homoj estus enigitaĵoj en lian koro, ankoraŭ tiam li hezitus antaŭ tiel timinda risko! Li povus efektiviĝi tion nur dank' al permeso de Dio, nur ne la fluejo de lia koro estus unigita kun la Fonto de la dia favoro, kaj se lia animo ricevus certecon pri la senrompa subteno de la Ĉiopova. Al kio, Ni demandas, ili atribuas tiel grandan kuraĝon? Ĉu ili akuzas Lin pri frenezo, kiel ili akuzis la antaŭajn Profetojn? Aŭ ĉu ili asertas, ke la sola motivo de Lia agado estas avido je aŭtoritato kaj je

akiro de teraj riĉaĵoj?

258. Favorema Dio! En Sia Libro, kiun Li titolis “Qayyúmu’l-Asmá’», - la unua, la plej granda kaj plej potenca el ĉiuj libroj – Li profetis Sian propran martiriĝon. En ĝi estas la jena fragmento: »Ho Vi Postrestinto de Dio! Mi oferis min komplete al Vi; mi akceptis malbenojn pro Vi, kaj sopiris nenion krom martira morto sur la vojo de Via amo. Sufiĉa Atestanto estas por mi Dio, la Plejalta, la Gardanto, la Eternulo!«

259. Simile, en Sia interpretado de la litero “Há« Li deziregis martirmorton, dirante: »Ŝajnas al mi, ke mi aŭdas Voĉon, vokantan en la plejfunda de mia animo: ‘Oferu tion, kion vi amas plej multe, kiel ĥusayn – paco estu al li – oferis por Mi sian vivon!’ Kaj se mi ne konsiderus tiun ĉi nepran misteron, je Tiu, kiu havas inter Siaj manoj mian vivon, se eĉ ĉiuj reĝoj de la tero farus interligon, ili ne povus forpreni de mi unu solan literon, kiom da malpli povas ĝin fari tiuj servantoj, kiuj indas nenian ateston kaj kiuj vere apartenas al la lastaj... Ke ĉiu konus la gradon de mia pacienco, de mia sinrezigno kaj sinofero sur la vojo de Dio.«

260. Ĉu oni povas konsideri la Aŭtoron de tiaj vortoj kiel iun, irantan alian vojon, ol la vojo de Dio, kaj sopirantan ion alian ekster Lia plezuro? En tiu ĉi verso kaŝas sin spiro de korpureco; se ĝi estus spirita plene en la mondon, ĉiuj estaĵoj fordonus siajn vivojn kaj oferus siajn animojn. Pensu pri la kanajla konduto de tiu ĉi generacio kaj konsideru ilian mirindan sendankecon. Vidu, kiel ili fermis la okulojn kontraŭ tiu ĉi tuta majesto, kaj sekvas malnoble tiujn malpurajn kadavrojn, el kies ventroj lev-

iĝas kriadado de la englutita propraĵo de la fideluloj. Kaj tamen kiel maldecajn kalumniojn ili ĵetadis sur tiujn Tagiĝojn de Sank-teco! Tiel Ni rankontas al vi tion, kion faris la manoj de la mal-fideluloj, tiuj, kiuj en la Tago de l' Leviĝo el Mortintoj forturnis siajn vizaĝojn de la dia Apudesto, kiujn Dio suferigis per la fajro de ilia propra nekredo, kaj por kiuj Li preparis en la venonta mondo punon, kiu englutos tiel iliajn korpojn, kiel la animojn. Ĉar ili diris: »Dio estas senpova, kaj Lia mano de kompatado estas katenita.«

261. Firmeco en la kredo estas plej certa atesto kaj grandioza pruvo de la vero. Kiel diris la «Sigelo de la Profetoj»: «Du versoj faris Min malĵuna.» Ambaŭ el tiuj versoj koncernas konstantecon en la Afero de Dio. Kiel Li diris: »Estu firma, kiel estis al vi ordonite.«¹⁹³

262. Kaj nun konsideru, kiel tiu Sadriĥ de la Dia Riĉván leviĝis en Sia junaĝo por proklami la Aferon de Dio. Vidu, kian konstantecon elmontris tiu Belo de Dio. La tuta mondo leviĝis por kontraŭstari Lin, tamen ĝi plene malsukcesis. Ju pli severaj estis la persekutoj kontraŭ tiu Sadriĥ de Beniteco, des pli kreskis Lia fervoro kaj des pli hela brilis la flamo de Lia amo. Ĉio tio estas evidenta kaj neniu diskutas la veron de tio. Fine Li fordonis Sian animon kaj direktis Sian flugon al la superaj sferoj.

263. Kaj inter la pruvoj de la vero de tiu ĉi Revelacio estis la potenco, la supernatura povo kaj perfekteco, kiujn Li, tiu El-montranto de la Ekzisto kaj Malkaŝanto de la Adorato elmontris,

¹⁹³Korano 11:113

sola kaj senhelpa, antaŭ la mondo. Tuh kiam tiu eterna Belo deklaris Sian Mision en Shíráz, en la jaro sesdeka, kaj disŝiris la vualojn de kaŝiteco – la signoj de la potenco, povo kaj aŭtoritato, emanantaj de tiu Esenco de Esencoj kaj Maro de Maroj, evidentiĝis en ĉiu lando. Ĝis tia grado, ke el ĉiu urbo aperadis signoj, evidentaĵoj, atestoj kaj pruvoj de tiu dia Lumportanto. Kiel multaj estis tiuj puraj kaj mildaj koroj, kiuj fidele spegulis la lumon de tiu eterna Suno, kaj kiel multaj estis la emanaĵoj de scio el tiu Oceano de la dia saĝo, kiu ĉirkaŭverŝis ĉiujn estaĵojn! En ĉiu urbo ĉiuj ekleziuloj kaj eminentuloj levigis por kontraŭstari kaj subpremis ilin, kaj malstreĉiis la bridon de maliceco, de envio kaj tiraneco en sia persekutado. Kiel granda estas la nombro de tiuj sanktaj animoj, de tiuj esencoj de justeco, kiuj, akuzite de la tiranoj, estis kondamnitaj al morto! Kaj kiom da enkorpiĝoj de pureco, flanke de kiuj oni vidis nenion krom la vera sciado kaj senmakulaj agoj, suferis teruran morton! Malgraŭ tio ĉiu el tiuj sanktaj estaĵoj spiris, ĝis la lasta momemnto, la Nomon de Dio, kaj ŝvebis en la sfero de subiĝemo kaj rezigno. Tia estis la potenco kaj aliformiga influo, kiun Li elmontris rilate al ili, ke ili ĉesis deziri ion ajn ekster Lia volo kaj ligis siajn animojn al la rememorado pri Li.

264. Konsideru: Kiu en tiu ĉi mondo kapablas elmontri tian superhoman povon, tian ĉiopenetran influon? Ĉiuj tiuj senmakulaj koroj kaj sanktaj animoj respondis kun absoluta sinrezigno al la vokado de Lia ordono. Anstataŭ plendi, ili diris dankojn al Dio, kaj meze de la mallumo de sia turmento ili elmontris nenion krom ĝojradia subiĝo al Lia volo. Evidente estas, kiel senindulga estis la malamo kaj kiel kruela estis la malbonvolo

kaj malamikeco de ĉiuj loĝantoj de la tero kontraŭ tiuj kamaradoj. Ili konsideris la persekutadon kaj dolorojn, kiujn ili suferigis al tiuj sanktaj kaj spiritaj estaĵoj, kiel rimedon por atingi animsavon, prosperon kaj ĉiamdaŭran sukceson. Ĉu de la tagoj de Adam la mondo vidis tian tumulton, tian furizan ekscitegon? Malgraŭ ĉiuj torturoj, kiujn ili suferis, kaj la diversaj afliktoj, kiujn ili travivis, ili iĝis objektoj de universala malhonorado kaj insultado. Ŝajnas, kvazaŭ la pacienco estus aperigita antaŭ la mondo nur dank' al ilia firmeco, kaj kvazaŭ la fideleco mem estus naskita nur de iliaj faroj.

265. Prikonsideru tiujn gravegajn okazojn en via koro, por ke vi ekkomprenu la grandecon de tiu ĉi Revelacio kaj ekkonu ĝian mirindegan majeston. Tiam la spirito de kredo blovita estos, per la favoro de la Kompatema, en vian animon, kaj vi eksidos kaj restados sur la glorloko de certeco. La unu sola Dio estas Mia Atestanto! Se vi pripensos momente, vi rekonos, ke sendepende de ĉiuj tiuj elmontritaj pruvoj kaj supre-menciitaj argumentoj, la malakcepto, insultado kaj malbenado flanke de la loĝantoj de la tero estas en si mem la plej certa atesto pri la vero de tiuj herooj sur la kampo de sinrezigno kaj korpureco. Kiam vi meditados pri la ĉikanoj, voĉataj de ĉiuj homoj, ĉu ekleziuloj, instruituloj aŭ scienculoj, tiom pli firma kaj pli konstanta vi iĝgados en la Kredo. Ĉar ĉio, kio okazis, estis profetita de tiuj, kiuj estas Minejoj de la dia sciado kaj Fontoj de la eterna leĝo de Dio.

266. Kvankam Ni ne intencis mencii la tradiciojn de la pasinta tempo, tamen, pro Nia amo al vi, Ni citos kelkajn el ili, kiuj harmonias kun Nia argumentado. Ni tamen ne sentas neceson

de tio, ĉar tio, kion Ni jam diris, sufiĉas al la mondo kaj al ĉiuj, kiuj estas en ĝi. Fakte ĉiuj Sanktaj Skribaĵoj kaj ties misteroj estas resumitaj en tiu ĉi mallonga rakonto. Tiagrade, ke se iu primeditus ĝin momente en sia koro li molkovrus dank' al Dio, kaj ekkomprenus la signifon de ĉio, kion revelaciis tiu ideala Reĝo. Konsiderante, ke la homoj diferencas en sia kompreno kaj stato, Ni citos, konforme al tio, kelkajn tradiciojn, por ke ili inspiru konstantecon al hezitanta animo kaj trankvilon al zorgopremita menso. Tiamaniere la atesto de Dio al la homoj, ĉu altaj aŭ malaltaj, estos kompleta kaj perfekta.

267. Inter tiuj tradicioj estas la jena: «Kaj kiam la Standardo de la Vero estas levita, la loĝantoj de la Oriento kaj de la Okcidento malbenas ĝin.» Oni devas trinki la vinon de sinrezigno, oni devas atingi la altaĵojn de korpureco, kaj nepre observi la meditadojn, pri kiu parolas la vortoj »Unuhora meditado estas preferinda, ol sepdek jaroj de pia glorado de Dio«, por ekkoni la sekretojn de la malnobla konduto de la homoj, de tiuj homoj, kiuj malgraŭ la amo kaj sopiro al la vero, kiun ili proklamas, malbenas la sekvantojn de la Vero, kiam foje Li estas aperigita. Pri tiu ĉi verso atestas la supra-menciita tradicio. Evidente estas, ke la kialo de tia konduto estas nenio alia, ol la nuligo de tiuj leĝoj, moroj, kutimoj kaj ceremonioj, sub kies regado ili vivis. En alia okazo, se la Belo de la Kompatema akordiĝus kun tiuj ĉi leĝoj kaj moroj, kiuj estis kutimaj inter la homoj, kaj se Li sankcius iliajn ritojn, tia konflikto kaj konfuzo neniam ekestus en la mondo. Tiun ĉi altsignifan tradicion konfirmas kaj pravas la vortoj, kiuj Li diris: »La tago, kiam la Alvokanto alvokos al

severega afero.«¹⁹⁴

268. La dia voko de la ĉiela Heroldo de post la Vualo de la Gloro, alvokanta la nomojn, ke ili forlasu komplete ĉiujn aĵojn, al kiuj ili kroĉas sin, estas mala al ilia deziro; kaj tio ĉi estas la kaŭzo de la akraj suferoj kaj furiozaj konfuzoj, kiuj okazis. Konsideru la konduton de la homoj. Ili ignoras tiujn ĉi firmfundamentajn tradiciojn, el kiuj ĉiu plenumiĝis, klinas sin al tiuj de duba valoro kaj demandas, kial tiuj ĉi ne plenumiĝis. Kaj tamen tiaj aferoj, kiuj estis por ili neimageblaj, efektiviĝis. La signoj kaj pruvoj de la Vero brilas kiel la tagmeza suno, kaj tamen la homoj erarvagas, sencele kaj konsternite, en la sovaĝejo de ignoreco kaj malsaĝeco. Malgraŭ ĉiuj versoj de la Korano kaj la rekonitaj tradicioj, kiuj antaŭdiras novan Kredon, novan Leĝon kaj novan Revelacion, tiu ĉi generacio ankoraŭ atendas, esperante ekvidi la Promesiton, kiu konfirmos la Leĝon de la Mahometa Epoko. Simile la judoj kaj la kristanoj voĉas tiajn samajn diraĵojn.

269. Inter la paroloj, kiuj antaŭdiras novan Leĝon kaj novan Revelacion, estas fragmentoj de la »Preĝo de Nudbih«: »Kie estas Tiu, kiu estas destinita por renovigi la ordonojn kaj leĝojn? Kie estas Tiu, kiu havas aŭtoritaton aliigi la Kredon kaj ĝiajn sekvantojn?« Simile ankaŭ Li diris en Ziyárat:¹⁹⁵ »Paco estu al la renovigita Vero«. Abú-'Abdi'lláh, demandita pri la karaktero de Mihdí, respondis jene: »Li faros tion, kion faris Mahometo, la Sendito de Dio, kaj nenigos ĉion, kio estis antaŭ Li, kiel la

¹⁹⁴Korano 54:6

¹⁹⁵Sanktovizita Tabuleto de 'Alí

Sendito de Dio neniigis la metodojn de tiuj, kiuj estis antaŭ Li.«

270. Rigardu, kiel malgraŭ tiuj kaj similaj tradicioj, ili vane argumentas, ke la leĝo antaŭe revelaciita devas esti neniel ŝanĝita. Kaj tamen, ĉu la celo de ĉiu Revelacio ne estas efektiviĝi ŝanĝon en la tuta karaktero de la homaro, ŝanĝon, kiu elmontriĝos tiel ekstere, kiel interne, kiu influos tiel ĝian internan vivon, kiel la eksteran staton? Ĉar se la karaktero de la homaro restu senŝanĝa, evidente estus, ke la universala Revelacio de Dio estis vana. En »‘Aválim«, aŭtoritata kaj fame konata libro, estas dirite: »Aperos Junulo el Bani-Háshim, kiu aperigos novan Libron kaj proklamos novan leĝon;« poste sekvas la jenaj vortoj: »Plej multaj el Liaj malamikoj apartenos al ekleziuloj«. En alia fragmento estas dirite pri ŝádiq, filo de Muĥammad, ke li diris la jenon: »Aperos Junulo el Bani-Háshim, kiu ordonos al la popolo, ke ĝi turniĝu al Li fidele. Lia Libro estos nova Libro, kaj Li alvokos la popolon, ke ĝi konfesu ĝin. Peza estas Lia Revelacio al la araboj. Se vi aŭdos pri Li, rapidu al Li.« Kiel precize ili sekvis la ordonojn de la Imámoj de la Kredo kaj Lampoj de certeco! Kvankam estas klare dirite: »Se vi aŭdos, ke aperis Junulo el Bani-Háshim, alvokanta la popolon al nova kaj Dia Libro kaj al novaj kaj Diaj leĝoj, rapidu al Li«, ili ĉiuj tmen deklaris tiun Sinjoron de l' ekzisto malfidelulo kaj proklamis Lin herezulo. Ili ekrapidis al la Háshima Lum, la Dia Malkaŝanto, sed kun nudigitaj glavoj kaj koroj plenaj da malamo. Atentu, plie, kiel klare estis menciita en la Libro la malamikeco de la ekleziuloj. Malgraŭ ĉiuj tiuj evidentaj kaj signifoplenaj signoj, malgraŭ ĉiuj tiuj seneraraj kaj nediskuteblaj aludoj la homoj malakceptis la senmakulan Esencon de la sciado kaj de la sanktaj paroloj, kaj

turniĝis al la proklamantoj de ribelo kaj malvero. Malgraŭ la skribitaj tradicioj kaj revelaciitaj vortoj ili parolis nur tion, kion inspiris al ili iliaj propraj egoistaj deziroj. Kaj se la Esenco de l' Vero anoncus ion, kio estas kontraŭa al iliaj inklinoj kaj deziroj, tuj ili akuzus Lin pri malfideleco kaj protestus, dirante: »Tio ĉi estas kontraŭa al la paroloj de la Imámoj de la Kredo kaj brilradiaj Lumoj. Nenio simila trovas bazon en nia netuŝebla Leĝo.« Same en la hodiaŭa tago tiaj samaj senvaloraj argumentoj estis kaj estas prezentataj de tiuj mortemuloj.

271. Kaj nunn konsideru alian tradicion kaj vidu, kiel ĉiuj tiuj aferoj estis antaŭdiritaj. En »Arba'in« estas dirite: »El Bani Háshim aperos Junulo, kiu anoncos revelacie novajn leĝojn Li alvokos la homojn al si, sed neniu atentos Lian vokon. Plej multaj el Liaj malamikoj apertenos al ekleziuloj. Liajn ordonojn ili ne obeos, sed ili protestos, dirante: 'Tio ĉi estas kontraŭa al tio, kion testamentis ol ni la Imámoj de la Kredo.'« En tiu ĉi tago ĉiuj ripetas la samajn vortojn, tute senciaj pri tio, ke Li sidas sur la trono de »Li faras kion Li volas«, kaj restadas sur la honorloko de »Li ordanas, kion Li deziras.«

272. Neniu kompreno povas koncepti la naturon de Lia Revelacio, kaj neniu sciado povas ekkoni la plenan mezuron de Lia Kredo. Ĉiuj diraĵoj dependas de Lia sankcio kaj ĉiuj aferoj bezonas Lian aŭtoritaton. Ĉio ekster Li estas kreita per Lia ordono kaj movas sin kaj ekzistas dank' al Lia leĝo. Li estas Malkaŝanto de la Diaj misteroj, kaj Koniganto de la kaŝita kaj pratempa saĝo. Estas rakontite en »Biháru'l-Anvár«, »'Avalim« kaj »Yánbú« pri ŝádiq, filo de Muĥammad, ke li diris la jenajn vortojn: »La sciado estas dudek sep literoj. Ĉio, kion la Pro-

fetoj konigis, estas du literoj. Neniu homo sciis iam ĝis nun pli, ol tiujn ĉi du literojn. Sed kiam Qá'im venos, Li aperigos la restintajn dudek kvin literojn.« Konsideru: li deklaris, ke la sciado konsistas el dudek sep literoj, kaj rigrdis ĉiujn Profetojn, de Adam ĝis la »Sigelo«, kiel malkaŝintajn nur du el tiuj literoj kaj senditajn kun tiuj ĉi du literoj. Li diris ankaŭ, ke Qá'im malkaŝos ĉiujn restintajn dudek kvin literojn. Konjektu laŭ tiuj ĉi vortoj, kiel granda kaj alta estas Lia stato! Lia rango superkreskas tiun de ĉiuj Profetoj, kaj Lia Revelacio superas la komprenon kaj ideojn de ĉiuj iliaj elektitoj; La Revelacion, pri kiu la Profetoj de Dio, Liaj sanktuloj kaj elektitoj havis nenian scion, aŭ kiun ili, obeante neesplorableblan ordonan de Dio, na malkaŝis – tian Revelacion tiuj malnoblaj kaj malvirtaj homoj penis mezuri per sia propra malperfekta menso, per sia propra malperfekta instruiteco kaj kompreno. Se ĝi ne konformas al iliaj kriterioj, ili tuj malakceptas ĝin. »Ĉu vi pensas, ke plimulte da ili aŭdas aŭ komprenas? Ili estas kiel brutoj! Vere, eĉ pli foren ili flankiĝis de la vojo!«¹⁹⁶

273. Kiel, Ni demandas, ili klarigas la supre-menciitan tradicion, la tradicion, kiu en seneraraj esprimoj antaŭdiras revelacion de aferoj neesplorableblaj kaj okazon de novaj kaj mirindaj faktoj en Lia tago? Tiaj eksterordinaraj okazoj ekscitas tiel grandan malkonsenton inter la homoj, ke ĉiuj ekleziuloj kaj doktoroj kondamnas Lin kaj Liajn kunulojn al morto, kaj ĉiuj popoloj de la tero leviĝas, por Lin kontraŭstari. Kiel estas dirite en »Káfi«, en la tradicio de Jábir, en la »Tabuleto de Fátimih« pri la karaktero de Qá'im: »Li evidentigos en si la perfektecon de Moseo, la

¹⁹⁶Korano 25:44

majeston de Jesuo kaj la paciencon de Ijob. Liaj elektitoj estos humiligitaj en Lia tago. Iliaj kapoj estos sendataj donace, kiel la kapoj de turkoj kaj deflamitoj. Ili estos mortigataj kaj bruligitaj. Timo kaptos ilin; konfuzo kaj tumulto inspiras teruron en iliajn korojn. La tero iĝos ruĝa de ilia sango. Iliaj virinoj ploras kaj lamentos. Tio estas vere Miaj amikoj!« Konsideru: nek unu sola litero de tiu ĉi tradicio restis neplenumita. En plej multe da lokoj ilia sango estis verŝata. En ĉiu urbo ili estis malliberigataj, kondukataj parade tra la provincoj, kaj kelkaj estis bruligitaj per fajro. Tamen neniu haltis momente por pripensi, ke se la promesita Qá'im devus proklami la leĝon kaj ordonojn de la antaŭa Revelacio, kial notitaj estus tiaj tradicioj, kaj kial ekestus tiagrada malkonsento kaj konflikto, ke la homoj konsiderus mortigadon de tiuj kamaradoj kiel ordonitan al ili devon, kaj opinias persekutadon de tiuj sanktanimuloj rimedo por atingi la plej altan favoron de Dio?

274. Atentu, plie, kiel tiuj aferoj, kiuj okazis, kaj la agoj, kiuj estas plenumitaj, ĉiuj estis menciitaj en la antaŭaj tradicioj. Tiel estas rakontite en »Rawḍiy-i-Káfi« pri »Zawrá'«. En »Rawḍiy-i-Káfi« estas rakontite pri Mu'ávíyih, filo de Vahháb, al kiu Abú-'Abdi'lláh diris: »Ĉu vi konas Zawrá'n?« Mi diris: »Estu ofertia al vi mia vivo! Oni diras, ke ĝi estas Baghdád.« »Ne«, li respondis. Kaj li aldonis: »Ĉu vi estis en la urbo Rayy?«,¹⁹⁷ al kiu mi respondis: »Jes, mi estis«. Tiam li demandis: »Ĉu vi vizitis la placon, kie oni vendas brutojn?« »Jes«, mi respondis. Li diris: »Ĉu vi vidis nigran monton dekstre de la vojo? Tio ĉi estas Zawrá'. Tie el ies idaro okdek homoj estos mortigitaj,

¹⁹⁷ Antikva urbo, proksime al kiu konstruita estas Baghdád

kaj ĉiuj ili indas esti nomitaj kalifoj.« »Kiu mortigos ilin?« mi demandis. Li respondis: »infanoj de Persujo!«

275. Tia estas la kondiĉo kaj sorto de Liaj kunuloj, kiel estis antaŭvidite en la antaŭaj tagoj. Kaj nun konsideru, kiel, laŭ tiu ĉi tradicio, Zawrá' estas ĝuste la lando de Rayy. En tiu loko Liaj kunuloj estis mortigataj meze de grandaj suferoj, kaj ĉiuj tiuj sanktanimuloj suferis martirigon el la manoj de persoj, kiel rankontas la tradicio. Tion ĉi vi aŭdis kaj pri ĉi tio ĉiuj atestas. Kial do tiuj rampantaj, vermsimilaj homoj ne ekpensas momente pri tiuj tradicioj, el kiuj ĉiu estas klara, kiel la suno en sia tagmeza gloro? Kial ili rifuzas akcepti la Veron kaj permesas, ke certaj tradicioj, kies signifon ili ne scipovas kompreni, baru ilin kontraŭ rekono de la Revelacio de Dio kaj Lia Belo, kaj igu ilin loĝadi en la inferaj abismoj? Tiaj aferoj povas esti atribuitaj al nenio alia ekster malfideleco de la ekleziuloj kaj doktoroj de tiu ĉi tempo. şádiq, filo de Muĥammad, diris pri ili: »La religiaj doktoroj de tiu epoko estas plej malnoblaj el la ekleziuloj, kaŝantaj sin en la ombro de la ĉielo. De ili devenas malbono, kaj al ili ĝi revenos.«

276. Ni petegas la instruitulojn de Bayán, ke ili ne sekvu tiun ĉi ekzemplon, ke en la tempo de Mustagháth ili ne suferigu al Li, la Dia Esenco, la ĉiela Lumo, la absoluta Eterneco, la Komenco kaj Fino de la Revelacioj de la Nevidebla, tion, kio estis suferigita en tiu ĉi tago. Ni petas, ke ili ne trofidu al sia intelekto, al sia kompreno kaj instruiteco kaj ne diskutu kontraŭ la Malkaŝanto de la ĉiela kaj senfina sciado. Kaj tamen, malgraŭ ĉiuj tiuj admonoj, Ni vidas, ke unuokululo, kiu mem estas ĉefo de la popolo, leviĝas kun grandega malamikeco kontraŭ Ni. Ni

antaŭvidas, ke en ĉiu urbo la popolo leviĝos, por subpremi la Benitan Belon, ke la kunuloj de tiu Sinjoro de la ekzisto kaj fincela Deziro de la homaro suros for de la persekutanto kaj serĉos rifuĝon kontraŭ li en sovaĝejo, dum aliaj rezignos sin mem kaj, kun absoluta animpureco, oferos siajn vivojn sur Lia vojo. Ŝajnas, ke Ni povas distingi tiun, kiu estas tiel fama pro sia religiemo kaj pieco, ke la homoj opinias sia devo obei lin, kaj al kies komando subiĝi ili konsideras kiel nepraĵon, kaj kiu leviĝos por ataki la radikon de la Dia Arbo, kaj penegos per ĉiuj siaj fortoj kontraŭstari kaj kontraŭbatali Lin. Tia estas la konduto de la homoj!

277. Ni esperas tutkore, ke la anaro de Bayán posedos la lumon de la sciado, ŝvebos en la sfero de la Spirito kaj loĝados tie, distingos la Veron kaj rekonos per la interna vido hipokritan malveron. En tiuj tagoj tamen tiaj odoroj de ĵaluzo estos disblovitaj, ke – Mi ĵuras je la Edukanto de ĉiuj estaĵoj, videblaj kaj nevideblaj – de la komenco de la mondkreo – kvankam ĝi ne havas komencon – ĝis la nuna tago neniam aperis kaj neniam en la estonteco vidiĝos tia malbonvolo, envio kaj malamo. Ĉar certa nombro da homoj, kiuj neniam spiris la aromojn de justeco, levis la standardon de ribelo kaj faris interligon kontraŭ Ni. Ĉiuflanke Ni vidas la minacon de iliaj lancoj, kaj ĉiudirekte Ni rekonas la akraĵon de iliaj sagoj. Tiel estas, kvankam Ni neniam gloris Nin pro io ajn kaj neniam penis altiĝi super iun ajn. Al ĉiu Ni estis plej afabla kunulo, plej indulgema kaj amema amiko. Inter malriĉuloj Ni serĉis ilian societeton, kaj meze de eminentuloj kaj instruituloj Ni estis humilaj kaj rezignemaj. Mi ĵuras je Dio, la sola vera Dio! Kiel ajn dolorigaj estis la malĝojoj

kaj suferoj, kiujn kaŭzis al Ni la anaro de la Libro, tamen ĉio tio estas komplete nenio kompare kun tio, kio trafis Nin el la manoj de tiuj, kiuj deklaras sin Niaj amikoj.

278. Kion pli Ni diru? La universo, se ĝi rigardus per la okulo de justeco, ne kapablu elteni la pezon de tiuj paroloj! En la unuaj tagoj post Nia alveno en tiun ĉi landon, kiam Ni ekvidis la signojn de la venontaj okazoj, Ni decidis, antaŭ ol ili plenumiĝis, foriĝi. Ni foriris en sovaĝejon kaj tie, izolite kaj aparte, Ni vivis dum du jaroj la vivon de kompleta soleco. El Niaj okuloj verŝis sin larmoj de turmento, kaj en Nia sanganta koro ondis oceano da tordanta doloro. Dum multaj noktoj Ni havis nenian manĝaĵon por sinnutro, kaj dum multaj tagoj Nia korpo trovis nenian ripozon. Je Tiu, kiu havas Mian vivon inter Siaj manoj! Malgraŭ ĉiuj tiuj pluvoj de afliktoj kaj senĉesaj sortobatoj Nia animo estis dronanta en ekstazo de feliĉo, kaj Nia tuta estaĵo elmontradis neesprimeblan ĝojon. Ĉar en Nia soleco Ni vivis sen atento pri malutilo aŭ utilo, sano aŭ malsano, pri iu ajn. En kompleta soleco Ni komunikiĝadis kun Nia spirito, forgesante la mondon kaj ĉion, kion ĝi entenas. Ni ne sciis tamen, ke la reto de dia destino etendiĝis trans la plej vastan koncepton de mortemuloj, kaj la sagoj de Lia ordono superis plej kuraĝajn homajn planojn. Neniu povas eviti la reton, kiun Li pretigis, kaj neniuj povas trovi trankvilon alie, ol subiĝante al Lia volo. Je la justeco de Dio! En Nia forestado Ni pensis pri nenia reveno, kaj en Nia soleco Ni esperis nenian revidiĝon. La sola kialo de Nia foriĝo estis ne iĝi objekto de malkonsento inter la kredantoj, fonto de malpaco inter Niaj kamaradoj, ilo de maljusteco kontraŭ iu ajn, aŭ kaŭzo de malĝojo por ies koro. Krom tio Ni

havis neniajn intencojn ekster tio. Ni celis nenion alian. Kaj tamen ĉiu persono faris planojn konformajn al la propra deziro, kaj postĉasis siajn proprajn vanajn imagojn – ĝis la horo, kiam el la Mistika Fonto aŭdiĝis voko, ordonante al Ni reiri tien, el kie Ni venis. Submetante Nian volon al Lia volo, Ni subiĝis al Lia ordono.

279. Kiu plumo povas priskribi la aferojn, kiujn Ni trovis ĉe Nia reveno! Pasis du jaroj, dum kiuj Niaj malamikoj senĉese kaj senlace komplotis, por Nin neniigi, pri kio ĉiuj atestas. Malgraŭ tio neniu inter la kredantoj leviĝis por oferi al Ni subtenon, kaj neniu emis kunagi por helpi Nin. Ne, anstataŭ helpi, kiajn pluvojn de senĉesaj sorĝoj iliaj vortoj kaj faroj verŝis sur Nian animon! Meze de ili ĉiuj Ni staras, kun Nia vivo preta en la mano, tute sinrezignintaj al Lia volo; per la bonfaremo de Dio kaj Lia favoro tiu ĉi revelaciita kaj elaperigita Litero donu Sian vivon ofere sur la vojo de la Unua Punkto, la plej alta Vorto! Je Tiu, je kies ordono la Spirito ekparolis, se ne retenus Nin tiu ĉi sopiro de Nia animo, Ni ne restus eĉ unu momenton plu en tiu ĉi urbo. »Sufiĉa Atestanto estas por Ni Dio.« Ni finas Nian argumentadon per la vortoj: »Ne ekzistas potenco, nek forto, krom en Dio«. »Ni estas de Dio, kaj al Li ni revenos«.

280. Tiuj, kiuj havas komprenemajn koroj, kiuj trinkis la Vinon de amo, kiuj eĉ dum momento ne okupiĝadis per kontentigado de siaj egoistaj deziroj, ekvidos klare, kiel la sunon en ĝia tagmeza gloro, la signojn evidentajn kaj pruvojn, kiuj atestas la veron de tiu ĉi mirinda Revelacio, de tiu ĉi superstara kaj dia Kredo. Konsideru, kiel homoj malakceptis la Belon de Diokaj kroĉis sin al siaj avidaj deziroj. Malgraŭ ĉiuj tiuj perfektaj ver-

soj, revelaciitaj en la »Plej Signifa Revelacio«, la dia Konfidentaĵo inter la homoj, kaj malgraŭ tiuj klar-klaraj tradicioj, el kiuj ĉiu estas pli konvinka, ol plej kompreneblaj paroloj, la homoj ignoris kaj malakceptis ilian veron kaj tenis sin firme je la literoj de certaj tradicioj, kiujn ili trovis, laŭ sia kompreno, kontraŭaj al tio, kion ili atendis, kaj kies signifon ili ne kapablis ekkompreni. Tiamaniere ili neniiĝis ĉian esperon kaj senigis sin de la pura vino de la Plejglora kaj de la klara kaj sankta akvo de la senmorta Belo.

281. Konsideru, ke eĉ la jaro, en kiu tiu Ĉefesenco de Lumo estas aperonta, estis speciale preparolita en la tradicioj, tamen ili ankoraŭ restas senatentaj, kaj ne ĉesas eĉ por unu momento sekvas siajn egoistajn dezirojn. Kiel rakontas tradicio Mufaĉĉal demandis ŝadiĉon: »Kion oni povas diri pri la signoj de Lia revelacio, ho mia sinjoro?« Li respondis: »En la jaro sesdeka aperigita estos Lia Afero kaj proklamita estos Lia Nomo.«

282. Kiel strange! Malgraŭ tiuj klaraj kaj evidentaj atestoj tiuj homoj fortunis sin de la Vero. Tiel ekzemple mencio pri la suferoj, malliberigo kaj afliktoj, kaŭzotaj al tiu Esenco de la dia virto, farita estis en la antaŭaj tradicioj. En »Biĉár« estas dirite: »En nia Qá'im estos kvar signoj de kvar Profetoj, Moseo, Jesuo, Jozefo kaj Mahometo. La signo ne Moseo estas timo kaj atendo, de Jesuo – tio, kion oni parolis pri Li, de Jozefo – malliberigo kaj hipokriteco, de Mahometo – aperigo de Libro, simila al la Korano.« Malgraŭ tiel konvinka tradicio, kiu en tiel seneraraj paroloj antaŭdiris la okazojn de la nuna tago, troviĝis neniu por atenti ĝian profetaĵon, kaj ŝajne neniu faros tien en la estonteco, krom tiu, kiun Dio volas. »Vere Dio igos tiun, kiun Li volas

aŭskulti, sed Ni ne igos aŭskulti tiujn, kiuj estas en tomboj.«

283. Estas evidente al vi, ke la Ĉielaj Birdoj kaj Kolomboj de la Eterneco parolas du lingvojn. Unu lingvo, la ekstera lingvo, estas sen aludoj, ĝi estas senkaŝa kaj senvuala, por ke ĝi estu lampo de gvido kaj lumturo, dank' al kiu vojaĝantoj povas atingi la altaĵojn de sankteco kaj serĉantoj povas eniri la regnon de la eterna interligo. Tiaj estas la senvualaj tradicioj kaj la evidentaj versoj, jam menciitaj. La alia lingvo estas vualita kaj kaŝa, tiel, ke ĉio, kio kuŝas kaŝite en la koroj de malbonvoluloj, iĝas evidenta, kaj la fundoj de iliaj animoj estas malkaŝitaj. Tiel ŝadiq, filo de Muĥammad, diris: »Vere, Dio elprovos ilin kaj kribros ilin.« Tio estas la dia kriterio, tio estas la provŝtono de Dio, per kiu Li provas Siajn servantojn. Neniu komprenas la signifon de tiuj paroloj krom tiuj, kies koroj estas plenaj de certeco, kies animoj estas en paco kun Dio, kaj kies mensoj estas liberaj de ĉio alia ekster Li. En tiaj paroloj la laŭvorta signifo, kiel ordinare la homoj ĝin komprenas, ne prezentas la veran sencan. Tiel estis dirite: »Ĉiu sciado havas sepdek signifojn, el kiuj nur unu estas konata al la homoj. Sed kiam Qá'im venos, Li malkaŝos al ili ĉiujn ceterajn signifojn.« Li diris ankaŭ: »Ni eldiras unu vorton, kaj en tiu vorto Ni kaŝas unu kaj sepdek signifojn; ĉiujn el tiuj signifoj Ni povas klarigi.«

284. Ni mencias tion nur tial, por ke la homoj ne estu konsternitaj pro certaj tradicioj kaj paroloj, kiuj ne plenumiĝis en la laŭvorta senco, ke, kontraŭe, ili atribuu sian konfuzon al sia propra manko de kompreno, kaj ne al neplenumiĝo de la tradiciaj promesoj, ĉar la signifo, kiun donis al ili la Imamoj de la Kredo, ne estas konata al tiuj ĉi homoj, kiel atestas la tradicioj

mem. La homoj ne devas sekve permesi, ke tiaj paroloj senigu ilin de la diaj malavaraĵoj, sed kontraŭe, ili devas serĉi lumon ĉe tiuj, kiuj estas ĝiaj rekonitaj Proklamantoj, por ke la kaŝitaj misteroj estu solvitaj kaj elmontritaj al ili.

285. Ni vidas tamen inter la popoloj de la tero neniun, kiu, sincere sopirante la Veron, serĉas la gvidadon de la diaj Malkaŝantoj koncerne la malklaraĵojn de la Kredo. Ĉiuj estas loĝantaj en la lando de forgeso, kaj ĉiuj estas sekvantaj la anaron de malvirto kaj ribelo. Dio vere kondukos al ili same, kiel ili mem kondukas, kaj Li forgesos ilin, same, kiel ili ignoris Lian Apud-eston en Lia Tago. Tia estas Lia decido rilate al tiuj, kiuj Lin malkonfesis, kaj tia ĝi estos rilate al tiuj, kiuj malakceptis Liajn signojn.

286. Ni finas Nian argumentadon per Liaj vortoj – altglorata estas Li – “Kaj kiu detenos sin de la rememoro pri la Kompatema, al tiu Ni alkatenos Satanon, kaj li estos lia intima kunulo.”¹⁹⁸ “Kaj kiu forturnas sin de la rememoro pri Mi, ties vico vere estos vivo de mizero.”¹⁹⁹

287. Tiel estis revelaciite antaŭe, se vi kapablas tion kompreni.

288. Revelaciita pere de “Bá» kaj »Há».

289. Paco estu al tiu, kiu klinas sian oreilon al la melodio de la Mistika Birdo, vokanta de Sadratu’l-Muntahá!

290. Glorata estu nia Sinjoro, la Plej Alta!

¹⁹⁸Korano 43:36

¹⁹⁹Korano 20:124

FINO

GLOSARO

‘**Abá** Supervesto aŭ mantelo.

Abbás Frato de Imám ĥusayn.

‘**Abbás Effendi** ‘Abdu’l-Bahá – ‘Aqá »Majstro.« Titolo, donita al ‘Abdu’l-Bahá de Bahá’u’lláh.

‘**Abdu’lláh** Sigelo de la Profeto.

‘**Abdu’lláh-i-Ubayy** Fervora kontraŭulo de Mahometo, el la gento ‘Awb, nomita la »ĉefo de hipokrituloj« (rig.: Ibn Hisham: »Life of Muĥammad«, eld. ĥustenfeld).

‘**Abú** ‘**Abdi’lláh** (ĥuseyn el Mílán): Li estis unu el tri personoj, kiuj pretendis esti enkorpigo de Imám ĥuseyn; li voĉis falsajn pretendojn al la plejsupera aŭtoritateco de la Bába kredo. Li estis mortigita per lancoj de soldatoj.

Abú ‘**Ámir (iafoje Abú’-Hámir)** Monaĥ el la tempo de Mahometo, kiu estis lia malamiko.

Abú-Jahl Homo, kiu ne kredis je Mahometo kaj estis senindulga en sia kontraŭstarado kaj nepersvadebla en la nekredo. (Abú-Jahl – »kiu minacis meti sian piedon sur la nukon de Mahometo, se li kaptus lin ĉe adorfaro.« Korano, X6VL,5.)

Abva’b-i-Arba’ih Laŭvorte: »Kvar Pordoj«, el kiuj ĉiu pretendis estis peranto inter la forestanta Imámo kaj liaj sekvantoj.

‘**Ad** Posteulo de Noa kaj praulo de la idolana araba gento. Urbo, fondita de ‘Ad; »Ili mokis la Profetojn, senditajn por ilin averti, kaj estis neniigitaj per fortegaj ventoj.« Rig.: »Hud.«

Adhan Mahometana alvoko al preĝo.

A.H. (»**Post Heĝiro**«) La dato de la translokiĝo de Mahometo el Mecca al Medinan, kaj bazo de la mahometana kronologio.

‘**Aka Siyyid Hasan** Frato de ‘Aka Siyyid ĥusayn el Yazd. Li estis malliberigita kune kun Báb. Li kaj lia frato ricevis de Báb la ordonon forlasi Lin kaj iri inter la homojn, por proklami la veraĵn Instruojn al la popolo de Dio.

‘**Aka Siyyid ĥusayn el Yazd** Skribisto de Báb. Li estis malliberigita kune kun Báb. Antaŭ sia ekzekuto Báb ordonis ke ĥusayn forlasi lin, kaŝi sian kredon, iri inter la homojn kaj transdoni la gemojn de la sciado al la popolo de Dio. Li atingis siavice la rangon de martiro en Ťihrán.

‘**Aka Muĥammad ‘Alí el Tabriz (Mirzo aŭ mulao)** Li devenis el nobla familio el Tabriz. Li estis ekzekutita kune kun Báb. Rig.: Nabil: »The Dawn Breakers.«

Al-Feyhá Laŭvorte: »la vasta«, epiteto, difinanta Damaskon.

Alláh-u-Akbar Dio la Granda.

Alláh-u-A‘zam Dio la plej Granda.

Alláh-u-Azmal Dio la plej Bela.

Alláh-u-Abhá Dio la plej Glora.

Alláh-u-Athar Dio la Plej Pura.

‘**Alí** Mirza aŭ Hájí Siyyid, patrinflanka onklo de Báb kaj, unue el la ĉefaj komercistoj el Shíráz. Kromnomita Khal-i-‘A‘zam, laŭvorte: »la plej granda Onklo.«

‘**Alí-ibn-i-Abi-Talib** Kuzo kaj bofilo de la Profeto Mahometo. Li estis mortigita de Ibn-i-Muljam, en Ku‘fih, en 40 j. A.H. Li etis la unua imamo kaj estis edzigita kun Fátimih, filino de Mahometo.

Alif La litero »A«, uzata simbole, kiel la greka »Alfa«.

Alif-Lam-Mim Tiuj ĉi vortoj estas uzitaj en la komenco de la Korano, II,1. »En la interligo de tiuj ĉi literoj kaŝitj estas la misteroj de la dia Esenco, kaj en iliaj konkroj trezortenantaj estos la perloj de Lia Unueco.«

Amir »Sinjoro.« »Princo,« »Komandanto,« »Estro.«

Amir-Nizám (Mírzá Taqí Khán) Granda veziro dum la regado de ŝaho Náŝiri‘d-Dín. Kruela despoto. Li estis respondeca por la konataj amasbuĉoj en Zanján kaj Níríz.

Arba‘in Rig.: ‘Usu‘l-i—Kafi-Biharu‘l-Anvar, kaj ‘Avalim.

Ard-i-A ‘Lá »La glorata loko«, nomo, donita al Zanján de Báb.

‘**Aqá** Laŭvorte: »Majstro«, titolo, donata al ‘Abdu‘l-Bahá.

Áqá Ján (Mírzá) (Jenáb-i-Khadimi'lláh) Skribisto de Bahá'u'lláh.

Áqá Khan-i-Nurz (Mírzá) Militministro sekvinta 'Amir-Nizámon kiel la Granda veziro, dum la regado de la ŝaho Náŝiri'd-Dín.

'Aqáy-i-Kalim »Bahiyiy Khanum,« »La plej Granda Sankta Folio,« filino de Bahá'u'lláh, kiu estis ekzilita kune kun Li en la aĝo de sep jaroj.

Ard-i-Jamat Laŭvorte: »Lando de Paradizo«.

Athím Pekulo.

Áyát Laŭvorte: »Signoj«.

'Ayn Alia nomo de 'Akká.

'Aválim 'Aválim Janbú. Kompilaĵo de la ŝianaj tradicioj. La principoj de la ŝianoj, publikigitaj en Tíhrán.

'A'zim Laŭvorte: »Granda«.

A'zam »La plej Granda«.

'Amá' Laŭvorte: »Lumnebulo,« simbole: »La Unua Nevidebla Substanco«.

Adib Laŭvorte: »instruito«.

'Alláma (»tre instruita«) epiteto, uzata de la ŝianoj, por nomi la granda teologon, Hasan ibn Yusuf ib 'Alí el Hilla.

Bá La litero »B« de la persa alfabeto.

Báb »Pordo«. Titolo, alprenite de Mírzá ‘Alí-Muḥammad post la deklaro de Lia misio en Shíráz, en majo 1844.²⁰⁰

Bábano (Bábí) Sekvanto dek Báb.

Báboj »Pordoj«. Titolo donita al tiuj, kiuj komunikiĝis kun la Dekdua Imámo (Imám Mahdí) dum lia aparteco aŭ »Kaŝiteco«. La unua el tiuj pordoj estis Abu ‘Umar ‘Othmán ibn Sa‘íd ‘Umarí; la dua Abú Ja‘far Muḥammad ibn ‘Othmán; la tria ḥusayn ibn Rúh Nawbakhti; la kvara: Abú’l-Hasan ‘Alí ibn Muḥammad Símarí. El tiuj ĉi »Pordoj« la unua estis nomita de Imám Hasan ‘Askarí, kaj la aliaj de la funkcianta tiam »Pordo« kun la sankcio de Imám Mahdí.

Badí Li portis la tabuleton de Bahá’u’lláh al la ŝaho Náŝiri’d-Dín. Li enviciĝis sub la standardon de Mullá ḥusayn. Li estis unu el la tridek loĝantoj de la vilaĝo Mijámay, kiuj deklaris sian kredon kaj aliĝis al la kredantaro; li iĝis martiro en la fortikaĵo de Shaykh Tabarsí.

Baghdád Regiono en la sudorienta Mezopotamio. La lando inter la riveroj Tigro kaj Eŭfrato (nordokcidente de Babilono kaj sudokcidente de Asirio). La 23an de aŭg. 1921

²⁰⁰Báb, kies nomo estis Siyyid ‘Alí Muḥammad, estis naskita en Šlíráz, la 1an de Muḥarram 1235 A.H. (la 20an de oktobro 1819). La dato de Lia naskiĝo konfirmis la veron de la tradicio, atribuata al Imám ‘Alí: „Mi estas du jarojn pli juna, ol nia Sinjoro.” Báb estis ankaŭ konata laŭ la jenaj nomoj: „Siyyid-i-Ďlíkr”, „’Abdu’lh-Ďlíkr,” Bábú’lláh,” „Siyyid-i-Báb,” „Nuqtíy-i-Úlá,” „Tal’at-i-A’lá”, „Haĉrat-i-A’lá”, „Rabb-i-A’lá,” „Niqtíy-i-Bayán.”

ĝi estis proklamita ĉefurbo de Irako.

Bágh-i-Takht Ĝardeno en la antaŭurbo de Shíráz.

Bahá »Gloro«, »Brilo«, »Lumo.« La titolo de Bahá'u'lláh.

Bahaano (Bahá'í) Sekvanto de Bahá'u'lláh.

Bahjí Laŭvorte: »plezuro«. Ĝi rilatas al tiu parto de la Ebenaĵo de 'Akká, kie trovas sin la Tombo kaj domo de Bahá'u'lláh.

Bani-Háshim La familio el kiu devenis Mahometo.

Baqiyyatu'lláh Laŭvorte: »Postrestinto de Dio«. Korano II,85. Ĝi estas ankaŭ titolo, donata same al Báb, kiel Bahá'u'lláh.

Bathá Alia nomo de Mecca. Pri Kaabah aŭ la kvarlatera Templo en Mecca oni parolas kiel pri »Bait Alláh« – Bethel aŭ Bathá, »la Domo de Dio.« Bekkah: alia nomo de Mecca.

Bayán Laŭvorte: »parolo«, »klarigo«. La titolo, donita de Báb al Sia Revelacio, speciale al Sia Libro.

Big Honora titolo, malpli alta, ol la titolo »Khán«.

Bihar (Usu'l-i-Kaŝf kaj Biharul-Anvar) Kompilaĵo de la ŝianaj tradicioj.

Biháru'l Anvár Avalím Yanbú »Principoj de la ŝianoj«, kompilaĵo de la tradicioj, verkita de Ja'far-i-Sadíq (la sesa Imámo), nomato la fondinto de la ŝiana kredo.

»**Blanka Vojo**« Simbole: la Religio de Dio.

- Cháfárcĥi** Laŭvorte: »kuriero«.
- Dalá'il-i-Sab'ih** Unu el la plej konataj verkoj de Báb.
- Dárughih** Alta policisto.
- Dáru'l-'Ilm** »La Sidejo de l' Sciado« – oficiala titolo de Shíráz.
- Dawlih** »Ŝtato«, »ŝtatregado«.
- Dhi'l-Hijjih** La monato de pilgrimoj al Mecca kaj Medina, koincidinta en tiu jara kun la vintra monato. Decembro 1844.
- Dikr** Laŭvorte: »mencio«, »rememoro«.
- »**Dotita per konstanteco**« Titolo, donata al la Profetoj, kiuj postlasis Librojn de Revelacioj kaj fondis religiajn leĝojn.
- Edirne** Adrianopolo.
- Epoko de Bayán** Tempoperiodo inter la Deklaracio de Báb, la 23an de majo 1844, kaj la Deklaracio de »Tiu, kiun Dio aperigos« (Bahá'u'lláh).
- Farman** »Ordono«, »reĝa dekreto«.
- Farrásh** »Lakeo«, »liktoro«, »servisto«. Farrásh-Báshí: ĉef-servisto.
- Farsakh (aŭ Farsang)** Mezurunuoj. Persa vojmezuro.
- Fátimih** Filino de Mahometo. Ŝi estis edzino de 'Alí, la unua Imámo.

Fátimih (Libro de) La ŝianoj kredas, ke post la ĉieleniro de Mahometo Fátimih lamentis kaj ploris la sorton de sia eminenta patro. Tial estis ordonite de la Plej Glora Sinjoro al Jabrá'il (Gabrielo) paroli kun Fátimih, kaj li parolis vortojn, kiuj konsolis kaj kvietigis ŝian koron. Tiuj ĉi vortoj estas kolektitaj kaj titolitaj: »Libro de Fátimih«. La ŝianoj kredas, ke tiu ĉi libro estas for kun Lia Alteco Qá'im (Imám Mahdí), kaj ke ĝi aperos en la tago de loia apero.

Fortikaĵo Kinar Gird Stacio ĉe la malnova Isfahani-Vojo, ĉirkaŭ 28 kilometrojn de Tihrán.

Há La litero »H«; la nombro – »5«

Hájí Mahometano, kiu plenumis la pilgrimon al Mecca.

Hájí Mírzá Karúm Khán El la ŝiana skolo, iama sekvanto de Siyyid Kázim, kiu tamen ne konsentis kun la kredo de sia majstro, ke Báb estas la delonge atendita promesita Qá'im. Li kun certa nombro de sekvantoj iĝis plej fervoraj kaj malamikaj persekutantoj de Báb kaj la bábanoj.

Hájí Siyyid Javad Loĝanto de Karbilá. Sekvanto kaj helpanto de Siyyid Kázim. Mullá 'Aliy-i-Bastání (unu el la Literoj de la Vivanto) konigis al li dum sia restado en Karbilá la Revelacion de Báb; li iris el tiu ĉi urbo en Shírázon, por informiĝi pli precize pri la naturo de tiu Revelacio (Nabil: »The Dawn Breakers«)

Hamzih »La Princo de Martiroj« – titolo donita al onklo de Mahometo. Li estis mortigita en la batalo apud O'hod.

La meccanoj terure masakris lian korpon, kio kaŭzis pro testojn kontraŭ kruelaj venĝoj. (Korano, XVI, 125)

Haníf La signifo de tiu ĉi vorto en la araba lingvo estas »inklinema al prava afero«. Ofte oni uzas ĝin teknike en la senco: »konfesanto de Islamo«.

Hijáz (Heĝaso) La sudokcidenta parto de Arabujo. Bahá'u'lláh uzas ĉi tiun esprimon por simboligi la araban lignvon.

Hijrah (Heĝiro) Laŭvorte: »transmigro«. La bazo de la mahometana kronologio. La dato de la transmigro de Mahometo el Mecca en Medinan.

Hiacinto Rozo, Najtingalo: Esprimoj, uzataj de Bahá'u'lláh kiel simboloj de la Malkaŝantoj de Dio.

Hín Laŭ la Abjada kalkulo la nombra valoro de ĉi tiu vorto estas 68. En la jaro 1268 A.H. okazis, ke al Bahá, malliberigita en Síyáh-Chál en Ĥihrán, konigita estis unue Lia Dia Misio. Li aludaas al tio en la odoj, kiujn Li verkis en tiu jaro.

Húd (Korano, XI) (La Surao pri Húd.) ‘Ad kaj Thamúd, menciitaj de Ptolomeo, estis du gentoj de la antikvaj araboj, malaperintaj en la tempo de Mahometo. Popularo tradicio atribuas ilian malaperon al venĝo de Dio.

Hurisoj Anĝeloj. (»Belegaj virgulinoj kiuj, laŭ Islamo, estas kunulinoj de la fideluloj en paradizo.«) »Kiujn neniu homo, nek spirito, tuŝis antaŭe.«

Ḥusayn La tria Imámo, filo de ‘Alí kaj Fatimih.

Ibn-i-Súriyá Instruita juda rabeno en la tempo de Mahometo. Mahometo faris al li demandojn koncerne la malfervoremon, kun kiu la judoj de tiu tempo sekvadis la leĝojn de Moseo.

Ibn Míhriyar Unu el tiuj, kiuj en la tempo de la Malgranda Kaŝiteco havis aliron aŭ korespondis kun la Imámo, kaj estas priskribita kiel loĝanto de Ahwáz.

Ibn Rúh ḥusayn (Abu’l-Kasim al Husain ibn Rúh) Li estis sankta shaykh kaj unu el la pordoj, kondukantaj al Sáhíb az Zamán (la Sinjoro de Tempo) aŭ la lasta granda Imámo, laŭ la ŝiana doktrino. Li estis elektita de Abú‘ Ja‘afar Muḥammad ibn Othmán al Omari kiel lia leŭtenanto, kaj kiam la lasta klasifikis la ŝianojn laŭ iliaj rangoj, ‘Abu’l-Kasim ricevis la rajton aperadi antaŭ li la unua el ĉiuj.

Ibn-i-Zíyád TODO #1

Ibn-i-Sa‘d Persekutantoj de la idaro de Mahometo.

»**Idhá’**« Signifas »se« aŭ »kiam«.

II »Gento.«

Imám (Imamo) La titolo de la dekdu ŝianaj postsekvintoj de Mahometo. Ankaŭ uzata ĝenerale rilate al la religiaj gvidantoj de Islamo. La dekdu Imamoj (rig.: Imameco, la »Eklezio de la Dekdu«) estas:

1. **‘Alí ibn Abí Jálíb**, kuzo kaj la unua disĉiplo de la Profeto. Li estis edzigita kun Fátimih, filino de Mahometo. (A.H. 40- A.D. 661.)
2. **Hasan**, filo de ‘Alí kaj Fátimih. (A.H. 50 – A.D. 670)
3. **Ĥusayn**, filo de ‘Alí kaj Fátimih. (A.H. 61 – A.D. 680)
4. **‘Alí**, filo de ĥusayn kaj Shahrbánú (filino de la lasta Sasamana reĝo), nomata ĝenerale Zeynu’l-Abidibín.
5. **Muĥammad Bákir**, filo de Zeynu’l-Abidín kaj de filino de Imámo ĥasan.
6. **Ja‘far-i-Sádiq**, filo de Imám Muĥammad Bákir.
7. **Músá Kázim**, filo de Imám Ja‘far-i-Sádiq.
8. **‘Alí’ ibn Músá er-Rizá**, nomata ĝenerale Imám Rizá. (A.H. 203)
9. **Muĥammad Takí**, filo de Imám Rizá. (A.H. 195- A.H. 254)
10. **‘Alí Takí**, filo de Imám Muĥammad Takí. (A.H. 232-A.H. 254)
11. **Hasan’ Askarí**, filo de Imám ‘Alí Takí. (A.H. 232- A.H. 260)
12. **Muĥammad**, filo de Imám Hasan Askarí kaj Narjiis Khátún, nomata de la ŝianoj »Imám Mahdí Hujjalu’lláh« (la »Pruvo de Dio«). »Bakeyyatulláh« (la

»Postkreskinto de Dio«, »Qá'im-i-al-i-Muĥammad«
(»Naskiĝonta el la familio de Mahometo«).

Imámeco (la doktrino pri) La ĉefa punkto de diferenco inter la ŝianoj kaj la sunnanoj. Laŭ la imama iserto la vica aŭtoritato estas afero tute spirita kaj rango, donata sole de Dio, unue pere de Lia Profeto, kaj poste pere de tiuj, kiuj Lin postsekvis. Ĝi havas nenion komunan kun la ĝenerala elekto, kiel komprenas la aferon de sunnanoj. La ĝenerala esprimo »Imameco« koncernas ĉiujn, kiuj estas partianoj de tiu ĉi teorio, sendepende de la maniero, laŭ kiu ili prezentas la postsekvon.

Imám Mahdí La dekdua en la vico de la Imámoj, postsekvintaj Mahometon, filo de Imám Hasan 'Askarí. Li estis naskita en Surra-man-Ra'a en la j. 255 A.H. kaj heredis la dignon de Imamo en la j. 260 A.H. Li ŝianoj kredas, ke li ne mortis, sed malaperis en subtera trairejo en Surra-man-Ra'a. La periodo de proksimume sesdek jaroj, dum kiu la komunikigado kun la Imamo estis ankoraŭ ebla pere de la Báboj (Pordoj), estas konata kiel la »Malgranda Kaŝiteco«. Tiun ĉi periodon sekvis la »Granda Kaŝiteco«, kiam Abú'l-Hasan, la lasta Bábo (Pordo), nenium nomis sia sekvanto. Pro tio kun lia morto ĉesis komunikigado inter la Imamo kaj la kredantoj, kaj la »Granda Kaŝiteco« komenciĝis kaj daŭros ĝis la »Reveno de la Imamo« okazos en la pleneco de l' tempo.²⁰¹ (E.G. Browne: »Travellers'

²⁰¹ „Estas notinde, ke la „Revelacio de Mírzá 'Alí Muĥammad Bábo“ okazis precize mil jarojn post tiu dato.” (E.G. Browne.)

Narrative«.)

Imám Músáy-i-Kázím La sepa Imamo. »La tomboj de la du Kázímtoj (t.e. de la sepa kaj naŭa Imamo) trovas sin en la distanco de proksimume tri mejloj norde de Baghdád kaj estas unue el la ĉefaj pilgrimceloj de la ŝianoj. Ĉirkaŭe de ili elkreskis urbo, loĝata ĉefe de persoj, kaj konata sub la nomo Kázímejn.« (E.G. Browne: »Travellers' Narrative.«)

Imám-Zádíh Posteulo de Imamo, aŭ lia tombosanktejo.

Imám-Zádúh-Hasan Loka tombosanktejo en Ťihrán.

Imám-Jum'h La ĉefa imamo en la urbo; ĉefo de la mulaoj.

'Imrán Laŭ Mahometo li estis patro de la Virgulino Mario (Miriam).

Íqán Laŭvorte: »certeco« (Rig.: Kitáb-i-Íqán.)

'Iráq (Irako) 1. (Ajemi). Centra provinco de Persujo, ebena lando, la antikva Medujo. Ĝia ĉefurbo etas Ťihrán (Teherano)

2. Esprimo, uzata de Bahá'u'lláh, por simboligi la persan lingvon.

3. **'Iráq-Arabí**, Suda regiono de la azia Turkujo, ĉirkaŭaĵo de Baghdád kaj Bossora, kuŝanta inter la riveroj Tigro kaj Eŭfrato. La antikva Babilonio.

Irshádu'l-Avám »Gvidilo por sensciuloj.« Libro, verkita de

Karim, kiu afektis grandan instruitecon, sed estis nur pretendemulo kaj egoisto.

Islám (Islamo) Laŭvorte: »sinrezigni«. Nomo, donita de Mahometo al Sia religio kaj al ĝiaj sekvantoj.

Isbráqát Laŭvorte: »lumelbriloj.« La titolo de unu el la Tabletoj de Bahá'u'lláh.

Ismu'llahahu'l-Ákhar Laŭvorte: »La lasta nomo de Dio.« La titolo kiun Báb donis al Quddús, la lasta »Litero de la Vivanto« kaj kunulo de Bá dum Lia pilgrimiro el Mecca al Medina. Li estis la unua, kiu suferis persekuton sur la persa tero pro la Afero de Dio. (Nabil: »The Dawn Breakers«).

Isráfil La anĝelo, kies tasko estas sonigi trumpeton en la Tago de Juĝo.

Jaáhilíyyih La malluma periodo de malklereco inter la araboj antaŭ la apero de Mahometo.

Jabal-i-Básit Laŭvorte: »la malfermita Monto«, aludo al »Máh-Kú«, kies Báb estis malliberigita.

Jabal-i-Shadid Laŭvorte: »La Malĝoja Monto« (la nombra valoro de la vorto Shadid estas 318, same kiel de Chihríq). Aludo al Chihríq (laŭ »Travellers' Narrative« Báb restis tri monatojn en la kastelo de Chihríq, antaŭ ol Li estis kondukita Ĥihránon por esti esploraata).

Jábulká (Okcidento) kaj Jábulsa (Oriento) Du mistikaj urbon. »En la plej ekstrema parto de la oriento estas

urbo, kies nomo estas Jábars, kaj kies loĝantoj devenas de la idoj de Thamúd. Kaj en la plej ekstrema parto de la okcidento estas urbo, kies nomo estas Jabalk, kaj kies loĝantoj devenas de la idoj de 'Ad.« (Rig.: La Surao pri Húd, Korano XI).

Jafr La scienco pri aŭgurado. (Nabil: »The Dawn Breakers«)

Jawad Laŭvorte: »la Malavara« – unu el la titoloj, donataj al la naŭa Imamo, Muĥammad Takí.

Jazíray-i-Khadrá Laŭvorte: »Floranta Insulo«.

Jenáb-i-Bahá La titolo, per kiu Bahá'u'lláh estis nomata antaŭ la martirigo de Báb.

Júdí (La Smeralda Montaĵo) Malkorekta formo de Monto Giordi, la greka Gordyall, kuŝanta inter Armenujo kaj Mezopotamio. Uzata simbole (la Smeralda Montaĵo). Tiu ĉi montaĵo estas tre malfacile trapasebla.

Kabir Laŭvorte: »granda«.

Ka'b-Ibn-i-Ashraf Fervora kontraŭulo de Mahometo el la gento Tayy, kiu iris kun kvardek judoj el Medina en Meccan kaj konspiris kun ĉef-malamiko de la Profeto por mortigi Mahometon. Li estis poste mortigita laŭ la ordono de la Profeto.

Kad-Khuda Ĉefo de kvartalo aŭ paroĥo en la urbo; vilaĝestro.

Káfi (Usúl-i-Káfi) (Rawdiy-i-Káfi)

1. Kompilaĵoj de la mahometanaj ŝianaj tradicioj.

2. »Káfí,« menciita en la »tradicio de Jábir« en la »Tabuleto de Fátimih.«
3. »Rawdiy-i-Káfí«, estas rakontite rilate al »Zawra«, pri Mu'Aviyih, filo de Vahhláb, al kiu Abú 'Abdilláh diris: »Ĉu vi konas Zawram?« oni diras, ke ĝi estas Baghdád. (Nabil: »The Dawn Breakers«)

Kalantar Majoro

Kalim »Tiu, kiu argumentas«.

Kalimat Laŭvorte: »vortoj«. La titolo de unu el la Tabuletoj de Bahá'u'lláh.

Karbilá Sankta urbo en la asia Turkujo, en la distance de sesdek mejloj suden de Baghdád. La amasbuĉo en Karbilá.

Karim Laŭvorte: »honorindulo«.

Kawthar La signifo de tiu ĉi vorto estas »abundeco«. Rivero en la paradizo, el kiu elfluas ĉiuj riveroj.

Khán Princo, nobelo, ĉefo.

Khasa'il-i-Sab'ih Laŭvorte: »sep kvalifikoj«. Traktato, en kiu Báb prezentis la esencajn ecojn, postulatajn de tiuj, kiuj atingis la konon de la Nova Revelacio kaj rekonis tion, kion ĝi atribuas al si.

Khaybar Indiĝena provinco de Punjab. La Khaybara Pasejo. La ĉefa pasejo inter Hindujo kaj Afganlando. Dek mejlojn for de la Peshawar la vojo mallarĝiĝas ĝis malpli ol dudek futoj laŭlonge de krutaĵo, kaj tial ĝi havas grandegan

strategian signifon. (Rig.: Korano LXVIII,15 – la militiro de Mahometo kontraŭ la judoj de Khaybar).

Khutb́iy-i-Qahriyyih Laŭvorte: »Prediko de Kolero.« Ĝi koncernas leteron, skribitan de Báb al la ŝaho Muĥammad, malkaŝantan la karakteron de Hájí Mírzá Aqásí. (Nabil: »The Dawn Breakers«)

Kisau’l-‘Ulama Biografio de la ŝianaj ekleziuloj, mencianta la doktrinon de Báb, ĝian historion kaj liajn antaŭulojn.

Kitáb-i-Íqán Laŭvorte: »Libro de Certeco«. La titolo de epistolo de Bahá’u’lláh al la onklo de Báb.

Koptoj Raso de la indiĝenaj egiptanoj, devenanta de la antikva egipta popolo. Unu el tiuj kristanaj egiptanoj starigis post la j. 451 monofizitan Eklezion, la ĉefan kristanan eklezion en Egipto, kies branĉo estas la etiopa, abisinia eklezio. La monofizitoj datas sin de la kvina jarcento. Ili akceptas, ke Kristo havis nur unu naturon, la dian, kaj ne du naturojn, kunigitajn ĝis nedistingebleco.

Korano (Qur’án) La sankta Libro de Islamo. Tradonita revelacie de Mahometo.

Ku’bih La antikvas sanktejo en Mecca, kiu de nememorebla tempo estis celo de pilgrimoj. Nun ĝi estas rekonita kiel la plej ĉefa sanktejo de Islamo.

Kuláh Persa ŝaflana ĉapelo, portata de ŝtataj oficistoj kaj civiluloj.

Kúfih (Hamzih) »La Princo de Martiroj«, la titolo de onklo de Mahometo. (Rig.: Hamzih).

Kull-i-Shay »ĉiuj aĵoj.« La nombra valoro de tiu ĉi vorto estas 361 aŭ 19 x 19.

Kullu't-Ta'ám Komentario pri la korana verso III,93, verkita de Bahá'u'lláh en Baghdád, honoranta Quddúson, la unuan martiro, kiun Báb kaj Bahá'u'lláh priploris en multaj Tabuletoj kaj preĝoj, kaj al kiu ili malŝparis laŭdovortojn. (Nabil: »The Dawn Breakers«).

»**Kvara ĉielo**« Unu el la gradoj de la nevidebla Regno.

Laylatu'l-Qadr Laŭvorte: »nokto de Povo«, unu el la lastaj dek noktoj de la monato de Ramaĉáno, kaj kiel oni ĝenerale kredas, la sepa, kalkulante de la fino. (Inter la 23a kaj 24a de Ramaĉán).

Malkaŝanto Malkaŝanto de Dio –Profeto.

Mahometo (Muĥammad) La Profeto de Islamo. La Malkaŝanto de la Korano. Nask. En aŭgusto 570 j. A.D., deklaris Sian mision en la j. 613. Lia transmigro en Medinan okazis en la j. 628 A.D.

Mi'ráj Laŭvorte: »supreniro«. La esprimo, uzata koncerne la ĉieleniro de Mahometo.

Mírzá Músá-Áqay-i-Kalim Frato de Bahá'u'lláh.

Mírzá Takí Mustawfí Lia oficiala titolo estas konata pli bone laŭ sia post kromnomo »Siphir«. Aŭtoro de ĝenerala histo-

rio de la mondo, kiu celis superi ĉiujn sampsecajn verkojn. La »Násikhu't-Tawáríth« konsistas el serio de dikaj volumoj, el kiuj ĉiu temas pri speciala periodo de la historio. Gobineau en sia verko »Trois ons en Asie« prezentas la socialajn flankojn de tiu historiisto de kiu li ĉerpas pliparton de la faktoj, rilatantaj al la movado de Báb, kiujn li priskribis tiel plastike en sia »Religions et Philosophies dans l' Asie Central«).

Mullá Muĥammad 'Alí-i-Bárfurushí Quddús (Jenáb-i-), »Lia Ekscelenco la Sankta«, estis pere de sia patrino rektlinia posteulo de Imám Hasan, la nepo de la Profeto Mahometo. Naskita en Bárfurúsh en la provinco Máizindaran, li estis disĉiplo de la eminenta Siyyid Kázim el Resht, kiu estis kunulo kaj akompanto de Báb dum Lia pilgrimiro. Li komencis proklami la vorton de Báb kun grandega firmeco. Fine, en la j. 1265 A.H. li estis mortkondamnita de Sa'id'l 'Ulma, la ĉefjuristo de Bárfurúsh. Li fordonis sian vivon meze de grandega kriado kaj bruado. (»Travellers' Narrative«)

Mullá ĥusayn-i-Bushrú'i Bábu'l-Báb, nomata »Jenábi-i-Báb, Jenáb—i-Bábu'l-Báb, Avvalu-man-ámana, Harj-i-avval, Ism-i-avval.« La unua »Litero«, la »Unua, kiu ekkredis«. Post la morto de Siyyid Kázim Mullá ĥusayn iris en Shírázon kaj faris viziton al Mírzá 'Alí Muĥammad, kun kiu li estis konatiĝinta en Karbilá. Li estis la unua, al kiu la juna Profeto deklaris Sian dian Mision, prezentante kiel pruvon Sian komenton pri la »Surao pri Jozefo« kaj elmontrante aliajn signojn. Mullá ĥusayn, post

mensa baraktado, kiu daŭris kelkajn tagojn, konvinkiĝis firme, ke la Majstro tiel senpacience atendata, tiel fervore dezirata, estas fine trovita.

Mullá Muḥammad ‘Alí-i-Zanjání Loĝanto de Zanján, kromnomita de Báb Hijjat-i-Zanjání. Li estis titolita Hijjatu’l Islám. Li konvinkiĝis pri la vereco de la misio de Báb, kaj tuj poste li iris prediki kaj alvokadi siajn disĉiplojn, ke ili akceptu Lian doktrinon. Li skribis al Báb deklaron kaj konfeson de sia kredo je Li. Li estis ĉefo (miyhahid) dum la sieĝo de Zanján, kaj tie li fordonis sian vivon; li estis mortigita ĝuste antaŭ la tritaga amasbuĉado post la subiĝo. («Travellers’ Narrative»).

Mullá ‘Alí-i-Bastámí Li estis konata pro sia sankteco kaj nomata »La Sanktulo el Khurasán.« Li estis laŭdire la unua martiro kaj la sola, kiu mortis el la manoj de la osmanaj turkoj. La martirigo okazis en la dua aŭ tria jaro de la Revelacio (A.H. 1262-3 – A.D. 1846-7). La mortverdikton kontraŭ li subskribis ĉiuj muftioj de Baghdád, inter kiuj la unua estis Maḥmud Effendi, krom unu, kies nomo estis Muhsin aŭ Hasan, kaj kiu rifuzis tion, dirante, ke la dubas la justecon de tiu ago. Báb direktis poste la jenajn vortojn al tiu Muhsin aŭ Hasan en la »Libro de Nomoj«: »Ĉar vi dubis kaj rifuzis partoprenis en tiu murdo, tial Dio dekretis en la Tago de Renaskiĝo la fajro vin ne tuŝu.«

Mullá Yúsof-i-Ardíbi Unu el la plej energiaj mistsenditoj de Báb. Li estis disputita proklami Lian doktrinon en Ázarbajjan. Dank’ al li konvertiĝis pliparto de la

loĝantoj de Milán (Zanján). Poste li penis unuiĝi kun la bábanoj en Shaykh Tabarsi, sed li estis malliberigita de Mahdí-kuli-Mírzá, gardata kun certa nombro da bábanaj ĉefoj post la sieĝo kaj rezervita por la ĝenerala buĉado, celanta aldoni brilon al la triumfo de la princo. Li estis kondukita en la urbon Bárfurúsh, kie li ŝatis elpafita el kanono. Li renkontis sian morton kun grandega heroeco.

Mullá Mihdíy-i-Kandi Unu el la ekleziuloj el la Shaykhí pario, kiu serĉis tiun senkomparan personon, kiu, laŭ ilia terminaro, estis la »Kvara Subtenanto« kaj centra malkaŝanto de la vero de la klara Religio (Islamo). Li akceptis poste la Aferon de Báb. Li estas menciita sur la listo de eminentulaj martiroj , troviĝanta en Táríkh-i-Jadíd. (»Travellers' Narrative«).

Mullá Báqir Unu el la unuaj partianoj de Báb. Antaŭ la ekiro al Chihríq al Tabríz Báb konfidis al li speciale preparitan skatolon, entenantan Liajn skribaĵojn, Lian ringon kaj plumojn, metis la ŝlosilon de la skatolo en koverton kaj komisiis al Mullá Báqir transdoni tiun ĉi altvaloran konfidaĵon al Mullá Kárim el Kazvín. (»Travellers' Narrative«).

Mullá Ni'Matu'llah-i-Mazindarání Fervora partiano de Báb. Li estis martirigita post la sieĝo de Shaykh Tabarsi.

Mullá Midhíy-i-Khu'i Menciita sur la listo de eminentaj martiroj, troviĝanta en Táríkh-i-Jadíd.

Mullá (Muĥammad) Sádiq-i-Khurásáni (Mukadda' la

»Sankta«): Li estis unu el la unuaj konvertitoj, konvinkitaj de Mullá ĥusayn. Li estis profesoro (Mudarris) en la kolegio en Isfahán. Post la sieĝo de Shaykh Tabarsi li estis, laŭ Táríkh-i-Jadíd, kondukita en la urbon Bárfurúsh kaj vendita kiel sklavo. (»Travellers' Narrative«)

Madrisih Religia kolegio.

Man-Yuzhiru'lláh »Tiu, kiun Dio aperigos«. La titolo donita de Báb al la Promesito.

Mashhadi Mahometano, kiu plenumis la pilgrimon al Mashhad.

Masjid Moskeo, sanktejo, preĝejo.

Maydán Subdivido de »farsakh«. Placo.

Mihdí aŭ Mahdí La titolo de la Malkaŝanto, atendata de la Islamo.

Mashriq'u'l-Adhkár Laŭvorte: »tagiĝloko de la glorado de Dio«. La titolo difinanta bahaan preĝejon.

»**Moskodora blovo de l' Eterneco**« Mistika esprimo, simbolanta la aromojn de la Dia Spirito de la Malkaŝanto.

Mustagháth Laŭvorte: »Alvokito«. Menciita en la verkoj de Báb kaj Bahá'u'lláh. Ĝi signifas la ciklon de ĉiu Diepoko.

Nadr-Ibn-Hánith Fervota kontraŭulo de Mahometo.

Najaf Urbo, altrespektata de la ŝianoj, ĉar en ĝi troviĝas la tombo de Imám 'Alí.

Namáz-Khánin Laŭvorte: »preĝodomo«.

Násikhu't-Tawáríth TODO #1

Rawzatus-safa Historio kompilita de generalo Musulman, historiisto. Historio, verkita de Mírzá Takí Mustawfí.

Nimrod Gen., 10,9. (Persekutinto de Abraham). Laŭ la orientaj legendoj li estis nepo de Ĥam. Li estis potenca ĉasisto; tial tiu ĉi nomo estas donota al ĉasistoj, famaj pro siaj sukcesoj.

Níqṭiy-i-Ukhrá Laŭvorte: »La lasta Punkto«. La titolo donita al Quddús de Bahá'u'lláh; rango kiun superas neniu krom tiu de Báb mem. (Nabil: »The Dawn Breakers«).

Nubuvvat-i-Khassih Speciala misio de Mahometo. (Nabil: »The Dawn Breakers«)

Nudbih Lamentado, verkita de Imám 'Alí.

Nuzejria religio Religio ĝenerala precipe inter la migrantaj gentoj de Persujo.

Párán (Monto) (Araba: Faran) Tombo de Teman-Teman; hebrea esprimo por »Tempo«, kaj uzata kiel simbolo de Eterneco.

»Dio venas de Teman, la Sanktulo de la monto Paran, Selah aŭ Sálíh (Justa Profeto). Lia majesto kovras la ĉielon, kaj Lia gloro plenigas la teron.« (Ĥabakuk, 3,3).

»Li diris: la Eternulo venis de Sinaj kaj eklumis al ili de Seir; Li ekbrilis de la monto Paran kaj venis kun milmiloj da sanktuloj; ĉe Lia dekstra flanko estas fajro de leĝo por ili.« (Re-adm. 33)

Teman aŭ Zeman, kio signifas »la tempodaŭro de Dio« estas denove starigita »en la Tempo« – »el la sentempa Tempo, Tempo sen komenco aŭ fino, kaj Dio faris interligon kun la homo denove en la Tempo kaj loko en Palestino.«

Punkto de Bayán Báb

Qá'im »Tiu, kiu aperos«. Tiu ĉi esprimo koncernas la Promesiton de la Islamo.

Qiblih (Keble) La direkto, al kiu oni devas turni la vizaĝon dum la preĝo. »La oriento kaj la okcidento apartenas al Dio; tial kien ajn vi turniĝas, tie estas la vizaĝo de Dio.« »Ni destinis la lokon, kiu estas al vi agrabla, kiel Qiblih, nur tiucele, ke Ni distingu tiun, kiu sekvas la Apostolon, de tiu, kiu kuras flanken.«

Qurbán (Qurbán 'Alí) La nomo de derviŝo, kiu fordonis sian vivon por la Afero de Báb. Li estis unu el la »Sep Martiroj«. »Qurbán« signifas laŭvorte »ofero« – pro tio li estis ofero por Báb.

Qayyúmu'l-Asmá Komentario pri la »Surao pri Jozefo«. La unua libro, verkita de Báb. Unu el la plej bone konataj citaĵoj el tiu ĉi libro estas: »Ho Vi, Postrestinto de Dio,« k.t.p.

Raqshá' Signifas laŭvorte »serpentino«. La nomo, donita de Bahá'u'lláh al la frato de Sultanu'l-'Ulamá, kiu per sovaĝa krueleco (en la lastaj jaroj) gajnis al si tiun ĉi nomon. (Nabil: »The Dawn Breakers«)

Rayy Antikva urbo, proksime de kiu konstruita estas Tíhráno. (Nabil: »The Dawn Breakers«)

Riḍvánó La nomo de gardanto de l' paradizo. Bahá'u'lláh uzas ĝin en la senco de la paradizo mem. – Ankaŭ ĝardeno de Bahá'u'lláh proksime de 'Akká.

Rik'atoj Terenkliniĝoj dum preĝo.

'Ruz'-bih (poste nomita Salmán) Unu el la kvar homoj, kiuj sinsekve anoncis al la araba popolo la ĝojan novaĵon pri la alveno de Mahometo.

Sád Alia esprimo por Isfáhán.

Sádik el Zanján (aŭ Milán) Li atencis la vivon de la ŝaho post la martirigo de Báb. Post tiu ĉi grava okazo ĉiuj babanoj estis suspektataj, kaj komence ĉiu, apartenanta al la babana komunumo, estis mortigata sen ia esploro koncerne lian efektivan partoprenon en la konspiro kontraŭ la reĝo. (»Travellers' Narrative«)

Sádiq La sesa Imamo de la ŝianoj. Ja'far-i-Sádiq filo de Bákir.

Sadratu'l-Muntahá La nomo de arbo, kiun la antikvaj araboj plantadis ĉe vojfiniĝoj, por ke ĝi montru la direkton. Kiel simbolo ĝi signifas la Malkaŝanton de Dio en Lia Tago.

Sadrîh Branĉo: »Sadrih de Bahá« – laŭvorte: »Branĉo de Gloro.«

Sahibu'z-Zamán »Sinjoro de la Tempo«; unu el la titoloj de la promesita Qá'im.

Sálih (iafoje Zálìh) »La Profeto Saleh«, aŭ, kiel signifas lia nomo, la »Justa Profeto«. Nebi Sálih estis sendita kiel profeto al la popolo de Thamúd, kaj li pruvis sian dian mision, estigante kamelinon el roko. La origino kaj historio de Nebi Sálih estas tute nekonata al la nunaj beduenoj, malgraŭ tio ili rilatas al li kun pli granda nacia respekto, ol al Moseo mem. La gento de Thamúd estas saracenaĵ loĝantoj de Sinaj, de antaŭ la mahometana invado.

Salman Rig.: 'Ruz'-bih.

Salsabil Fonto en ola paradizo.

Samandar Laŭvorte: »fenikso«.

Samari Magiisto, vivanta samptempe kun Moseo.

Septo (aŭ Septuagunto) La aleksandria traduko, la plej antikva greka traduko de la Malnova Testamento, kiu estis ĝenerala inter la judoj en la tempo de Kristo, kaj estas nun uzata de la Greka Eklezio.

Septa Sfero La plej alta grado de la nevidebla Regno. Ĝi signifas ankaŭ la Revelacion de Bahá'u'lláh.

Serafo Anĝelo de la Tago de l' Juĝo.

Sesdeka jaro La j. 1260 A.H., jaro de la Deklaracio de Báb (A.D. 1844).

Shadíd »Martiro«; la pluralo estas »Shadáda«.

Shaykhu'I-Islám Ĉefo de religia tribunalo, nomata por ĉiu granda urbo de la ŝaho.

Shaykh Aḥmad Ahsá'í La fondinto de la Shaykhí-skolo, kun kiu la baba movadoo estas tiel intime ligita. Li estis el la gento Sakr, unu el la plej gravaj arabaj gentoj. Li ĝisvivis la aĝon de okdek kvin jaroj. Post lia morto anstataŭis lin lia disĉiplo, Hájí Siyyid Kázim.

Sheba (Ŝeba) La biblia Ŝeba, kuŝanta en la suda parto de la Araba duoninsulo. Simbolo, uzata por esprimi hejmen aŭ loĝolokon.

Shíráz (Ŝirazo) La ĉefurbo de Fars, provinco de Persujo.

Sinaj (La monto, kie la Ordonooj kaj leĝoj estis donitaj al Moseo). La Sinaja Duoninsulo (»Li ekbrilis de la Sinaj de lumo sur la mondon«). Bahá'u'lláh uzas la vorton »Sinaj« kiel simbolon (ordono).

Sinjoro de la Tempo Unu el la titoloj de la promesita Qá'im.

Sirat Laŭvorte: »ponto« aŭ »vojo«; ĝi signifas la religion de Dio.

Siyáh-Chál Laŭvorte: »Nigra Kavoj«. La nomo de la malliberejo en Tihrán, kie Bahá'u'lláh estis tenata. Komence ĝi estis akvotenejo de unu el la publikaj banejoj

en Ĥihrán. Tio estas subtera malliberejo, kie oni tenadis krimulojn de plej malbona kategorio. (Nabil: »The Dawn Breakers«)

Siyyid Áká ĥusayn-i-Turshízí La mujtahid de Turshíz. Li estis unu el la »sep martiroj«. Li estis arestita en Ĥihrán post sia reveno al Karbilá.

Siyyid Kázim-i-Rashtí Disĉiplo kaj postsekvinto de Shaykh Aĥmad. Dum la lastaj jaroj de sia vivo li paroladis, same kiel preleganto kaj kiel predikanto, pri la promesita Pruvo, pri la signoj de Lia alveno kaj ties interpretado, kaj priparolis la kvalitojn de la Majstro de la Nova Revelacio, insiste proklamante, ke Li devas esti junulo, ke Li ne devas posedi la homan instruitecon kaj ke Li devas esti el la gento de Háshim. Post sia reveno el Surra-man-na'a la respektinda Siyyid finis la vivon.

Siyyid Yahyá el Darab Fama doktoro kaj Siyyid, objekto de granda respekto. Lli estis delegito de la ŝaho Muĥammad por esplori la pretendojn, voĉatajn de Báb. Li ekkredis je Báb kaj estis mortigita pro sia kredo (sufokita per la propra zono) post la ribelo de Niriz.

Sufioj Klaso de mahometanaj mistikuloj, speciale en Persujo. La pieco de la sufioj estas miskaĵo de asketismo kaj gnosticismo, kiu ofte aperas en panteista aŭ teozofia formo, kaj kiu estis inspiro por amaso da religia poezio.

Surao La nomo de la ĉapitroj de la Korano.

Ŝianoj (Shí'ah) Laŭvorte: »sekvantoj«. Unu el la du grandaj

religiaj skoloj de Islamo, la ŝianoj kaj la sunnanoj.

Tá (la lando de) Țíhrán (Arz-i-akdas. »la Sankta Lando«).

Țaff Țíhrán.

Tajallíyát Laŭvorte: »Brilegoj«. La titolo de unu el la Tabuletoj de Bahá'u'lláh.

Țarázát Laŭvorte: »Ornamoj«. La titolo de unu el la Tabuletoj de Bahá'u'lláh.

Táríkh-i-Jadíđ Monografio, verkita de simpatianta aŭtoro, se ne babano mem. (Ekzistas sole en la manuskripta formo; ricevita de Sidney Churchill, ĝi troviĝas en la librejo de la Brita Muzeo, sub la jena determino: »or.2942. Tarikh-i-Jadid. A history of the Bábís. A.H. 1298 (A.D. 1881).« (Rig.: »Travellers' Narrative.«)

Thamúd (Talmudo) Kolekto de la hebreaj civilaj kaj religiaj leĝoj, ne entenataj en la Kvinlibro. Ĝenerale ĝi konsistas el Miŝno kaj Gemaro, sed iafoje estos limigita nur al la lasta. Ĝi ekzistas en du grandaj kolektoj, la palestina Talmudo kaj la Talmudo de la lando de Izrael.

Țíhrán (Teherano) La ĉefurbo de Persujo.²⁰²

Tumano Monsumo egala al unu dolaro.

‘Urvatu’l-Vuthqa Laŭvorte: »la plej forta tenilo«, simbolo de la Dia Kredo.

²⁰²Noto de la tradukinto

Vahhláb Rig.: Káfi.

Váhid-i-Avval »La Unua Unuo«. Mírzá ‘Alí Muḥammad, Báb, dum Sia vivo elektis el inter Siaj plej fidelaj kaj spir-itkapablaj disĉiploj dekok personoj nomitajn »Literoj de la Vivanto« (Hurúfát-i-Hayy), kiuj kune kun Li mem, la »Punkto« (Nukta) formis sanktan anaron de la dekaŭ, nomitan la »Unua Unuo«.

Valí-‘Ahd Kronprinco.

Varaqatu’l-Firdaws Fratino de Mullá ḥusayn; ŝi estis en Karbilá en proksimaj rilatoj kun Ṭáhirih (Qurratu’l-‘Ayn).

Varaqatu’l-‘Ulyá Laŭvorte: »La Plej Altglora Folio«. La titolo, donata al la edzino de Bahá’u’lláh, la patrino de la »Plej Granda Branĉo«, ‘Abdu’l-Bahá.

Varaqiy-i-‘Ulyá Laŭvorte: »La Plej Granda Sankta Folio«. La titolo, donata al Bahíyyih Khánum, filino de Bahá’u’lláh kaj fratino de ‘Abdu’l-Bahá.

»**Yá Sahibu’z-Zamán**« »Ho Sinjoro de la Tempo!« Unu el la titoloj de la promesita Qá’im.

Yaḥyá (filo de Zaḥario kaj Elizabeto) Yaḥyá signifas Johano. Johano la Baptisto anoncis al la popolo de Izrael la ĝojan novaĵon pri la alveno de Kristo.

Yaḥyá (Mírzá) (ṣubh-i-Azal) Dunonfrato de Bahá’u’lláh, kiu perfidis Lian Aferon.

Yamál-i-Mubárák Laŭvorte: »la Benita Belo«. Titolo, donata al Bahá'u'lláh.

Yamal'-i-Qidam Laŭvorte: »la Pratempa Belo«. Titolo, donata al Bahá'u'lláh.

Yathrib Alia nomo de Medino. Yathrib estas nomo malnova; ĝi estis nomita »El Medinah«, »la urbo«, nur post kiam ĝi famiĝis, doninte rifuĝon al Mahometo.

Zanján Ĉefurbo de la provinco Khamsih, unu el la unuaj provincoj, kiuj akceptis la instruojn de Báb. Poste okazis la sieĝo kaj la amasbuĉo de la babanoj en Zanján.

»La provinco oriente de Kaflan-Kúh, inter Irako kaj Ád-hirbáyján. Ĝia ĉefurbo, Zanján, estas ĉirkaŭita per muro, ornamita per multaj turetoj, kiel estas kutime en Persujo, kaj prezentas tre pentrindan kaj belan vidaĵon. La loĝantaro konsistas el turkoj, kaj, escepte de la registaraj oficistoj, ooni malmulte aŭdas la persan lingvon.« (Nabil: »The Dawn Breakers«. Comte de Gobineau: »Les Religions et les Philosophies dans l' Asie Central.«)

Zaqqúm (arbo) Laŭvorte: »la infera arbo«.

Zawrá Baghdád. La nomo, aŭ, pli ĝuste epiteto Zawrá (la kurba) estas uzata rilate al almenaŭ dek diversaj lokoj. Sed en tiu ĉi libro kaj en similaj tiu ĉi epiteto koncernas Baghdádon, la sidejon de la perfidaj Abasidoj, tiel malamindaj al ĉiu vera ŝiano.

Zíyárat Sanktovizita Tabuleto, verkita de Imám 'Alí. (La Li-

bro de Sanktovizitado. »Kitábi-i-Zíyarat.«)

Zá La litero »Z«.

Zádih »Filo.«

Zaynu'l-Muqarrabín Laŭvorte: »ornamo de favorato«.

Zeynu'l-Mukarrabín Babana skribisto, aŭ, kiel li preferis esti nomata, Harfu'z-Zá, la litero »Z«. Lia laboremo estis neordinare granda; estas ekzemple notite pri la »67a kopio« de Kitáb-i-Íqán, farita de li sola.